


JIN PING MEI

aŭ

ORO, VAZO, UMEFLORO

金 瓶 梅



LA UNUA VOLUMO: LA ĈAPITROJ 1—20

第一卷 1—20 回

Verkita de Ridemulo el Lanling

兰陵笑笑生 著

Esperantigita de Wang Chongfang

王崇芳 世译

La tradukon kontrolis: Wei Yida, Zhao Jianping,

Mao Zifu, Xiong Linping, Laurent Vignaud

审读： 魏以达 赵建平 毛自富 熊林平

劳杭·维尼奥（法）

DANKOJN

Al la samideanoj Wei Yida (Vejdo), Zhao Jianping, Mao Zifu (Anteo), Xiong Linping (Minosun) kaj Laurent VIGNAUD; sen ilia sincera kaj efika kunlaboro, nome kontrolado de la traduko kiel en la enhavo, tiel ankaŭ en la lingvo, la teksto ne povus havi sian relative facilan legeblecon;

Al la sinjoroj Wang Bin kaj Mao Zifu kaj aliaj amikoj, kiuj liveris al mi necesajn rarajn materialojn kaj malfacile akireblajn aŭtentikan kompletan originalon kaj ĝiajn fremdlingvajn tradukojn kaj referencajn librojn; sen tiuj materialoj kaj libroj mi ne povus sukcese fini la tradukon;

Al ĉiuj amikoj, kiuj helpis kaj kuraĝigis min dum la tradukado en diversaj manieroj;

Al mia kara edzino kaj mia tuta familio; sen ilia plena prizorgo en la vivo mi neniel povus dediĉi mian trankvilan koron kaj mian tutan tempon al la traduko;

Al mia paro da kadukaj manoj, precipe la dekstra duonparaliziĝinta post la apopleksio (ĝi jam perdis la skribkapablon, sed feliĉe ankoraŭ povas frapadi komputilan klavaron); sen ilia diligenta, kvankam mallerta, laboro, mia modesta traduko neniel povus sin prezenti antaŭ la okuloj de la legantoj en Esperanta skriboformo.

Wang Chongfang, la tradukinto

鸣谢

感谢魏以达、赵建平、毛自富、熊林平、劳杭·维尼奥（法）五位世界语同道真诚有效的合作，没有他们在内容和文字上对译文的审读，译文不可能具有较好的易读性。

感谢王彬和毛自富先生提供了必要的珍贵资料和难以获得的全真原本和外文译本以及其他参考书，没有这些资料和书籍，本译本难以顺利完成。

感谢在我翻译过程中以各种形式给予帮助和鼓励的所有朋友。

感谢我的老伴儿和全家人在翻译过程中给予我生活上的悉心照料，以使我能安心地把全部时间都投入到翻译工作中。

感谢我的一双苍老的手，特别是中风后半麻痹的右手（它已经不能握笔写字，但幸运地尚能敲击键盘），没有它们笨拙但勤奋的工作，这部稚嫩的译作绝无可能以世界语文字形式呈现在读者面前。

译者 王崇芳

Atentigo al la legantoj:

La tradukinto rezervas al si la plenan kopirajton de tiu ĉi traduko.

Min kontaktu:

zjwcfsc@163.com

zjwcfsc@21cn.com

译者声明:

本世界语译稿未经译者同意，任何人不得大量复制并大批量群发或进行商业活动。引用译文必须注明出处。欢迎读者对译文中的错误和不妥处提出修改建议，但不得任意删改。

联系方式:

zjwcfsc@163.com

zjwcfsc@21cn.com

Tiu, kiu legas *Jin Ping Mei* kaj ekhavas kompaton, estas bodisatvo; tiu, kiu ekhavas teruron, estas noblulo; tiu, kiu ekhavas senton de agrabla ĝuo, estas malnoblulo; kaj tiu, kiu ekhavas la emon sekvi iliajn ekzemplojn, estas ulo neniom pli bona, ol brutaco.

Nur al tiuj, kiuj vere komprenas la signifon de tiu ĉi aserto, estas permesite legi tiun ĉi romanon.

—— el la *Antaŭparolo al Jin Ping Mei* ,

skribita de Rozari-Fingrumanto

读《金瓶梅》而生怜悯心者，菩萨也；生畏惧心者，君子也；生欢喜心者，小人也；生效法心者，乃禽兽耳。

若有人识得此意，方许他读《金瓶梅》也。

——摘自弄珠客《金瓶梅序》



La unua mirinda grandioza romano en la ĉina antikva literaturo.

ENKONDUKO

Inter la ĉinaj klasikaj romanoj *Jin Ping Mei* estas unike grandioza kaj mirindega verko. Ĝia konsterna mirindeco kuŝas ne sole en tio, ke ĝiaj kvintesencaj partoj estas tiel rimarkindaj kaj, aliflanke, ĝiaj riproĉeblaj partoj estas tiel terure okulfrapantaj, sed eĉ en la fakto, ke kvankam ĝi estis multfoje kondamnita kiel malpermesita libro dum pli ol kvarcent longaj jaroj post sia apero, tamen ĝi ĉiam ĉarmis kaj ĉarmas la sennombrajn legantojn per sia neimageble magia forto. Sekve, tute sen troigo, oni povas aserti, ke ĝi estas la sola romano, kiu estas la plej alloga kaj samtempe estas elmetata al plej multaj malaprobaj kaj riproĉoj. En la komencaj jaroj post sia publikiĝo ĝi iam estis laŭdegata kiel la unua el la kvar mirindaj romanoj (la ceteraj tri estas *La Romano pri la Tri Regno*, *Ĉe la Akvorando* kaj *Pilgrimo al la Okcidento*). Post la apero de *Ruĝdoma Sonĝo*, ne malmultaj literaturaj kritikistoj opiniis, ke *Ruĝdoma Sonĝo* estas kaŝita *Jin Ping Mei*, ke *Ruĝdoma Sonĝo* originis el *Jin Ping Mei*, kaj ke *Ruĝdoma Sonĝo* heredis kaj evoluigis *Jin Ping Mei*. Iu Okcidenta veterana ĉinologo kaj kritikisto pri la ĉina literaturo taksis ĝin jene: “La romano *Jin Ping Mei* estas tia historio, kian rakontis, kun ĉarmo terure granda, iu justa protokolanto pri la siatempa socia vivo miksis el mono, sekso kaj sangaj larmoj. Ĝi estas unu el la plej bonaj kaj plej kortuŝantaj ĉinaj klasikaj romanoj.” Jen kial tiu ĉi grandioza verko meritas esti esperantigita kaj prezentata al la vasta esperantistaro de la mondo.

Tiu ĉi verko konsistas el cent ĉapitroj. Ni komplete tradukis ĝin sen ajna ellaso.

La tradukinto Wang Chongfang

2019-12-17

译者导言

在我国古典名著中,《金瓶梅》是一部伟大的“奇书”。它的“奇”在于它的精华是那么突出,而招非议的部分又是那么触目;它的“奇”还在于它问世后漫长的四百余年间虽屡次遭禁,却仍有一种神奇的力量吸引着无数的读者。它是一部最吸引人、最招人非议的小说。它问世之初曾被盛赞为四大奇书中的第一奇书(其他三部是《三国》、《水浒》、《西游》)。《红楼梦》问世后,又有《红楼梦》是暗《金瓶梅》、脱胎于《金瓶梅》、继承发展《金瓶梅》之说。一位研究中国文学的西方老资格汉学家曾这样评价它:“《金瓶梅》仿佛是由一位公正的记录者讲述的一则由金钱、性及血泪交融一体的具有惊人魅力的那个时代社会现实的故事,是中国最优秀、最动人的一部古典小说。”因此,这部伟大的奇书值得译成世界语,向中外世界语者推介。

《金瓶梅》全书 100 回。本译本为无删节全译本。

译者 王崇芳 2019-12-17

ANTAŬPAROLO AL LA ESPERANTA TRADUKO DE *JIN PING MEI*

En la historio de la disvolviĝo de la ĉina literaturo, la dinastio Ming (1368—1644) estas epoko kun rimarkindaj karakterizaĵoj, kiuj estas ligitaj kun iuj apartaj trajtoj de tiu historia periodo. En la fruaj jaroj de la dinastio, la regantoj adoptis subpremajn rimedojn en la politiko kaj ideologio; sed kun la paso de jaroj la politika regado iom post iom moderiĝis. Precipe post la regperiodo de Wanli, pro la imperiestra neglekto de la regnaj aferoj, la leĝo kaj la disciplino ĉesis esti severaj, la administrado putriĝis, la tuta socio iom post iom perdis la severan regon. En tiuj cirkonstancoj, en la literatura verkado, multe disvolviĝis la du popularaj ĝenroj de literaturo, la opero kaj la romano: tio ŝuldiĝis al la malstreĉita politika regado kaj relativa libereco en ideologio. La granda kontribuo al la literaturo en tiu ĉi periodo estas la kreskado kaj maturiĝo de la ĝenro de romanoj. “La Kvar Mirindaj Romanoj” dum la dinastio Ming, nome *Jin Ping Mei*, *La Romano pri la Tri Regno*, *Ĉe la Akvorando* kaj *Pilgrimo al la Okcidento*, prezentas vivan bildon de la procezo de la disvolviĝo de la tradiciaj ĉinaj romanoj, kaj ili ĉiuj fariĝis senmortaj verkoj en la literatura historio.

《金瓶梅》世界语译本序言

在中国文学的发展史中，明代（1368—1644）是一个特殊的时期。这种特殊性是与明朝的历史的某些特点相关联的。明朝初期统治者在政治和思想上采取的是高压政策，但是过了若干年后，政治上逐渐松弛。特别是经历了万历朝以后，皇帝多年不问朝政，纲纪废弛。吏制腐败，整个社会在政治和思想上慢慢陷入失控状态。在这种情况下戏曲、小说等通俗文学得到了极大的发展。这与明朝后期上的失控和思想上的自由有关。明代“四大奇书”《金瓶梅》、《三国演义》、《水浒传》、《西游记》展现了中国古代长篇小说的发展过程，同时也各自成为文学史上的不朽之作。

La apero de *Jin Ping Mei* signas la maturiĝon de la klasikaj ĉinaj romanoj kiel en enhavo, tiel ankaŭ en formo. El la angulo de verkado, ĝi efektivigas la trarompon en kvar kampoj. Unue, la materialo de la romano komencas veni el la aktuala vivo. Diference de la antaŭaj romanoj, kiuj ĉerpis materialon aŭ temon el historiaj rakontoj, religiaj legendoj aŭ folkloro, *Jin Ping Mei*, anstataŭe, ĉerpas sian temon rekte el la aktuala vivo, kio estas radikala ŝanĝo al la antaŭa modelo de la romana verkado. Due, la intrigoj de la romano ne plu estas legendecaj. Prenante la ĉiutagan vivon de ordinaraĵoj kiel temon de priskribo, *Jin Ping Mei* havas en si preskaŭ neniujn abruptajn leviĝojn kaj malleviĝojn, nek kulminojn sin tuj sekvantajn, sed la priskriboj en ĝi estas multe pli detalaj, ol tiuj en la antaŭaj romanoj. Trie, sin trovas preskaŭ neniuj mirindaj herooj inter la personoj portretitaj en la romano. La oficialuloj, komercistoj, ĉeheimaj virinoj, prostituitinoj, geservistoj, urbaj senokupuloj kaj alispekaj personoj en ĝi, ili ĉiuj venas el la reala vivo, kaj neniuj el ili havas eksterordinaran saĝecon, fortegan volon, senegalajn militajn meritojn kaj brilajn atingojn, aŭ strangajn travivaĵojn, t.e. la romano donas pli da atento al la priskribo de la reala vivo, ol al la altiĝo de la legantoj simple per malsimplaj intrigoj. Kvare, la personoj en la romano estas kreitaj ne laŭ la antaŭa etika modelo de bono kaj malbono en absoluta kontraŭeco, sekve ili estas riĉaj je la dispozicioj, pli proksimaj al la vera homa naturo. Ĉio ĉi tio ebligas al la romano *Jin Ping*

*Mei trovi sian neanstataŭigeblan pozicion en la historio de la ĉina literaturo. Ĝia maniero de verkado rekte influis la kreon de la posta granda romano *Ruĝdoma Songó*.*

《金瓶梅》的出现，标志着中国古代的长篇从内容和形式都走向了成熟。从创作的角度来说，它实现了四个方面的突破：一是，小说素材的当代化。《金瓶梅》没有像过去的小说那样，从历史故事、宗教传说和民间传奇中寻求素材，而是直接取材于当代生活。这就彻底改变了过去小说的写作模式。二是，小说情节的非传奇化。《金瓶梅》以市井生活为自己的描写对象，它所写的基本上是市井人物的日常生活，情节上没有大的波澜，但细致的程度却大大超过了以前的小说。三是，小说人物的非英雄化。本书塑造了一批官员、商人、家庭女性、妓女、奴仆、市井帮闲，他们都是来自现实生活中的人物，既没有超凡的智慧和刚强的意志，也没有盖世的武功和奇特的经历。这就使小说摆脱了纯粹靠情节和故事吸引读者的传统，而更加注重于对现实生活的描写。四是，打破了过去小说中，善恶完全对立的道德模式。在人物性格的描写方面具有了丰富性，从而更贴近了真实的人性。这四个方面使《金瓶梅》奠定了它在中国文学史上不可取代的地位。它的这种写作模式，直接影响了后来的《红楼梦》的创作。

Jin Ping Mei estis skribita ĉirkaŭ la tempo de la fino de la 16a jarcento kaj la komenco de la 17a. Pri ĝia aŭtoro, ĉio, kion oni scias, estas nur la nomo “Ridemulo el Lanling” presita sur la kovrilo de la libro. Koncerne liajn veran nomon kaj karieron, oni scias nenion ĝis la nuna tempo.

《金瓶梅》大约成书于 16 世纪末到 17 世纪初。关于它的作者，我们只知道原书上署的是“兰陵笑笑生”，具体他叫什么名字，有什么样的经历，至今还不清楚。

Jin Ping Mei priskribas la historion de la riĉiĝo de parvenuo kaj lian familian vivon en la 16a jarcento de Ĉinio. Ĝia protagonisto Ximen Qing origine estas posedanto de vendejo de ĉinaj medikamentoj. Li koluzias kun la oficialuloj per subaĉetoj kaj sin okupas pri procesaj aferoj por siaj klientoj kun la subteno de la loka registaro, rapide akiras grandnombrajn riĉaĵojn, kaj, pavimante sian vojon per mono, fine fariĝas oficialulo. Dume li vivas ekstreme diboĉan vivon personan kaj familian kaj dronas en ekscesa luksemo kaj senbridaj voluptaj plezuroj, samtempe tenante malĉastajn rilatojn kun multaj virinoj. Rezulte de tio, lia sano estas serioze damaĝita kaj li mortas de subita malsano. Post lia morto, la riĉaĵoj de li akumulitaj baldaŭ falas en la manojn de aliaj, kaj liaj belaj kromedzinoj apartenas ĉiu al nova viro unu post alia, kaj la amikoj, kiuj iam lakee amasiĝis ĉirkaŭ li, konkure defraŭdas per ĉiu ebla rimedo liajn monon kaj riĉaĵojn.

《金瓶梅》写了中国 16 世纪一位暴发户的个人发迹史和家庭生活史。小说的主人公西门庆原本是一个开药铺的商人，他通过行贿勾结官府，然后又依靠官府包揽词讼，巧夺民财，迅速积累财富，最后用金钱开道，登上仕途。另一方面，他在家庭生活和个人生活上，又极度豪奢，纵欲无度，和众多女子有淫乱关系。这使得他的身体大大受到伤害，最后暴病身亡。他原来聚敛的钱财，在他死后迅速落入他人之手。他那些漂亮的妻妾，也分别有了新的归属。在他活着的时候，身边曾有很多朋友。等他一死，这些朋友则纷纷设法骗取他家的财物。

El la procezo de la riĉiĝo de Ximen Qing, ni povas vidi la disvolviĝon kaj trajtojn de la komercaĵa ekonomio, kaj ankaŭ la pozicion kaj la rolon de la nove leviĝanta komercistaro en la socio dum la dinastio Ming. La sukceso de Ximen Qing en la komerca kampo estas ŝuldata, kompreneble, al liaj inteligento, kapableco kaj bona administrado, sed, aliflanke, ankaŭ al lia koluziado kun la lokaj aŭtoritatoj kaj lia monopollo de la potenco. En efektiveco, tio ja estas universala trajto en la funkciado de la komercaĵa ekonomio en la aŭtokrata socio.

从西门庆的发迹过程，我们看到了商品经济在明代的发展情况和特点，及新兴的商人势力在社会上的地位和作用。西门庆在商业上的成功，既与他个人的精明强干、善于经营有关，也与他和政府官员勾结，掌握了权力的垄断有关。这可以说是专制社会中商业经济运作的一

个特点。

La titolo de la romano konsistas el tri ĉinaj ideografiaĵoj Jin (oro), Ping (vazo), kaj Mei (umefloro), kiuj respektive prezentas tri virinojn en la familio de Ximen Qing. Jin prezentas Oran Lotuson (kromedzinon de Ximen Qing), Ping, Florvazon (lian alian kromedzinon), kaj Mei, Umefloron (origine servistino de Ora Lotuso, kiu, post la morto de Ximen Qing, edziniĝas al la garnizona komandanto Zhou, kaj ludas sufiĉe gravan rolon en la posta parto de la romano). Sed iuj kritikistoj vidas en ili aludon al la tri reflektitaj bildoj de la ekscesa deziro de la homo je mono (Oro), alkoholo (la entenaĵo en Vazo) kaj seksdeziro (nome, pere de la simbolo Umefloro, vira volupta seksdeziro al virino). Ximen Qing havas ĉefan edzinon, Lunan Sinjorinon, kaj kvin kromedzinojn. La okazaĵoj inter tiuj ĉi virinoj formas la tutan historion de la familia vivo de Ximen Qing. Ili tenas bonajn rilatojn inter si en ŝajno, sed efektive intrigas kaj batalas unu kontraŭ la alia en kaŝeco pro ĵaluzo kaj por sia propra intereso, levante ondon post ondo da konfliktoj en la familio. Tiuj ĉi personoj en la romano estas tre vivaj en sia figuro kaj frapante distingaj unu de la alia en sia individueco.

这部小说的名字由三个字组成，它们分别代表了西门庆家中的三个女性。“金”指潘金莲（西门庆的妾），“瓶”指李瓶儿（西门庆的另一个妾），“梅”指庞春梅（潘金莲的丫鬟，她在西门庆死后嫁给了周守备，在后来的故事中起到了重要的作用）。不过，有些批评家则从中看出，它是对人的过度欲望的三个方面的影射（“金”指金钱，“瓶”指美酒，“梅”借女性指男人的性欲）。西门庆的妻子叫吴月娘，他还有五个妾。围绕着这些女性所发生的故事基本上构成了西门庆家庭生活史的全部。她们表面上和和气气，背地里勾心斗角，争风吃醋，掀起了一波又一波的矛盾。在小说中这几个人物形象非常生动，个性也极其鲜明。

En sia priskribo de la urbana vivo en la romano, la aŭtoro portretas ne nur Ximen Qing kaj liajn edzinon kaj kromedzinojn, kiuj dronas en luksa materiala ĝuo en la riĉegaj cirkonstancoj, sed ankaŭ nombron da malgravaj personoj ĉe la fundo de la socio, kiuj, por trovi al si vivrimedojn, kontraŭvole flatkomplezas al riĉuloj kaj potenculoj kaj lakee klopodadas inter ili, por akiri ilian favoron, sen la plej malgranda digno kaj eĉ sen moraleco kaj justeco. Inter ili sin trovas Ying Bojue, Xie Xida kaj similaj, kiuj estas ĵurligitaj fratoj de Ximen Qing, kaj ankaŭ bonzoj kaj bonzinoj, taŭistaj pastroj, kiuj ofte iras al la riĉulaj domoj por eta profito, la geservistoj kaj servoknaboj de Ximen Qing, prostituitinoj en bordeloj, kaj eĉ la ulo nomata Han Daoguo, kiu, pro mono, eĉ lasas sian edzinon adulti kun lia mastro, ktp, ktp. Kun tiuj personoj, la mondo en la romano estas pli riĉa kaj pli brilkolora, kio multe fortigas la satiran efekton. Krome, la artaj kvalitoj de la romano *Jin Ping Mei* ankaŭ estas reliefigitaj per la freŝa kaj viva stilo de la lingvo kaj per la vigla ritmo, en kiuj la personoj estas priskribitaj en siaj gajaj ridoj, koleraj blasfemoj, kaj mokaj kaj mordantaj diroj.

在《金瓶梅》所描写的市井生活中，作者不但成功塑造了在富裕的环境里耽于享乐的西门庆和他的妻妾们，还塑造了一批处于底层社会，为了衣食而曲意迎合、行走帮闲，没有尊严，甚至也没有道义感的小人物。他们中有与西门庆结拜过兄弟的应伯爵、谢希大等，有来往于有钱人家图些小利的僧人、道士和尼姑，有西门庆的家童，有妓院里的妓女，还有为了钱财而不惜让自己的老婆与主子通奸的韩道国等。他们的存在，使小说所描写的世界具有了丰富性，也使小说的讽刺意味大大地加强了。《金瓶梅》的小说艺术成就还突出地体现在文字鲜活的风格上，体现在描绘人物嬉笑怒骂洒脱的节奏上。

Tio, kion oni plej multe kritikas pri tiu ĉi romano, estas la kvanto da erotikaj priskriboj en ĝi, kaj sekve, dum longa periodo ĝi estis kondamnita kiel malpermesita libro, kio iagrade malhelpis ĝian disvastiĝon. Sed, aliflanke, ni ne povas ne konfesi, ke tiaj priskriboj ludas gravan rolon en la

portretado de la personoj kaj karakterizado de ilia karaktero aŭ psiko. Eĉ en la erotikaj priskriboj la aŭtoro tre bone kaptas la karakterajn trajtojn de la persono, farante distingon inter malsamaj figuroj: kiel ekzemple la megereco de Ora Lotuso, la malkaŝemo de Florvazo, la deteniĝemo de Luna Sinjorino, la akomodigiĝemo de Jada Turo, la naiveco de Aroma Lotuso, la senhonteco de Wang la Sesa, ktp, ktp.

这部小说最为人诟病的，是其中有色情描写的部分，所以在很长的一段时间里它一直是禁书，这一定程度上影响了它的传播。但是我们又不能不承认，这些描写对于塑造人物形象，刻画人物性格或心理，有着极为重要的作用。即使在性描写中，作者也较好地把握了人物的性格特征，使不同人物的性格有了区别。如潘金莲的泼辣，李瓶儿的老实，吴月娘的矜持，孟玉楼的随和，宋蕙莲的幼稚，王六儿的无耻，等等。

La romano *Jin Ping Mei* havas tri ĉefaj eldonoj. Inter ili, la plej frua estas *Jin Ping Mei Ci Hua* (*Jin Ping Mei* kun Partoj en Versoj), kies unuaj kvin ĉapitroj estas eltiritaj el la koncernaj partoj pri Wu Song en la romano *Ĉe la Akvorando* kun modifoj, kaj kies teksto estas enmetita per granda kvanto da versoj. La dua estis unufoje publikigita en la regperiodo de la imperiestro Chongzhen, kun la kompleta titolo *Nova Eldono de Jin Ping Mei kun Ilustraĵoj kaj Komentoj*, kiu faras adekvatajn mallongigojn kaj modifojn al la teksto kaj forstrekas iujn partojn de versoj kaj la rakonton pri Wu Song en la komenco, kiu estas anstataŭigita per la rakonto pri Ximen Qing, tiel ke la konsisto de la verko fariĝas pli kompakta kaj la lingvo pli konciza, kaj, krome, pli ol 200 ilustraĵoj estas enmetitaj en tiun ĉi eldonon. La tria estas tiu kun komentoj de Zhang Zhupo, kun la kompleta titolo *La Unua Mirinda Romano kun Komentoj de Gao He Tang*. Zhang Zhupo (1670—1698), indiĝeno de Xuzhou en la provinco Jiangsu, faris pluan reviziadon al la teksto surbaze de la eldono de Chongzhen kaj aldonis grandan kvanton da komentoj, el kiuj multaj estas tre trafaj, kaj el liaj originalaj opinioj pri la temo kaj arto de romana verkado, ne malmultaj estas ankoraŭ valoraj eĉ en la nuna tempo.

《金瓶梅》的版本主要有三个系统。其中出现最早的《金瓶梅词话》系统。这个系统的前五回是从《水浒传》中的有关章节演化出的，主要写武松的故事，而且文中杂有大量的韵文。第二个系统是崇祯本，其全名为《新刻绣像批评金瓶梅》。这个系统的本子，对《词话本》作了适当的删改，略去了部分韵文，还删去了开篇关于武松的故事，换成了关于西门庆的故事，所以读起来显得更加紧凑，文字也更为精炼。另外，书中还配有二百余幅插图。第三个系统是张竹坡批评本，全名为《皋鹤堂批评第一奇书金瓶梅》。张竹坡生于 1670 年，卒于 1698 年，是江苏徐州人。他在崇祯本的基础上又对小说的原文作了进一步修改，并添加了大量的批语。张的批语有许多精彩的地方，他对该小说的主题和艺术都有独到的理解，有不少评论在今天看来仍有价值。

La romano *Jin Ping Mei* havas apartan gravecon en la monda literaturo. Ĝi jam estas tradukita en multajn fremdajn lingvojn, kiel ekzemple la japanan, korean, vjetnaman, francan, germanan, rusan, anglan, araban, hispanan, italan, hungaran, rumanan, ĉeĥan, svedan, finnan, danan, latinan, ktp. En iuj lingvoj eĉ aperis pluraj tradukversioj.

《金瓶梅》在世界文学中有其特殊的意义。它已经被译成了日、韩、越南、法、德、俄、英、阿拉伯、西班牙、意大利、匈牙利、罗马尼亚、捷克、瑞典、芬兰、丹麦、拉丁文等外文译本。有的语种还出现多种译本。

Nia Esperanta versio estas tradukita el la originalo de la eldono de Zhang Zhupo, kun referenco al la tri fremdlingvaj tradukoj, kiuj estas: *The Golden Lotus*, tradukita de la angla ĉinologo Clement Egerton (paralela ĉina-angla eldono, en kvin volumoj, Biblioteko de Ĉinaj Klasikaĵoj), *Fleur en Fiole d'Or*, tradukita de la franca ĉinologo André Lévy (paralela ĉina-franca

eldono, en kvin volumoj, Biblioteko de Ĉinaj Klasikaĵoj) kaj *The Plum in the Golden Vase or, Chin P'ing Mei*, tradukita de la usona ĉinologo David Tod Roy (1933—2016), publikigita de Princeton University Press, en kvin volumoj. La traduko de Clement Egerton estis farita surbaze de la eldono de Zhang Zhupo; entute lia traduko estas fidela al la originalo, sed bedaŭrinde la tradukisto intence evitis multajn poemojn en la originalo. La franclingva traduko de André Lévy kaj la anglalingva traduko de David Tod Roy estis tradukitaj el la originalo de *Jin Ping Mei Ci Hua*. Kvankam en la du tradukoj la versaj partoj estas komplete tradukitaj, tamen multaj el la poemoj en la eldono de *Jin Ping Mei Ci Hua* estas diferencaj de tiuj en la eldono de Zhang Zhupo.

本世界语译本，依据张竹坡批评本，并参照三种外文译本。它们是英国汉学家克莱门特·埃杰顿（Clement Egerton）翻译的英译本，书名译为“*The Golden Lotus*”（大中华文库五卷汉英对照本），法国汉学家安德烈·勒维 André Lévy 翻译的法译本，书名译为“*Fleur en Fiole d'Or*”（大中华文库汉法五卷对照本），美国汉学家芮效卫（David Tod Roy, 1933—2016）翻译的五卷英译本（普林斯顿大学出版社），书名译为“*The Plum in the Golden Vase or, Chin P'ing Mei*”。埃杰顿的英译本所依据的中文底本是张竹坡批评本，从整体看它的译文忠实于原文，但遗憾的是它略去了许多诗词等韵文。勒维的法译本和芮效卫的英译本所依据的中文底本是词话本，其中的诗词部分虽全部译出，但词话本中的很多诗词与张竹坡批评本中的诗词不完全相同。

La unua volumo de la anglalingva traduko de David Tod Roy estis publikigita en la jaro 1993, kaj poste, en ĉiu kvara aŭ kvina jaro, aperis unu sekva volumo, ĝis en 2013 eldoniĝis la lasta (kvina) volumo. Por la traduko de tiu ĉi kolosa verko li fordonis proksimume 40 jarojn el sia vivo. Ĝeneraldire, li tradukis la tekston laŭ la metodo laŭvorta, farante klarigan noton aŭ zorgan esploron al ĉiu literatura aŭ historia aludo, kultura detalo, vulgara diro, proverbo, duparta alegoria kutimdiro (el kiu la unua parto estas klariga, dum la dua parto, esprimita aŭ ne, portas la intencitan ideon), kaj eĉ slango propra al la Ming-dinastia periodo, kiu estas malmulte konata al la nuntempuloj, kaj entute la notoj en la tuta traduko sumiĝas je pli ol 4400! Jen kial oni diras, ke lia traduko estas ne sole versio por apreza legado, sed eĉ enciklopedieca referenca faklibro por la esplorantoj de la ĉina antikva kulturo. Se oni diras, ke la traduko de Clement Egerton estas populara versio konvena al la legado de ordinaraj legantoj, tiu de David Tod Roy devus esti versio pli aŭ malpli akademia, sekve, konsidere al tiu ĉi fakto, dum la tradukado mia esperanta versio konstante ĉerpis multon el la unua, kun konsultado al la dua nur tiam, kiam mi renkontis problemon koncernantan malfacile tradukeblan esprimon aŭ kulturan detalon aŭ aldonon de nepre necesa noto. Plie, mi ankaŭ kopiis la pli ol 200 ilustraĵojn en la originalo kaj enmetis ilin en ĉiun koncernan ĉapitron de la traduko. Konsidere de la grandamplekseco de tiu ĉi verko, mia esperanta traduko, sekvante la manieron de la Biblioteko de Ĉinaj Klasikaĵoj kaj la anglalingva traduko de David Tod Roy, ankaŭ aperos en kvin volumoj, kun ĉiu volumo entenanta dudek ĉapitrojn.

La tradukinto Wang Chongfang

2020-04-09

芮效卫的英译本第一卷出版于 1993 年，之后每隔若干年推出一卷，于 2013 年译完最后一卷（第 5 卷）。为了翻译这部巨著，他耗废了将近 40 年的时间。他基本采用直译的方式，对书中所有文学、历史典故和文化细节以及俗语、谚语、歇后语，甚至鲜为人知的明代俚语等都作了注释，注释达 4400 多条！因此它不仅仅是一个译本，也是一部研究中国古代文化的百科全书式的参考书。如果说埃杰顿的译本是供大众阅读的通俗译本，芮效卫的译本则是偏重学术性的译本。因此本译本在行文上借鉴前者较多，而在难译的词语和文化细节以及必要的注释等方面，则借鉴后者较多。另外，我也把原本中的 200 幅插图全部复制出来，插在

译文的每一回中。考虑到《金瓶梅》卷帙浩繁，本世界语译本仿效大中华文库和芮效卫英译本的做法，也以五卷本的形式分期推出。

译者 王崇芳

2019-04-09

ANTAŬPAROLO AL *JIN PING MEI* KUN PARTOJ EN VERSOJ

Skribita de Ĝojemulo

欣欣子: 《金瓶梅词话》序

Mi arogas al mi opinii, ke en la skribado de *Rakonto pri Jin Ping Mei* la Ridemulo el Lanling certe enfokusigis sian atenton sur la ĝenerale regantajn morojn de sia epoko, pri kiuj li probable havis ion por esprimi.

窃谓兰陵笑笑生作《金瓶梅传》，寄意于时俗，盖有谓也。

El la sep sentoj¹ nature propraj al la homo, la malĝojo estas la plej noca al la sano. Por la homoj de la supera saĝeco, kiuj kapablas ĉiam akomodi sin al la konstanta ŝanĝiĝo de la Naturo, la malĝojo estas kiel nebulo aŭ glacio, kiu povas per si mem malaperi aŭ degeli; sekve estas nenecese paroli pri tia malutilo al tiuj ĉi personoj. Eĉ la homoj de meza saĝeco, kiuj scias dispeli la malĝojon helpe de la racio, nature povas esti liberaj de tia embaraso. Sed el la ordinaruloj, kiuj nek povas lumigi sian koron per tia saĝeco, nek kapablas kompreni la konfuceanajn klasikaĵojn, por mildigi sian malĝojon, preskaŭ neniu sukcesas eviti la nocon de la malĝojo al iliaj menso kaj korpo.

人有七情，忧郁为甚。上智之士，与化俱生，雾散而冰裂，是故不必言矣。次焉者，亦知以理自排，不使为累。惟下焉者，既不出于于心胸，又无诗书道腴可以拨遣，然则不致于坐病者几希！

El la konsidero pri tiu ĉi fakto, mia amiko, Ridemulo el Lanling, elĉerpis kaj enverŝis la saĝecon akumulitan dum sia vivdaŭro en la komponadon de tiu ĉi kolosa verko, kiu entute konsistas el cent ĉapitroj. Ĝiaj paroloj kaj esprimoj estas frapante originalaj, kaj rikoltas universalan laŭdon kaj ĝeneralan admiron. Ĝi estis verkita kun neniu alia celo, ol lumigi la fundamentajn homajn interrilatojn, instigi homojn al la abstino de malĉasteco, helpi al ili distingi puron de malpuro, edifi kiel la malbonulojn, tiel ankaŭ la bonulojn, kaj meti en lumon la sekretojn de prospero kaj malprospero, sukceso kaj malsukceso, pere de la nehaltigebla funkciado de la karmaj kaŭzo kaj efiko, en tia maniero, kvazaŭ ili kuŝas nude rivelitaj antaŭ la okuloj de la legantoj. En la verko, de la komenco ĝis la fino, la fadenoj de la intrigo estas tiel komplike, sed tre klare, interplektitaj, kiel la sistemo de la arterioj kaj vejnoj en la homa korpo, aŭ kiel miriadoj da silkaj fadenoj, kiuj flirtas en la vento tute sen implikiĝi. La verko estas tiel alloga, ke la legantoj povas, preskaŭ en ĉiuj okazoj, esti tiel forte absorbitaj, ke ĝin legante, ili forgesas komplete sian malĝojon, kun komprenema rideto.

吾友笑笑生为此，爰罄平日所蕴者，着斯传，凡一百回。其中语句新奇，脍炙人口。无非明人伦、戒淫奔、分淑慝、化善恶，知盛衰消长之机，取报应轮回之事，如在目前；始终如脉络贯通，如万丝迎风而不乱也。使观者庶几可以一晒而忘忧也。

Estas preskaŭ neadeble, ke en tiu ĉi verko la lingvo ŝajnas esti iom vulgara, kaj ĝia atmosfero odoras je troaj ŝminko kaj pudro. Sed mi volus aserti, ke oni devus doni al tio nenian atenton, ĉar eĉ la unua kanto *Amindumo en Libro de Poezio*² estas karakterizita de Konfuceo kiel “esprimanta

ĝojon sen malĉasteco kaj malĝojon sen korŝira doloro”. “La riĉeco kaj la altrangeco ja estas tio, kion ĉiu deziras”, sed tre malmultaj estas tiuj, kiuj ĝuas ilin sen sin turni al diboĉo. La malĝojoj kaj rankoro estas la sentoj, kiujn ĉiu abomenas, sed tre malmultaj estas tiuj, kiuj povas sperti ilin sen sin vundi.

其中未免语涉俚俗，气含脂粉。余则曰：不然。《关雎》之作，乐而不淫，哀而不伤。富与贵，人之所慕也，鲜有不至于淫者；哀与怨，人之所恶也，鲜有不至于伤者。

Mi legis multajn tiajn verkojn de literaturistoj de la antaŭaj tempoj, kiaj estas ekzemple *Novaj Rakontoj ĉe la Lampo kun Tondita Meĉo* de Lu Jinghui, *Rakonto pri Yingying* de Yuan Zhen, *Kolekto de Mallertaj Imitaĵoj* de Zhao Bi, *Ĉe la Akvorando* de Luo Guanzhong, *Amuzaj Rakontoj pri Pasio* de Qiu Qiongsan, *Elegantaj Eseoj pri Amsopiro* de Lu Meihu, *Puraj Konversacioj ĉe la Kandellumo* de Zhou Jingxuan, kaj ankaŭ la postaj verkoj kiel ekzemple *Rakonto pri Laŭdeziraĵo*, *Rakonto pri Zhang Yuhu*. Iliaj lingvaĵoj estas tiel preciozaj, ke legantoj plejofte ne povas ĝui ilin kun facileco kaj jam forĵetas ilin flanken kun bedaŭro, antaŭ ol atingi la finon.

吾尝观前代骚人，如卢景晖之《剪灯新话》、元微之之《莺莺传》、赵君弼之《效顰集》、罗贯中之《水浒传》、丘琼山之《钟情丽集》、卢梅湖之《怀春雅集》、周静轩之《秉烛清谈》，其后《如意传》、《于湖记》，其间语句文确，读者往往不能畅怀，不至终篇而掩弃之矣。

Koncerne tiun ĉi verkon, kvankam ĝi estas esprimita plejparte per la ĉiutaga lingvo de la urba bazono aŭ la buduaraj babiloj, tamen eĉ tri-futa infano povas trovi plezuron kun kompreno, kiam li aŭdas alies legon de ĝi, kvazaŭ tiam li suĉus la Ĉielan nektaron aŭ palpus la balenan dentegon. Kvankam ĝi povas ne esti egala al la klasikaĵoj de la antikvaj tempoj, tamen ĝia profunda signifo kaj ĝia vigla kaj humura stilo estas sufiĉe elstaraj, por indigi ĝin je alta konsidero. Krome, rilate la moralan reformadon de la epoko, la kondamnon de la malbono kaj instigon al la bono, la purigon de la menso kaj nobligon de la koro, ĝi ja povus esti konsiderata kiel verko kun siaj konsiderindaj bonkvalitoj.

此一传者，虽市井之常谈，闺房之碎语，使三尺童子闻之，如飫天浆而拔鲸牙，洞洞然易晓。虽不比古之集理趣，文墨绰有可观。其它关繫世道风化，惩戒善恶，涤虑洗心，不无小补。

Koncerne tiujn aferojn, kiuj okazas en la dormoĉambro, ĉiu en efektiveco sentas sin forte allogata al ili, sed, aliflanke, ĉiu ŝajnigas, ke li forpuŝas ilin kun abomeno. La ordinaraĵoj ne estas sanktuloj aŭ saĝuloj, kiaj estis Yao kaj Shun³, sekve ekzistas tre malmultaj homoj, kiuj povas eviti droni en karnaj plezuroj. Jen kial eĉ la plej bonaj el tiuj, kiuj atingis riĉecon kaj altrangecon, preskaŭ ĉiuj permesas al sia koro esti ŝancelita kaj al sia ambicio difektita.

譬如房中之事，人皆好之，人皆恶之，人非尧舜圣贤，鲜不为所耽。富贵华色，是以摇动人心，荡其素志。

Rigardu: kiel grandiozaj estas la altaj domoj; kiel profundaj estas la nubaj fenestroj kaj nebulaj ĉambroj; kiel pompaj estas la oritaj ekranegoj kaj broditaj litaĵoj; kiel allogaj estas la nuboj da virinaj haroj kaj la apetitivekaj molaj kaj blankaj mamoj; kiel diligente dancas la virfeniksoj kaj feniksinoj, por plaĉi unu al la alia; kiel luksaj estas la brokitaj vestoj kaj la delikataj nutraĵoj, kiel romantikaj estas la belulinoj kaj talentuloj en sia prikanto de la venteto kaj la luno; kiel diboĉaj estas la aromaj langoj reciproke suĉitaj, kiam la jadosimilaj salivogutoj intermiksiĝas; kiel senbridaj estas la paro da jade delikataj brakoj, kiuj estas interplektitaj kaj reinterplektitaj, kaj la paro da lilie belaj piedetoj, kiuj sin ĵetas kaj reĵetas en sia svingiĝado!

观其高堂大厦，云窗雾阁，何深沉也；金屏绣褥，何美丽也；鬓云斜亸，春酥满胸，何婬媚也；雄凤雌凰迭舞，何殷懃也；锦衣玉食，何侈费也；佳人才子，嘲风咏月，何绸缪也；

鸡舌含香，唾圆流玉，何溢度也；一双玉腕绉复绉，两只金莲颠倒颠，何猛浪也。

Certe, tio estas feliĉo. Kaj tamen, kiam ĝojo atingas sian kulminon, ĝi naskas malĝojon. Okazo por disiĝo venas, alportante marasmon al la belaj vizaĝoj: tio estas neevitebla. La bezono pluki umeflorojn kaj sendi ilin⁴ per kuriero aŭ konfidi sian amon sur pecon da silko kaj lasi ĝin komunikata per fiŝo⁵, ja estas afero farenda nur tiam, kiam oni havas neniun alian elekton. Katastrofoj kaj malfeliĉoj, disiĝoj kaj migrado en malfacilegoj, estas neeviteblaj en la homa vivo. Oferto de la vivo al glavo aŭ lanco neniel povas esti antaŭmalhelpata. En tiu ĉi mondo regas la imperiestra leĝo, kaj en la submondo estas fantomoj kaj spiritoj: ilin neniue povas eviti. Kaj koncerne la okazojn, ke, se iu adultas kun alies edzino aŭ filino, lia propra edzino aŭ filino adultos kun alia viro, aŭ ke katastrofo kaj malfeliĉo estas la rezulto de akumulitaj malbonfaroj, kaj bona fortune kaj feliĉo la rekompenco por bonfaroj: ili ĉiuj povas esti resumitaj kiel efiko de la ciklo de fatala repago.

既其乐矣，然乐极必悲生：如离别之机将兴，憔悴之容必见者，所不能免也；折梅逢驿使，尺素寄鱼书，所不能无也；患难迫切之中，颠沛流离之顷，所不能脱也；陷命于刀剑，所不能逃也；阳有王濛，幽有鬼神，所不能遁也。至于淫人妻子，妻子淫人，祸因恶积，福缘善庆，种种皆不出循环之机。

Sekve la Ĉielo havas siajn printempon, someron, aŭtunon kaj vintron, ĝuste kiel la homo siajn ĉagrenojn kaj ĝojojn, disiĝojn kaj rekuniĝojn, kio estas natura kaj tute ne miriga. Koncerne tiujn, kiuj agas konforme al la Ĉielaj sezonoj, en la longa periodo iliaj posteuloj ĝuos daŭran prosperon, kaj en la mallonga tempo ili serene vivos sian vivdaŭron Ĉieldonacitan. Koncerne tiujn, kiuj agas kontraŭ la Ĉielaj sezonoj, ili per tio ruinigos ne sole sian reputacion, sed eĉ sian vivon, kaj katastrofo trafos ilin, antaŭ ol ili havos la tempon turni sian kalkanon. Ĉar neniue en la mondo povas eskapi la periodajn ciklojn de la tempo, tial tiuj, kiuj restas nevunditaj de la kruela sorto kaj neinfektitaj de malhonoro dum sia vivdaŭro, povas esti kalkulitaj kiel vere feliĉaj.

故天有春夏秋冬，人有悲欢离合，莫怪其然也。合天时者，远则子孙悠久，近则安享终身；逆天时者，身名罹丧，祸不旋踵。人之处世，虽不出乎世运代谢，然不经凶祸，不蒙耻辱者，亦幸矣。

Jen kial, laŭ mia observo, mi arogas al mi opinii, ke sinjoro Ridemulo en la skribado de tiu ĉi verko probable havis ion por esprimi.

吾故曰：笑笑生作此传者，盖有所谓也。

Skribita de Ĝojemulo en sia kabineto en la vilaĝo Mingxuan.

欣欣子书于明贤里之轩。

Notoj:

1. La sep sentoj: t.e. ĝojo, kolero, malĝojo, timo, amo, malamo kaj deziro.
2. *Libro de Poezio*: ĉina unua kolekto de poemoj.
3. Yao kaj Shun: du legendaj saĝaj reĝoj en la praantikva Ĉinio.
4. En la ĉina kulturo, sendi frondon da umefloroj al amiko estas simbolo de profunda amikeco. Antikvuloj kredis, ke fiŝo povas porti mesaĝojn.

5. Letero estis nomata *Chisu* (尺素) en la antikva Ĉinio. Antikvaj ĉinoj skribis leteron sur blanka silka tuko longa ĉirkaŭ 13 colojn, sekve la letero estis nomata ankaŭ *Chisu*. Antikva poemo diris: “Iu vojaĝanto veninta de malproksima loko, / Alportas al mi keston en karpa formo. / Mi diris al mia filo, ke li tuj malfermu la keston, / Kaj en ĝi ni trovas longan leteron skribitan sur silko.” (客从远方来，遗我双鲤鱼；呼儿烹鲤鱼，中有尺素书).

ANTAŬPAROLO AL *JIN PING MEI*

Skribita de Rozari-Fingrumanto el Dongwu

La romano *Jing Ping Mei* estas obscena libro. Sed, malgraŭ tio, la klerulo Yuan Hongdao laŭdis ĝin tiel alte, kiel li povis, kaj samtempe ankaŭ esprimis sian propran opinion. Laŭ li, la aŭtoro ja havis siajn proprajn intencojn, kiuj estis pli admonaj, ol instigaj. Kiel ekzemple, multaj virinoj ludas rolon en la romano, sed la fakto, ke la aŭtoro emfaze elektis kaj uzis nur la nomojn de Ora Lotuso, Florvazo kaj Umeffloro por formi sian titolon, estas ekzemplo de la tipo de historiografio, kiu povas esti ekzemplita per la *Taowu* de la regno Chu¹. En la romano, Ora Lotuso mortis pro sia adulto, Florvazo mortis pro sia ŝarĝo de pekoj, kaj Umeffloro mortis pro sia malĉasto, el kiuj ĉiu venis al vivfino multe pli tragika, ol iu ajn el la aliaj virinoj. La aŭtoro uzis la portreton de Ximen Qing por prezenti la grandan krimecon de la mondo, uzis la portreton de Ying Bojue por prezenti la klaŭnecon de la mondo, kaj uzis la portretojn de ĉiuj tiuj diboĉaj virinoj por prezenti la virinan klaŭnecon aŭ krimecon de la mondo. Liaj priskriboj de tiuj ĉi portretoj estas tiel frapante efektaj, ke ni, legante ilin, ne povas ne ekŝviti de surprizo. Sekve la intencoj de la aŭtoro ja devas esti pli admonaj, ol instigaj.

Mi iam diris, ke “tiu, kiu legas *Jin Ping Mei* kaj ekhavas kompaton, estas bodisatvo; tiu, kiu ekhavas teruron, estas noblulo; tiu, kiu ekhavas senton de agrabla ĝuo, estas malnoblulo; kaj tiu, kiu ekhavas la emon sekvi iliajn ekzemplojn, estas ulo neniom pli bona, ol brutaco.”

Mia amiko Chu Xiaoxiu iam akompanis junulon al bankedo, ĉe kiu gajaj kantoj kaj dancoj estis prezentataj. Kiam la teatra sceno “*la Brava Reĝo Festenas en la Nokto*”² estis ludata, la junulo diris kun envia admiro: “Kiel la vivo de vera viro povas esti alia, ol tiu ĉi?”

“La fakto estas,” respondis Xiaoxiu, “ke tiu ĉi sceno estas ludata nur por prezenti fortan kontraston kun la tragika elnodiĝo.”

La ĉeestantoj, kiuj aŭdis tiun ĉiiron, admiris la saĝecon de lia komento.

Sekve mi opinias, ke nur al tiuj, kiuj vere komprenas la signifon de tiu ĉi aserto, estas permesite legi tiun ĉi romanon. Alie Yuan Hongdao riskas esti akuzita kiel senhonta instiganto de senbridaj seksaj plezuroj.

Jen konsilo mia: la homoj de tiu ĉi mondo neniel devus sekvi la paŝojn de Ximen Qing!

Hazarde skribita de Rozari-Fingrumanto el Dongwu sur la vojo al Suzhou

Lastan monaton de la vintro de la tria jaro de la regperiodo Wanli

Notoj:

1. Taowu estas la nomo donita al la analoj de la regno en la antikveco, ĝi ne plu ekzistas, sed estas menciita en la klasikaĵo *Mengzio*. Laŭ la tradicia interpreto la vorto taowu estis la nomo de feroce mita besto kaj estis elektita kiel la titolo de historia verko pro tio, ke ĝi estis uzata por servi kiel admona negativa ekzemplo. Jen vd. la tekston el *Mengzio*. Mengzi diris: “Kiam oni ne plu kolektis kantojn por la reĝoj, poemoj ĉesis esti kolektataj. Kiam poemoj ĉesis esti kolektataj, la analoj *La Printempoj kaj Aŭtunoj* estis skribitaj. La Sheng de la regno Jing, La *Taowu* de la regno Chu, kaj La *Printempoj kaj Aŭtunoj* de la regno Lu estas libroj de la sama kategorio. La eventoj registritaj estis aferoj pri la duko Huan de la regno Qi kaj la duko Wen de la regno Jin, kaj la stilo estas tiu de historiaj kronikoj. Konfuceo diris: ‘Mi arogis al mi uzi la didaktikajn principojn de *Libro de Poezio* en mia libro

Printempoj kaj Aŭtunoj.”

2. La Brava Reĝo: lia nomo estis Xiang Ji (232—202 a.K.), aŭ Xiang Yu, kiu naskiĝis en Xiaxiang (okcidente de la nuna gubernio Suqian en la provinco Jiangsu). Li estis unu el la feŭduloj en la lastaj jaroj de la dinastio Qin. Kiam la dinastio Qin estis renversita, li memtitolis sin la Brava Reĝo de la Okcidenta Chu. Kiam li estis sieĝita de la armeo de Liu Bang en Gaixia en 202 a.K., li kantis la Kanton de Gaixia al sia edzino Yuji en patoso kaj malĝojego, antaŭ ol li sin mortigis ĉe la rivero Wu.

金瓶梅序

《金瓶梅》，稗书也。袁石公亟称之，亦自寄其牢骚耳，非有取于《金瓶梅》也。然作者亦自有意。盖为世戒，非为世劝也。如诸妇多矣，而独以潘金莲、李瓶儿、春梅命名者，亦楚《杙机》之意也。盖金莲以奸死，瓶儿以孽死，春梅以淫死，较诸妇为更惨耳。借西门庆以描画世之大净，应伯爵以描画世之小丑，诸淫妇以描画世之丑婆、净婆，令人读之汗下。盖为世戒，非为世劝也。余尝曰：读《金瓶梅》而生怜悯心者，菩萨也；生畏惧心者，君子也；生欢喜心者，小人也；生效法心者，乃禽兽耳。余友人褚孝秀，偕一少年，同赴歌舞之筵。衍至霸王夜宴，少年垂涎曰：男儿何可不如此！孝秀曰：也只为这乌江，设此一着耳。同座闻之，叹为有道之言。若有人识得此意，方许他读《金瓶梅》也。不然，石公几为导淫宣欲之尤矣。奉劝世人，勿为西门之后车可也。

万历丁巳季冬，东吴弄珠客漫书于金阊道中。

POSTPAROLO

La romano *Jin Ping Mei* estas fablo kreita de eminenta literaturisto. Ĝiaj satiraj sagoj estas direktitaj al la celoj de la samtempuloj. Sed, ĉu la ekspliciteco, per kiu la aŭtoro elmetis la malbelajn aspektojn de la homa vivo al plena lumo, ne estas ankaŭ konforma al la celo de nia antaŭa granda instruisto, Konfuceo, kiam tiu ne forstrekis la kantojn de Zheng kaj Wei el *Libro de Poezio*¹? La maniero, en kiu, per incidento post incidento en la romano, la aŭtoro penis semi la semojn de karmaj kaŭzo kaj efiko, klare kaj sendube montras, ke li ja estas homo de granda kompatato.

Tiuj, kiuj helpas al la disvastigo de tiu ĉi libro en la estonteco, faros senliman bonfaron. Kaj tamen ekzistas eĉ tiuj, kiuj ignoras tion ĉi kaj rigardas la libron kiel pornografian. Tiel agante, ili ne nur ne komprenas la celon de la aŭtoro, sed ankaŭ maljuste distordas la intencojn de tiuj, kiuj ĝin disvastigas.

Jen la celo de tiu ĉi postparolo, por fari tiun ĉi klarigon.

Skribita de Niangong²

Notoj:

1. Zheng kaj Wei estis la nomoj de du malgrandaj regnoj en la antikva Ĉinio. Ĝiaj popolaj muzikaĵoj kaj kantoj estis rigardataj kiel malĉastaj. Sed en *Libro de Poezio*, kiu estis redaktita de Konfuceo, tiuj kantoj estas inkluzivitaj.

2. La identeco de Niangong estas nekonstatebla.

廿公跋

金瓶梅传为世庙时，一巨公寓言，盖有所刺也。然曲尽人间丑态，其亦先师不删郑卫之旨乎？中间处处埋伏因果，作者亦大慈悲矣。今后流行此书，功德无量矣。不知者竟目为淫书，不惟不知作者之旨，并亦冤却流行者之心矣。特为白之。





PRONONCA ŜLOSILO DE LA PROPRAJ NOMOJ EN NIA ESPRIMARO

专有名词中汉语拼音字母读法

La ĉinaj propraj nomoj latinigitaj laŭ la ĉina oficiala sistemo de transskribo povas esti prononcataj proksimume kiel la Esperantaj kun la jenaj esceptoj:

Konsonantoj:

ch = ĉ h = ĥ j = ĝj q = ĉj r = ĵ sh = ŝ w = ŭ x = ŝj y = j zh = ĝ

Kombinoj de vokaloj:

ai = aj ei = ej ao = aŭ ou = oŭ ia = ja ie = je iao = jaŭ iou = joŭ uo = ŭo uai = ŭaj
uei = ŭej uan = ŭan uang = ŭang weng = ŭeng yu = ju ŭ = ju u post j, q, x = ju

ĈAPITRO 1

XIMEN QING ĴURE INTERFRATIĜIS KUN SIAJ FRIPONAJ AMIKOJ
kaj
WU SONG HAZARDE RENKONTIS SIAJN PROPRAJN FRATON KAJ BOFRATINON

第一回 西门庆热结十弟兄 武二郎冷遇亲哥嫂

I

*Kiam la riĉeco estas for, la stratoj dezertiĝas;
Tiam silentas la muzika sono kaj la kanta voĉo.
La brava glavo perdas siajn terurecon kaj brilon;
La trezora liuto rompiĝas, palas ĝia ora ornamaĵo.*

诗曰:

豪华去后行人绝, 箫箏不响歌喉咽。
雄剑无威光彩沉, 宝琴零落金星灭。

II

*La marmoran peronon vizitas nur la aŭtuna prujno;
La pala luno brilas super la iama gaja amuzejo.
Vidiĝas tie nek amuza spektaklo, nek belulinoj,
Ili reduktiĝis jam al cindro en la Okcidentaj Tomboj.*

玉阶寂寞坠秋露, 月照当时歌舞处。
当时歌舞人不回, 化为今日西陵灰。

III


*Juna belulino, kun korpo mola kaj seks-alloga,
Kaŝas ĉe sia talio glavon fatalan por la viro.
Kvankam lia kapo ne estas vidata fali teren,
Lia medolo estas suĉita el la ostoj ĝis elĉerpiĝo.*

又诗曰:

二八佳人体似酥, 腰间仗剑斩愚夫。
虽然不见人头落, 暗里教君骨髓枯。



Ximen Qing ĵure interfratiĝis kun siaj friponaj amikoj.



Wu Song hazarde renkontis siajn proprajn fraton kaj bofratinon.

La lasta el la ĉi-supraj poemoj estis skribita de iu taŭista pastro nomata Lü Yan, senmortulo, kies religia nomo estis Chun Yangzi. Li vivis dum la dinastio Tang kaj pasigis siajn tagojn en la serĉado de virto kaj asketismo, sekve li, superante la teridecon, atingis la paradizon. Li ekhavis sidlokon en la Purpura Palaco kaj fariĝis la reganto de la Ok Kavernoj, de kie li alportis helpojn al teridoj en malfacileco kaj mizero. Sed ŝajnas, tre bedaŭrinde, ke preskaŭ ĉiuj, kiuj vivas en tiu ĉi mondo nia, ĉiam klopodante kaj penante dum la vivo, neniel povas esti tute liberaj de la kateno de siaj sep sentoj kaj ses deziroj¹. Oni apenaŭ povas eskapi el la fatala cirklo de vino, virino, riĉeco kaj ambicio, sed, pli aŭ malpli frue, la fino de la vivo venos al ĉiu mortemulo, kaj li estos devigita rezigni ĉion, kion li posedis, ĉar, post la morto, ĉio al li neniel utilos.

这一首诗，是昔年大唐国时，一个修真炼性的英雄，入圣超凡的豪杰，到后来位居紫府，名列仙班，率领上八洞群仙，救拔四部洲沉苦一位仙长，姓吕名岩，道号纯阳子祖师所作。单道世上人，营营逐逐，急急巴巴，跳不出七情六欲关头，打不破酒色财气圈子。到头来同归于尽，着甚要紧！

La homaj travivaĵoj montras al ni, ke el tiuj kvar malbonoj, virino kaj riĉeco certe estas la multege pli katastrofaj. Kial oni havas tian aserton? Ni do konsideru la okazon de tiu, al kiu malfavoras la tempo, tiel ke li trovas sin en mizero kaj en senlima tristo, suferante malfeliĉojn, kiujn li neniam atendis. Nokte li priserĉas sian grenujon, kaj trovas en ĝi neniun greneron. Matene li ellitiĝas kaj ĉirkaŭrigardas la kuirejon, sed povas trovi nenion por fari kuirfajron. Lia familio estas en malsato kaj malvarmo; vidante, ke liaj edzino kaj infanoj suferas malsaton, li ne scias, de kie li povos havigi al ili nutraĵon. En tia tragika situacio, kie do li povos trovi la monon por aĉeti vinon? Kaj, eĉ pli malbone, liaj parencoj kaj amikoj al li ĵetas malestiman rigardon kaj montras malvarman mienon. Tiu ĉi kompatinda mizerulo, venkita de la vivo, eĉ se li havas grandan ambicion, kiel li povus havi la kuraĝon rivali kun aliaj?

虽是如此说，只这酒色财气四件中，惟有“财色”二者更为利害。怎见得他的利害？假如一个人到了那穷苦的田地，受尽无限凄凉，耐尽无端懊恼，晚来摸一摸米瓮，苦无隔宿之炊，早起看一看厨前，愧无半星烟火，妻子饥寒，一身冻馁，就是那粥饭尚且艰难，那讨馀钱沽酒！更有一种可恨处，亲朋白眼，面目寒酸，便是凌云志气，分外消磨，怎能够与人争气！

Vere:

Kiam lia ĉevalo aŭ oro estas perdita,

Liaj intimuloj tuj fariĝas nekonatoj.

正是：

一朝马死黄金尽，亲者如同陌路人。

Sed ekzistas alia speco de homo, kiu posedas grandan riĉaĵon. Por aĉeti la plezurojn de amoro, li fordiboĉas sian monon. Kiel ajn granda estas la monsumo, en volupta aventuro li voluntas forĵeti eĉ miriadojn da orpecoj je unu fojo, nur por vekti ekrideton ĉe belulino. Li trinkas nur la plej fajnan vinon, kiu estas tiel multekostan, kvazaŭ ĝi estus fandita el oro aŭ jado, kaj la vino senfine elverŝiĝas en sukcenajn pokalojn. Por serĉi al si rangon aŭ peni atingi sian ambician celon, li ne ŝparas sian monon por movi eĉ diojn aŭ spiritojn. Lia vizaĝesprimo aŭ gesto povas ordoni aliajn klopodadi por lin servi. Homoj ariĝas ĉirkaŭ li por serĉi lian favoron, kaj iuj el ili eĉ voluntas leki liajn ulcerojn kaj hemoroidojn, por lin flati. Tio daŭras kondiĉe nur, ke li tenas en sia mano la potencon: tuj kiam lia influo estas perdita, ili ĉiuj levas la ŝultrojn kaj foriras de li, lin ne plu servante. De la antikveco ĝis la nuna tempo, neniam aflikto en la mondo estas pli eltenebla, ol

tiu ĉi ŝanĝiĝo de varmo al malvarmo.

Ĉu do tiuj ĉi du specoj de homoj ambaŭ ne estas la viktimoj de la plago kaŭzita de riĉeco?

到得那有钱时节，挥金买笑，一掷巨万。思饮酒真个琼浆玉液，不数那琥珀杯流；要斗气钱可通神，果然是颐指气使。趋炎的压脊挨肩，附势的吮痂舐痔，真所谓得势叠肩而来，失势掉臂而去。古今炎冷恶态，莫有甚于此者。这两等人，岂不是受那财的利害处！

Nun ni konsideru la danĝeron, kiu venas de virinoj. Rigardu do ĉirkaŭen al la mondo, mi vin petas.

Laŭdire en la pasinteco iam estis virtulo Liuxia Hui, kiu, kvankam kiam belulino sidis sur liaj genuoj, tute ne konfuziĝis en la spirito. Kie do en la nunaj tagoj ni povus trovi tian konduton, kian li havis? Kaj ekzistis ankaŭ la nobla persono el la antikva regno Lu, kiu, kiam ĉarma knabino deziris enveni al li, rapide li fermis sian pordon por rifuzi al ŝi eniri; aŭ Guan Yunchang², kiu, ĉe lumigita kandelo, legadis libron maldormante ĝis la tagiĝo, por resti ĉasta kun siaj du bofratinoj restantaj en la sama ĉambro. Kiom da tiaj virtuloj do la historio povas konigi al ni? Kaj kion do ni povos diri pri tiuj nuntempuloj, kiuj, kvankam jam havante plurajn edzinojn, elspezas siajn riĉaĵojn por ĉasi eksteredzecajn amorojn, senfine avidante seksajn plezurojn? Ekzistas ankoraŭ aliaj eĉ pli voluptemaj, kiuj, ekvidinte iun ajn virinon havantan iom da beleco, delogas ŝin per ĉiu ebla rimedo. Ili penas faligi ŝin en sian kaptilon, por ĝui sur ŝi momentajn sensplezurojn, neglektante la sentojn de siaj amikoj kaj donante nenian atenton al la moralaj principoj kaj la harmonio de sia propra familio. Por atingi sian vantaron celon, ili vane forŝutas sennombrajn riĉaĵojn kaj forĵetas senmezurajn trezorojn por abundo da vino kaj frandaĵoj.

如今再说那色的利害。请看如今世界，你说那坐怀不乱的柳下惠，闭门不纳的鲁男子，与那秉烛达旦的关云长，古今能有几人？至如三妻四妾，买笑追欢的，又当别论。还有那一种好色的人，见了个妇女略有几分颜色，便百计千方偷寒送暖，一到了着手时节，只图那一瞬欢娱，也全不顾亲戚的名分，也不想朋友的交情。起初时不知用了多少滥钱，费了几遭酒食。

Vere:

Tri pokaloj da vino funkcias kiel lasciv-instigilo,

Kaj du pokaloj servas kiel peranto de malĉastaĵo.

正是：

三杯花作合，两盏色媒人。

La diboĉemo de tia persono transiras ĉiujn limojn, kaj eĉ estigas disputojn, sangoverŝon kaj ĉiajn aliajn malbonojn. En la fino li estas kondamnita al perejo, liaj edzinoj kaj infanoj estas por ĉiam ruinigitaj, kaj ĉio, kion li plenumis kaj atingis dum la vivo, estas reduktita al polvo. Tia viro estis Shi Chong³, kiu, pro amo al sia amorentino Verda Perlo, tragike mortis en prizono, kvankam iam liaj riĉaĵoj amasiĝis eĉ ĝis la ĉieltuŝa alteco. Alia estis la Brava Reĝo de Chu⁴, kies heroeco estis senrivala en la mondo kun forto sufiĉa eĉ por eltiri monton. Pro sia freneza amo al sia favorantino Yuji, lia kapo estis pendigita en Gaixia.

Jen kiel asertas la versoj:

La pordo de amo povas esti la pordo de vivo,

Sed efektive ĝi estas ĝuste la pordo de morto.

Ofte la komuna saĝo avertas nin kontraŭ la fakto,

Tamen ni nin regi ne povas kaj lasas nin viktimiĝi.

Ĉu tiaspekaj homoj ne estas ĝuste la viktimoj de la plago de amorado?

到后来情浓事露，甚而斗狠杀伤，性命不保，妻孥难顾，事业成灰。就如那石季伦泼天

豪富，为绿珠命丧图圉；楚霸王气概拔山，因虞姬头悬垓下。真所谓：

“生我之门死我户，看得破时忍不过”。

这样人岂不是受那色的利害处！

Estas facile paroli tiele pri virinoj kaj riĉaĵoj, tamen ekzistas preskaŭ neniu, kiu estus por ĉiam libera de tiuj ĉi plagoj. Se, en ĉi tiu mondo, efektive troviĝas iu, kiu klare travidas la veron, li certe diros al ni, ke ĉiuj niaj amasoj da oro, silkaĵoj kaj jado, kiujn ni posedas kiel trezorojn, neniel povos sekvi nin en nia tombo. Ili estas nur rubaĵo, tute ne pli valora, ol polvo kaj nia fetora haŭtosako sur la tero. Niaj riĉaĵoj povas esti tiel grandnombraj, ke ili ĉiuj ne povos esti entenataj en nia ĉerko, nia rizo estas tiel abunda, ke ĝi povos putri pro tio, ke ni ne plu povos ĝin konsumi: por nia mortinta korpo, ĝi estos tute senutila; ĉio fariĝos nur malbonodora putraĵo. Niaj altaj palacoj kaj spacoplenaj haloj alportos al ni nenian ĝojon tiam, kiam ni kuŝos en la tombo. Niaj silkaj roboj, broditaj jakoj, kaj riĉaj peltaĵoj vulpaj kaj zibelaj, ĉiuj finfine estos nur ĉifonaĵoj, en kiuj estos envolvitaj niaj ostoj. Tiuj ĉarmaj kaj koketaj knabinoj, kiuj plenumas niajn dezirojn tiel bone, ke ni povas havi sur ilia korpo la plej agrablan ĝuon, kaj kies lerteco en flatado al ni estas tiel rafinita, ke ili kapablas ravi nin ĝis ekstazo. Sed se, en iu tago, la vualo estas deŝirita, ĉio, kion ni trovos en ili, estos nur falso, pura falso! Ĉu ili ne estas ĝuste kiel generalo, kiu, kiam la ordono estas donita por batalo, povas manifesti sian valoron nur per siaj kriegoj? Tiuj skarlataj lipoj, tiuj pure blankaj dentoj, tiu alloga okulumado kaj tiu flirtado per la maniko: se vera kompreno estus de ni atingita, ni ekkonus ilin nur kiel abomenajn grimacojn de la *jakŝoj* (jakŝo: malbonfaraj spiritoj —trad.) en la palaco de *Jamao* (Jamao: la reĝo de infero —trad.). La silkaj ŝtrumpoj kaj la liliaj piedetoj estas kiel pioĉoj kaj ŝoveliloj, kiuj servas por la fosado de nia tombo. La dolĉa flirtado sur la kapkuseno kaj la ama ludo sub la litkovriloj, estas nur la antaŭirantoj de la eterna sufero, en kiu, interne de la kvina etaĝo de la Infero, ni estos brogitaj en bolanta oleo.

说便如此说，这“财色”二字，从来只没有看得破的。若有那看得破的，便见得堆金积玉，是棺材内带不去的瓦砾泥沙；贯朽粟红，是皮囊内装不尽的臭淤粪土。高堂广厦，玉宇琼楼，是坟山上起不得的享堂；锦衣绣袄，狐服貂裘，是骷髅上裹不了的败絮。即如那妖姬艳女，献媚工妍，看得破的，却如交锋阵上将军叱咤献威风；朱唇皓齿，掩袖回眸，懂得来时，便是阎罗殿前鬼判夜叉增恶态。罗袜一弯，金莲三寸，是砌坟时破土的锹锄；枕上绸缪，被中恩爱，是五殿下油锅中生活。

Prave diras *Sutro de Diamanto* (sanskrite: Vajracchedikā Prajñāpāramitā —trad.) pri tiu ĉi vivo: “kiel sonĝo kaj kiel iluzio; kiel fulmo kaj kiel roso”, ĉar, kvankam ĉe la fino de nia vivo ĉiuj objektoj estos por ni senutilaj, tamen dum la vivo ni ne povas elteni la perdon de eĉ bagatelaĵo el ili. Ni povas esti tiel fortaj, ke ni, sen helpo de aliaj, povas levi *dingon* (antikva tri- aŭ kvarpieda bronza kuirkaldrono kun du ringoformaj ansoj —trad.) aŭ treni ŝipegon, sed, kiam la vivfino alproksimiĝas, niaj ostoj perdos sian forton kaj niaj tendenoj sian povon. Kvankam nia riĉeco povas doni al ni montojn da bronzo kaj valojn da oro, ili povos fandiĝi kiel neĝo tiam, kiam la lasta momento venos. Kvankam nia beleco eklipsas la helan lunon, kaj hontigas la brilkolorajn florojn, tiel ke ili ne kuraĝas eĉ levi siajn petalojn por rigardi nian superban aspekton, tamen kiam venos la tago, en kiu ni fariĝos nenio alia, ol fetora putraĵo, tiam homoj, preterpasante nin, mane ŝtopos al si la nazon. Kvankam ni havas la akran spriton kaj elokventon de Lu Jia kaj Sui He⁵, ili neniel utilos al ni tiam, kiam niaj lipoj malvarmiĝos, kaj neniu vorto povos eliĝi el nia buŝo. Estus do preferinde, se ni purigus niajn sensojn kaj metus sur nin *kasajon* (kasajo: longa robo portata de bonzo —trad.), kaj tiam, kontemplante la malplenecon kaj iluziecon de tiu ĉi mondo, ni povos esti liberaj de la en- kaj eliro de la pordo de la naskiĝo kaj morto, kaj, ne falante en la embarason de la

vantaj mondaj aferoj, ni antaŭeniros rekte al la perfekteco. Nur tiamaniere ni povos ĝui senzorgecon kaj bonan vivon, kaj fine eskapi la fajron de la Infero.

只有那《金刚经》上两句话说得好，他说道：“如梦幻泡影，如电复如露。”见得人生在世，一件也少不得，到了那结束时，一件也用不着。随着你举鼎荡舟的神力，到头来少不得骨软筋麻；由着你铜山金谷的奢华，正好时却又要冰消雪散。假饶你闭月羞花的容貌，一到了垂眉落眼，人皆掩鼻而过之；比如你陆贾隋何的机锋，若遇着齿冷唇寒，吾未如之何也已。到不如削去六根清静，披上一领袈裟，参透了空色世界，打磨穿生灭机关，直超无上乘，不落是非窠，倒得个清闲自在，不向火坑中翻筋斗也。

Vere:

Ĉio plenumiĝas per la tri koloroj da spiro;

Kiam homo mortas, ĉiuj faroj liaj finiĝas.

正是：

三寸气在千般用，一日无常万事休。

Kial mi multvorte priparolis la veran signifon de vino, virino, riĉeco kaj ambicio? Nur pro la kaŭzo, ke mi memoras familion, kiu, iam prosperanta, falis finfine en staton de plej profunda mizero. Poste nek saĝeco, nek artifiko, povis ĝin savi, kaj neniu parenco, nek amiko, volis etendi helpmanon. Dum kelkaj mallongaj jaroj la mastro de tiu ĉi familio ĝuis sian riĉecon, kaj poste li mortis, postlasante reputacion, kiun neniu enviis. En tiu familio sin trovis pluraj membroj, kiuj ĉiam penis flatadi por akiri al si favoron, konkuri inter si pri supereco, sin fordoni al la serĉado de amoraj plezuroj, kaj provoki konfliktojn unu kun la alia. En la komenco ŝajnis, ke ĉio ĉe ili iras bone, tamen la bona tempo ne daŭris longe, antaŭ ol iliaj kadavroj kuŝis en la ombro, kaj ilia sango makulis la dezertiĝintajn ĉambrojn.

说话的为何说此一段酒色财气的缘故？只为当时有一个人家，先前恁地富贵，到后来煞甚凄凉，权谋术智，一毫也用不着，亲友兄弟，一个也靠不着，享不过几年的荣华，倒做了许多的话靶。内中又有几个斗宠争强，迎奸卖俏的，起先好不妖娆妩媚，到后来也免不得尸横灯影，血染空房。

Vere:

Bonon rekompencas bono,

Malbonon rekompencas malbono;

La reto de la Ĉielo havas grandajn maŝojn,

Sed ĝi lasas al nenio ilin trairi.

正是：

善有善报，恶有恶报；天网恢恢，疏而不漏。

Dum la regperiodo Zhenghe de la imperiestro Huizong de la potenca dinastio Song, vivis en la subprefektujo Qinghe de la prefektujo Dongping en Shandong, iu juna diboĉa dando, kies nomo estis Ximen Qing. Li havis ĉirkaŭ dudek sep jarojn, kaj estis la mastro de riĉa familia posedaĵo. Gaja, belaspekta elegantulo, li estis, bedaŭrinde, kaprica kaj frivola. Lia patro, Ximen Da, iam travojaĝis la regionojn Sichuan kaj Guangdong, farante la komercon de krudaj medikamentoj, kaj poste li funkciigis grandan medikament-vendejon en la subprefektujo Qinghe. Li loĝis en domo, kiu konsistis el kvinĉambra fasado kaj postaj sep vicoj da ĉambroj ambaŭflanke. Li havis amason da geservistoj kaj tre konsiderindan nombron da ĉevaloj kaj muloj. Kvankam li eble ne estis kalkulata kiel granda riĉegulo, li certe estis unu el la plej riĉaj homoj en la tuta subprefektujo. Ximen Da kaj lia edzino verŝis abundon da amo sur sian solan filon kaj permesis al li fari ĉion, kio al li plaĉis. Dum li estis ankoraŭ sufiĉe juna, liaj gepatroj mortis. La knabo apenaŭ donis atenton al

sia studado, ĉiutage vagaĉis tien kaj tien, kaj fordonis sin al disipado kaj diboĉado. Precipe post la morto de siaj gepatroj, li estis malofte trovita en la hejmo, sed pasigis sian tutan tempon en la serĉado de sensaj plezuroj en bordeloj kaj ĉe fremdaj virinoj. Li lernis luktarton, svingadon de batalstango, kaj hazardludon, *ŝuangluon* (ĉina antikva ludo simila al ŝako por du personoj, kiun oni ludis per ĵetkuboj kaj egalaj figurpecoj por ĉiu partio sur tabulo —trad.) kaj diversajn ŝakojn. Li tre multe faris monludon, kaj fariĝis tiel lerta en ĝi, ke li eĉ povis distingi la diversajn pecojn de la hazardludilo nur per mana tuŝado de ili. En efektiveco, koncerne la monludan arton, ekzistis ja neniu malgranda detalo, kiun li ne konus. Liaj amikoj kaj konatoj ĉiuj estis sentaŭguloj kaj parazitaj, kiuj pasigis sian tutan vivon en sinamuzado je alies elspezoj.

话说大宋徽宗皇帝政和年间，山东省东平府清河县中，有一个风流子弟，生得状貌魁梧，性情潇洒，饶有几贯家资，年纪二十六七。这人复姓西门，单讳一个庆字。他父亲西门达，原走川广贩药材，就在这清河县前开着一个大大的生药铺。现住着门面五间到底七进的房子。家中呼奴使婢，骡马成群，虽算不得十分富贵，却也是清河县中一个殷实的人家。只为这西门达员外夫妇去世的早，单生这个儿子却又百般爱惜，听其所为，所以这人不甚读书，终日闲游浪荡。一自父母亡后，专一在外眠花宿柳，惹草招风，学得些好拳棒，又会赌博，双陆象棋，抹牌道字，无不通晓。结识的朋友，也都是些帮闲抹嘴，不守本分的人。

La ĉefa inter ili estis Ying Bojue, aŭ alinome Guanghou, la dua filo de silkaj-komercisto. Li fordiboĉis la riĉaĵon, kiun li heredis de sia patro, kaj sinkis tiel malalten, ke li pasigis sian tutan tempon nur restante en la kvartalo de plezuro, preta akompani serve iun ajn, kiu iris al la malĉastejo, aŭ manĝi kun la unua trovita, kiu volis pagi por la manĝo, sekve oni donis al li moknomon Almozulo Ying. Li estis lerta en piedpilkado, ŝakoj kaj diversaj hazardludoj.

第一个最相契的，姓应名伯爵，表字光侯，原是开绸缎铺应员外的第二个儿子，落了本钱，跌落下来，专在本司三院帮嫖贴食，因此人都起他一个浑名叫做应花子。又会一腿好气毬求，双陆棋子，件件皆通。

La dua estis Xie Xida. La avo de tiu ĉi viro estis eta oficialulo en Qinghe, kaj liaj gepatroj jam mortis dum li estis ankoraŭ juna. Li maldiligentis kaj donis nenian atenton al sia studado, kaj tial li perdis sian pozicion kaj vivis senokupan vivon. Li estis lerta en ludo de *pipao* (ĉina kvarkorda plukinstrumento, iom simila al gitaro —trad.). Tiuj ĉi du kaj Ximen Qing havis la samajn gustojn kaj estis en tre intimaj rilatoj. Krom ili sin trovis ankoraŭ kelkaj aliaj, kiuj estis de malsamaj gradoj de malbona reputacio. Unu estis Zhu Shinian; alia estis Sun Tianhua kun la moknomo Babilemulo. La ceteraj estis Wu Dian'en, kiu iam estis praktikanto de jino kaj jango⁶ de la subprefektujo. Li jam estis maldungita, kaj nun ĉiam estis trovita vagaĉi en la urbodomo kun la espero trovi laboron kiel atestanto por la oficistoj en iliaj pruntedonoj de mono kun procentego, kaj per tio li konatiĝis kun Ximen Qing. Kaj liaj ankoraŭ aliaj amikoj estis Yun Lishou, juna frato de Kolonelo Yun; Chang Zhijie; Bu Zhidao; kaj Bai Laiguang, kiu estis alinome konata ankaŭ Guangtang (aŭ Supo nur kun Sojo).

第二个姓谢名希大，字子纯，乃清河卫千户官儿应袭子孙，自幼父母双亡，游手好闲，把前程丢了，亦是帮闲勤儿，会一手好琵琶。自这两个与西门庆甚合得来。其余还有几个，都是些破落户，没名器的。一个叫做祝实念，表字贡诚。一个叫做孙天化，表字伯修，绰号孙寡嘴。一个叫做吴典恩，乃是本县阴阳生，因事革退，专一在县前与官吏保债，以此与西门庆往来。还有一个云参将的兄弟叫做云理守，字非去。一个叫做常峙节，表字坚初。一个叫做卜志道。一个叫做白赆光，表字光汤。

Kiam oni rimarkigis, ke tiu ĉi nomo estas stranga, li ĉiam faris klarigon, ke lia nomo estis donita de lia guvernisto, kiu faris admirindan elekton, kun referenco al la teksto el klasikaĵo *Libro*

de *Historiaj Dokumentoj*, sekve ĝi estas supozata havi signifoplenan literaturan aludon. “Se troviĝus io malaprobinda pri ĝi,” li kutime diris, “mi jam antaŭ longe farus ŝanĝon, sed, evidente, ĝi havas gravan historian asociiĝon, kaj mi certe tenos ĝin neŝanĝita. Entute ili estis dek personoj, el kiuj Ximen Qing estis la sola, kiu estis ne nur tre riĉa, sed ankaŭ preta malavare disĵeti sian monon, kaj tial ili ĉiam instigis lin al hazardludo, drinkado kaj serĉado de plezuroj en bordeloj.

说这白贲光，众人中也有道他名字取的不好听的，他却自己解说道：“不然我也改了，只为当初取名的时节，原是一个门馆先生，说我姓白，当初有一个什么故事，是白鱼跃入武王舟。又说有两句书是‘周有大赉，于汤有光’，取这个意思，所以表字就叫做光汤。我因他有这段故事，也便不改了。”说这一干共十数人，见西门庆手里有钱，又撒漫肯使，所以都乱撮哄着他要钱饮酒，嫖赌齐行。

Vere:

Kun pokaloj levitaj kaj eltrinkitaj,

La fratoj ŝajnas fariĝi pli intimaj.

Sed en kvieto subite leviĝas ŝtormo,

Nur tiam klare vidiĝas la vera koro.

正是:

把盏衔杯意气深，兄兄弟弟抑何亲。

一朝平地风波起，此际相交才见心。

Nun ke la financa situacio de Ximen-familio jam dekadencis, kaj al ĝi naskiĝis malinda filo, kiu elektis siajn amikojn el inter tiuj friponoj, ĝi neeviteble estus reduktita al malriĉiĝo. Sed ĉar Ximen Qing estis nature neobeigebla, artifika kaj insidema, li kapablis montri, ke li neniel estas stultulo. Li pruntedonis monon al la oficialuloj kaj eĉ havis iajn rilatojn kun la kvar koruptitaj ministroj, Gao, Yang, Tong, Cai, kaj li sin enmiksas en diversajn specojn de aferoj, agante kiel intervenanto por homoj en proceso, arbitraciante en aferoj de disputo, kaj, iafoje, agante kiel vetotenanto. La popolo de Qinghe tre timis lin kaj kutime alparolis lin per “via moŝto Ximen”. Lia unua edzino, sinjorino Chen, mortis juna, forlasinte al li filineton, kaj tiu ĉi filino nun estis fianĉinigitita al Chen Jingji, filo de Chen Hong, parenco de la marŝalo Yang, la Komandanto de la Imperiestra Gvardio en la Orienta Ĉefurbo. Post la morto de sia edzino, Ximen Qing trovis sin sen edzino kapabla zorgi pri la mastrumado, kaj edziĝis al la filino de iu bataliona komandanto Wu.

说话的，这等一个人家，生出这等一个不肖的儿子，又搭了这等一班无益有损的朋友，随你怎的豪富也要穷了，还有甚长进的日子！却有一个缘故，只为这西门庆生来秉性刚强，作事机深诡譎，又放官吏债，就是那朝中高、杨、童、蔡四大奸臣，他也有门路与他浸润。所以专在县里管些公事，与人把搅说过钱，因此满县人都惧怕他。因他排行第一，人都叫他西门大官人。这西门大官人先头浑家陈氏早逝，身边只生得一个女儿，叫做西门大姐，就许与东京八十万禁军杨提督的亲家陈洪的儿子陈敬济为室，尚未过门。只为亡了浑家，无人管理家务，新近又娶了本县清河左卫吴千户之女填房为继室。

Tiu ĉi sinjorino estis ĉirkaŭ dudek-kvin-jara. Ĉar ŝi naskiĝis en la dek-kvina tago de la oka monato⁷ ŝiaj gepatroj nomis ŝin Luna Knabino, kaj sekve ŝi estis konata per la nomo Luna Sinjorino aŭ simple Luno post sia edziniĝo al Ximen Qing. Nature milda kaj kvietema, ŝi estis bona edzino, perfekte obeema al sia edzo. Ŝi havis tri aŭ kvar servistinojn sub sia dispono, kaj Ximen Qing jam prenis plezurojn kun ĉiu el ili. Kiel sian duan edzinon, li prenis al si knabinon el bordelo, nomatan Gracia Li, kaj, krome, kiel sian trian, ankaŭ junan virinon el Suda Strato, nomatan sinjorino Zhuo la Dua, kiu iam estis lia amorantino. Ĉar tiu havis malfortan sanon, suferante tiel multajn malsanojn, Ximen Qing denove daŭrigis sian “flugadon kun la vento kaj

ludadon kun la luno”⁸ en la kvartalo de plezuro kaj flirtadon kun fremdaj virinoj.

这吴氏年纪二十五六，是八月十五生的，小名叫做月姐，后来嫁到西门庆家，都顺口叫他月娘。却说这月娘秉性贤能，夫主面上百依百随。房中也有三四个丫鬟妇女，都是西门庆收用过的。又尝与勾栏内李娇儿打热，也娶在家里做了第二房娘子。南街又占着窠子卓二姐，名卓丢儿，包了些时，也娶来家做了第三房。只为卓二姐身子瘦怯，时常三病四痛，他却又去飘风戏月，调弄人家妇女。

Vere:

Orientaj rozaj lipoj kaj vangoj estas ebriige allogaj,

Dum la okcidentaj nutraĵoj estas ekstreme frandaj.

Kuŝante inter persikaj floroj kelkajn tagojn,

Li ekavidas la peoniojn, kiuj ŝajnas pli ravaj.

正是：

东家歌笑醉红颜，又向西邻开玳宴。

几日碧桃花下卧，牡丹开处总堪怜。

Iun tagon, kiam Ximen Qing estis hejme nenion farante, li diris al sia edzino:

“Hodiaŭ estas la dudek-kvina de la naŭa monato, kaj la tria de la venonta monato estos la tago, en kiu mi devos, laŭ nia interkonsento, renkontiĝi kun miaj amikoj. Mi pensas, ke tiam mi gastigos ilin ĉi tie, kaj dungos kelkajn junajn kantistinojn, por ke ni povu gaje amuziĝi en nia hejmo, sen bezono iri aliloken. Mi volas, ke vi faru necesajn aranĝojn.”

话说西门庆一日在家闲坐，对吴月娘说道：“如今是九月廿五日了，出月初三日，却是我兄弟们的会期。到那日也少不的要整两席齐整的酒席，叫两个唱的姐儿，自恁在咱家与兄弟们好生玩耍一日。你与我料理料理。”

“Mi deziras, ke vi ne menciu al mi tiujn ulaĉojn,” diris Luna Sinjorino. “Inter ili certe troviĝas neniun, kiu estus deculo. De tago al tago, ili venas ĉi tien, kiel senditoj el la Infero, enmetante ideojn en vian stultan menson por mistifiki vin. Ekde kiam vi konatiĝis kun ili, eĉ neniun tutan tagon vi pasigis en via propra hejmo! Nun ke la Tria Sinjorino sentas sin ne bone, mi konsilas, ke vi rezignu tiun ĉi bankedon, kaj ne drinku almenaŭ dum tiuj ĉi tagoj.”

吴月娘便道：“你也便别要说起这干人，那一个是那有良心和行货！无过每日来勾使的游魂撞尸。我看你自搭了这起人，几时曾有个家哩！现今卓二姐自恁不好，我劝你把那酒也少要吃了。”

“Ĝenerale,” diris Ximen Qing, “mi trovas viajn parolojn agrablaj, sed hodiaŭ via diro sonas al mi teda. Laŭ vi, ĉu ĉiuj miaj amikoj povus esti malbonuloj? Pri la ceteraj mi preferus silenti, sed certe mia fraĵo Ying estas homo honesta, taktoplana. Se ni petas lin fari ion ajn por ni, li neniam rifuzas al mi, kaj kion ajn li faras, li faras tre bone. Koncerne Xie Xida, li estas sagaca kaj sufiĉe konscienca. Kompreneble, homoj perfektaj ili ne estas, sed ni ja ne devus fari al ili ekscesajn postulojn. Se niaj renkontiĝoj ne okazos regule, mi timas, ke ni neniel povos profundigi nian amikecon. En la sekva okazo, kiam ni ĉiuj kuniĝos, ni preferos formi inter ni ĵure-interfratiĝon, por ke poste ni povu havi fidindan reciprokan helpon, se ni iam ajn tian bezonos.”

西门庆道：“你别的话倒也中听。今日这些说话，我却有些不耐烦听他。依你说，这些兄弟们没有好人，别的倒也罢了，自我这应二哥着一个人，本心又好又知趣，着人使着他，没有一个不依顺的，做事又十分停当。就是那谢子纯这个人，也不失为个伶俐能事的好人。咱如今是这等计较罢，只管恁会来会去，终不着个切实。咱不如到了会期，都结拜了兄弟罢，明日也有个靠傍。”

“Mi havas nenion kontraŭ tiu ĉi interfratiĝa ideo,” diris Luna Sinjorino, “sed mi timas, ke

probable la aliaj ricevos pli da helpo de vi, ol vi de ili. Kaj mi estas certa, ke *ili utilos al vi ne pli multe, ol fadentirata marioneto, al kiu mankas vitala spiro.*”

吴月娘接过来道：“结拜兄弟也好。只怕后日还是别个靠你的多哩。若要你去靠人，提傀儡儿上戏场——还少一口气儿哩。”

Ximen Qing ekridis kaj diris: “Se mi, laŭ mia sperto, trovas ilin fidindaj, kial do mi devus ilin ne fidi? Efektive, jam longe mi atendas la venon de mia fraĉjo Ying. Kiam li venos, mi do vidu, kion li pensos pri mia ideo.”

西门庆笑道：“自恁长把人靠得着，却不更好了。咱只等应二哥来，与他说这话罢。”

Tiumomente envenis iu intelekto-aspektanta knabo kun delikataj trajtoj. Tiu ĉi estis Dai'an, la persona servoknabo de Ximen Qing.

“Onklo Ying kaj onklo Xie estas ekstere,” li diris. “Ili volus paroli al vi.”

正说着话，只见一个小厮儿，生得眉清目秀，伶俐乖觉，原是西门庆贴身伏侍的，唤名玳安儿，走到面前来说：“应二叔和谢大叔在外见爹说话哩。”

“Mi ĵus parolis pri ili, kaj ili venas,” diris Ximen Qing.

Li rapidis al la salono. Ying Bojue, vestita per nova nigra ĉapo kaj duone eluzita robo, portante purajn ŝtrumpojn kaj silkajn ŝuojn, sidis sur la honora sidloko kontraŭ Xie Xida. Kiam Ximen Qing envenis, ili ambaŭ tuj stariĝis kaj salutis lin kun profunda riverenco.

“Ni ĝojas trovi vin hejme, fraĉjo,” ili diris. “Ni ne vidis vin jam plurajn tagojn.”

西门庆道：“我正说他，他却两个就来了。”一面走到厅上来，只见应伯爵头上戴一项新盔的玄罗帽儿，身上穿一件半新不旧的天青夹绉纱褶子，脚下丝鞋净袜，坐在上首。下首坐的，便是姓谢的谢希大。见西门庆出来，一齐立起身来，边忙作揖道：“哥在家，连日少看。”

Ximen Qing petis ilin residiĝi, kaj ordonis teon al ili.

“Vi estas bonvena paro,” li diris al ili. “Lastajn tagojn mi havis enuan tempon. Mi ne forlasis tiun ĉi domon eĉ dum momento, kaj dume vi ne montris vin al mi, eĉ nek viajn ombrojn!”

西门庆让他坐下，一面唤茶来吃，说道：“你们好人儿，这几日我心里不耐烦，不出来走跳，你们通不来傍个影儿。”

“Ĝuste kiel mi antaŭvidis!” diris Ying Bojue al Xie Xida. “Mi sciis, ke li devus multe enui!”

伯爵向希大道：“何如？我说哥哥要说哩。”

Poste li sin turnis al Ximen Qing:

“Fraĉjo, mi ne estas surprizita, ke vi koleriĝas kontraŭ ni, sed, efektive, mi ja estis multeokupita, kaj tamen eĉ mi mem ne sciis, pri kio mi estas tiel okupita la tutajn tagojn. Estas oportune por vi nur doni ordonojn al viaj servistoj, sed por mi ne estas tiel facile persone plenumi ĉiun aferon.”

因对西门庆道：“哥，你怪的是。连咱自也不知道成日忙些什么！自咱们这两只脚，还赶不上一张嘴哩。”

“Kie do vi estis ĉi tiujn lastajn tagojn?” demandis ilin Ximen Qing.

西门庆因问道：“你这两天在那里来？”

“Hieraŭ mi iris al la domo de Li por vidi la knabinon nomatan Cinamo. Ŝi estas la pli juna fratino de Cinamujo, la nevino de via Dua Sinjorino. Mi ne vidis ŝin jam sufiĉe longe, kaj mi devas diri, ke ŝi jam fariĝis treege bela, kaj mi ne povas imagi, kiel ĉarme pli bela ŝi estos en la estonteco. Ŝia patrino insiste instigis min trovi egale belan junan viron por ŝin deflori. Mi estas certa, ke ŝi nepre plaĉos al vi.”

伯爵道：“昨日在院中李家瞧了个孩子儿，就是哥这边二嫂子的侄女儿桂卿的妹子，叫做桂姐儿。几时儿不见他，就出落的好不标致了。到明日成人的时候，还不知怎的样好哩！”

昨日他妈再三向我说：‘二爹，千万寻个好子弟梳笼他。’敢怕明日还是哥的货儿哩。”

“Se ŝi estas tiel ĉarma,” diris Ximen Qing, “mi devos persone iri kaj propraokule rigardi ŝin.”

西门庆道：“有这等事！等咱空闲了去瞧瞧。”

“Fraĉjo,” diris Xie Xida, “se mi diras, ke ŝi vere ĉarmas, eble vi min ne kredas, sed efektive ŝi ja estas okulplaĉa.”

谢希大接过来道：“哥不信，委的生得十分颜色。”

“Bone,” diris Ximen Qing, “tio estas la klarigo pri via hieraŭo, sed kio okazis al vi dum la pli antaŭaj tagoj?”

西门庆道：“昨日便在他家，前几日却在那里去来？”

“Antaŭ kelkaj tagoj,” diris Ying Bojue, “nia amiko Bu Zhidao mortis, kaj mi devis pasigi kelkajn tagojn en lia domo helpante en la aranĝado de funebraĵoj. Lia edzino petis min diri al vi, kiel dankema ŝi estas por la incenso kaj aliaj objektoj, kiujn vi sendis al ŝi. Ŝia loko estas tiel malgranda, kaj la sola regalo, kiun ŝi povis doni, estis tiel neinda, ke ŝi ne kuraĝis inviti vin al la funebra ceremonio.”

伯爵道：“便是前日卜志道兄弟死了，咱在他家帮着乱了几日，发送他出门。他嫂子再三向我说，叫我拜上哥，承哥这里送了香楮奠礼去，因他没有宽转地方儿，晚夕又没甚好酒席，不好请哥坐的，甚是过不意去。”

“Kiel bedaŭrinde!” diris Ximen Qing. “Ŝajne pasis nur kelkaj tagoj, de kiam mi aŭdis, ke li falis en malsanon. Mi neniam pensis, ke li mortis tiel baldaŭ. Li iam donacis al mi oran ventumilon, kaj mi pensis, kiel reciproki lian donacon, kaj tuj poste mi aŭdis pri lia morto.”

西门庆道：“便是我闻得他不好得没多日子，就这等死了。我前日承他送我一把真金川扇儿，我正要拿甚答谢答谢，不想他又作了故人！”

Xie Xida suspiris kaj diris:

“Antaŭe niaj fratoj estis dek, nun unu jam forpasis. Cetere, la tria de la venonta monato estos la tago por nia renkontiĝo. Tiam ni ĝenos vian moŝton elspezi ian monsumon por nia tiutaga renkontiĝo.”

谢希大便叹了一口气道：“咱会中兄弟十人，却又少他一个了。”因向伯爵说：“出月初三日，又是会期，咱每少不得又要烦大官人这里破费，兄弟们顽耍一日哩。”

“Mi ĵus jam diris al mia edzino,” diris Ximen Qing, “ke tiuj ĉi renkontiĝoj, en kiuj ni faras nenion alian, krom manĝi kaj drinki, ne prezentas la esencan elementon en nia amikeco. Ni devus elekti iun templon, ellabori ian formalan dokumenton, kaj definitive ĵure fari nian interfratiĝon. Tiam ni estos por ĉiam ŝuldigitaj helpi unu la alian en la estonteco. Kiam la tago venos, mi aĉetos oferaĵon de la tri brutoj, la bovo, ŝafo kaj porko por la ceremonio. Mi proponas, ke ĉiu el vi estu preta kontribui iom laŭ siaj monrimedoj. Mi miaflanke ne volus fari insiston pri tio al vi, sed ŝajnas al mi, ke, ĉar ni kune formos interfratiĝon, estos multe pli dece, se ĉiu el ni faru ian kontribuon.”

西门庆便道：“正是，我刚才正对房下说来，咱兄弟们似这会来会去，无过只是吃酒顽耍，不着一个切实，倒不如寻一个寺院里，写上一个疏头，结拜做了兄弟，到后日彼此扶持，有个傍靠。到那日，咱少不得要破些银子，买办三牲，众兄弟也便随多少各出些分资。不是我科派你们，这结拜的事，各人出些，也见些情分。”

“Certe, fraĉjo,” haste diris Ying Bojue, “prave diras la proverbo: *edzino neniel povas bruligi incenson anstataŭ sia edzo*⁹. Ĉiu el ni devas fari ion por montri, ke ni estas seriozaj, sed mi timas, ke *ni estas pli aŭ malpli kiel furunkoj sur rata vosto — ĝia puso apenaŭ videblas*¹⁰, kaj certe ne multo estos eligita el ni.”

伯爵连忙道：“哥说的是。婆儿烧香当不的老子念佛，各自要尽自的心。只是俺众人们，老鼠尾巴生疮儿——有脓也不多。”

“Ho, vi ruza ulo!” diris Ximen Qing, ridante: “Neniu ja atendas de vi multon.”

西门庆笑道：“怪狗才，谁要你多来！你说这话。”

“Se la interfratiĝo estos farata,” diris Xie Xida, “ni devus esti dek. Nun Bu Zhidao jam mortis. Kiu devus esti trovita por lin anstataŭi.”

谢希大道：“结拜须得十个方好。如今卜志道兄弟没了，却教谁补？”

Ximen Qing pripensis iom da tempo. Poste li diris:

“Mia najbaro, fraĉjo Hua, nevo de la eŭnuko Hua, estas la ĝusta homo. Li elspezas sian monon eĉ sen hezito, kaj regule iras al bordeloj. Li loĝas tuj najbare apud mia domo, kaj ni estas tre intimaj amikoj. Mi do sendos mian servoknabon por inviti lin aliĝi al ni.”

西门庆沉吟了一回，说道：“咱这间壁花二哥，原是花太监侄儿，手里肯使一股滥钱，常在院中走动。他家后边院子与咱家只隔着一层壁儿，与我甚说得来，咱不如叫小厮邀他邀去。”

Ying Bojue ĝoje manklakis:

“Ĉu tiu, kiun vi menciis, estas tiu Hua Zixu, kiu tenas ĉe si la bordelan knabinon nomatan Arĝenta Wu?”

应伯爵拍着手道：“敢就是在院中包着吴银儿的花子虚么？”

“Estas ĝuste li,” diris Ximen Qing.

西门庆道：“正是他！”

“Invitu do lin per ĉia rimedo,” diris Ying Bojue. “Se mi nur povos amikiĝi kun li, tio signifos alian vinbovlon por mi.”

伯爵笑道：“哥，快叫那个大官儿邀他去。与他往来了，咱到日后，敢又有一个酒碗儿。”

“Vi stultulaĉo!” diris Ximen Qing, ridante, “aŭdante vian parolon pri bovlo, oni povus imagi, ke vi ĉiam suferas malsaton.”

Ili ĉiuj eksplodis per ridoj.

西门庆笑道：“傻花子，你敢害馋痲痞哩，说着的是吃。”大家笑了一回。

Post iom da tempo Ximen alvokis Dai'an kaj sendis lin al la domo de Hua Zixu.

“Diru al li, ke ni estas pretaj formi dekpersonan interfratiĝon en la tria de la venonta monato, kaj ke mi estos honorata, se li volos aliĝi al ni. Aŭdinte lian respondon, revenu kaj raportu ĝin al mi. Se li ne estos hejme, diru do tion al lia edzino.”

Kaj la servoknabo tuj ekiris al lia domo.

西门庆旋叫过玳安儿来说：“你到间壁花家去，对你花二爹说，如此这般：‘俺爹到了出月初三日，要结拜十兄弟，敢叫我请二爹上会哩。’看他怎的说，你就来回我话。你二爹若不在家，就对他二娘说罢。”玳安儿应诺去了。

“Ĉu tiam ni estos ĉi tie, aŭ iros al templo?” demandis Bojue.

伯爵便道：“到那日还在哥这里是，还在寺院里好？”

“Ĉi tie troviĝas du temploj,” diris Xie Xida. “Unu estas la budhista templo Eterna Feliĉo, kaj la alia, la taŭista Templo de Jada Imperiestro. Ni povos iri al iu ajn el la du.”

希大道：“咱这里无过只两个寺院，僧家便是永福寺，道家便是玉皇庙。这两个去处，随分那里去罢。”

“Tiu ĉi interfratiĝo,” diris Ximen Qing, “ne koncernas la budhismon, kaj, cetere, mi ne bone konas la bonzojn de tiu templo. Ni devos iri al la Templo de Jada Imperiestro. La ĉefpastro, Wu, estas mia intima amiko; tie estas kviete, kaj ni havos lokon sufiĉe spacohavan.”

西门庆道：“这结拜的事，不是僧家管的，那寺里和尚，我又不熟，倒不如玉皇庙吴道官与我相熟，他那里又宽展又幽静。”

“Prave vi diras, fraĉjo,” diris Ying Bojue. “Xie proponis la templon Eterna Feliĉo probable pro tio, ke la tieaj bonzoj havas intimajn rilatojn kun lia edzino.”

伯爵接过来道：“哥说的是，敢是永福寺和尚倒和谢家嫂子相好，故要荐与他去的。”

“Vi maljuna kanajlo,” diris Xie Xida, ridante, “ĉi tie ni nun diskutas pri plej serioza afero, kaj vi tamen prenas ĝin kiel okazon konvenan al brua furzo.”

希大笑骂道：“老花子，一件正事，说说就放出屁来了。”

Dum ili parolis kaj ridis, Dai'an revenis.

“La mastro Hua ne estis hejme,” li diris, “sed mi donis la mesaĝon al lia edzino. Ĝin aŭdinte, ŝi tre ĝojis kaj diris: ‘Se via mastro Ximen estas tiel afabla kaj invitas mian edzon, mi estas certa, ke li nepre iros tien. Tuj kiam li revenos, li mesaĝos vian mastron, kaj kiam venos la tago de la interfratiĝo, mi lin rememorigos.’ Ŝi donis al mi du kukojn por mi mem, kaj diris al mi, ke mi nepre transdonu al vi ŝiajn salutojn.”

正说笑间，只见玳安儿转来了，因对西门庆说道：“他二爹不在家，俺对他二娘说来。二娘听了，好不欢喜，说道：‘既是你西门爹携带你二爹做兄弟，那有个不来的。等来家我与他谈，至期以定撺掇他来，多拜上爹。’又与了小的两件茶食来了。”

“La edzino de fraĉjo Hua,” diris Ximen Qing, “estas virino ne nur bela, sed ankaŭ inteligenta.”

西门庆对应、谢二人道：“自这花二哥，倒好个伶俐标致娘子儿。”

Ili trinkis ankoraŭ alian tason da teo, kaj la du homoj leviĝis por foriri.

“Ni do foriru por informi la aliajn fratojn,” ili diris, “kaj kolekti iliajn kvotojn de la elspezoj, kaj vi, viaflanke, bonvolu fari la aranĝojn kun la ĉefpastro Wu.”

说毕，又拿一盏茶吃了，二人一齐起身道：“哥，别了罢，咱好去通知众兄弟，叫他分资来。哥这里先去与吴道官说声。”

“Jes,” diris Ximen Qing, “mi scias. Mi ne plu restigos vin ĉi tie.”

Li leviĝis kaj akompanis ilin ĝis la pordego. Antaŭ ol iri malproksimen, Ying Bojue sin returnis. “Ĉu vi ne pensas, ke estus amuze, se ni havus kelkajn belajn kantistinojn?”

西门庆道：“我知道了，我也不留你罢。”于是一齐送出大门来。应伯爵走了几步，回转来道：“那日可要叫唱的？”

“Ba! ne necesos,” diris Ximen Qing. “Estos pli amuze, se ni fratoj ridos kaj ŝercos nur inter ni.”

Kaj Ying Bojue faris riverencon kaj foriris kun Xie Xida.

西门庆道：“这也罢了，弟兄们说说笑笑，到有趣些。”说毕，伯爵举手，和希大一路去了。

Tre baldaŭ venis la unua de la deka monato. Frumatene Ximen Qing ellitiĝis kaj sidis en la ĉambro de Luna Sinjorino, kaj tiam alvenis servoknabo, kies kapharoj ĵus komencis esti aranĝitaj laŭ la plenaĝula maniero. Li portis kun si oritan kaj poluritan vizit-kesteton. Li unue faris *koŭtoŭon* (genuiĝo kaj riverenco kun la kapo tuŝanta la plankon —trad.) al Ximen Qing; poste li stariĝis kaj diris:

话休饶舌，捻指过了四五日，却是十月初一日。西门庆早起，刚在月娘房里坐的，只见一个才留头的小厮儿，手里拿着个描金退光拜匣，走将进来，向西门庆磕了一个头儿，立起来站在旁边说道：

“Mia mastro Hua Zixu sendas al via moŝto siajn komplimentojn. Iom antaŭe vi sendis vian

serviston kun invito, sed li ne estis hejme pro afero kaj ne persone ricevis la mesaĝon. Li informiĝis, ke vi faros aranĝojn por renkontiĝo en la tria de la monato, kaj nun sendas per mi tiun ĉi donaceton, kiun li konfidis al vi uzi kiel vi trovos dece. Li esperas, ke vi poste diros al li la efektivan sumon de la kvoto, kiun li devos doni, kaj li kompletigos la mankantan parton.”

“俺是花家，俺爹多拜上西门爹。那日西门爹这边叫大官儿请俺爹去，俺爹有事出门了，不曾当面领教的。闻得爹这边是初三日上会，俺爹特使小的先送这些分资来，说爹这边胡乱先用着，等明日爹这里用过多少派开，该俺爹多少，再补过来便了。”

Ximen Qing prenis la paketon, ekzamenis la etiketon, sur kiu estis skribite “unu taelo da arĝento”.

“Tio estas pli ol sufiĉa,” li diris, “via mastro certe ne devos sendi plion. Rememorigu lin teni tiun tagon libera. Li devos frumatene ellitiĝi, por pretigi sin iri al la templo kune kun la ceteraj el ni.”

西门庆拿起封袋一看，签上写着“分资一两”，便道：“多了，不消补的。到后日叫爹莫往那去，起早就要同众爹上庙去。”

“Jes, mi scias,” respondis la servoknabo.

Kiam la servoknabo estis preta foriri, Luna Sinjorino petis lin atendi momenton. Ŝi diris al Jada Fluto, la pli aĝa el siaj du servistinoj, doni al li du pecojn de fruktokuko.

“Tio estas donita al vi mem anstataŭ teo,” ŝi diris al li. “Reveninte hejmen, salutu vian mastrinon en mia nomo, kaj diru al ŝi, ke en iu el ĉi tiuj tagoj mi persone iros inviti ŝin veni kaj babili kun mi.”

La knabo prenis la kukojn, refoje *koŭtoŭis*, kaj foriris.

那小厮儿应道：“小的知道。”刚待转身，被吴月娘唤住，叫大丫头玉箫在食箩里拣了两件蒸酥果馅儿与他。因说道：“这是与你当茶的。你到家拜上你家娘，临去秋波你说西门大娘说，迟几日还要请娘过去坐半日儿哩。”那小厮接了，又磕了一个头儿，应着去了。

Kelkajn momentojn pli poste, Ying Bao, la servoknabo de Ying Bojue, venis. Ankaŭ li portis vizit-kesteton. Dai'an enkondukis lin.

“Mia patro kolektis tiujn ĉi kvotojn de la aliaj,” li diris, farinte *koŭtoŭon*, “kaj esperas, ke vi akceptos ilin.”

西门庆才打发花家小厮出门，只见应伯爵家应宝夹着个拜匣，玳安儿引他进来见了，磕了头，说道：“俺爹纠了众爹们分资，叫小的送来，爹请收了。”

Ximen Qing, ĵetante rigardon al la paketoj, vidis, ke ili entute estas ok, kaj transdonis ilin al sia edzino sen malfermi ilin.

“Uzu ilin,” li diris al ŝi, “por aĉeti ion por nia vizito al la templo.”

西门庆取出来看，共总八封，也不拆看，都交与月娘，道：“你收了，到明日上庙，好凑着买东西。”

Li forsendis Ying Bao. Baldaŭ pli poste li leviĝis kaj iris vidi sian trian edzinon, kiu estis malsana, sed, apenaŭ li atingis la ĉambron kaj sidiĝis, Jada Fluto venis diri al li, ke ŝia mastrino volas ree paroli al li.

说毕，打发应宝去了。立起身到那边看卓二姐。刚走到坐下，只见玉箫走来，说道：“娘请爹说话哩。”

“Kial antaŭe ŝi ne diris ĉion, kion ŝi havis por diri al mi?” diris Ximen Qing. Li leviĝis kaj revenis al ŝi, trovante ŝin kun ĉiuj paketoj malfermitaj kaj sternitaj antaŭ ŝi.

“Jen, rigardu!” ŝi diris, ridante, “Ying Bojue sendas unu dekonon kaj du centonojn de taelo da malbonkvalita arĝento, kaj la ceteraj homoj, nur po tri aŭ kvin centonojn. Juĝate laŭ la koloro, iuj

estas ruĝetaj, iuj flavetaj, aspekte ili povus esti oro. Certe, mi antaŭe neniam vidis tian aĵon en nia domo. Se vi akceptos ĝin, nia reputacio estos perdita pro ĝi. Vi devas tuj resendi ilin.”

西门庆道：“怎的起先不说来？”随即又到上房，看见月娘摊着些纸包在面前，指着笑道：“你看这些分子，止有应二的是一钱二分八成银子，其余也有三分的，也有五分的，都是些红的黄的，倒象金子一般。咱家也曾没见这银子来，收他的也污个名，不如掠还他罢。”

“Ne gravigu la bagatelon!” diris Ximen Qing. “La mankantan sumon ni kompletigu, kaj ĉio estos en ordo.”

Tion dirante, li foriris.

西门庆道：“你也耐烦，丢着罢，咱多的也包补，在乎这些！”说着一直往前去了。

La duan tagon, li pripesis kvar taelojn da arĝento kaj diris al sia servanto Laixing, ke li aĉetu unu porkon, unu ŝafon, kvin aŭ ses vazegojn da bonkvalita vino, kelkajn kokojn kaj anasojn, kandelojn kaj paperajn oferaĵojn. Poste li enmetis kvin dekonojn da arĝento en koverton kaj diris al sia servisto Laibao:

“Prenu ĝin kaj la aliajn objektojn, kaj iru kun Dai'an kaj Laixing al la Templo de Jada Imperiestro. Atinginte la templon, diru al la ĉefpastro: ‘Morgaŭ nia mastro faros solenan interfratiĝon kun siaj amikoj, kaj li prenos al si la liberecon peti vin komponi alparolon konvenan al la okazo. Li volas aranĝi bankedon en via templo en la vespero, kaj li estus tre dankema, se vi farus la necesajn preparojn. Li alvenos en la mateno.’”

到了次日初二日，西门庆称出四两银子，叫家人来兴儿买了一口猪、一口羊、五六坛金华酒和香烛纸札、鸡鸭案酒之物，又封了五钱银子，旋叫了大家人来保和玳安儿、来兴三个：

“送到玉皇庙去，对你吴师父说：‘俺爹明日结拜兄弟，要劳师父做纸疏辞，晚夕就在师父这里散福。烦师父与俺爹预备预备，俺爹明早便来。’”

Post nelonge Dai'an revenis. Li diris, ke li jam komunikis la mesaĝon, kaj ke la ĉefpastro donis sian konsenton.

只见玳安儿去了一会，来回说：“已送去了，吴师父说知道了。”

La tago baldaŭ forpasis. La sekvan matenon Ximen Qing lavis sin kaj kombis al si la harojn, kaj poste diris al Dai'an, ke tiu iru venigi Hua Zixu por matenmanĝo, antaŭ ol ili aliĝos al la aliaj por kune iri al la templo.

须臾，过了初二，次日初三早，西门庆起来梳洗毕，叫玳安儿：“你去请花二爹，到咱这里吃早饭，一同好上庙去。一发到应二叔家，叫他催催众人。”

La servoknabo tuj ekiris lin inviti. Baldaŭ poste Ying Bojue kaj la aliaj alvenis. Ili envenis en la domon kaj, formante rondon, kune faris al si riverencon.

玳安应诺去，刚请花子虚到来，只见应伯爵和一班兄弟也来了，却正是前头所说的这几个人。为头的便是应伯爵，谢希大、孙天化、祝念实、吴典恩、云理守、常峙节、白赆光，连西门庆、花子虚共成十个。进门来一齐筭圈作了一个揖。

“Jam estas la tempo ekiri,” kriis Ying Bojue.

伯爵道：“咱时候好去了。”

“Ne, antaŭ ĉio matenmanĝu,” diris Ximen Qing.

西门庆道：“也等吃了早饭着。”

Li do ordonis alporti teon kaj nutraĵon. Matenmanĝinte, li metis sur sin veston pli brilkoloran kaj pli belan, kaj ili ĉiuj kune ekiris al la Templo de Jada Imperiestro.

便叫：“拿茶来。”一面叫：“看菜儿。”须臾，吃毕早饭，西门庆换了一身衣服，打选衣帽光鲜，一齐径往玉皇庙来。

Antaŭ ol ili iris tre malproksimen, ili povis vidi la templan pordegon. Ĝi estis alta kaj impona:

ĝia ĉefa sanktejo, kun muroj atingantaj preskaŭ la ĉielon, estis ankoraŭ pli grandioza. La fronta muro de la pordego estis en formo de la ideografiaĵo 八, kiu estis ruĝe ŝmirkovrita. Interne de la muroj estis tri koridoroj, kiuj similis la ideografiaĵon 川. La konstruaĵo estis el marmoro kun akvecaj vejnoj. La ĉefa sanktejo, kies altaj tegmentorandoj estis ŝanĝbrilantaj en verda kaj ora koloroj, kuŝis en la centro. La statuoj de la Tri Puraj Saĝaj Prapatroj staris en deca ordo en la mezo de la ĉefa sanktejo, kaj en la malantaŭo estis la statuo de la Plejsupera Maljuna Sinjoro¹¹ rajdanta sur sia nigra bubalo.

不到数里之遥，早望见那座庙门，造得甚是雄峻。但见：殿宇嵯峨，宫墙高耸。正面前起着一座墙门八字，一带都粉赭色红泥；进里边列着三条甬道川纹，四方都砌水痕白石。正殿上金碧辉煌，两廊下檐阿峻峭。三清圣祖庄严宝相列中央，太上老君背倚青牛居后殿。

Ili eniris en la duan sanktejon, ĉirkaŭirante trapasis flankan pordon, venis al la loĝejo de la ĉefpastro Wu. Sur la du flankoj kreskis herboj tiel verdaj, kiel jaspo, kaj floroj tiel ruĝaj, kiel koralo. Tie kreskis ankaŭ pinoj kaj bambuoj. Ambaŭflanke de la pordo estis paralelaj surskriboj de versduo, kiu tekstis jene:

En la paradizo, senfinaj estas la jaroj;

En la Ĉiela Kruĉo kuŝas alia mondo.

进入第二重殿后，转过一重侧门，却是吴道官的道院。进的门来，两下都是些瑶草琪花，苍松翠竹。西门庆抬头一看，只见两边门楹上贴着一副对联道：

洞府无穷岁月，壶天别有乾坤。

Norde estis la halo konsistanta el tri ĉambroj, kie la ĉefpastro Wu laboris kaj faris taŭisman preĝadon ĉiutage en la mateno kaj vespero. La halo estis speciale ornamita por la okazo. En la mezo de la norda muro estis pendigita bildo de Jada Imperiestro en la Ora Palaco de Paradizo, kaj sur la du flankoj estis la nobeloj de la Purpura Palaco. Inter ili viciĝis ankaŭ la kvar generaloj Ma, Zhao, Wen kaj Guan¹².

上面三间敞厅，却是吴道官朝夕做功课的所在。当日铺设甚是齐整，上面挂的是昊天金阙玉皇上帝，两边列着的紫府星官，侧首挂着便是马、赵、温、关四大元帅。

La ĉefpastro Wu staris ekster la halo. Li bonvenigis ilin kun taŭista riverenco, kaj Ximen Qing kaj liaj amikoj eniris en la halon. Preninte teon, ili ĉiuj leviĝis kaj komencis rigardi la bildojn. Bai Laiguang prenis Chang Zhijie je la mano, kaj ili ekzamenis la portreton de la generalo Ma. Li havis imponan aspekton, kiu inspiris timon, sed li havis tri okulojn.

当下吴道官却又在经堂外躬身迎接。西门庆一起人进入里边，献茶已罢，众人都起身，四围观看。白赚光携着常峙节手儿，从左边看将过来，一到马元帅面前，见这元帅威风凛凛，相貌堂堂，面上画着三只眼睛。

“Mi ne komprenas tion ĉi,” diris Bai Laiguang. “Ni mortemuloj trovis bona havi du okulojn kaj teni unu el ili malfermita kaj la alian fermita. Ĉu li povas bezoni ekstran okulon por rigardi nin kaj niajn misagojn?”

便叫常峙节道：“哥，这却是怎的说？如今世界，开只眼闭只眼儿便好，还经得多出只眼睛看人破绽哩！”

Aŭdinte tion, Ying Bojue iris al li: “Vi stultulo,” li diris. “Speciale pro vi sola, li ja bezonas unu plian okulon!”

应伯爵听见，走过来道：“呆兄弟，他多只眼儿看你倒不好么？”

Ĉiuj ekridis. Kaj Chang Zhijie montris la bildon de la generalo Wen.

众人笑了。常峙节便指着下首温元帅道：

“Jen, ĉi tie,” li diris, “estas io vere stranga. Li estas tutkorpe blua. Mi supozas, ke li devas esti

unu el la prapatroj de Lu Qi¹³.”

“二哥，这个通身蓝的，却也古怪，敢怕是卢杞的祖宗。”

Ying Bojue ekridis.

“Venu ĉi tien, via ĉefpastro moŝto,” li ekkriis, “kaj mi rakontos al vi komikan historion.”

伯爵笑着猛叫道：“吴先生你过来，我与你说个笑话儿。”

Kaj la ĉefpastro vere venis al li por aŭskulto.

那吴道官真个走过来听他。

“Iam iu taŭista pastro mortis kaj venis antaŭ la Reĝon de la Infero,” komencis rakonti Ying Bojue. “La Reĝo demandis lin: ‘Kio vi estas?’ ‘Mi estas taŭista pastro,’ li respondis. La Reĝo do ordonis unu el liaj subuloj priserĉi la registrojn por konstati lian identecon. Li eltrovis, ke efektive li estas taŭista pastro kaj homo senkulpa, sekve la Reĝo lin reliberigis kaj resendis al la tero. Kiam li reviviĝis en la lando, kie li antaŭe vivis, li renkontiĝis kun iu konato, kiu laboris en tinkturejo. ‘Kiel do vi sukcese reviviĝis?’ Tiu ĉi homo lin demandis. ‘Mi nur diris, ke mi estas taŭista pastro, kaj ili resendis min al la mondo,’ respondis la pastro. Tiu ĉi homo do memoris tion, kaj kiam lia lasta tempo venis kaj li aperis antaŭ la Reĝo de la Infero, li ankaŭ deklaris, ke li estas taŭista pastro. La Reĝo ordonis siajn subulojn ekzameni lian korpon. Kiam ili pririgardis liajn manojn, ili trovis ilin ambaŭ blue makulitaj. ‘Kion tio ĉi signifas?’ demandis la Reĝo. ‘Tio venis de la masturbado, kiun mi faris por la generalo Wen.’ La tinkturisto respondis imitante la tonon de voĉlego de sankta teksto.”

伯爵道：“一个道家死去，见了阎王，阎王问道：‘你是什么人？’道者说：‘是道士。’阎王叫判官查他，果系道士，且无罪孽。这等放他还魂。只见道士转来，路上遇着一个染房中的博士，原认得的，那博士问道：‘师父，怎生得转来？’道者说：‘我是道士，所以放我转来。’那博士记了，见阎王时也说是道士。那阎王叫查他身上，只见伸出两只手来是蓝的，问其何故。那博士打着宣科的声音道：‘曾与温元帅搔胞。’”

Ili ĉiuj eksplodis per ridego.

说的众人大笑。

Poste ili iris al la alia flanko por rigardi la bildojn de Guan kaj Zhao. Guan havis ruĝan vizaĝon, kaj Zhao estis nigravizaĝa militisto, kun granda tigro staranta apude.

一面又转过右首来，见下首供着个红脸的却是关帝。上首又是一个黑面的是赵元坛元帅，身边画着一个大老虎。

Bai Laiguang montris la tigron kaj kriis: “Rigardu la tigron! Ĝi devas esti unu el la specoj, kiuj ne manĝas karnon, aŭ probable ĝi estas nature milda kaj traktas la homon tre afable.”

白赚光指着道：“哥，你看这老虎，难道是吃素的，随着人不妨事么？”

“Ĉu vi ne scias, ke tiu ĉi tigro estas lia plej fidinda servanto?” diris Ying Bojue

伯爵笑道：“你不知，这老虎是他一个亲随的伴当儿哩。”

Xie Xida, kiu ĉiam aŭskultis, alproksimiĝis kaj diris: “Ho, kiel terure! se mi havus tian servanton, momento da ĝia akompano estus por mi neeltenebla. Mi ĉiam timus, ke ĝi min formanĝus.”

谢希大听得走过来，伸出舌头道：“这等一个伴当随着，我一刻也成不的。我不怕他要吃我么？”

Ying Bojue ekridis kaj diris al Ximen Qing:

“Kia sensencaĵo!”

伯爵笑着向西门庆道：“这等亏他怎地过来！”

“Kion do vi volas diri per tio?” demandis Ximen Qing.

西门庆道：“却怎的说？”

“Nu,” respondis Ying Bojue, “Xie Xida ĵus diris, ke li timus, ke iu fidinda kunulo povus formanĝi lin. Vi do certe devus gardi vian vivon, ĉar ĉirkaŭ vi troviĝas sep aŭ ok el ni, tute fidindaj amikoj, kiuj ĉiuj estas pretaj sin nutri je via elspezo en iu ajn tempo.”

伯爵道：“子纯一个要吃他的伴当随不的，似我们这等七八个要吃你的随你，却不吓死了你罢了。”

Ĝuste en la momento, kiam ĉiuj babilis kaj ridis, la ĉefpastro alproksimiĝis. “Ĉu mi aŭdas, ke vi parolas pri tigro?” li diris. “Ĝuste en nia subprefektujo, Qinghe, lastatempe unu tigro kaŭzis tre seriozajn malbonojn al multaj homoj. Eĉ pli ol dek ĉasistoj perdis sian vivon inter ĝiaj dentoj.”

“Ĉu vere?” ekkriis Ximen Qing.

说着，一齐正大笑时，吴道官走过来，说道：“官人们讲这老虎，只俺这清河县，这两天好不受这老虎的亏！往来的人也不知吃了多少，就是猎户，也害死了十来人。”西门庆问道：“是怎的来？”

“Jes,” diris la ĉefpastro. “Mi estas surprizita, ke vi, sinjoroj, eĉ ne aŭdis pri tio. Mi devus ne scii pri tio, sed antaŭ kelka tempo unu el miaj junaj novicoj iris peti almozon ĉe la domo de la riĉulo Chai en Cangzhou, kaj li restis tie kelkajn tagojn antaŭ ol reveni en sekureco. Inter Qinghe kaj Cangzhou sin trovas monteto nomata Jingyang, kaj ŝajnas, ke lastatempe aperis drake-okula, blankfrunta tigro, kiu ofte atakas homon de tie kiel sian predon. Vojaĝantoj tre timas trapasi la monteton kaj devas formi grupon por trairi tiun vojon. La lokaj aŭtoritatoj nun promesas premion de kvindek taeloj da arĝento por mortigo de la tigro, sed ĝis nun, kvankam pluraj provoj estis faritaj, ili vaniĝis. Plej malfeliĉaj estis tiuj ĉasistoj: ili multe suferis de plurfoja punvergado pro neplenumo de la ordono en la fiksita templimo.”

吴道官道：“官人们还不知道。不然我也不晓的，只因日前一个小徒，到沧州横海郡柴大官人那里去化些钱粮，整整住了五七日，才得过来。俺这清河县近着沧州路上，有一条景阳冈，冈上新近出了一个吊睛白额老虎，时常出来吃人。客商过往，好生难走，必须要成群结伙而过。如今县里现出着五十两赏钱，要拿他，白拿不得。可怜这些猎户，不知吃了多少限棒哩！”

Bai Laiguang eksaltis kaj diris: “Hodiaŭ ni estas okupitaj je nia interfratiĝo, sed morgaŭ ni ekiros kapti la tigron. Tio estos tre bona okazo por ni akiri sumon da mono.”

白賚光跳起来道：“咱今日结拜了，明日就去拿他，也得些银子使。”

“Evidente vi ne rigardas vian vivon kiel valoran,” diris Ximen Qing.

西门庆道：“你性命不值钱么？”

Bai Laiguang ekridis kaj diris: “Se nur mi havus monon por elspezi, mi zorgus pri nenio alia, eĉ ne pri la vivo.”

白賚光笑道：“有了银子，要性命怎的！”众人齐笑起来。

La aliaj ĉiuj ekridis.

“Tio rememorigas al mi pri alia komika rakonteto,” diris Ying Bojue. “Iam iu falis en la tigran faŭkon, kaj lia filo, kiu volis lin savi, prenis tranĉilon kaj iris mortigi la rabobeston. Sed la homo, kvankam jam efektive inter la makzeloj de la tigro, laŭte kriis: ‘Kara filo, estu singarda dum vi svingos vian tranĉilon, ke ĝi ne difektu la tigran felon.’”

应伯爵道：“我再说个笑话你们听：一个人被虎衔了，他儿子要救他，拿刀去杀那虎。这人在虎口里叫道：‘儿子，你省可而的砍，怕砍坏了虎皮。’”

Liaj vortoj elvokis ridegon ĉe ĉiuj aŭskultantoj.

说着众人哈哈大笑。

La ĉefpastro nun jam finis la preparojn por la oferceremonio. Kiam ĉio estis preta, li venis proksimen kaj diris:

“Sinjoroj, jam estas la tempo por bruligi la paperajn oferaĵojn.”

只见吴道官打点牲礼停当，来说道：“官人们烧纸罢。”

Poste li prenis la ellaboritan dokumenton.

“Mi jam skribis la alparolon,” li diris, “sed mi devus scii, kiu el vi estas la plej aĝa frato kaj en kian ordon mi metos la aliajn. Se vi estos tiel afablaj kaj aranĝos ĉiun el vi en deca rango, tiam mi trovos facila skribi viajn honorajn nomojn.”

一面取出疏纸来，说：“疏已写了，只是那位居长？那位居次？排列了，好等小道书写尊讳。”

Ĉe tio eksonis ĥoro:

“Lia moŝto, nia fraĉjo Ximen Qing, kompreneble devas rangi kiel la unua.”

众人一齐道：“这自然是西门大官人居长。”

Sed Ximen Qing rifuzis. “Ni devus rangi laŭ nia aĝo,” li diris. “Fraĉjo Ying estas pli aĝa, ol mi, do estas li, kiu devus okupi la unuan lokon.”

西门庆道：“这还是叙齿，应二哥大如我，是应二哥居长。”

“Ho, ne, ne, fraĉjo!” ekkriis Ying Bojue, elŝovinte sian langon. “Tio ruinigus min! En la nuna tempo la homo estas juĝata nur laŭ sia riĉeco aŭ sia pozicio, anstataŭ laŭ sia aĝo. Kial do ni devus preni la aĝon en konsideron? Cetere, inter ni troviĝas aliaj, kiuj estas pli aĝaj, ol mi mem. Kaj ekzistas ankaŭ aliaj kaŭzoj, kial mi ne devus esti la plej aĝa frato. Kiel en la digno, tiel ankaŭ en la morala reputacio, mi neniel povus rangi tiel alte, kiel via moŝto. Vi estas perfekta modelo por la tuta mondo. Kaj, krome, mi ĉiam estas nomata Ying la Dua, kaj se mi fariĝus la plej aĝa, mi devus esti nomata Ying la Unua. Se tiam mi renkontiĝus kun du konatoj, kaj unu alparolus min per Ying la Unua kaj la alia per Ying la Dua, tiuokaze mi ne scius, al kiu el ili mi devus respondi.”

伯爵伸着舌头道：“爷，可不折杀小人罢了！如今年时，只好叙些财势，那里好叙齿！若叙齿，这还有大如我的哩。且是我做大哥，有两件不妥：第一不如大官人有威有德，众兄弟都服你；第二我原叫做应二哥，如今居长，却又要叫应大哥，倘或有两个人来，一个叫‘应二哥’，一个叫‘应大哥’，我还是应‘应二哥’，应‘应大哥’呢？”

Ximen Qing ekridis.

“Via lerta lango parolas eĉ tian sensencaĵon! Oni povus morti de ridego pro ĝi,” li diris.

西门庆笑道：“你这撺断肠子的，单有这些闲说的！”

Xie Xida instigis lin ne rifuzi, sed Ximen Qing daŭre modeste preferis iun alian. Finfine, post plua premo fare de Hua Zixu, Ying Bojue kaj la aliaj, li ne plu povis rezisti kaj akceptis la honoran lokon. Li estis sekvata de Ying Bojue kaj Xie Xida; kaj Hua Zixu, el respekto al lia riĉeco, okupis la kvaran lokon. La aliaj aranĝis sin en la pli malaltaj pozicioj. La ĉefpastro do plenigis la dokumenton, ekbruligis incenson kaj kandelojn, kaj, kun ĉiuj homoj starantaj ŝultron ĉe ŝultro en sia deca ordo, la alparolo estis solene malfaldita kaj laŭte legata:

谢希大道：“哥，休推了。”西门庆再三谦让，被花子虚、应伯爵等一干人逼勒不过，只得做了大哥。第二便是应伯爵，第三谢希，第四让花子虚有钱做了四哥。其余挨次排列。吴道官写完疏纸，于是点起香烛，众人依次排列。吴道官伸开疏纸朗声读道

“En la imperio de la Granda Song, la prefektujo Dongping de Shandong, la subprefektujo Qinghe, ni, la fidelaj Ximen Qing, Ying Bojue, Xie Xida, Hua Zixu, Sun Tianhua, Zhu Nianshi, Yun Lishou, Wu Dian'en, Chang Zhijie kaj Bai Laiguang, ĉi tie kolektiĝas, lavas al ni la manojn kaj bruligas incenson por peti benon de la Ĉielo. La ĵuro pri fideleco ĵurita en la Persikarba

Ĝardeno¹⁴ estas la modelo de lojaleco; kun humila koro ni prenas ĝin kiel nian ekzemplon, kaj penas sekvi la spiriton, kiu ĝin inspiras. La amikeco inter Guan Zhong kaj Bao Shuya¹⁵, antikvaj du fidelaj amikoj, estis tiel profunda, kiel la oceano, kaj, animitaj de la sama spirito, ni volas imiti ilian solenan strebon. Interne de la kvar maroj ĉiuj homoj estas fratoj, kaj, kvankam ili portas diversajn familinomojn, tamen ili povas esti tiel intimaj, kiel la sangofratoj. Kaj tial, en ĉi tiu regperiodo Zhenghe — tia-tia jaro — tia-tia monato — tia-tia tago, pie oferante viand-oferaĵojn de porko kaj ŝafo antaŭ la Feniksa Ĉaro, ni humile *koŭtoŭas* antaŭ tiu ĉi altaro kaj faras pian peton de beno. Ni faras nian plej respektan riverencon al la Plejalta Ĉielo, kie loĝas Jada Imperiestro, al la Gardantaj Anĝeloj de la Kvin Direktoj, al la Protektaj Dioj de Urbo kaj Vilaĝo, kaj al ĉiuj spiritoj, kiuj venas kaj iras. Ni petegas, ke ili akceptu la incenson de nia sincereco kaj degnu protekti nin en ĉio, kion ni faros. Ni, Ximen Qing kaj ceteraj, kvankam naskiĝintaj ĉiu en malsama horo, petegas, ke la morto trovu nin kunigitaj. Ni dezirus, ke la frateca ligilo inter ni restu por ĉiam nerompita. Niajn plezurojn ni kune dividu, kaj en la tempo de mizero ni helpu unu la alian. La memoro pri nia amikeco restu ĉiam verda, kaj en nia riĉeco ni memoru la malriĉecon. Kun tia memoro, de la komenco ĝis la fino, nia fido estu firmigita, kaj, venanta kun la suno kaj iranta kun la luno, nia frateco estu starigita tiel alta, kiel la ĉielo, kaj tiel firma, kiel la tero. Ekde nun, ekde tiu ĉi nia solena interfratiĝo, nia amo estu eterna, kaj nia paco senfina, kaj ĉiu el ni ĝuu longvivecon, kaj lia familio daŭran feliĉon. Nur en la Ĉielon ni metu nian fidon, ĝis la fino de nia vivo. Kiel la signon de nia interfratiĝo, ni sincere skribas ĉion ĉi tion supran.

Regperiodo Zhenghe

Tia-tia tago, tia-tia monato, tia-tia jaro.”

维大宋国山东东平府清河县信士西门庆、应伯爵、谢希大、花子虚、孙天化、祝念实、云理守、吴典恩、常峙节、白赚光等，是日沐手焚香请旨。伏为桃园义重，众心仰慕而敢效其风；管鲍情深，各姓追维而欲同其志。况四海皆可兄弟，岂异姓不如骨肉？是以涓今政和年月日，营备猪羊牲礼，鸾驭金资，瑞叩斋坛，虔诚请祷，拜投昊天金阙玉皇上帝，五方值日功曹，本县城隍社令，过往一切神祇，仗此真香，普同鉴察。伏念庆等生虽异日，死冀同时，期盟言之永固；安乐与共，颠沛相扶，思缔结以常新。必富贵常念贫穷，乃始终有所依倚。情共日往以月来，谊若天高而地厚。伏愿自盟以后，相好无尤，更祈人人增有永之年，户户庆无疆之福。凡在时中，全叨覆庇，谨疏。

政和 年 月 日文疏

Post kiam la ĉefpastro finis la legon de la dokumento, ĉiuj interfratiĝantoj kune faris kultadon antaŭ la altaro kaj poste laŭvice faris ok *koŭtoŭojn*. Poste la paperaj oferaĵoj estis forbruligitaj, kaj ĉiuj oferaĵvazoj estis forigitaj. La ĉefpastro ordonis, ke oni forportu ankaŭ la oferitajn animalojn kaj ilin haktranĉu kaj kuiru. La kokaĵoj, fiŝaĵoj kaj diversspecaj fruktoj abunde kovris du tablojn. Ximen Qing prenis la honoran lokon, kaj la ceteraj sidiĝis ĉiu laŭ sia rango. La ĉefpastro prezidis la festenon.

Baldaŭ la vino estis plurfoje enverŝita en la pokalojn al ĉiuj fratoj, kaj ili komencis sin amuzi ŝerce parolante kaj ludante fingrodivenon¹⁶, tiel ke la tuta halo estis plena de ĝenerala brua ridego.

吴道官读毕，众人拜神已罢，依次又在神前交拜了八拜。然后送神，焚化钱纸，收下福礼去。不一时，吴道官又早叫人把猪羊卸开，鸡鱼果品之类整理停当，俱是大碗大盘摆下两桌，西门庆居于首席，其余依次而坐，吴道官侧席相陪。须臾，酒过数巡，众人猜枚行令，耍笑哄堂，不必细说。

Jen kiel diras la poemo:

La suno leviĝas,

*La suno subiras.
Kiam la ebriuloj foriras subtenate,
La lunarko jam pendas super arboj.*

正是：
才见扶桑日出，又看曦驭衔山。
醉后倩人扶去，树梢新月弯弯。

Meze de ilia gajeco, Dai'an subite envenis. Li flustris al Ximen Qing: "Panjo sendis min akompani vin hejmen. Ŝi diris, ke la Tria Sinjorino hodiaŭ sentas sin tre malbone, kaj vi devas tuj reveni hejmen."

饮酒热闹间，只见玳安儿来附西门庆耳边说道：“娘叫小的接爹来了，说三娘今日发昏哩，请爹早些家去。”

Ximen Qing tuj leviĝis kaj diris: "Mi propre ne volus ĝeni vian gajecon, sed mia tria edzino estas malsana, kaj mi bedaŭras, ke mi devas nun vin forlasi."

西门庆随即立起来说道：“不是我摇席破座，委的我第三个小妾十分病重，咱先去休。”

"Mi iros la saman vojon, kiel fraĵo Ximen Qing," diris Hua Zixu. "Ni do kune iros."

只见花子虚道：“咱与哥同路，咱两个一搭儿去罢。”

"Se vi du riĉuloj ambaŭ foriros," kriis Ying Bojue, "kiel ni povos resti ĉi tie? Fraĵo Hua, vi ja ne devas tuj foriri."

伯爵道：“你两个财主的都去了，丢下俺们怎的！花二哥你再坐回去。”

"En lia hejmo troviĝas neniŭ viro," diris Ximen Qing. "Ni devos kune reveni, por ke lia edzino estu en trankvilo."

西门庆道：“他家无人，俺两个一搭里去的是，省和他嫂子疑心。”

"Ĝus kiam mi estis preta veni ĉi tien," diris Dai'an, "Sinjorino Hua diris al Tianfu, ke li selu ĉevalon kaj venu ĉi tien."

玳安儿道：“小的来时，二娘也叫天福儿备马来了。”

Ĝuste en tiu momento la knabo alvenis. Li aliris al Hua Zixu kaj diris: "Via ĉevalo estas ĉi tie, kaj panjo volis, ke vi tuj revenu."

只见一个小厮走近前，向子虚道：“马在这里，娘请爹家去哩。”

Antaŭ ol foriri, ili dankis la ĉefpastron pro lia komplezo, kaj salutis Ying Bojue kaj la aliajn.

"Ni estas devigitaj nun foriri," ili diris, "sed vi devas resti kaj plu gaje vin amuzi."

于是二人一齐起身，向吴道官致谢打搅，与伯爵等举手道：“你们自在耍耍，我们去也。”

Ili eliris, surĉevaliĝis kaj rajdis for. Tiuj, kiuj restis, estis tiel glutemaj, ke ili kvazaŭ volus formanĝi la tutan monton Tai¹⁷ eĉ sen dankemo al la terdio. Ili restadis en la templo kaj drinkadis ĝis plena kontenteco.

说着出门上马去了。单留下这几个嚼倒泰山不谢土的，在庙流连痛饮不题。

Kiam Ximen Qing atingis sian domon, li diris ĝisrevidon al Hua Zixu, kaj tuj iris demandi sian edzinon Luno, kiel lia tria edzino statas.

却表西门庆到家，与花子虚别了进来，问吴月娘：“卓二姐怎的发昏来？”

"Mi diris, ke ŝi estas malsana," ŝi diris, "por ke vi pli frue estu for de tiuj uloj. Jen kial mi igis Dai'an tiel diri. Sed efektive ŝia malsano ja pliserioziĝas kun la tagoj, kaj vi devus resti hejme kaj dediĉi iom da tempo al ŝi."

月娘道：“我说一个病人在家，恐怕你搭了这起人又缠到那里去了，故此叫玳安儿恁地说。只是一日日觉得重来，你也要在家看他的是。”

Aŭdinte ŝiajn vortojn, Ximen Qing iris al la alia flanko de la domo por viziti sian trian

edzinon, kaj dum kelkaj sinsekvaj tagoj li donis al ŝi iom da atento.

西门庆听了，往那边去看，连日在家守着不题。

La tempo pasis tre rapide, kaj baldaŭ venis la deka de la deka monato. Kiam Ximen Qing sendis alvoki kuraciston, por ekzameni la malsanon de sia tria edzino, kaj restis ankoraŭ en la salono, Ying Bojue envenis ridetante. Ximen Qing salutis lin, kaj petis lin sidiĝi.

却说光阴过隙，又早是十月初十外了。一日，西门庆正使小厮请太医诊视卓二姐病症，刚走到厅上，只见应伯爵笑嘻嘻走将进来。西门庆与他作了揖，让他坐了。

“Kiel estas mia bofratino?” demandis Ying Bojue.

伯爵道：“哥，嫂子病体如何？”

“Mi timas, ke ŝi povos neniel resaniĝi,” diris Ximen Qing, “mi eĉ dubas, ĉu io ajn povos esti farita por ŝi.”

西门庆道：“多分有些不起解，不知怎的好。”

Kaj li daŭrigis:

“Kiam do la festeno finiĝis tiun tagon?”

因问：“你们前日多咱时分才散？”

“La ĉefpastro insiste instigis nin plu resti, kaj kiam ni disiĝis, jam estis preskaŭ ĉe la noktomezo. Mi estis morte ebria. Feliĉe, vi revenis hejmen pli frue.”

伯爵道：“承吴道官再三苦留，散时也有二更多天气。咱醉的要不得，倒是哥早早来家的便益些。”

“Ĉu vi nun jam tagmanĝis?” demandis Ximen Qing.

西门庆因问道：“你吃了饭不曾？”

Ying Bojue ruze evitis diri “jes” aŭ “ne”, li do petis Ximen Qing fari divenon.

伯爵不好说不曾吃，因说道：“哥，你试猜。”

“Mi supozas, ke vi jam manĝis.”

西门庆道：“你敢是吃了？”

Ying Bojue ĝentile metis sian manon antaŭ sian buŝon, kaj diris ridetante: “Vi stultulo! Vi misdivenis.”

伯爵掩口道：“这等猜不着。”

“Nu? Se vi ne manĝis, kial do vi ne rekte diris tiele, vi hundaĉo?” diris Ximen Qing, ridante. “Mi ne povas imagi, kio faras vin tiel afektema.”

西门庆笑道：“怪狗才，不吃便说不曾吃，有这等张致的！”

Li do ordonis al sia servisto prepari manĝon por Ying Bojue kaj ankaŭ li mem.

一面叫小厮：“看饭来，咱与二叔吃。”

“Mi ja devus jam havi mian tagmanĝon,” diris Ying Bojue, “sed mi ĵus aŭdis plej eksterordinaran novaĵon, kaj mi devis tuj veni kaj diri al vi ĉion pri ĝi. Ni povos mem iri kaj vidi.”

伯爵笑道：“不然咱也吃了来了，咱听得一件稀罕的事儿，来与哥说，要同哥去瞧瞧。”

“Kia do estas la mirinda novaĵo?” diris Ximen Qing.

西门庆道：“甚么稀罕的？”

“Ĉu vi ankoraŭ memoras, kion la ĉefpastro rakontis pri la tigro de la monteto Jingyang?” diris Ying Bojue. “Nu, hieraŭ iu viro mortigis tiun tigron per siaj nudaj pugnoj.”

伯爵道：“就是前日吴道官所说的景阳冈上那只大虫，昨日被一个人一顿拳头打死了。”

“Ne parolu tian sensencaĵon,” diris Ximen Qing. “Mi ne kredas eĉ unu vorton pri ĝi.”

西门庆道：“你又来胡说了，咱不信。”

“Vi povas diri, ke vi ne kredas min, sed atendu ĝis mi rakontos al vi ĉion pri tio,” daŭrigis

Ying Bojue, svingante kiel la manojn tiel ankaŭ la piedojn en sia ekscitiĝo. “La heroo estas iu nomata Wu Song, kiu antaŭ ne longe serĉis azilon ĉe la domo de la mastro Chai kaj estis devigita foriri de tie. Poste li falis en malsanon, kaj, kiam li resaniĝis, li pensis, ke li devos serĉi sian pli aĝan fraton. Sur la vojo ĉi tien, li devis trapasi la monteton Jingyang. Tie li renkontis la tigron kaj mortigis ĝin per nenia armilo, krom la manoj kaj piedoj.”

伯爵道：“哥，说也不信，你听着，等我细说。”于是手舞足蹈说道：“这个人有名有姓，姓武名松，排行第二，”先前怎的避难在柴大官人庄上，后来怎的害起病来，病好了又怎的要去寻他哥哥，过这景阳冈来，怎的遇了这虎，怎的怎的被他一顿拳脚打死了。

Ying Bojue rakontis tiel detale, kvazaŭ li mem vidus la okazaĵon per siaj propraj okuloj aŭ eĉ li mem mortigus la tigron.

一五一十说来，就象是亲见的一般，又象这只猛虎是他打的一般。

Aŭdinte tion, Ximen Qing skuis sian kapon.

“Tiuokaze do,” li diris, “tuj kiam ni finos nian manĝon, mi iros kun vi kaj vidos propraokule, kiel aspektas la heroo kaj la tigro.”

说毕，西门庆摇着头儿道：“既恁的，咱与你吃了饭同去看来。”

“Ni do ne atendu la manĝon, alie ni povos esti tro malfruaj,” diris Ying Bojue. “Ni iru al Granda Strato kaj pasigu unu aŭ du horojn en la vintrinkejo tie.”

伯爵道：“哥，不吃罢，怕误过了。咱们倒不如大街上酒楼上去坐罢。”

Laixing tiam estis preta prepari la tablon, sed lia mastro diris al li, ke li ĉesigu la preparon, kaj petu Lunan Sinjorinon alporti al li lian supervestojn.

只见来兴儿来放桌儿，西门庆道：“对你娘说，叫别要看饭了，拿衣服来我穿。”

Kelkajn momentojn poste li jam metis sur sin la superveston kaj ekiris, manon en mano, kun Ying Bojue. Sur la strato ili renkontis Xie Xida.

“Saluton, fraĵoj,” li diris, ridetante, “ĉu ankaŭ vi venas por vidi la viron, kiu mortigis la tigron?”

须臾，换了衣服，与伯爵手拉着手儿同步出来。路上撞着谢希大，笑道：“哥们，敢是来看打虎的么？”

“Jes,” diris Ximen Qing. Xie Xida diris al ili, ke la homamasoj estas tiel grandaj, ke la vojo estas preskaŭ ne trapasigebla, kaj ili do iris en vintrinkejon, por rigardi de la etaĝo la straton.

西门庆道：“正是。”谢希大道：“大街上好挨挤不开哩。”于是一同到临街一个大酒楼上坐下。

Pasis ne longa tempo, antaŭ ol ili aŭdis la sonon de tamburoj kaj gongoj. La homoj streĉis ĉiu sian kolon por vidi la spektaklon. Ĉasistoj, en duopoj, ĉiu portante sian ruĝkvastan lancon, marŝis antaŭ la korpo de la mortigita tigro. Ĝi estis tiel kolosa, ke la kvar fortaj viroj apenaŭ povis porti ĝin, kaj ĝi aspektis kiel brodita sakego. Post ĝi, rajdante sur blanka alta ĉevalo, venis la brava viro, kiu ĝin mortigis.

不一时，只听得锣鸣鼓响，众人都一齐瞧看。只见一对对缨枪的猎户，摆将过来，后面便是那打死的老虎，好象锦布袋一般，四个人还抬不动。末后一匹大白马上，坐着一个壮士，就是那打虎的这个人。

Ximen Qing fiksrigardis lin, mordante siajn fingrajn ungojn, kaj diris: “Rigardu nur tiun viron. Li devus havi la forton de fortika bubalo, alie li neniel povus venki tiun ĉi bestegon.”

西门庆看了，咬着指头道：“你说这等一个人，若没有千百斤水牛般气力，怎能够动他一动儿。”

Kaj ili plu trinkis sian vinon, diskutante pri la heroa faro.

这里三个儿饮酒评品，按下不题。

Kia do estis la aspekto de la heroo?

Vidu nur:

Altega estas lia majesta figuro:

Viro en aĝo de ĉirkaŭ dudek kvin jaroj,

Kiu havas imponan aspekton,

Kun vizaĝo severa, regultrajta,

Kaj kun paro da brilantaj okuloj.

Liaj pugnoj pezas kiel martelo.

Se li nur eklevas sian piedon,

La tigroj sur monto ektimiĝas.

Kiam li eksvingas sian pugnon,

La grandaj ursoj time ektremas.

Li portas ĉapon kun arĝentaj floroj,

Kaj lia jako estas ruĝe makulita

Per la sango de lia viktimo.

单表迎来的这个壮士怎生模样？

但见：

雄躯凛凛，七尺以上身材；阔面棱棱，二十四五年纪。双目直竖，远望处犹如两点明星；两手握来，近觑时好似一双铁碓。脚尖飞起，深山虎豹失精魂；拳手落时，穷谷熊罴皆丧魄。头戴着一顶万字头巾，上簪两朵银花；身穿着一领血腥衲袄，披着一方红锦。

Tiu ĉi estis ĝuste la homo, pri kiu Ying Bojue parolis. Lia hejmo estis en la subprefektujo Yanggu, kaj nur por serĉi sian pli aĝan fraton li sur la vojo hazarde renkontis la tigron kaj ĝin mortigis, kaj pro tio la subprefekto alvokis la heroon al sia oficejo, kaj amasego da homoj atendis vidi lin ĉe lia alveno.

这人不是别人，就是应伯爵说所阳谷县的武二郎。只为要来寻他哥子，不意中打死了这个猛虎，被知县迎请将来。众人看着他迎入县里。

Kiam Wu Song alvenis, la subprefekto estis sidanta en la aŭdienza halo. Li deĉevaliĝis kaj eniris, kaj kelkaj homoj portis la bestegon antaŭ la halon. lia moŝto estis forte impresita de la aspekto de la heroo, kaj pensis en si, ke tiu ĉi viro devas esti vere fortega, alie li ne povus mortigi tian tigron.

却说这时正值知县升堂，武松下马进去，扛着大虫在厅前。知县看了武松这般模样，心中自忖道：“不恁地，怎打得这个猛虎！”

Li do vokis Wu Song antaŭeniĝi. La heroo *koŭtoŭis*, kaj poste rakontis, kiel li mortigis la tigron tiel vive, ke la ĉeestantaj oficistoj estis duone paralizitaj de timo. Poste, en la aŭdienza halo, la subprefekto solene proponis al li tri pokalojn da vino, kaj el la publika trezorejo estis elprenitaj kvindek taeloj da arĝento, por esti donitaj al Wu Song kiel rekompenco.

便唤武松上厅。参见毕，将打虎首尾诉说一遍。两边官吏都吓呆了。知县在厅上赐了三杯酒，将库中众土户出纳的赏钱五十两，赐与武松。

“Dank’ al la bona administrado de via moŝto,” diris Wu Song, “mi ŝuldas mian venkon super la tigro pli al bonŝanco, ol al mia kapablo. Mi havas nenian rajton sur tiun ĉi rekompencon. La ĉi-tieaj ĉasistoj altiris sur sin multe da puno de via moŝto pro tiu ĉi besto, kaj mi estos tre dankema, se via moŝto disdonos al ili la arĝenton, anstataŭ al mi.”

武松稟道：“小人托赖相公福荫，偶然侥幸打死了这个大虫，非小人之能，如何敢受这

些赏赐！众猎户因这畜生，受了相公许多责罚，何不就把赏给散与众人，也显得相公恩典。”

“Mi do faros laŭ via deziro,” diris la subprefekto.

知县道：“既是如此，任从壮士处分。”

Kaj la mono estis distribuita inter la ĉasistoj. Vidante, ke Wu Song estas heroo tiel malavare grandanima kaj honesta, li opiniis, ke estos bona ideo doni al li ian pozicion.

武松就把这五十两赏钱，在厅上俵散与众猎户去了。知县见他仁德忠厚，又是一条好汉，有心要抬举他。

“Vi estas indiĝeno de Yanggu,” li diris, “sed ĝi ne multe distancas de ĉi tie. Mi volus proponi al vi la oficon de la ĉefo de mia polico, kaj konfidi al vi la taskon forbalai la banditojn, kiuj faras plagojn en la najbaraĵo. Kia do estas via opinio?”

Wu Song genuiĝis kaj diris:

“Mi estos eterne dankema pro la favoro de via moŝto.”

便道：“你虽是阳谷县人氏，与我这清河县只在咫尺。我今日就参你在我县里做个巡捕的都头，专在河东水西擒拿贼盗，你意下如何？”武松跪谢道：“若蒙恩相抬举，小人终身受赐。”

La subprefekto tuj vokis sian sekretarion, ordonis al li skribi la necesajn paperojn, kaj baldaŭ ĉio estis pretigita. La eminentuloj de la distrikto ĉiuj venis por esprimi siajn gratulojn, kaj festenoj estis faritaj dum pluraj sinsekvaj tagoj. Tiu Wu Song, kiu propre intencis serĉi sian pli aĝan fraton, ricevis la neatenditan nomumiĝon de policĉefo en Qinghe. Li kompreneble tre ĝojis pro tio, kaj en la tuta prefektujo de Dongping troviĝis neniuj, kiu ne konus la nomon de Wu Song.

知县随即唤押司立了文案，当日便参武松做了巡捕都头。众里长大户都来与武松作贺庆喜，连连吃了数日酒。正要回阳谷县去抓寻哥哥，不料又在清河县做了都头，却也欢喜。那时传得东平一府两县，皆知武松之名。

Vere:

Tiu ĉi heroo, vera bravulo,

Kun vina forto iris sur la monton.

Li pugne mortigis la ferocan tigron,

Kaj nun lia nomo ĉie diskoniĝas.

正是：

壮士英雄艺略芳，挺身直上景阳冈。

醉来打死山中虎，自此声名播四方。

Iun tagon, kiam Wu Song promenis laŭ la strato, li ekaŭdis voĉon malantaŭ si, kiantan:

“Fraĉjo, fraĉjo! Ĉu vi estas tro fiera, por min koni, nun ke vi jam fariĝis policĉefo?”

Li tuj sin turnis kaj, je sia surprizo, rekonis la parolanton.

却说武松一日在街上闲行，只听背后一个人叫道：“兄弟，知县相公抬举你做了巡捕都头，怎不看顾我！”武松回头见了这人，不觉的：

Jen vidu:

Liaj brovoj ekradiis de ĝojego,

Lia vizaĝo brilis de larĝa rideto.

欣从额角眉边出，喜逐欢容笑口开。

Li estis lia frato Wu Da, la ĝusta homo, kiun li tiel longe deziris renkonti. Dum la periodo de severa malsatego la fratoj estis devigitaj disiĝi. Wu Da transloĝiĝis al Qinghe kaj luprenis domon en Ametista Strato. Li estis homo simpla, molkaraktera, kun aspekto tre ne okulplaĉa, kaj pro tio oni donis al li moknomon Tricola Arboŝelo¹⁸. La kompatinda homo estis nek tre forta, nek tre

inteligenta, sekve li fariĝis konstanta objekto de moko kaj ofendo por la najbaroj.

这人不是别人，却是武松日常间要去寻他的嫡亲哥哥武大。却说武大自从兄弟分别之后，因时遭饥馑，搬移在清河县紫石街赁房居住。人见他为人懦弱，模样猥褻，起了他个浑名叫做三寸丁谷树皮，俗语言其身上粗糙，头脸窄狭故也。只因他这般软弱朴实，多欺侮也。这也不在话下。

Wu Da havis nek metion, nek fakan okupon; li perlaboris siajn vivrimedojn kolportante vaporumitajn kukojn. Malfeliĉe lia edzino mortis, restiginte al li junan filinon Jasmeno, kiu nun estis dek-du-jara. Ili solaj kune vivis tie kelkajn monatojn, kaj poste Wu Da perdis monon en sia kolportado kaj, pro malvasteco de monrimedoj, li transloĝiĝis al la domo de riĉulo nomata Zhang, kiu loĝis ĉe Granda Strato. Tie Wu Da luprenis loĝejon de simpla ĉambro. La Zhang-familianoj trovis lin homo tre honesta, kaj ili faris sian plejebulon por doni al li apartan prizorgon, kaj li ankoraŭ sin okupis je la vendado de kukoj. Kiam li havis senokupan tempon, li kutime restis en la butikoj de Zhang, helpante ĉe io aŭ alio, kaj estis tre afabla al la komizoj de la butikoj. Ili ĉiuj tre amis lin kaj ofte parolis favore al li antaŭ sia mastro, kaj sekve Zhang fine eĉ liberigis lin je lia lupago de la loĝejo.

且说武大无甚生意，终日挑担子出去街上卖炊饼度日，不幸把浑家故了，丢下个女孩儿，年方十二岁，名唤迎儿，爷儿两个过活。那消半年光景，又消折了资本，移在大街坊张大户家临街房居住。张宅家下人见他本分，常看顾他，照顾他依旧卖些炊饼。闲时在铺中坐地，武大无不奉承。因此张宅家下人个个都欢喜，在大户面前一力与他说方便。因此大户连房钱也不问武大要。

Tiu ĉi riĉulo Zhang estis pli ol sesdek-jara. Li estis tre riĉa kaj prospera, sed li havis neniujn infanojn. Lia edzino, filino de sinjoro Yu, mastrumis tre rigore, kaj sekve li havis neniujn junajn servistinojn belaspektajn por sin amuzi. Li ofte batis al si la bruston, suspirante kaj lamentante: “Jen mi estas maljuna kaj seninfana, kaj, kvankam mi posedas sufiĉe abundan propraĵon, tamen, malgraŭe, kian utilon ĝi havas al mi?”

却说这张大户有万贯家财，百间房屋，年约六旬之上，身边寸男尺女皆无。妈妈余氏，主家严厉，房中并无清秀使女。只因大户时常拍胸叹气道：“我许大年纪，又无儿女，虽有几贯家财，终何大用。”

“Se al vi plaĉos,” diris lia edzino iun tagon, “mi diros al svatistino aĉeti paron da knabinoj por vi. Ili povos lerni ludi muzikilojn kaj kantadi matene kaj vespere, por vin distri, eble tiam vi sentos vin pli bone.”

妈妈道：“既然如此说，我叫媒人替你买两个使女，早晚习学弹唱，服侍你便了。”

Ĉe tio la riĉulo ekĝojis kaj tre dankis sian edzinon denove kaj refoje. Post ne longe, ŝi plenumis sian promeson, sendis alvoki svatistinon, kaj poste la du knabinoj estis sukcese aĉetitaj. Unu, kun familinomo Pan, estis nomata Ora Lotuso, kaj la alia, kun familinomo Bai, estis nomata Jada Lotuso.

大户听了大喜，谢了妈妈。过了几时，妈妈果然叫媒人来，与大户买了两个使女，一个叫做潘金莲，一个唤做白玉莲。

Jada Lotuso estis ĉirkaŭ dek-ses-jara kaj naskiĝis en bordelo. Ŝi estis sufiĉe bela, kun haŭto pure blanka, kaj inteligenta. Ora Lotuso estis la filino de iu Pan Cai, kiu loĝis ekster la suda urbopordego. Ŝi estis lia sesa infano, kaj ŝi estis tre bela eĉ en sia infanaĝo. Ŝiaj malvaste vinditaj piedetoj estis aparte ĉarmaj, kaj de tio ŝi ricevis sian nomon¹⁹. Post kiam ŝia patro mortis, ŝia patrino estis tute sen vivrimedoj, kaj kiam ŝi estis naŭ-jara, ŝi estis vendita al la generalo Wang. En lia domo ŝi lernis ludi muzikilojn kaj kanti, kaj, en sia libera tempo, ankaŭ legi kaj skribi. Ŝi estis

nature inteligenta kaj diligenta, kaj antaŭ ol ŝi estis dekdu-jara, ŝi jam fariĝis lerta en multaj artoj. Ŝi lernis, kiel ekzemple, nigre pentri al si la brovojn, pudri la vizaĝon kaj ruĝumi la lipojn, kaj ŝi povis ludi plurajn muzikilojn. Ŝi ne neglektis la kudradon, kaj ŝi povis legi la ideografiaĵojn en libroj. Kun siaj haroj bele volvitaj en hartuberon, portante striktan robon, ŝi povis preni koketajn pozojn. Kiam ŝi estis dekkvin-jara, la generalo Wang mortis, kaj ŝia patrino revendis ŝin al la riĉa Zhang por tridek taeloj da arĝento.

玉莲年方二八，乐户人家出身，生得白净小巧。这潘金莲却是南门外潘裁的女儿，排行六姐。因他自幼生得有些姿色，缠得一双好小脚儿，所以就叫金莲。他父亲死了，做娘的度日不过，从九岁卖在王招宣府里，习学弹唱，闲常又教他读书写字。他本性机变伶俐，不过十二三，就会描眉画眼，傅粉施朱，品竹弹丝，女工针指，知书识字，梳一个缠髻儿，着一件扣身衫子，做张做致，乔模乔样。到十五岁的时节，王招宣死了，潘妈妈争将出来，三十两银子转卖于张大户家，与玉莲同时进门。

Ŝi kaj Jada Lotuso ambaŭ kune lernis muzikajn lecionojn, sed ĉar ŝi jam havis antaŭajn spertojn, ŝi trovis ilin tute ne malfacilaj. Estis decidite, ke ŝi ludu *pipaon* kaj Jada Lotuso *ĝengon* (13-, 16-, 21- aŭ 25-korda plukinstrumento iom simila al citro —trad.). Ili dividis la saman dormoĉambron. Post kiam la du knabinoj eniris en la domon, ilia mastrino estis tre afabla al ili, kaj donis al ili orajn kaj arĝentajn kap-ornamaĵojn, por ke ili estu faritaj pli belaj. Poste Jada Lotuso neatendite mortis, kaj Ora Lotuso estis restigita sola. Tiam ŝi estis dek-ok-jara, kaj ŝia vizaĝo fariĝis tiel ĉarme bela, kiel persika floro, kaj ŝiaj delikataj brovoj estis arkaj, kiel krescenta luno. Multajn fojojn la mastro Zhang deziris havi intimaĵojn kun ŝi, sed, sub la aŭstera okulo de sia edzino, li trovis neniun okazon por ĝui ŝin. Kaj tamen, en iu tago, kiam la mastrino eliris el la domo por festeno en najbara domo, la riĉulo sekrete alvokis ŝin al sia ĉambro, kaj finfine lia deziro estis kontentigita.

大户教他习学弹唱，金莲原自会的，甚是省力。金莲学琵琶，玉莲学筝，这两个同房歇卧。主家婆余氏初时甚是抬举二人，与他金银首饰装束身子。后日不料白玉莲死了，止落下金莲一人，长成一十八岁，出落的脸衬桃花，眉弯新月。张大户每要收他，只得主家婆厉害，不得到手。一日主家婆邻家赴席不在，大户暗把金莲唤至房中，遂收用了。

Vere:

*Ne malfrua estas la romantika renkontiĝo sur Ĉiela Teraso,
Ĉar la ĉiamverda amanto tenas ankoraŭ maljunajn flamojn!*

正是:

莫讶天台相见晚，刘郎还是老刘郎。

Malfeliĉe, de kiam li havis plezurojn ĉe Ora Lotuso, ĉiaj malbonoj venis sur lin. Li havis mukoplenan nazon, li ĉiam larmis, kaj li fariĝis pli kaj pli surdeta. Liaj lumboj komencis dolori, kaj la urinado fariĝis al li malfacila. Ne longe li suferis de tiuj ĉi malsanoj, antaŭ ol lia edzino eksciis pri lia sekreto. Ŝi brue riproĉis lin dum pluraj tagoj, kaj severe punis Oran Lotuson, vergante ŝin ĝis duonmorto. La mastro Zhang, sciante, ke li faris ion maldecan, sekrete provizis la knabinon per iom da doto, kaj serĉis por ŝi iun konvenan viron, por ŝin edzinigi. Oni en lia butikoj diris: “Wu Da estas vidvo kaj tre honesta homo,” kaj ŝajnis al li, ke neniuj povus esti pli dezirinda, ol tiu viro, kiu loĝas en la sama domo, kaj, cetere, li povus ankoraŭ havi la okazon vidi la belan knabinon de tempo al tempo. Li do edzigis Wu Da al ŝi sen postuli ion ajn kiel repagon.

大户自从收用金莲之后，不觉身上添了四五件病症。端的那五件？第一腰便添疼，第二眼便添泪，第三耳便添聋，第四鼻便添涕，第五尿便添滴。自有了这几件病后，主家婆颇知其事，与大户嚷骂了数日，将金莲百般苦打。大户知道不容，却赌气倒赔了房奩，要寻嫁得

一个相应的人家。大户家下人都说武大忠厚，见无妻小，又住着宅内房儿，堪可与他。这大户早晚还要看觑此女，因此不要武大一文钱，白白地嫁与他为妻。

La geedziĝo estis celebrita, kaj Zhang, eĉ pli afabla, ŝutis favorojn al la novedzo. Se al li mankis sufiĉa mono por fari kukojn, la riĉulo kaŝe provizis lin per ĝi; kaj kiam Wu Da eliris portante du korbojn por kolporti siajn kukojn, la riĉulo, certigante sin, ke ĉirkaŭe estas neniu homo, sekrete eniris en la ĉambron de Ora Lotuso en ŝia soleco. Kvankam iafoje Wu Da hazarde trovis, ke Zhang traktis lian edzinon tiel intime, kvazaŭ ŝi ankoraŭ apartenus al li, li estis devigita toleri la vidon, ne kuraĝante fari proteston. La mastro Zhang venis en la mateno kaj restis ĉe ŝi ĝis la vespero, ĝis finfine en iu tago li estis venkita de elĉerpiĝo de energio kaj mortis surloke. Antaŭe lia edzino neniam estis blinda al ĉio, kio okazis, kaj nun, furioziĝinte, ŝi diris al siaj servistoj, ke ili pelu Wu Da kaj lian edzinon sur la straton. La kompatinda viro kun Ora Lotuso iris al Ametista Strato, kaj tie ili luprenis du ĉambrojn en la domo de Wang, la malproksima parenco de la imperiestra familio, kaj daŭrigis la vendadon de siaj kukoj.

这武大自从娶了金莲，大户甚是看顾他。若武大没本钱做炊饼，大户私与他银两。武大若挑担儿出去，大户候无人，便蹩入房中与金莲厮会。武大虽一时撞见，原是他的行货，不敢声言。朝来暮往，也有多时。忽一日大户得患阴寒病症，呜呼死了。主家婆察知其事，怒令家僮将金莲、武大即时赶出。武大故此遂寻了紫石街西王皇亲房子，赁内外两间居住，依旧卖炊饼。

Post sia edziniĝo al Wu Da, baldaŭ Ora Lotuso trovis, ke li tute ne indas esti ŝia edzo. Li ne nur estis malbelaspekta, sed ankaŭ havis nenian virecon, kaj ŝi komencis lin abomeni, ofte kverelis kun li, por verŝi sian koleron, kaj ŝi eĉ plendis kontraŭ la mastro Zhang.

“En la mondo ne mankas viroj,” ŝi diris al si. “Kial li devis edzinigi min al tia aĉaĵo, kia tiu ĉi estas. Ĝi ĉiam restas la sama, kia ĝi estas. Kiel ajn pene mi pelas lin, li ne moviĝas eĉ unu paŝon; kaj se mi penas puŝi lin antaŭen, li male nur iras malantaŭen. Kiel ajn multeokupita estas la tago, li ŝajnas malsana kaj neniel volas tuŝi siajn laborilojn. Ho ve, mi devas esti la plej granda malfeliĉulino en tiu ĉi mondo, edziniĝinte al tia estaĵo, kia li estas. Mia sorto estas vere mizera, kruela.”

原来这金莲自嫁武大，见他一味老实，人物猥琐，甚是憎嫌，常与他合气。报怨大户：“普天世界断生了男子，何故将我嫁与这样个货！每日牵着不走，打着倒退的，只是一味吃酒，着紧处却是锥钁也不动。奴端的那世里悔气，却嫁了他！是好苦也！”

Kaj kiam ŝi estis sufiĉe soleca, ŝi kantis la jenan kanton:

Por viro mi prenis lin;

Nun mi ekscias, ke li estas nenia vera viro.

Mi ne volus fanfaroni, sed li estas ja tro aĉa.

La korvo neniel povas esti parigita kun la fenikso;

Mi estas oro profunde enterigita,

Dum li nur peco da latuno.

Kiel li povus esti inda min brakumi?

Li estas nur fekaĵo kaj tero,

Dum mi freŝa floro aparte aroma.

Ĉu mia jada korpo, kuŝante en liaj brakoj,

Povos plezure vibrigi lin en ekstazo?

Kiel mi povos pasigi miajn tagojn kun li por ĉiam?

Kiel mi povos toleri lin tiel longe, dum mi vivos?

Mi, pura oro, neniel povos resti en koto tiel malpura.

常无人处，唱个《山坡羊》为证：

想当初，姻缘错配，奴把你当男儿汉看觑。不是奴自己夸奖，他乌鸦怎配鸾凤对！奴真金子埋在土里，他是块高号铜，怎与俺金色比！他本是块顽石，有甚福抱着我羊脂玉体！好似粪土上长出灵芝。奈何，随他怎样，到底奴心不美。听知：奴是块金砖，怎比泥土基！

Karaj legantoj, bonvolu noti al vi: en tiu ĉi mondo la virinoj estas preskaŭ la samaj: la knabino, kiu estas sufiĉe bela kaj inteligenta, povas kontentiĝi, se nur ŝi edziniĝas al bona viro. Sed, se ŝia viro pruvigas tia, kia Wu Da estis, tiam, kiel ajn virta ŝi povas esti, ia grado de malkontenteco, eĉ abomeno, pli aŭ malpli baldaŭ influas ŝian sintenon al li. Kaj ni devas memori, ke ekde la antikveco la bela knabino malofte sukcesas en trovo de bela edzo egala al ŝi. Tio estas kiel la fakto, ke tiu, kiu havas oron por vendi, apenaŭ povas renkonti tiun, kiu deziras ĝin aĉeti.

看官听说：但凡世上妇女，若自己有几分颜色，所禀伶俐，配个好男子便罢了，若是武大这般，虽好杀也未免有几分憎嫌。自古佳人才子相配着的少，买金偏撞不着卖金的。

En ĉiu tago Wu Da, preninte siajn korbojn, eliris por vendi siajn kukojn kaj revenis nur ĉe la sunsubiro. Kaj, post kiam la virino liberigis sin de li, ŝi kutime sidis sub la rulkurteno, dentfendante melonsemojn kaj etendante antaŭen siajn piedetojn kun la espero altiri la atenton de iuj junaj nenifaremuloj. Kaj, efektive, venis antaŭ ŝian pordegon konstanta fluo da junaj stratulaĉoj, kiuj ĉiutage paroladis ŝerce aŭ enigme, kaj eĉ laŭte kriis:

武大每日自挑担儿出去卖炊饼，到晚方归。那妇人每日打发武大出门，只在帘子下嗑瓜子儿，一径把那一对小金莲故露出来，勾引浮浪子弟，日逐在门前弹胡博词，撒谜语，叫唱：

“Kia domaĝo, ke peco da grasa ŝafaĵo falis en hundan buŝaĉon!”

“一块好羊肉，如何落在狗嘴里？”

Ili elverŝis ĉiaspecajn vortaĉojn sur ŝin tiel glate, kiel oleon, ĝis finfine Wu Da venis al netolerebleco kaj konkludis, ke Ametista Strato ne plu estas la loko taŭga por ilia loĝado, kaj decidis transloĝiĝi aliloken. Sed kiam li parolis al sia edzino pri la afero, ŝi kriis:

油似滑的言语，无般不说出来。因此武大在紫石街又住不牢，要往别处搬移，与老婆商议。

“Vi nana estaĵo! Vi estas nenio, krom stultulo. Vi luprenis tian aĉan loĝejon, kaj kompreneble malnobluloj venas kaj diras, kion ajn ili volas. La plej bona afero, kiun vi devos fari, estas kolekti kelkajn taelojn, trovi sufiĉe bonan domon kaj lupreni du ĉambrojn en ĝi. Tiam ni eble povos loĝi pli respektinde, kaj oni povos ĉesi trakti nin tiamaniere.”

妇人道：“贼馄饨不晓事的，你赁人家房住，浅房浅屋，可知有小人罗唆！不如添几两银子，看相应的，典上他两间住，却也气概些，免受人欺侮。”

“De kie mi povos havigi al mi la monon por lupreni tian domon?” diris Wu Da.

武大道：“我那里有钱典房？”

“Vi bulo da ŝlimo! Ĉu vi estas viro? Ĉu vi permesas, ke via edzino plu estu insultata en tia maniero? Se vi havas neniom da mono, prenu do miajn kap-ornaĵojn, forvendu ilin, kaj aĉetu domon per la mono. Poste, kiam ni havos sufiĉan monon, ni povos reaĉeti la ornaĵojn.”

妇人道：“呸！浊才料，你是个男子汉，倒摆布不开，常交老娘受气。没有银子，把我的钗梳凑办了去，有何难处！过后有了再治不迟。”

Wu Da sukcese kolektis dekkelkajn taelojn da arĝento kaj prenis lokon proksime de la urbodomo. Ĝi havis du ĉambrojn sur du etaĝoj, kun du kortetoj. La tuta loko estis tre pura. De kiam Wu Da kaj lia edzino ekloĝis en Okcidenta Strato, li ankoraŭ daŭrigis la perlaboradon de siaj vivrimedoj kolportante vaporumitajn kukojn.

武大听老婆这般说，当下凑了十数两银子，典得县门前楼上下两层四间房屋居住。第二层是楼，两个小小院落，甚是干净。武大自从搬到县西街上来，照旧卖炊饼过活。

Nun, neatendite, li hazarde renkontis sian pli junan fraton, kaj iliaj koroj ekĝojegis. En la fino Wu Da invitis sian fraton kune iri al la hejmo. Li kondukis lin sur la duan etaĝon, sidigis lin tie. Poste li vokis Oran Lotuson veni kaj vidi Wu Song.

不想这日撞见自己嫡亲兄弟。当日兄弟相见，心中大喜。一面邀请到家中，让至楼上坐，房里唤出金莲来，与武松相见。

“Vi devas memori la viron,” li diris al ŝi, “kiu mortigis la tigron sur la monto Jingyang. Li estas neniue alia, ol via bofrato, la filo de la sama patrino, kiel la mia. Li ĵus estis nomumita la policĉefo.”

因说道：“前日景阳冈上打死大虫的，便是你的小叔。今新充了都头，是我一母同胞兄弟。”

Ora Lotuso faris riverencon al sia bofrato, kaj Wu Song genuiĝis por reciproki la saluton. Ŝi ne permesis al li tion fari, kaj starigis lin, dirante, ke tia degnemo de lia flanko supermezure embarasos ŝin.

那妇人叉手向前，便道：“叔叔万福。”武松施礼，倒身下拜。妇人扶住武松道：“叔叔请起，折杀奴家。”

Wu Song tamen persistis, kaj, post kelktempa ĝentila disputo, finfine ili ambaŭ surgenuiĝis kaj *koŭtoŭis* unu al la alia. Baldaŭ poste la eta Jasmeno alportis teon por la du homoj. Wu Song, alfrontante la allogan ĉarmon de sia bofratino, ĝenate sin detenis de rigardo al ŝi, dume Wu Da sin okupis je la preparo por la regalo de sia frato.

武松道：“嫂嫂受礼。”两个相让了一回，都平磕了头起来。少顷，小女迎儿拿茶，二人吃了。武松见妇人十分妖娆，只把头来低着。不多时，武大安排酒饭，款待武松。

Baldaŭ poste Wu Da malsupreniris la ŝtuparon kaj eliris por aĉeti vinon kaj iajn frandaĵojn, restigante sian edzinon sola kun Wu Song en la supra ĉambro.

说话中间，武大下楼买酒菜去了，丢下妇人，独自在楼上陪武松坐地。

Ora Lotuso admiris liajn virecajn kvalitojn kaj la noblecon de lia sinteno, rememorante, kiel li mortigis la tigron, kaj pensante, kian senmezuran energion tia viro devas havi. Ŝi pensis en si:

“Tiu ĉi du viroj ambaŭ estas la filoj de unu sama patrino; kial do la korpo de mia edzo devas esti tiel terure aĉforma, ke li aspektas pli kiel fantomo, ol kiel homo? En kiu el miaj antaŭaj vivoj do mi tiel miskondutis, ke mi devas esti kondamnita al la edziniĝo al tia objekto, kia li estas? Wu Song estas tiel fortika kaj energiplena, kial mi ne devus inviti lin ĉi tien por kunloĝi kun ni? Li ŝajnas la ĝusta viro por mi.”

看了武松身材凜凜，相貌堂堂，又想他打死了那大虫，毕竟有千百斤气力。口中不说，心下思量道：“一母所生的兄弟，怎生我家那身不满尺的丁树，三分似人七分似鬼，奴那世里遭瘟撞着他来！如今看起武松这般人壮健，何不叫他搬来我家住？想这段姻缘却在这里了。”

Ŝi do diris kun dolĉa rideto:

“Kie vi loĝas, bofraĉjo? Kiu zorgas pri via ĉiutaga vivo?”

于是一面堆下笑来，问道：“叔叔你如今在那里居住？每日饭食谁人整理？”

“Mi nur ĵus estis nomumita policĉefo,” diris Wu Song, “kaj, ĉar mi devas esti ĉiam preta por mia devo, mi loĝas proksime de la urbodomo. Du soldatoj servas min kaj kuiras por mi.”

武松道：“武二新充了都头，逐日答应上司，别处住不方便，胡乱在县前寻了个下处，每日拨两个土兵伏侍做饭。”

“Kial do ne veni ĉi tien kaj loĝi kun ni?” diris la virino. “Estus pli agrable por vi, ol loĝi tie proksime de la urbodomo kun nur tiuj malpuraj soldataĉoj por vin prizorgi. Se vi venos kaj loĝos kun ni, vi trovos ĉi tie multe pli oportune: kiam ajn vi deziros ion por manĝi aŭ trinki, mi kun plezuro persone preparos por vi, kaj mia kuiraĵo certe estos perfekte pura.”

夫人道：“叔叔何不搬来家里住？省的在县前士兵服侍做饭腌臢。一家里住，早晚要些汤水吃时，也方便些。就是奴家亲自安排与叔叔吃，也干净。”

“Mil dankojn, bofranjo!” diris Wu Song.

武松道：“深谢嫂嫂。”

“Eble via edzino loĝas ie en la najbaraĵo,” plue diris Ora Lotuso. “Mi esperas, ke mi povos konatiĝi kun ŝi.”

夫人又道：“莫不别处有婶婶？可请来厮会。”

“Mi ankoraŭ ne edziĝis,” diris Wu Song.

武松道：“武二并不曾婚娶。”

Poste Ora Lotuso ĝentile demandis, kia estas lia aĝo²⁰, kaj kiam li diris al ŝi, ke li estas dudek-ok-jara, ŝi rimarkis al li, ke li estas tri jarojn pli aĝa, ol ŝi. En la fino ŝi demandis, kie li loĝis pli frue.

夫人道：“叔叔青春多少？”武松道：“虚度二十八岁。”夫人道：“原来叔叔倒长奴三岁。叔叔今番从那里来？”

“Mi loĝis en Cangzhou dum pli ol unu jaro. Mi ne sciis, ke mia frato jam transloĝiĝis ĉi tien, pensante, ke li ankoraŭ loĝas en la malnova loko.”

武松道：“在沧州住了一年有馀，只想哥哥在旧房居住，不道移在这里。”

“Ho, tio estas longa historio por rakonti. Ni estis devigitaj veni ĉi tien pro tio, ke de kiam mi edziniĝis al via frato, profitante de lia troa humileco, la tieaj najbaroj de tempo al tempo ofendis kaj insultis nin. Se nur li estus tiel forta, kiel vi, kara bofraĉjo, neniu kuraĝus diri al ni ion ajn malbonan.”

夫人道：“一言难尽。自从嫁得你哥哥，吃他忒善了，被人欺负，才到这里来。若是叔叔这般雄壮，谁敢道个不字！”

“Mia frato estas homo honesta, kiu ĉiam kondutas skrupule,” diris Wu Song, “tute malkiel mi, homo temerara.”

武松道：“家兄从来本分，不似武松撒泼。”

“Ne diru tian absurdaĵon,” diris la virino ridetante. “Prave diras la proverbo: *kiu ne havas firmecon, tiu ne ĝuas sekurecon*. Mi mem havas viglan temperamenton, kaj al mi ne plaĉas tia viro, kia, ricevinte eĉ vangofrapojn, ne kuraĝas ribeli.”

夫人笑道：“怎的颠倒说！常言：人无刚强，安身不长。奴家平生性快，看不上那三打不回头，四打和身转的”

“Se mia frato ne estigas ĝenaĵojn, nek provokas malpacon,” diris Wu Song, “la kaŭzo certe estas, ke li deziras nur eviti al vi malfeliĉon.”

武松道：“家兄不惹祸，免得嫂嫂忧心。”二人在楼上一递一句的说。

Jen poemo, kiu tion atestas:

La gebofratoj hazarde renkontiĝas.

Per sia mildeco kaj koketa mieno

Ŝi deziras sekrete ludi flirtadon,

Kaj logincitetas lin per sugestaj vortoj.

有诗为证：

叔嫂萍踪得偶逢，娇娆偏逞秀仪容。

私心便欲成欢会，暗把邪言钓武松。

Ili ankoraŭ ne finis la konversacion, kiam Wu Da revenis kun aĉetitaj viando, legomoj kaj aliaj manĝaĵoj, kaj metis ilin en la kuirejon. Li venis al la piedo de la ŝtuparo kaj laŭte vokis:

“Edzino mia, edzino mia, malsupreniru!”

话说金莲陪着武松正在楼上说话未了，只见武大买了些肉菜果饼归家。放在厨，走上楼来，叫道：“大嫂，你且下来则个。”

“Vi malĝentilulo!” kriis Ora Lotuso. “Kial vi volas min malsupren? Ĉi tie estas neniu alia, krom mi, por akompani vian fraton. Ĉu vi volus, ke ankaŭ mi lin forlasu?”

“Bonvole vin ne ĝenu pro mi,” diris Wu Song.

那妇人应道：“你看那不晓事的！叔叔在此无人陪侍，却交我撇了下去。”武松道：“嫂嫂请方便。”

“Kial do vi ne iru al la najbara domo,” diris la virino, “kaj petu la maljunulinon Wang veni kaj pretigi por ni la manĝon? Jen kion vi devos tuj fari.”

妇人道：“何不去间壁请王乾娘来安排？只是这般不见便。”

Wu Da do foriris kaj petis la maljunan virinon veni. Ŝi venis kaj faris la kuiradon, kaj kiam ĉio estis preta, ŝi portis la kuiradojn supren kaj metis ilin sur la tablon: fiŝojn, viandon, fruktojn kaj kukojn. La vino estis varmigita, kaj Wu Da, petinte sian edzinon preni la lokon de gastiganto, mem sidis sur flanko loko, kaj sidigis sian fraton sur la honora loko. Kiam ili estis ĉiuj sur sia loko, Wu Da komencis verŝi vinon al ĉiuj tri.

武大便自去央了间壁王婆来。安排端正，都拿上楼来，摆在桌子上，无非是些鱼肉果菜点心之类。随即烫酒上来。武大叫妇人坐了主位，武松对席，武大打横。三人坐下，把酒来斟，武大筛酒在各人面前。

“Bofraĉjo,” diris Ora Lotuso, levante sian pokalon, “pardonu al ni, ke ni ne faras specialan regalon al vi. Mi timas, ke tiu ĉi estas vino tro kruda.”

那妇人拿起酒来道：“叔叔休怪，没甚管待，请杯儿水酒。”

“Bonvolu ne tiel paroli,” diris Wu Song. “Mi estas tre dankema al vi, bofranj, pro via afableco.”

武松道：“感谢嫂嫂，休这般说。”

Wu Da sin okupis nur je la vinverŝado, dume Ora Lotuso, ĉiam afable ridetante, kun la vorto “bofraĉjo” sur la lipoj, ripetfoje diradis: “Kial vi ne vin servas per ĉi viand-buletoj, mia bofraĉjo?” kaj ŝi, elektante la plej fajnajn partojn el la pladoj per siaj manĝbastonetoj, metis ilin en lian bovlon. Wu Song, kiu estis nature simplanima, traktis ŝin nur kiel sian karan bofratinon, ne sciante, kiaspeca virino ŝi estas. Sufiĉe lerta, ŝi faris tiel afablan mienon kaj sin montris tiel varmkora, ke venis al li en la kapon neniu penso pri ŝia intenco lin delogi. Dum ili sidis kune kaj trinkis plurajn pokalojn da vino, ŝi manĝegis lin per la okuloj, ne povante forteni la rigardon de sur li eĉ unu momenton, kaj tio finfine embarasis lin tiel multe, ke li povis nur mallevi sian kapon.

武大只顾上下筛酒，那妇人笑容可掬，满口儿叫：“叔叔，怎的肉果儿也不拣一箸儿？”拣好的递将过来。武松是个直性的汉子，只把做亲嫂嫂相待。谁知这妇人是个使女出身，惯会小意儿。亦不想这妇人一片引人心。那妇人陪武松吃了几杯酒，一双眼只看着武松的身上。武松吃他看不过，只得倒低了头。

Li daŭrigis la drinkadon. Poste, kiam li komencis senti sin iom ebria, li leviĝis.

吃了一歇，酒阑了，便起身。

“Kial vi tiel hastas?” diris Wu Da. “Restu kaj trinku ankoraŭ iom pli. Nun vi ja havas nenion

por fari.”

武大道：“二哥没事，再吃几杯儿去。”

“Dankon,” diris ĝentile Wu Song, “sed mi revenos vidi vin ambaŭ en iu alia tempo.”

武松道：“生受，我再来望哥哥嫂嫂罢。”

Ili ĉiuj malsupreniris la ŝtuparon, kaj, kiam li eliris el la domo, Ora Lotuso kriis:

都送下楼来。出的门外，妇人便道：

“Kara bofraĉjo, ne forgesu fari aranĝojn por veni ĉi tien kaj loĝi kun ni. Alie, nin la najbaroj mokridos. Sciu: sangofratoj ne estas fremduloj, kaj via kunloĝo ĉi tie estos por ni plezuro. Kaj, cetere, via defendo certe estos por ni avantaĝo...”

“叔叔是必上心搬来家里住，若是不搬来，俺两口儿也吃别人笑话。亲兄弟难比别人，与我们争口气，也是好处。”

“Koran dankon pro la komplezo de vi, mia bofranco. Mi do alportos miajn pakaĵojn ĉi tien ĉi-vespere.”

武松道：“既是嫂嫂厚意，今晚有行李便取来。”

“Ni do atendos vin,” diris la virino kun senpacienco.

妇人道：“奴这里等候哩！”

Vere:

Deziron sovaĝan neniŭ okulo konas,

Malgraŭ ke pompas la persikfloroj.

正是：

满前野意无人识，几点碧桃春自开。

Notoj:

1. La sep homaj sentoj estas: ĝojo, kolero, malĝojo, timo, amo, malamo kaj deziro; la ses deziroj estas tiuj, kiuj devenas de la homaj sensorganoj (okuloj, oreloj, nazo, lango, korpo kaj menso).

2. Guan Yunchang: fama generalo (?—220 p.K.) de la regno Shu en la periodo de la Tri Regnoj, honorita kaj eĉ diigita post sia morto, de postaj diversaj imperiestroj.

3. Shi Chong, riĉegulo dum la dinastio Jin (265—420), havis belegan dancistinon nomatan Verda Perlo, kiun li tre amis. Sun Xiu, potenca kortegano, kiu avidis la belecon de Verda Perlo, petis posedon de ŝi, sed Shi rifuzis. Sun falskulpigis Shi pri perfido kaj arestis tiun. Malĝojiĝinte, ke ŝia mastro estis ruinigita pro ŝi, Verda Perlo eksaltis de sur alta pavilono kaj mortis en la tago, kiam Shi estis arestita.

4. La Brava Reĝo de Chu: t.e. Xiang Yu (232—202 a.K.). Ĉe la fino de la dinastio Qin, kiam Xiang Yu, venkita de sia rivalo Liu Bang en la lukto por la regna potenco, estis persekutata ĝis ekstrema situacio ĉe la rivero Wu, li kontraŭvole adiaŭis sian favoratan kromedzinon Yuji kaj sin mortigis sur la riverbordo.

5. Lu Jia kaj Sui He: du historiaj figuroj; la unua estis fama pro sia sagaceco kaj akra sprito, kaj la dua fama pro sia saĝeco kaj elokvento.

6. Praktikanto de jino kaj jango: praktikanto de astrologio, sortodivenisto aŭ geomanciisto.

7. Monato (ĉina): en la tradicia ĉina luna kalendaro la unua monato respondas proksimume al februaro, kaj la oka, proksimume al septembro.

8. Flugadi kun la vento kaj ludadi kun la luno: ĉina kutima esprimo signifanta “serĉadi al si plezuron ĉe fremdaj virinoj aŭ ĉe prostituitinoj”.

9. Edzino neniel povas bruligi incenson anstataŭ sia edzo: ĉina kutima esprimo signifanta “ĉiu devas persone plenumi sian devon”.

10. Estas pli aŭ malpli kiel furunkoj sur rata vosto — ĝia puso apenaŭ videblas: humura kutimdiro signifanta “havi tre limigitajn kapablon aŭ monrimedojn”. Tiu ĉi estas ekzemplo de populara tipo de ĉinlingva humura vortludo nomata *xiehouyu* (duparta alegoria frazo), el kiu la unua parto estas priskriba aŭ klariga, dum la dua, esprimita aŭ iafoje nedirita sed ĉiam sugestita, portas la intencitan ideon. *Jin Ping Mei* estas la ĉefa trezorejo de la fruaj ekzemploj de tiu ĉi tipo de spritaĵo.

11. La Plejsupera Maljuna Sinjoro: taŭisma dio, identigita kun Laozi.

12. La kvar generaloj Ma, Zhao, Wen kaj Guan: kvar dioj protektantaj la taŭismon.

13. Lu Qi: Tang-dinastia ĉefministro malfidela kaj insidema kun tre malbela aspekto.

14. La ĵuro pri fideleco ĵurita en la Persikarba Ĝardeno: aludo pri la ĵure-interfratiĝo de la tri herooj de Shu Han en la Persikarba Ĝardeno (t.e. Liu Bei, Guan Yu kaj Zhang Fei) en *La Romano pri la Tri Regno*.

15. La amikeco inter Guan Zhong kaj Bao Shuya: Guan Zhong kaj Bao Shuya estis tre bonaj korteganoj de Qi-regno en la periodo de Printempoj kaj Aŭtunoj (770—476 a.K.), kiuj estas famaj pro sia profunda kaj tre fidela amikeco inter si.

16. Fingrodivena ludo: ludo ludata de du personoj en bankedo aŭ festeno, kiuj montras samtempe ĉiu fingrojn de la dekstra mano kaj krias laŭ sia diveno la ekzaktan sumon de la fingroj montritaj de sia mano kaj tiu de la rivalo. Tiu, kiu trafas, venkas. La venkito devas trinki difinitan kvanton da vino.

17. La monto Tai: En Ĉinio sin trovas kvin sanktaj montoj altaj: t.e. Orienta Sankta Tai-monto 泰山 en Shandong-provinco, Suda Sankta Heng-monto 衡山 en Hunan-provinco, Okcidenta Sankta Hua-monto 华山 en Shaanxi-provinco, Norda Sankta Heng-monto 恒山 en Shanxi-provinco kaj Meza Sankta Song-monto 嵩山 en Henan-provinco. La Orienta Sankta Tai-monto estas okupas la unuan lokon inter la kvin altaj montoj, sekve ĝi povas esti nomata la monto de la montoj.

18. Tricola Arboŝelo: tiu ĉi moknomo estas ŝuldata al la fakto, ke lia korpo estis nana kaj lia haŭto raspa kun la vizaĝo tro longa kaj mallargha.

19. Ŝi ricevis sian nomon (Ora Lotuso): en la antikva Ĉinio, viroj kun anormala psikologio kutime ŝatis kaj laŭde nomis “ora lotuso” la virinan vinditan piedeton.

20. La aĝo de ĉino, laŭ la ĉina tradicia kalkulmaniero kalkuliĝas tiamaniere: oni havas unu jaron ĉe la naskiĝo kaj unu plia jaro aldoniĝas ĉe ĉiu lunkalendara novjaro, sekve Wu Song efektive estis dudek-sep-jara.

ĈAPITRO 2

SUB LA RULKURTENO ORA LOTUSO KOKETIS AL XIMEN QING

kaj

LA MALJUNULINO WANG PAROLIS PRI LA AMORO

第二回 俏潘娘帘下勾情 老王婆茶坊说技

*Kun vizaĝo bela kiel lotusfloro,
Kun haŭto blanka kiel neĝo,
Ŝi, en sia jaro dek-kvina, gracias kaj ĉarmas.
Svelta ĉe la pordo malfermita,
Kiel umefloro en burĝono,
Ŝi staras duonkaŝita de la kurteno.
Kiel knabino pura, hontema,
Ŝi dezirus grimpi sur la turon,
Kun gaja intenco havi vastan vidon.
Plaĉa estas ŝia paŝado,
Plaĉa estas ŝia pozo,
Plaĉa estas ŝia sido,
Kaj aparte plaĉa estas ŝia alkroĉiĝo.*

词曰：

芙蓉面，冰雪肌，生来娉婷年已笄。
袅袅倚门余，梅花半含蕊，似开还闭。
初见帘边，羞涩还留住；
再过楼头，款接多欢喜。
行也宜，立也宜，坐也宜，偎傍更相宜。
——右调《孝顺歌》



Sub la rulkurteno Ora Lotuso koketis al Ximen Qing.



La maljunulino Wang parolis pri la amoro.

Wu Song iris al la gastejo proksime de la urbodomo, faris sian pakaĵon el sia litaĵo kaj aliaj objektoj, kaj diris al unu el siaj servosoldatoj, ke li portu ĝin al la domo de lia frato. Kiam Ora Lotuso vidis lin veni, ŝi estis tiel ĝojega, kvazaŭ ŝi trovis trezoron. Ŝi tuj komencis purigi kaj ordigi la ĉambron por sia bofrato. Wu Song resendis la servosoldaton, kaj mem restis por tranokti en la hejmo de sia frato. En la sekva mateno li ellitiĝis tre frue, kaj Ora Lotuso rapidis varmigi akvon por li. Li lavis sin, kombis kaj ligis siajn harojn, kaj poste pretigis sin por iri al la oficejo por subskribi la registron de sia ĉeesto.

话说当日武松来到县前客店内，收拾行李铺盖，交土兵挑了，引到哥家。那妇人见了，强如拾得金宝一般欢喜，旋打扫一间房与武松安顿停当。武松吩咐土兵回去，当晚就在哥家歇宿。次日早起，妇人也慌忙起来，与他烧汤净面。武松梳洗裹帨，出门去县里画卯。

“Kara bofraĉjo,” diris Ora Lotuso, “registrinte vian venon al la oficejo, tuj revenu hejmen por la matenmanĝo. Vi ne iru aliloken por preni vian manĝon.”

Wu Song forlasis ŝin kaj iris al la oficejo. Registrinte sian venon, li pasigis la tutan matenon plenumante sian oficdevon, kaj poste revenis hejmen. Tiam Ora Lotuso jam pretigis la tagmanĝon, kaj la tri sidiĝis al la tablo por la manĝo.

Preninte ambaŭmane tason da teo, la virino proponis ĝin al Wu Song.

“Vi vin ĝenas tiom multe pro mi,” li diris, “ke tio faras min treege embarasita. Morgaŭ mi do aranĝos, ke servosoldato venu kaj vin helpu.”

妇人道：“叔叔画了卯，早些来家吃早饭，休去别处吃了。”武松应的去了。到县里画卯已毕，伺候了一早晨，回到家，那妇人又早齐齐整整安排下饭。三口儿同吃了饭，妇人双手便捧一杯茶来，递与武松。武松道：“交嫂嫂生受，武松寝食不安，明日拨个土兵来使唤。”

“Ne, ne, ne tian aferon faru,” ekkriis maltrankvile Ora Lotuso. “Ni estas la sama karno kaj sango, kaj tiu ĉi domo estas la hejmo por ni ĉiuj. Mi servas ja ne fremdulon. Eĉ al tiu ĉi eta Jasmeno mi ne fidis: mi ofte vidas ŝin aranĝi objektojn ne en ordo. Sed se ni havos helpan servosoldaton en la domo, mi trovos lin malpura en mia kuirejo. Mi ne toleros vidon de tia homo ĉi tie.”

“Tiaokaze,” diris Wu Song, “mi povos nur akcepti vian afablecon kun granda dankemo.”

那妇人连声叫道：“叔叔却怎生这般计较！自家骨肉，又不服事了别人。虽然有这小丫头迎儿，奴家见他拿东拿西，蹀里蹀斜，也不靠他。就是拨了土兵来，那厮上锅上灶不乾淨，奴眼里也看不上这等人。”武松道：“恁的却生受嫂嫂了。”有诗为证：

Jen poemo, kiu tion atestas:

Wu Song neniam estas galanta,

Sed lia bofratino estas tre lasciva.

Ruze instiginte lin enloĝiĝi tie,

Ŝi nutras ardan amon sub sia litkovrilo.

武松仪表岂风流，嫂嫂淫心不可收。

笼络归来家里住，相思常自看衾稠。

Ne longe post kiam Wu Song enloĝiĝis en la hejmo de sia frato, li donis al Wu Da iom da mono kaj petis lin aĉeti iom da kukoj, fritpastaĵoj, teo kaj fruktoj por regali la najbarojn. Ili venis kun donacetoj por esprimi sian respekton al Wu Song, kaj pli poste Wu Da donis simplan festenon por reciproki ilian komplezon. Wu Song donacis al sia bofratino rulon da kolora sateno, por ke ŝi faru al si vestojn.

话休絮烦。自从武松搬来哥家里住，取些银子出来与武大，买饼馐茶果，请那两边邻舍。

都斗分子来与武松人情。武大又安排了回席，不在话下。过了数日，武松取出一匹彩色段子与嫂嫂做衣服。

“Ho, kara bofraĉjo,” ŝi ekkriis kun ĝojego, “mi pensas, ke mi ne povus akcepti tiel karegan donacon,” sed ŝi tuj rapidis aldoni: “Ĉar vi jam aĉetis ĝin, mi supozas, ke mi devas ĝin akcepti.”

Ŝi do danke faris riverencon kaj prenis la satenon. De tiam Wu Song definitive loĝiĝis tie kiel membro de la familio de sia frato. Wu Da, kiel antaŭe, ĉiutage iris sur stratojn por vendi siajn kukojn, kaj Wu Song iradis al la urbodomo por plenumi siajn oficdevojn. Ĉu li revenis frue, ĉu malfrue, Ora Lotuso ĉiam havis manĝon aŭ teon preta por li, kaj servis lin kun granda plezuro. Li rimarkis ĉion ĉi tion sen multe pensi, kvankam kun bedaŭreto, ke li ŝin tiel ĝenas. La virino, siaflanke, de tempo al tempo provis loginciteti lin per frivolaj paroloj, sed li estis homo absolute honesta kun koro pura, neniel impresebla.

那妇人堆下笑来，便道：“叔叔如何使得！既然赐与奴家，不敢推辞。”只得接了，道个万福。自此武松只在哥家宿歇。武大依前上街挑卖炊饼。武松每日自去县里承差应事，不论归迟归早，妇人顿茶顿饭，欢天喜地伏侍武松，武松倒觉过意不去。那妇人时常把些言语来拨他，武松是个硬心的直汉。

Se estas io por rakonti, la rakonto longas; kiam estas nenio, ĝi mallongas.

Baldaŭ pasis unu monato. Venis la dekunua monato, kaj oni preparis sin por travivi la vintron. La norda vento furioze blovis plurajn tagojn, kaj grizaj nuboj kolektiĝis kaj kovris la tutan ĉielon. Poste la neĝo komencis fali, kaj baldaŭ densaj blankaj flokoj flirtadis en la aero. Ho, kia spektaklo!

有话即长，无话即短，不觉过了一月有余，看看十一月天气，连日朔风紧起，只见四下彤云密布，又早纷纷扬扬飞下一天瑞雪来。好大雪！怎见得？

Jen vidu nur:

Malhelaj nuboj kovras la senfinan ĉielon,

Kiuj gravedas je bonaŭgura neĝo.

Blankaj flokoj dancas preter la fenestrobretoj;

La boato de Ziyu¹, sur la rivero Shan,

Iam estis devigita halti en tiu vetero.

Baldaŭ dika mantelo kovras la altajn palacojn;

Riveroj kaj montoj estas ĉenitaj per arĝento.

La ĉielo estas plena de disŝutataj salo kaj pudro,

Tiutage Lü Mengzheng², la estonta ĉefministro,

En sia kabano suspiris pro sia mizero.

但见：万里彤雪密布，空中瑞祥飘帘。琼花片片舞前檐。剡溪当此际，濡滞子猷船。顷刻楼台都压倒，江山银色相连。飞盐撒粉漫连天。当时吕蒙正，窑内叹无钱。

La neĝado senĉese daŭris ĝis la plena noktiĝo. La mondo estis arĝente blanka ĉie, kaj ĝi aspektis, kvazaŭ la tero estis vestita per mantelo arĝente blanka. En la sekva mateno Wu Song iris al la oficejo kaj restis tie ĝis la tagmezo. Ora Lotuso ordonis sian edzon iri vendi siajn kukojn, kaj ŝi iris peti sian najbarinon, la maljunan virinon Wang, ke ŝi iru aĉeti por ŝi iom da nutraĵo kaj vino. Poste ŝi eniris en la ĉambron de Wu Song, kaj preparis por li braĝujon, pensante en si:

“Hodiaŭ mi devos certigi min pri li: sendube mi povos vekti lin al amorpasio per mia koketa loginciteto.”

Tiel pensante ŝi staris solece sub la rulkurteno kaj atendadis, ĝis ŝi ekvidis Wu Song, kiu, paŝante en la brilblanka neĝo, revenis hejmen.

当日这雪下到一更时分，却早银妆世界，玉碾乾坤。次日武松去县里画卯，直到日中未归。武大被妇人早赶出去做买卖，央及间壁王婆买了些酒肉，去武松房里簇了一盆炭火。心里自想道：“我今日着实撩斗他，他一撩斗，不怕他不动情。”那妇人独自冷冷清清立在帘儿下，望见武松正在雪里，踏着那乱琼碎玉归来。

Rapide suprentirinte la kurtenon, ŝi lin akceptis kun rideto.

“Ĉu vi sentas vin malvarma, kara bofraĉjo?” ŝi demandis.

妇人推起帘子，迎着笑道：“叔叔寒冷？”

“Dankon pro via zorgo, bofranjol!” Li ĝentile respondis kaj eniris en la domon.

Li demetis sian feltan ĉapon, kiun la virino estis preni per siaj manoj.

“Ne necesas ĝeni vin, bofranjol!”

武松道：“感谢嫂嫂挂心。”入得门来，便把毡笠儿除将下来。那妇人将手去接，武松道：“不劳嫂嫂生受。”

Li mem forviŝis la neĝon de sur ĝi kaj pendigis ĝin sur la muro. Poste li malligis sian zonon, demetis sian eksteran robon papage verdan kaj eniris en sian ĉambron.

自把雪来拂了，挂在壁子上。随即解了缠带，脱了身上鹦哥绿紵丝衲袄，入房内。

“Mi jam atendis vin la tutan matenon,” diris Ora Lotuso. “Kial vi ne revenis por la matenmanĝo?”

那妇人便道：“奴等了一早晨，叔叔怎的归来吃早饭？”

“Matene unu el miaj amikoj invitis min al manĝo,” respondis Wu Song, “kaj ĵus mi havis ankoraŭ alian inviton, sed mi decidis ne akcepti ĝin, kaj mi revenis rekte hejmen.”

武松道：“早间有一相识请我吃饭，却才又有作杯，我不耐烦，一直走到家来。”

“Se estas tiel,” diris la virino, “kial do vi ne iom alproksimiĝus al la fajro?”

妇人道：“既恁的，请叔叔向火。”

“Bona ideo,” diris Wu Song. Li do demetis siajn oleitajn botojn, ŝanĝis siajn ŝtrumpojn kaj surmetis paron da varmaj ŝuoj. Poste li alportis benkon kaj sidiĝis apud la fajro.

武松道：“正好。”便脱了油靴，换了一双袜子，穿了暖鞋，掇条凳子，自近火盆边坐地。

Laŭ la ordono de Ora Lotuso, pli frue Jasmeno jam riglis la antaŭan pordon kaj fermis la postan. Ŝi mem alportis iom da nutraĵo kaj la pladojn, kiujn ŝi kuiris, kaj metis sur la tablon antaŭ Wu Song.

那妇人早令迎儿把前门上了闩，后门也关了。却搬些煮熟菜蔬入房里来，摆在桌子上。

“Kie estas mia frato?” li demandis.

武松问道：“哥哥那里去了？”

“Li ankoraŭ ne revenis de sia vendado,” respondis la virino. “Ni nun do kune trinku kelkajn pokalojn.”

妇人道：“你哥哥出去买卖未回，我和叔叔自吃三杯。”

“Estas ne malfrue,” diris Wu Song. “Mi preferas, se ni lin atendu.”

武松道：“一发等哥来家吃也不迟。”

“Ho, kial do necesus lin atendi?” diris Ora Lotuso.

妇人道：“那里等的他！”

Ĝuste tiumomente Jasmeno envenis kun kruĉo da vino jam varmigita. Wu Song denove ĝentile pardonpetis pro tio, ke li kaŭzas al ŝi tiom da ĝeno.

说犹未了，只见迎儿小女早暖了一注酒来。武松道：“又教嫂嫂费心。”

Ora Lotuso diris nenion, sed ŝi nur altiris benkon al la fajro kaj sidiĝis. Sur la tablo estis kelkaj pladoj. Ŝi prenis pokalon kaj rigardis Wu Song rekte en liajn okulojn:

“Bofraĉjo, malplenigu ĝin!”

妇人也掇一条凳子，近火边坐了。桌上摆着杯盘，妇人拿盏酒擎在手里，看着武松道：“叔叔满饮此杯。”

Wu Song prenis la pokalon kaj trinkis ĝin ĝis la fundo per unu gluto.

武松接过酒去，一饮而尽。

Ŝi enverŝis duan pokalon da vino kaj donis ĝin al li, dirante: “Estas tiel malvarme, kara bofraĉjo, vi devas trinki tiun ĉi, kiu povos fari paron.”

那妇人又筛一杯酒来，说道：“天气寒冷，叔叔饮过成双的盏儿。”

“Estas via vico, bofranjo!” diris Wu Song, sed ankaŭ tiun ĉi li eltrinkis per unu tiro.

武松道：“嫂嫂自请。”接来又一饮而尽。

Poste li enverŝis unu pokalon por ŝi. Ŝi prenis la pokalon kaj delikate prenis trinkon, poste ŝi levis la vinkruĉon, replenigis la pokalon kaj metis ĝin antaŭ Wu Song. Tiam ŝia lakte blanka brusto estis parte nekovrita, kaj ŝia ĉarma hartubero iom malligita, kaj ŝiaj haroj pendis tiel libere, kiel belaj nuboj. Kun larĝa rideto sur la vizaĝo, ŝi ruzete diris:

武松却筛一杯酒，递与妇人。妇人接过酒来呷了，却拿注子再斟酒放在武松面前。那妇人一径将酥胸微露，云鬓半亸，脸上堆下笑来，说道：

“Mi aŭdis, ke vi tenas knabinon en via loĝejo proksime de la urbodomo, ĉu vere?”

“我听得人说，叔叔在县前街上养着个唱的，有这话么？”

“Oni ĉiam parolas sensencaĵon tian aŭ alian, sed vi ne devas ĝin kredi, bofranjo,” diris Wu Song. “Mi neniel estas tia viro.”

武松道：“嫂嫂休听别人胡说，我武二从来不是这等人。”

“Ĉu? Mi vin ne kredas,” diris Ora Lotuso. “Probable via lango diras ion, dum via koro pensas pri alio.”

妇人道：“我不信！只怕叔叔口头不似心头。”

“Demandu do mian fraton, se vi min ne kredas.”

武松道：“嫂嫂不信时，只问哥哥就是了。”

“Aja, ne al mi parolu pri li! Nenion li komprenas. Li ĉiam vivas kvazaŭ en ebrieco aŭ en sonĝo. Se li havus sufiĉan inteligentecon por kompreni tion, li ne pasigus siajn tagojn vendante kukojn. Sed ankoraŭ unu pokalon, mia bofraĉjo tre kara!”

妇人道：“啊呀，你休说他，那里晓得甚么？如在醉生梦死一般！他若知道时，不卖炊饼了。叔叔且请杯。”

Ŝi replenigis tri aŭ kvar pokalojn unu post la alia, kaj Wu Song trinkis ilin ĉiujn. Ankaŭ ŝi mem trinkis kelkajn, ĝis la alkoholo vekis tumultojn de la pasio en la koro, tiel ke ŝi eĉ perdis sian memregon kaj apenaŭ sciis, kiel esprimi sin kohere, dece.

连筛了三四杯饮过。那妇人也有三杯酒落肚，哄动春心，那里按纳得住。欲心如火，只把闲话来说。

Tiam Wu Song jam ekhavis sufiĉe klaran lumon sur la vera stato de la afero. Li nur tenis la kapon klinita por eviti rigardi ŝin. Post kelka tempo ŝi leviĝis kaj iris varmigi iom pli da vino. Wu Song forlasis sian sidlokon, prenis fajrostangon kaj komencis plivigli la fajron. Baldaŭ Ora Lotuso revenis kun ankoraŭ unu kruĉo da varmigita vino. En unu mano ŝi tenis la kruĉon kaj per la alia ŝi milde ekpinĉis lin je la ŝultro.

武松也知了八九分，自己只把头来低了，却不来兜揽。妇人起身去烫酒。武松自在房内却拿火箸簇火。妇人良久暖了一注子酒来，到房里，一只手拿着注子，一只手便去武松肩上一捏，说道：

“Kara bofraĉjo mia,” ŝi diris, “vi devas esti malvarma kun tiaj maldikaj vestoj.”

“叔叔只穿这些衣裳，不寒冷么？”

Wu Song komencis senti ian abomenon, kaj faris nenian respondon. Vidante lin silenta, ŝi ekprenis la fajrostangon el lia mano kaj diris:

武松已有五七分不自在，也不理他。妇人见他不应，匹手就来夺火箸，口里道：

“Vi ne scias vigligi la fajron. Mi do faru tion por vi. Mi volas nur, ke ĉio estu tiel arda, kiel la flamoj el la fajrujo.”

“叔叔你不会簇火，我与你拨火。只要一似火盆来热便好。”

Wu Song sentis ŝin eĉ pli antipatia, sed li ankoraŭ diris nenion.

武松有八九分焦燥，只不做声。

Sen rimarki lian koleran mienon Ora Lotuso demetis la fajrostangon kaj verŝplenigis ankoraŭ unu pokalon. Ŝi mem trinkis plenbuŝon da vino el ĝi, signifoplene fiksrigardis Wu Song en liajn okulojn, dirante:

这妇人也不看武松焦燥，便丢下火箸，却筛一杯酒来，自呷了一口，剩下半盏酒，看着武松道：

“Se vi havas la koron por mi, jen, trinku la reston el mia pokalo!”

“你若有心，吃我这半盏儿残酒。”

Li abrupte kaptis la pokalon el ŝia mano kaj verŝis la vinon sur la plankon, kriante: “Ne estu tiel senhonta!”

Kaj samtempe li forpuŝis ŝin tiel forte, ke ŝi preskaŭ falis.

武松匹手夺过来，泼在地下说道：“嫂嫂不要恁的不识羞耻！”把手只一推，争些儿把妇人推了一交。

Poste li fiksrigardis ŝin per okuloj preskaŭ elorbitigitaj.

武松睁起眼来说道：

“Mi estas viro kun la piedoj sur la tero kaj la kapo tuŝanta la ĉielon, viro kun dentoj en mia buŝo kaj haroj sur mia kapo. Mi ne estas porko aŭ hundo, kiu konas nenion pri la sanktaj leĝoj de honoro, nek pri la reguloj de la komuna deco. Ĉesu kondukti en tia senhonta maniero. Se poste mi ree aŭdos iun ajn flustron pri tia miskonduto de vi, tiam, eĉ se miaj okuloj povos diri al mi, ke vi estas mia bofratino, tamen mia pugno ne rekonos vin.”

“武二是个顶天立地噙齿戴发的男子汉，不是那等败坏风俗伤人伦的猪狗！嫂嫂休要这般不识羞耻，为此等的勾当，倘有风吹草动，我武二眼里认的是嫂嫂，拳头却不认的是嫂嫂！”

Liaj vortoj faris ŝin tiel konfuzita, ke ŝi tuj ruĝiĝis de honto. Ŝi alvokis Jasmenon depreni la manĝilaron, kaj murmuris:

“Mi nur ŝercis. Ne necesas, ke vi prenu tion serioze. Vi ja estas homo ne scianta ŝati alies respekton!” Kiam la pladoj estis formetitaj, ŝi iris malsupren en la kuirejon.

妇人吃他几句抢得通红了面皮，便叫迎儿收拾了碟盏家伙，口里说道：“我自作耍子，不直得便当真起来。好不识人敬！”收了家伙，自往厨下去了。

Vere:

La falinta floro volas sekvi la fluon,

Sed la fluo ignoras la falintan floron.

正是：

落花有意随流水，流水无情恋落花。

Tiam Ora Lotuso venis al la konstato, ke ŝia flirtado ne nur havis nenian efikon sur Wu Song, sed, anstataŭe, eĉ kaŭzis krudan riproĉon de li en ŝian vizaĝon.

Wu Song restis sola en sia ĉambro, remaĉante la ĵusan okazaĵon kun pli kaj pli granda indigno.

这妇人见勾搭武松不动，反被他抢白了一场。武松自在房中气忿忿，自己寻思。

Ĉe la fino de la posttagmezo Wu Da revenis paŝante en la neĝo. Li puŝmalfermis la pordegon, demetis siajn korbojn, kaj, enirinte en la ĉambron, tuj vidis, ke la okuloj de lia edzino estas ruĝaj de ploro.

天色却是申牌时分，武大挑着担儿，大雪里归来。推门进来，放下担儿，进的里间，见妇人一双眼哭的红红的，便问道：

“Kun kiu vi ĵus kverelis?” li demandis.

“你和谁闹来？”

“Se vi ne estus viro tiel malinda,” kriis lia edzino, “tia afero neniel povus okazi, kaj neniu povus min ofendi.”

妇人道：“都是你这不不争气的，交外人来欺负我。”

“Kiu do kuraĝus malmilde trakti vin?” demandis Wu Da.

武大道：“谁敢来欺负你？”

“Kiu? Estas ja neniu alia, ol la kanajlo, via frato. Kiam la neĝado estis tiel densa, vidante lin reveni, mi afable pretigis manĝon kaj vinon por li. Trovante, ke neniu estas ĉirkaŭe, li provis min delogi. Jasmeno vidis tion propraokule.”

妇人道：“情知是谁？争奈武二那厮。我见他大雪里归来，好意安排些酒饭与他吃，他见前后没人，便把言语来调戏我。便是迎儿眼见，我不赖他。”

“Mia frato ne estas tia viro,” diris ŝia edzo. “Li ĉiam estas homo honesta. Sed ne faru tiel laŭtan bruon, alie la najbaroj aŭdos kaj nin mokridos.”

武大道：“我兄弟不是这等人，从来老实。休要高声，乞邻舍听见笑话。”

Li do iris vidi Wu Song.

武大撇了妇人，便来武二房里叫道：

“Ĉu vi ankoraŭ ne manĝis kukojn, fraĵo?” li diris. “Jen mi alportas kelkajn, kaj ni kune manĝu ĉi tie.”

“二哥，你不曾吃点心？我和你吃些个。”

Sed Wu Song diris nenion, kaj, meditinte sufiĉe longan tempon, li eliris el la domo.

武松只不做声，寻思了半晌，一面出大门。

“Kien do vi iros, fraĵo?” kriis Wu Da, sed lia frato foriris sen respondo.

武大叫道：“二哥，你那里去？”也不答应，一直只顾去了。

Wu Da revenis en la ĉambron kaj diris al sia edzino:

“Mi vokis lin, sed li ne respondis kaj nur iris laŭ la vojo al la urbodomo. Mi vere ne komprenas, kio efektive okazis.”

武大回到房内，问妇人道：“我叫他又不应，只顾望县里那条路去了。正不知怎的了？”

“Vi stulta vermo!” kriis Ora Lotuso. “Estas nenio nekomprenebla. La aĉulo hontas kaj ne kuraĝas alvizaĝi vin. Jen kial li foriris. Probable li, havante nenian aŭdacon plu loĝi ĉi tie, tuj iris venigi homojn, por forporti siajn objektojn. Mi ne povas imagi, kial vi havas la intencon lin reteni.”

妇人骂道：“贼馄饨虫！有甚难见处？那厮羞了，没脸儿见你，走了出去。我猜他一定叫人来搬行李，不要在这里住。却不道你留他？”

“Se li foriros,” diris Wu Da, “oni certe nin ridos.”

武大道：“他搬了去，须吃别人笑话。”

“Li estas aĉulo senhonta, malmorala, kaj li provis min delogi. Ĉu tio ne estas ridindaĵo? Se vi tiel forte volas lin, iru do vivi kun li. Mi neniel toleros lin. Donu al mi eksedzinigan skribon kaj min repudiu, se al vi plaĉos, kaj tiam vi du povos vivi kune.”

ŭrino ŭrdis: “混沌魍魎, 他来调戏我, 到不乞别人笑话! 你要便自和他过去, 我却做不的这样的人! 你与了我一纸休书, 你自留他便了。”

Post tio Wu Da ne kuraĝis remalfermi la buŝon, kaj li estis devigita suferi ŝian severan riproĉon dum longa tempo.

武大那里敢再开口。被这妇人倒数骂了一顿。

Kiam ili ankoraŭ kverelis inter si, Wu Song, kun servosoldato portanta longan vekton, revenis, faris sian pakaĵon, kaj foriris. Wu Da iris post ili, kriante:

正在家两口儿絮聒, 只见武松引了个土兵, 拿着条扁担, 迳来房内收拾行李, 便出门。武大走出来, 叫道:

“Kial vi nepre devas foriri, fraĉjo?”

“二哥, 做甚么便搬了去?”

“Ne demandu, kara fraĉjo,” respondis Wu Song. “Se mi diros la veron, via bona nomo estos ruinigita.”

武松道: “哥哥不要问, 说起来装你的幌子, 只由我自去便了。”

Wu Da ne kuraĝis lin plu demandi, kaj estis devigita lasi lin foriri kun sia pakaĵo. Dume lia edzino daŭrigis la riproĉadon en sia ĉambro, grumblante:

武大那里再敢问各细, 由武松搬了出去。那妇人在里面喃喃呐呐骂道:

“Nu, bone, tre bone! Kiel oni diras, ke *estas malfacile pruntepreni monon inter parencoj*. Ĉiuj scias, ke vi havas pli junan fraton, kiu tenas la oficon de policĉefo en la urbodomo, kaj ĉiu eĉ supozas, ke li vivtenas siajn fraton kaj bofratinon. Sed oni neniel povas pensi, ke li, vivante kaj sin nutrante en nia domo, kontraŭe, pagas nin per maldanko. Li estas kiel *florcidonio, kiu estas bela aspekte, sed putrinta interne*. Li jam foriris de ni: mi devas danki la Ĉielon kaj la Teron! Miaj okuloj estas finfine malembarsitaj je la vido de tiu ĉi maldankemulo.”

“却也好, 只道是亲难转债, 人不知道一个兄弟做了都头, 怎的养活了哥嫂, 却不知反来咬嚼人! 正是花木瓜空好看。搬了去, 倒谢天地, 且得冤家离眼睛。”

Wu Da ne povis eviti aŭdon de ĉio, kion lia edzino diris. Sed li ankoraŭ ne povis kompreni, kio efektive okazis, kaj lia koro restis en maltrankvilo.

武大见老婆这般言语, 不知怎的了, 心中反是放不下。

Nun lia frato jam reiris al la gastejo proksime de la urbodomo kaj loĝis tie, kaj Wu Da ankoraŭ kolportis kukojn sur la stratoj. Li tre dezirus havi la okazon iri al la urbodomo kaj havi parolon kun sia frato, sed lia edzino donis al li severan ordonon, ke li ne kontaktigu kun li, kaj li ne riskis ŝin malobei.

自从武松搬去县前客店宿歇, 武大自依前上街卖炊饼。本待要去县前寻兄弟说话, 却被这妇人千叮万嘱, 吩咐交不要去兜揽他, 因此武大不敢去寻武松。

Post kiam Wu Song foriris de sia frato, la neĝado subite ĉesis. Pasis dek tagoj. La subprefekto de Qinghe okupis sian postenon dum pli ol du jaroj kaj jam amasigis al si multe da oro kaj arĝento. Nun li bezonis kapablan personon fidindan, por liveri tiujn ĉi valoraĵojn en la manojn de iu el liaj parencoj en la Orienta Ĉefurbo por sekura konservo. Li estis certa, ke kiam lia trijara oficperiodo proksimiĝos al sia fino, por plu teni sian oficon, li tiam bezonos subaĉeti siajn superulojn per tiuj ĉi valoraĵoj. Sed pro timo, ke malbonaj homoj sur la vojo ilin retenos aŭ forrabos, li pensis, ke li devos trovi sufiĉe fortegan personon por la eskortado. Subite li ekpensis pri Wu Song. Jes, li estas

la ĝusta homo, li pensis, kaj tuj sendis venigi Wu Song kaj diris al li:

说这武松自从搬离哥家，捻指不觉雪晴，过了十数日光景。却说本县知县自从到任以来，却得二年有余，转得许多金银，要使一心腹人送上东京亲眷处收寄，三年任满朝觐，打点上司。一来却怕路上小人，须得一个有力量的人去方好，猛可想起都头武松，须得此人方了得此事。当日就唤武松到衙内商议道：

“Mi intencas sendi gravan donacon kun letero al unu el miaj parencoj en la Orienta Ĉefurbo. Li estas Zhu Mian, unu el la subuloj de la Granda Marŝalo. Mi timas, ke sur la vojo povos esti danĝeroj, sed se vi prenos sur vin tiun ĉi taskon, mi estos certa, ke ĉio estos en ordo. Se vi faros tion ĉi por mi, mi abunde rekompencos vin post via reveno.”

“我有个亲戚在东京城内做官，姓朱名勳，见做殿前太尉之职，要送一担礼物，捎封书去问安。只恐途中不好行，若得你去方可。你休推辞辛苦，回来我自重赏。”

“Via moŝto jam montris al mi tiom multe da favoroj, kiel do mi, via humila subulo, povus ekpensi pri rifuzo?” respondis Wu Song. “Ĉar vi jam donis vian ordonon, mi tuj ekiros.”

Kun granda ĝojo la subprefekto proponis al Wu Song tri pokalojn da vino, kaj donis al li dek taelojn da arĝento kiel vojaĝelspezojn.

武松应道：“小人得蒙恩相抬举，安敢推辞！既蒙差遣，只此便去。”知县大喜，赏了武松三杯酒，十两路费。不在话下。

Ricevinte lian instrukcion, Wu Song iris al la gastejo kaj, sendinte sian servosoldaton por aĉeti kelkan nutraĵon, vazegon da vino kaj iujn legomojn en la strato, sin direktis al la domo de sia frato. Ĝuste tiam Wu Da revenis kaj trovis, ke Wu Song atendas lin sur la perono de la domo. Wu Song ordonis la servosoldaton porti la nutraĵon kaj vinon en la kuirejon.

Ora Lotuso ankoraŭ ne komplete rezignis la tutan esperon, nek povis sufoki sian tutan amsenton al li. Kiam ŝi vidis Wu Song veni kun vino kaj aliaj frandaĵoj, ŝi pensis en si:

且说武松领了知县的言语，出的县门来，到下处，叫了土兵，却来街上买了一瓶酒并菜蔬之类，迳到武大家。武大却街上回来，见武松在门前坐地，交土兵去厨下安排。那妇人余情不断，见武松把将酒食来，心中自思：

“Probable li ankoraŭ nutras penson pri mi, alie, li certe ne revenus al mi. Poste mi povos iom post iom fari al li pluan sondon.”

“莫不这厮思想我了？不然却又回来怎的？到日后我且慢慢问他。”

Sekve ŝi tuj iris supren por repudri sian vizaĝon kaj rearanĝi sian hararon kaj, surmetinte sian plej belan veston, revenis malsupren por lin renkonti.

妇人便上楼去重匀粉面，再整云鬟，换了些颜色衣服，来到门前迎接武松。妇人拜道：

“Mi ne povas imagi, kia miskompreno malagrabligis vin, mia bofraĉjo,” ŝi diris, farante riverencon. “Dum pluraj tagoj vi ne montris vin al ni. Kaj mi ofte min demandis pri la kialo. Nun mi ĝojas vin revidi en la hejmo, sed kial do vi elspezis vian monon por tiuj ĉi objektoj?”

“叔叔，不知怎的错见了，好几日并不上门，叫奴心里没理会处。今日再喜得叔叔来家。没事坏钞做甚么？”

“Mi havas ion por diri al mia fraĉjo,” diris Wu Song. “Jen kial mi devas veni.”

武松道：“武二有句话，特来要与哥哥说知。”

“Tiuokaze,” diris la virino, “bonvolu do supreniri kaj sidi tie.”

Kaj ili tri iris al la supra ĉambro. Wu Da kaj lia edzino sidis sur la lokoj de honoro, kaj Wu Song sidiĝis sur benko. La servosoldato surtabligis vinon kaj frandaĵojn, kaj Wu Song invitis sian fraton kaj bofratinon al sinservado. De tempo al tempo Ora Lotuso ĵetis signifoplenan rigardon al sia bofrato, sed li direktis sian atenton nur al la vino, kiun li trinkis.

妇人道：“既如此，请楼上坐。”三个人来到楼上，武松让哥嫂上首坐了，他便掇杌子打横。土兵摆上酒，并嘎饭一齐拿上来。武松劝哥嫂吃。妇人便把眼来睃武松，武松只顾吃酒。

Post kiam ili trinkis kelkajn pokalojn, Wu Song petis Jasmenon alporti kompletan da tostopokaloj kaj, post kiam la servosoldato plenigis unu el ili per vino, li prenis la pokalon en la manon kaj diris al Wu Da:

酒至数巡，武松问迎儿讨副劝杯，叫土兵筛一杯酒拿在手里，看着武大道：

“Kara fraĉjo respektinda: hodiaŭ la subprefekto jam ordonis, ke mi iru al la Orienta Ĉefurbo por lia komisiono. Morgaŭ mi ekvojaĝos, kaj povos reveni post du aŭ tri monatoj, aŭ eble post nur unu monato, se la afero iros glate. Jen kion mi venas por diri al vi: ĉar vi ĉiam estas homo honesta, sed tro malforta, mi timas, ke fremduloj povos, profitante de mia foresto, vin humiligi aŭ ofendi. Nu, aŭskultu min. Kutime vi vendas dek vaporumilojn da kukoj en ĉiu tago, sed ekde morgaŭ vi reduktu la nombron al kvin. Tiele vi povos eliri pli malfrue en la mateno kaj reveni hejmen pli frue antaŭ la vespero. Ne trinku vinon kun aliaj; malpendigu la rulkurtenon kaj riglu vian pordegon tuj post via hejmenigo. Se vi faros ĉion ĉi tion, vi povos eviti multon da malagrablaĵoj, sed se io malagrabla okazos al vi, ne lasu vin fali en kverelon kun iu ajn. Atendu ĝis mia reveno kaj lasu al mi solvi la aferon por vi. Nu, mia kara fraĉjo, se vi konsentos, trinku tiun ĉi pokalon.”

“大哥在上，武二今日蒙知县相公差往东京干事，明日便要起程，多是两三个月，少是一月便回，有句话特来和你说。你从来为人懦弱，我不在家，恐怕外人来欺负。假如你每日卖十扇笼炊饼，你从明日为始，只做五扇笼炊饼出去，每日迟出早归，不要和人吃酒。归家便下了帘子，早闭门，省了多少是非口舌。若是有人欺负你，不要和他争执，待我回来，自和他理论。大哥你依我时，满饮此杯！”

Wu Da prenis la pokalon kaj malplenigis ĝin.

“Kara fraĉjo,” li diris, “via diro estas perfekte prudenta. Mi faros ĉion, kion vi rekomendas al mi.”

武大接了酒道：“兄弟见得是，我都依你说。”

Poste Wu Song plenigis alian pokalon kaj parolis al Ora Lotuso:

吃过了一杯，武松再斟第二盏酒，对那妇人说道：

“Bofranjo, vi havas tro subtilan inteligentecon por bezoni mian longan diron. Mia frato estas simplanima, kaj la efektiva mastrumado estas en viaj manoj. Prave diras la proverbo: *pli valoras la interna forteco, ol la ekstera*³. Se vi konsciencie plenumos vian mastruman devon, mia frato havos nenion por maltrankviliĝi. Certe vi aŭdis ankaŭ la antikvan proverbon: *kiam la plektobarilo estas solida, hundoj ne povas tra ĝi enŝoviĝi*.”

“嫂嫂是个精细的人，不必要武松多说。我的哥哥为人质朴，全靠嫂嫂做主。常言表壮不如里壮，嫂嫂把得家定，我哥哥烦恼做甚么！岂不闻古人云：篱牢犬不入。”

Tiu ĉi parolo hontruĝigis la vizaĝon de Ora Lotuso ĝis la oreloboj. Ŝi eksplodis de kolero kaj, fingre montrante sian edzon Wu Da, verŝis sur Wu Song fluon da insultoj:

那妇人听了这句话，一点红从耳边起，须臾紫涨了面皮，指着武大骂道：

“Vi sentaŭga kanajlo! Kian klaĉon vi vomis kontraŭ mi? Ĉu vi opinias, ke vi povos premi min per tia kalumnio? Sciu, ke mi, kvankam sen porti ĉapon, efektive estas kiel vera viro. Mi ja estas virino sonanta laŭte kaj klare, firma kaj fidinda. Mia pugno povus teni eĉ viron starantan sur ĝi, kaj mia brako povus lasi eĉ ĉevalon galopi laŭ ĝi. Mi neniel povas esti kiel testudo vundita sen sangelfluo. Ja eĉ neniun formiko, de kiam mi edziniĝis al Wu Da, kuraĝis enŝteliĝi en mian ĉambron. Kiel do vi aŭdacas paroli pri hundoj enŝoviĝantaj tra ne solida plektobarilo? Kia deliraĵo! Ĉiu vorto de akuzo devas havi bazon de fakto: *Ekzistas neniun briko, kiu ĵetite ne falus sur ian*

lokon.”

“你这个混沌东西。有甚言语在别处说，来欺负老娘！我是个不带头巾的男子汉，叮叮当当响的婆娘！拳头上也立得人，胳膊上走得马，不是那脓血搠不出来鳖！老娘自从嫁了武大，真个蚂蚁不敢入屋里来，甚么篱笆不牢犬儿钻得入来？你休胡言乱语，一句句都要下落！丢下一块瓦砖儿，一个个也要着地！”

Wu Song ekridis kaj diris: “Ne koleriĝu, bofranjo. Se nur via koro ĉiam estas en perfekta akordo kun via buŝo, ĉio estos en ordo. Sed mi, miaflanke, devos bone gardi en la memoro, kion vi ĵus diris. Kaj nun, bonvolu trinki tiun ĉi pokalon.”

武松笑道：“若得嫂嫂做主，最好。只要心口相应。既然如此，我武松都记得嫂嫂说的话了，请过此杯。”

Ora Lotuso abrupte forpuŝis la pokalon kaj kuris malsupren. Antaŭ ol ŝi atingis la piedon de la ŝtuparo, ŝi haltis kaj kriis:

那妇人一手推开酒盏，一直跑下楼来，走到在胡梯上发话道：

“Vi pensas, ke vi estas tre saĝa kaj inteligenta, sed kial vi ŝajne ne konas la onidiron: ‘*la edzino de la pli aĝa frato devas esti respektata kiel patrino*’? Ekde kiam mi edziniĝis al Wu Da, neniuj menciis, ke li havas iun ajn pli junan fraton. De kie vi venis? Ĉu vi estas vera parenco aŭ ne? Jen vi tamen pretendas esti mastro de la domo! Ho, kian misfortunon mi havas, kiu faligis sur min tiom da malfeliĉoj!”

“既是你聪明伶俐，恰不道长嫂为母。我初嫁武大时，不曾听得有甚小叔，那里走得来？是亲不是亲，便要做乔家公。自是老娘晦气了，偏撞着这许多鸟事！”

Kaj ŝi malsupreniris la reston de la ŝtuparo, plorsingultante.

一面哭下楼去了。

Vere:

Admono pacienca kaj bonintenca, sed vana;

Kun rankoro, Ora Lotuso eklevas ŝtormon.

Ŝia senhonta aroganto, kun mordanta deliro,

Konsternas eĉ Wu Song, la grandan heroon.

正是：

苦口良言谏劝多，金莲怀恨起风波。

自家惶愧难存坐，气杀英雄小二哥。

La virino afektis multajn manierojn de sceno, dum la du fratoj trinkis kelkajn pliajn pokalojn, ĝis ili plu ne povis trankvile sidadi. En la fino ili kune iris malsupren, kaj disiĝis unu de la alia kun larmoj.

那妇人做出许多乔张致来。武大、武松吃了几杯酒，坐不住，都下的楼来，弟兄洒泪而别。

“Fraĉjo,” diris Wu Da, “vi devos foriri, mi supozas, sed revenu kiel eble plej frue, por ke mi povu revidi vin kiel eble plej baldaŭ.”

武大道：“兄弟去了，早早回来，和你相见。”

“Estus preferinde,” diris Wu Song, “se vi, fraĉjo, restus en la domo sen fari la kukvendon, kaj tiam mi aranĝos, ke iu alportu al vi vivtenon.”

武松道：“哥哥，你便不做买卖也罢，只在家里坐的。盘缠，兄弟自差人送与你。”

Ĉe la disiĝo li ree konsilis:

“Bone memoru, kion mi diris al vi, kara fraĉjo, kaj atente gardu vian pordegon.”

临行，武松又吩咐道：“哥哥，我的言语休要忘了，在家仔细门户。”

“Mi scias. Estu trankvila, fraĉjo,” promesis Wu Da.

武大道：“理会得了。”

Tiele Wu Song disiĝis de sia frato. Li revenis al la gastejo, faris sian pakadon, kaj preparis armilojn de protekto. En la sekva mateno li prenis la ŝarĝon de la valoraĵoj de la subprefekto, selis la ĉevalon, kaj ekiris al la Orienta Ĉefurbo.

武松辞了武大，回到县前下处，收拾行装并防身器械。次日领了知县礼物，金银驼垛，讨了脚程，起身上路，往东京去了，不题。

Post la foriro de sia frato Wu Da devis elteni la riproĉojn de sia edzino dum pluraj tagoj, sed li sin retenis por resti silenta, englutante ŝiajn insultojn. Li faris, kion lia frato diris al li, kaj vendis nur duonon de tiom da kukoj, kiom li vendis antaŭe. Ĉiutage li revenis antaŭ la sunsubiro kaj, demetinte la korbojn, malpendigis la rulkurtenon kaj fermis la pordegon, kaj poste li venis sidiĝi en la ĉambro. Lia edzino vidis tion ĉi kaj fariĝis pli kaj pli incitita kun la tagoj.

只说武大自从兄弟武松说了去，整整吃那婆娘骂了三四日。武大忍声吞气，由他自骂，只依兄弟言语，每日只做一半炊饼出去，未晚便回来。歇了担儿，便先去除了帘子，关上大门，却来屋里坐的。那妇人看了这般，心内焦燥，

“Vi idioto, kiu nenion komprenas!” ŝi kriis finfine. “Mi neniam vidas karcergardiston, kiu fermas la prizonan pordon, dum la suno ankoraŭ estas alte en la ĉielo. Niaj najbaroj devas ridi kaj pensi, ke ni timas fantomojn eĉ en luma tago. Vi nun, ĝuste kiel senscia novnaskito, faras nur, kion via frato diris. Ĉu vi ne hontas, ke ĉiuj aliaj vin mokridas?”

骂道：“不识时浊物！我倒不曾见，日头在半天里便把牢门关了，也吃邻舍家笑话，说我家怎生禁鬼。听信你兄弟说，空生着卵鸟嘴，也不怕别人笑耻！”

“Lasu ilin ridi,” diris Wu Da. “Prava estas tio, kion mia frato diris. Liaj vortoj povos evitigi al ni multe da malagrablaĵoj.”

武大道：“由他笑也罢，我兄弟说的是好话，省了多少是非。”

“Pu! Vi fia estaĵo!” lia edzino ekkriis, kaj kraĉis sur lian vizaĝon. “Vi, plenkreska viro, havas tamen nenian volon de via propra memo, farante nur kion iu ajn alia diras al vi.”

被妇人啐在脸上道：“呸！浊东西！你是个男子汉，自不做主，却听别人调遣！”

“Lasu aliajn parolaĉi,” diris Wu Da svingante sian manon en signo de indiferenteco. “Por mi la vortoj de mia frato estas kiel oro kaj jado.”

武大摇手道：“由他，我兄弟说的是金石之语。”

Li daŭrigis malfruan eliron kaj fruan revenon, kaj fermis la pordegon tuj post sia hejmeniĝo. Tio tiel kolerigis lian edzinon, ke ŝi plurfoje kverelis kun li, sed vane, kaj en la fino ŝi pli kaj pli faris al si la kutimon: ĉirkaŭ la tempo de lia reveno ŝi malpendigis la rulkurtenon kaj fermis kaj riglis la pordegon. Vidante tion, Wu Da ĝojis en si, pensante, ke se ŝi tiel agos, ĉio certe estos en ordo.

原来武松去后，武大每日只是晏出早归，到家便关门。那妇人气生气死，和他合了几场气。落后闹惯了，自此妇人约莫武大归来时分，先自去收帘子，关上大门。武大见了，心里自也暗喜，寻思道：“恁的却不好？”

Jen poemo, kiu tion atestas:

Estu singarda: reveno frua, pordo fermita,

Por teni la geedzan amon for de danĝero.

Sed kiam ŝiaj seksdeziroj vekigis en konfuzo,

Vane eĉ se oni katenus ŝin en ŝlosita kaĝo.

有诗为证：

慎事关门并早归，眼前恩爱隔崔嵬。

春心一点如丝乱，任锁牢笼总是虚。

La tempo pasis tiel rapide, kiel galopanta ĉevalo, kaj la suno kaj la luno alternis kiel navedo. Ŝajnis, ke pasis nur momento de post la vintra solstico; kaj tuj kiam la umefloroj ekfloris, revenis jam la sunplena, varmeta printempo. Iutage, en la tria monato, la suno brilis tiel agrable, ke Ora Lotuso decidis vesti sin per sia plej bela vesto. Post kiam Wu Da eliris por la kukvendo, ŝi staris ĉe la pordego, sub la rulkurteno. Pensante, ke jam proksimiĝas la tempo de lia reveno, ŝi estis preta malpendigi la rulkurtenon kaj reiri al sia ĉambro por atendi lin. Sed en tiu tago io neatendita estis destinita por okazi: tiumomente iu viro preteriris sub la rulkurteno.

白驹过隙，日月如梭，才见梅开腊底，又早天气回阳。一日，三月春光明媚时分，金莲打扮光鲜，单等武大出门，就在门前帘下站立。约莫将他归来时分，便下了帘子，自去房内坐的。一日也是合当有事，却有一个人从帘子下走过来。

Ekde la antikveco, en la amaferoj oni ĉiam trovas, ke la sorto intence renkontigas la geamantojn, kaj ke *sen feliĉa hazardo estus neniam vera romano*. Ĝuste kiam Ora Lotuso tenis longan stangon en la mano por malpendigi la rulkurtenon, subita ekblovo de vento forblovis ĝin el ŝia mano. Ŝi ne sukcesis kapti ĝin, kaj ĝi falis sur la kapon de tiu viro. Ŝi ekridetis pardonpetan rideton kaj ĵetis ŝtelan rigardon al li. Li estis en la aĝo de dudek kvin aŭ dudek ses jaroj, havante diboĉulan aspekton. Surkape li portis kvastan ĉapon kaj orajn filigranajn harpinglojn, kun paro da jadaj ringoj inkrustitaj per oro. Sur sia longa staturo kun belaj koksoj li portis verdan silkan robon kaj sur la piedoj paron da belaj dikplandumaj ŝuoj, kun blankaj ŝtrumpoj tiel puraj, kiel klara akvo. Li mane tenis ventumilon brile oritan. Li estis vera belulo, kaj meritis esti komparebla kun la plej belaj elegantuloj en la mondo. Ora Lotuso ĵetis signifoplenan rigardon al li el sub la rulkurteno.

自古没巧不成话，姻缘合当凑着。妇人正手里拿着叉竿放帘子，忽被一阵风将叉竿刮倒，妇人手擎不牢，不端不正却打在那人头上。妇人便慌忙陪笑，把眼看那人，也有二十五六年纪，生得十分浮浪。头上戴着缨子帽儿，金铃珑簪儿，金井玉栏杆圈儿；长腰才，身穿绿罗褶儿；脚下细结底陈桥鞋儿，清水布袜儿；手里摇着洒金川扇儿，越显出张生般庞儿，潘安的貌儿。可意的人儿，风风流流从帘子下丢与个眼色儿。

Kiam la stango trafis lin, li haltis, preta fari koleran eksplodon, sed, sin turninte, li subite vidis nekredeble belan virinon. Ŝia hararo estis tiel nigra, kiel korva plumaro; ŝiaj brovoj estis tiel delikate arkaj, kiel novluno. Ŝiaj migdalformaj okuloj estis klaraj kaj friske akvecaj, kaj ŝia ĉarma ĉerizkolora buŝeto elspiris ebriigan parfumon. Ŝia rekta nazo estis jade delikata, kaj ŝiaj rozaj vangoj estis bele pudritaj. Ŝia vizaĝo havis la delikatan rondecon de arĝenta pelvo. Ŝia korpo havis la leĝeran sveltecon de bukedo da floroj, kaj ŝiaj jadecaj fingroj delikatecon de ŝenopraza tigo. Ŝia talio estis tiel maldika, kiel salika branĉeto. Malsupre, estis imagebla la blankeco de la ventro, mola kaj graseta, ĉirkaŭ la umbiliko. Ŝiaj liliaj piedoj estis etaj kaj pintaj, ŝia brusto estis karnoriĉa kaj delikathaŭta, kaj ŝiaj femuroj, tiel alabastraj! Kaj plie, tiu io, kies nomon ne decas diri, kaŝita sub la kovro de tufo da nigraj lanecaj haroj, elaste streĉita, ruĝa kaj krispa, frande karnoriĉa... La senfina ĉarmo de tiu ĉi virino defias ĉian priskribon per vortoj.

这个人被叉竿打在头上，便立住了脚，待要发作时，回过脸来看，却不想是个美貌妖娆的妇人。但见他黑鬟鬟赛鸦鸽的鬟儿，翠弯弯的新月的眉儿，清冷冷杏子眼儿，香喷喷樱桃口儿，直隆隆琼瑶鼻儿，粉浓浓红艳腮儿，娇滴滴银盆脸儿，轻袅袅花朵身儿，玉纤纤葱枝手儿，一捻捻杨柳腰儿，软浓浓粉白肚儿，窄星星尖翘脚儿，肉奶奶胸儿，白生生腿儿，更有一件，紧揪揪、红绉绉、白鲜鲜、黑裊裊，正不知是甚么东西。观不尽这妇人容貌。且看他怎生打扮？

Se vi volas scii, kiel ŝi sin ornamis kaj vestis,
Jen, vidu nur:
*Ŝiaj karbe brilnigraj haroj estas tiel densaj, kiel nuboj,
Kiuj estas volvitaj en hartuberon parfum-elspirantan.
Ambaŭflanke de ĝi ŝi portas malgrandajn harpinglojn,
Kun oblikve fiksita duopo da floroj de la sama tigo
Kaj, malantaŭe, paron da delikataj kombiletoj.
Du persikfloroj ornamas ŝiajn salikfolieskajn brovojn,
Kiuj, longaj kaj maldikaj, estas plej delikate pentritaj.
La jadaĵ oreplendaĵoj, kiujn ŝi portas, estas okulplaĉe rimarkindaj,
Kaj la mirinda beleco de ŝia mola brusto duone kovrita
Eklipsas tiun de ĉia rara jado senpreza.
Ŝi portas bluan tunikon kaj plisitan jupon el maldika silko;
Sub la manumon estas enŝovita parfuma poŝtuko kun broditaj floroj;
Sub ŝia delikata gorgo, dense-butonita korsaĵo kaŝas ŝiajn mamojn.
Ŝiaj piedoj estas pligraciigitaj per etaj ŝuoj,
Kiuj estas faritaj en formo de montaj korvoj, kun ornamitaj pintoj.
Iliaj altaj plandumoj estas el blanka silko,
Tiel ke ŝi ŝajnas ĉiam paŝanta sur parfumita polvo.
Ŝia skarlata silka pantalono estas brodita per orioleoj kaj floroj kaj,
Kiam ŝi sidiĝas aŭ paŝas, la vento blovmalfermas ŝian jupon
Kaj lasas sentiĝi la imageblan sekreton.
El ŝia buŝo venas ondo post ondo da aromo tiel delikata, kiel tiu de orkideoj aŭ mosko,
Dum ŝiaj ĉerizkoloraj lipoj kaj ŝiaj rozaj vangoj havas la brilkoloran belecon de freŝaj floroj.
Ĉe tiu ĉi vido, viroj povas ekhavi la senton, ke la animo kvazaŭ forkuras el la korpo,
Kaj la junaj amoremuloj eĉ povus tuj pereji surloke.*

但见：

头上戴着黑油油头发髻，一迤里颺出香云，周围小簪儿齐插。斜戴一朵并头花，排草梳儿后押。难描画，柳叶眉衬着两朵桃花。玲珑坠儿最堪夸，露来酥玉胸无价。毛青布大袖衫儿，又短衬湘裙碾绢纱。通花汗巾儿袖口儿边搭刺。香袋儿身边低挂。抹胸儿重重纽扣香喉下。往下看尖翘翘金莲小脚，云头巧缙山鸦。鞋儿白绫高底，步香尘偏衬登踏。红纱膝裤扣莺花，行坐处风吹裙跨。口儿里常喷出异香兰麝，樱桃口笑脸生花。人见了魂飞魄丧，卖弄杀俏冤家。

Apenaŭ tiu viro ekvidis ŝin, li sentis sin preskaŭ tute ekster si. Lia kolero rapidege forflugis ĝis la malproksimega insulo Javo, kaj sur lia vizaĝo tuj aperis afabla rideto. Ora Lotuso sciis, ke ŝi estas riproĉinda pro la neatendita okazo, kaj ŝi faris gracian riverencon kaj diris:

“La ventblovo subite forblovis la stangon el mia mano, kaj mi bedaŭras, ke ĝi malfeliĉe trafis vin. Bonvolu ne koleri kontraŭ mi.”

La viro, ĝustiginte sian ĉapon per la mano, reciprokis la riverencon tiel profunde, ke lia kapo preskaŭ tuŝis la teron.

“Ne gravas, sinjorino,” li konsolis, “estu trankvila.”

那人一见，先自酥了半边，那怒气早已钻入爪洼国去了，变做笑吟吟脸儿。这妇人情知不是，叉手望他深深拜了一拜，说道：“奴家一时被风失手，误中官人，休怪！”那人一面把手整头巾，一面把腰曲着地还喏道：“不妨，娘子请方便。”

Ĝuste tiam la najbarino, maljunulino Wang, la te-vendistino, hazarde vidis ĉion, kio okazis. Ŝi sin intermetis, dirante kun rideto:

“He, kiu estas tie? Estas vi, granda sinjoro, kiu preteriris ĉi tie kaj estis bonvenigita per frapo sur la kapo!”

“Tio estas mia kulpo,” diris la viro ridetante. “Mi, miaflanke, devus esti pli atentema. Volu ne ofendiĝi de mia entrudiĝo, sinjorino.”

“Mi deziras, ke vi nur ne riproĉu min,” respondis la virino.

La viro ree ekridetis kaj faris ankoraŭ pli profundan riverencon al ŝi por esprimi sian bedaŭron. Liaj friponaj okuloj, spertaj en amoraj aventuroj kaj en taksado de virinaj koketaĵoj, ne sin deturnis for de Ora Lotuso eĉ dum momento. Finfine li foriris per pavaj paŝoj, svingante sian ventumilon kaj returnante la kapon al ŝi sep- aŭ ok-foje.

却被这隔壁住的卖茶王婆子看见。那婆子笑道：“兀的谁家大官人打这屋檐下过？打的正好！”那人笑道：“倒是我的不是，一时冲撞，娘子休怪。”妇人答道：“官人不要见责。”那人又笑着大大地唱个喏，回应道：“小人不敢。”那一双积年招花惹草，惯觑风情的贼眼，不离这妇人身上，临去也回头了七八回，方一直摇摇摆摆遮着扇儿去了。

Jen poemo, kiu tion atestas:

*En serena tago de bela printempo, promenante
Li hazarde vidis ĉarman belulinon sub rulkurteno.
Ĉe la foriro la dolĉaj rigardoj rulas altajn ondojn,
Kiuj vekis ardan deziron, senigante ŝin je libereco.*

风日晴和漫出游，偶从帘下识娇羞。

只因临去秋波转，惹起春心不自由。

Ora Lotuso sekvis per la okuloj la forirantan viron. Forte impresis ŝin liaj elegantaj manieroj, lia diboĉula aspekto kaj liaj dolĉaj vortoj. Ŝi havis nenian ideon pri lia nomo, pri lia loĝloko, sed ŝi ĝuste konkludis, ke se li ne reciprokus ŝiajn sentojn en ia mezuro, li neniel povus returni la kapon al ŝi tiel ofte. Ŝi restis sub la rulkurteno longatempe, ĝis li perdiĝis el ŝia vido, kaj poste, malpendiginte la rulkurtenon, ŝi fermis la pordegon kaj revenis en sian ĉambron.

当时妇人见了那人生的风流浮浪，语言甜净，更加几分留恋：“倒不知此人姓甚名谁，何处居住。他若没我情意时，临去也不回头七八遍了。”却在帘子下眼巴巴的看不见那人，方才收了帘子，关上大门，归房去了。

Karaj legantoj, ĉu vi povas diveni, kiu estis tiu ĉi viro? Tiu estis neniŭ alia, ol la ĉefo de tiuj, kiuj serĉis la plezurojn en la bordeloj kaj de tiuj, kiuj amis pluki por si sovaĝajn rarajn florojn kaj ŝteli parfumon kaj aromon: ĝuste lia moŝto Ximen Qing, la mastro de vendejo de krudaj medikamentoj. Tiam lia tria edzino ĵus mortis kaj la solena enterigo estis finita, kaj, malbonhumora, li faris promenon laŭlonge de la strato kun la intenco iri viziti Ying Bojue por havi ian distriĝon ĉe li. Kiam li preteriris la domon de Wu Da, li ricevis, kiel ni supre legis, neatenditan frapon sur la kapo.

看官听说，这人你道是谁？却原来正是那嘲风弄月的班头，拾翠寻香的元帅，开生药铺复姓西门单讳一个庆字的西门大官人便是。只因他第三房妾卓二姐死了，发送了当，心中不乐，出来街上行走，要寻应伯爵到那里去散心耍子。却从这武大门前经过，不想撞了这一下子在头上。

Kaj tiu ĉi granda sinjoro Ximen Qing, vidinte Oran Lotuson sub la rulkurteno, revenis hejmen kaj pensis:

却说这西门大官人自从帘子下见了那妇人一面，到家寻思道：

“Kia belega virino ŝi estas, sed kiel mi povos akiri ŝin en miajn brakojn?”

“好一个雌儿，怎能够得手？”

Li subite ekmemoris la maljunulinon Wang, ŝian najbarinon, kiu tenis tetrinkejon.

“Ŝi ŝajnas esti lerta spertulino,” li diris al ŝi, “kaj, se ŝi povos konduki la aferon al feliĉa fino, kian mi deziras, mi certe rekompencos ŝin per kelkaj taeloj da arĝento.”

猛然想起那间壁卖茶王婆子来，堪可如此如此，这般这般：“撮合得此事成，我破费几两银子谢他，也不值甚的。”

Anstataŭ preni manĝon, li tuj rapidis al la strato kaj impetis en la tetrinkejon de la maljunulino. Li sidiĝis en la interno, sub la te-butika ŝildo en formo de rubando.

于是连饭也不吃，走出街上闲游，一直迳蹚入王婆茶坊里来，便去里边水帘下坐了。

“Mia granda sinjoro, kiel agrable grandegan saluton vi ĵus faris al ŝi!” diris la maljunulino, ridante.

王婆笑道：“大官人却才唱得好个大肥喏！”

“Venu ĉi tien, duonpanjo, mi havas ion por vin demandi,” diris Ximen Qing. “Tiu via juna najbarino, nu, tiu juna virino — kies edzino ŝi estas?”

西门庆道：“干娘，你且来，我问你，间壁这个雌儿是谁的娘子？”

“Ho,” respondis la maljunulino, “ŝi estas la pli juna fratino de Jamao, la filino de la generalo Wu Dao⁴. Kial do la demandon?”

王婆道：“他是阎罗大王的妹子，五道将军的女儿，问他怎的？”

“Mi parolas al vi serioze. Ĉesu ŝerci!” diris Ximen Qing.

西门庆道：“我和你说正话，休要取笑。”

“Kiel vi povus ne koni ŝin?” diris la maljunulino. “Ŝia edzo vendas kukojn ĉe la urbodomo.”

王婆道：“大官人怎的不认得？他老公便是县前卖熟食的。”

“Ĉu ŝi estas la edzino de Xu la Tria,” diris Ximen Qing, “tiu viro, kiu vendas jujub-kukojn?”

西门庆道：“莫不是卖枣糕徐三的老婆？”

“Ne, se estus li, ili estus egala paro,” diris la maljunulino skuante la kapon. “Plu do divenu, via moŝto.”

王婆摇手道：“不是，若是他，也是一对儿。大官人再猜。”

“Ŝi devas esti la edzino de Li la Tria, tiu, kiu vendas frititajn raviolojn,” diris Ximen Qing.

西门庆道：“敢是卖饅饅的李三娘子儿？”

“Ne, se estus li, mi pensus, ke ili povus esti perfekte egalaj unu al la alia,” la maljunulino ankoraŭfoje skuis la kapon.

王婆摇手道：“不是，若是他，倒是一双。”

“Ĉu do ŝi estas la edzino de Liu Xiao'er kun brakoj tatuitaj?” ree divenis Ximen Qing.

西门庆道：“莫不是花胳膊刘小二的婆儿？”

La maljunulino eksplodis per ridego.

“Ne, ne!” ŝi diris, “Eĉ se estus li, ankaŭ ili estus egala paro. Divenu ankoraŭ alian fojon, mia granda sinjoro.”

王婆大笑道：“不是，若是他时，又是一对儿。大官人再猜。”

“Mi neniel povas ĝuste diveni, kara duonpanjo,” diris Ximen Qing preskaŭ en malespero, dum la maljunulino Wang ridis plengorĝe.

西门庆道：“干娘，我其实猜不着了。”

“Nu, bone, mi diros al vi. Ŝia edzo estas tiu ulo Wu Da, kiu kolportas kukojn sur la stratoj.”

王婆哈哈笑道：“我好交大官人得知了罢，他的盖老便是街上卖炊饼的武大郎。”

Aŭdinte tion, Ximen Qing preskaŭ eksaltis de sur sia sidloko.

西门庆听，跌脚笑道：

“Ĉu ne estas tiu Wu Da, kiu havas la moknomon Tricola Arboŝelo?”

“莫不是人叫他三寸丁谷树皮的武大么？”

“Ĝuste tiu ulo,” respondis la maljunulino.

王婆道：“正是他。”

“Ho, Ĉielo!” kriegis Ximen Qing. “*Kia bongusta ŝafvianda peco falis en la buŝon de hundaĉo!* Kaj tamen, kiel do tio povis okazi?”

西门庆听了，叫起苦来，说是：“好一块羊肉，怎生落在狗口里！”

“Ĉiam estas la sama strangaĵo: ekde la antikveco, *ĉevalo bona ofte portas stultulon, virino bela ofte kundormas kun mallerta edzo*,” respondis la maljunulino. “La Maljunulo sub la Luno⁵ ja ofte tiel fuŝas sian laboron.”

王婆道：“便是这般故事，自古骏马却驮痴汉走，美妻常伴拙夫眠。月下老偏这等配合。”

“Duonpanjo, kiom mi ŝuldas al vi por la teo kaj kukoj?” demandis Ximen Qing.

西门庆道：“干娘，我少你多少茶果钱？”

“Nenio menciinda, lasu tion!” respondis la maljunulino. “Ni faros konton pli poste.”

王婆道：“不多，由他，歇些时却算不妨。”

“Kun kiu nun via filo Wang Chao laboras?” demandis ree Ximen Qing.

西门庆又道：“你儿子王潮跟谁出去了？”

“Li ĉiam kun komercisto, indiĝeno de la regiono Huai, sed li estas for de mi jam tiel longan tempon, ke mi eĉ ne scias, ĉu li nun vivas aŭ jam estas mortinta.”

王婆道：“说不得，跟了一个淮上客人，至今不归，又不知死活。”

“Kial do ne konfidi lin al mi? Li ŝajnas esti knabo sagaca kaj lerta.”

西门庆道：“却不交他跟我，那孩子倒乖觉伶俐。”

“Mi tre ĝojas, ke li ricevas de vi laŭdon kaj aprobon.”

王婆道：“若得大官人抬举他时，十分之好。”

“Tre bone,” diris Ximen Qing. “Kiam li revenos, ni ree parolos pri tiu ĉi afero.”

西门庆道：“待他归来，却再计较。”

Dirinte tion ĉi, li dankis la maljunulinon, kaj poste leviĝis kaj foriris.

说毕，作谢起身去了。

Sed, apenaŭ pasis kelka tempo, li ree venis al la domo de la maljunulino Wang kaj sidiĝis sub la butika ŝildo, kun la vizaĝo turnita al la domo de Wu Da.

约莫未及两个时辰，又捱将来王婆门首，帘边坐的，朝着武大门前半歇。王婆出来道：

“Ĉu mi povus servi vin per ume-suko?” demandis la maljunulino Wang, elirinte el la domo.

“大官人，吃个梅汤？”

“Bone, sed iom pli acidan,” diris Ximen Qing.

西门庆道：“最好多加些酸味儿。”

La maljunulino pretigis la sukon kaj ambaŭmane portis ĝin al li. Trinkinte ĝin, li demetis la tason.

王婆做了个梅汤，双手递与西门庆吃了。将盏子放下，西门庆道：

“Vi faris tre bonan ume-sukon, kara duonpanjo,” li diris. “Ĉu vi havas multe da umeoj en la ĉambro?”

“干娘，你这梅汤做得好，有多少在屋里？”

“Mi multege-foje servadis kiel svatistino dum la vivo,” diris la maljunulino, “sed mi neniel

povis teni ilin en mia ĉambro.”⁶

王婆笑道：“老身做了一世媒，那讨不在屋里！”

“Mi parolis pri la ume-suka faro, ne pri svato,” diris Ximen Qing. “Vi faris konfuzon, kara duonpanjo!”

西门庆笑道：“我问你这梅汤，你却说做媒，差了多少！”

“Mi komprenis nur, ke vi parolis pri la svato, pardonon,” diris la maljunulino.

王婆道：“老身只听得大官人问这媒做得好。”

“Nu, bone, mia kara duonpanjo,” diris Ximen Qing, “ĉar ĵus vi menciis, ke vi kutime faris svatadon, kial do vi ne aranĝos ankaŭ por mi bonan geedzigon? Se vi sukcesos, mi vin abunde rekompencos.”

西门庆道：“干娘，你既是撮合山，也与我做头媒，说头好亲事，我自重重谢你。”

“Vi nur ŝerce incitetas min,” diris la maljunulino. “Se via ĉefa edzino aŭdus pri tio, mia maljuna vizaĝo certe ricevus solidajn vangofrapojn.”

王婆道：“看这大官人作戏！你宅上大娘子得知，老婆子这脸上怎吃得那耳刮子！”

“Ne, tute ne,” diris Ximen Qing. “Mia ĉefa edzino estas plej afabla virino, kaj mi jam havas multajn virinojn hejme, tamen neniuj el ili estas ĝuste tia, kian mi pleje deziras. Se vi havas vere bonan virinon laŭ vi konvenan por mi, vi devos prezenti ŝin al mi. Estus por mi indiferece, ĉu ŝi alia viro jam ĝuis aŭ ne, sed ŝi devus esti nepre laŭ mia gusto.”

西门庆道：“我家大娘子最好性格。见今也有几个身边人在家，只是没一个中得我意的。你有这般好的，与我主张一个，便来说也不妨。若是回头人儿也好，只是要中得我意。”

“Feliĉe,” diris la maljunulino, “kelkajn tagojn mi aŭdis pri belega virino, sed mi timas, ke ŝi ne taŭgos por vi.”

王婆道：“前日有一个倒好，只怕大官人不要。”

“Se ŝi estas la ĝusta bongustaĵo, faru la svaton al mi, kaj mi bone rekompencos vin por via servo.”

西门庆道：“若是好时，与我说成了，我自重谢你。”

“Ŝi estas vere multe pli ol la ordinara beleco,” diris la maljunulino, “sed, bedaŭrinde, sufiĉe maljuna.”

王婆道：“生的十二分人才，只是年纪大些。”

“De la antikveco oni ĉiam diras, ke *matura virino ja havas ĉarmojn meritantajn ŝatadon*. Unu aŭ du jaroj da pliaĝeco tute ne gravas. Sed, kian aĝon do ŝi havas?”

西门庆道：“自古半老佳人可共，便差一两岁也不打紧。真个多少年纪？”

“Ŝi naskiĝis en la jaro *ding-hai*, tiu de la porko, sekve ŝi devos esti naŭdek-tri-jara post la novjara tago de la venonta jaro.”

王婆道：“那娘子是丁亥生，属猪的，交新年却九十三岁了。”

“Vi freneza maljunulino!” kriis Ximen Qing ridante. “Kial vi nur tiel ĉife tordas vian frenezmienan vizaĝon kaj amas ŝerci?”

西门庆笑道：“你看这风婆子，只是扯着风脸取笑。”

Tion dirinte, Ximen Qing leviĝis kaj foriris kun rideto.

说毕，西门庆笑着起身去。

Jam estis malfrue en la vespero. Ĝuste kiam la maljunulino Wang eklumigis la lampon kaj estis preta fermi la pordegon, Ximen Qing ankoraŭfoje aperis. Li ree sidiĝis sub la butika ŝildo kaj fiksis siajn sopirantajn okulojn en la direkto al la domo de Wu Da.

看看天色晚了，王婆恰才点上灯来，正要关门，只见西门庆又趑将来，迳去帘子底下凳

子上坐下，朝着武大门前只顾将眼望。

“Ĉu vi dezirus tason da harmoni-spica supo, granda sinjoro?” demandis la maljunulino.

王婆道：“大官人吃个和合汤？”

“Bone, mia kara duonpanjo,” respondis Ximen Qing, “sed iom pli dolĉan.”

西门庆道：“最好！干娘放甜些。”

La maljunulino rapide alportis la supon, kaj li ĝin manĝis. Li sidis tie ĝis tre malfrue. Finfine li stariĝis.

“Kara duonpanjo, metu la pagon en mian konton, kaj mi pagos al vi entute morgaŭ.”

王婆连忙取一钟来与西门庆吃了。坐到晚夕，起身道：“干娘，记了帐目，明日一发还钱。”

“Laŭ via plezuro,” diris la maljunulino. “Ni certe havos okazon por reguligi la konton.”

王婆道：“由他，伏惟安置，来日再请过论。”

Ximen Qing ekridis kaj foriris. En la hejmo li sentis sin tiel maltrankvila, ke li havis nek apetiton por manĝoj, nek dormemon dum la nokto. Lia koro estis konsumita de la deziro je tiu virino. Sinjorino Luno, lia ĉefa edzino, vidis lin en tia malgaja stato, pensante, ke tio estas ŝuldata al la morto de lia tria edzino, kaj ne donis atenton al tio.

西门庆笑了去。到家甚是寝食不安，一片心只在妇人身上。就是他大娘子月娘，见他这等失张失致的，只道为死了卓二姐的缘故，倒没做理会处。当晚无话。

En la sekva mateno, apenaŭ la maljunulino Wang malfermis sian tetrinkejon kaj ĵetis rigardon eksteren, ŝi vidis, ke Ximen Qing jam estas tie, paŝadante tien kaj reen sur la strato.

次日清晨，王婆恰才开门，把眼看外时，只见西门庆又早在街前来回踱走。

“Ha! Tiu ĉi ulo certe jam sufiĉe malpacienciĝis.” diris al si la maljunulino. “Mi do dolĉe ŝmiru al li la muzelon, li certe ne povos plu sin teni antaŭ mi. Li ĉiam tiras profiton el la rilato kun ĉiuj en la urbo, sed, nun ke li jam falis en mian kaptilon, mi nepre devos elpremi el li iom da mono utiligante lian malĉastecon.”

王婆道：“这刷子甭得紧！你看我着些甜糖抹在这厮鼻子上，交他抵不着。那厮全讨县里人便宜，且交他来老娘手里纳些贩钞，嫌他几个风流钱使。”

La pasinta historio de tiu ĉi maljunulino Wang havis nenian rilaton al honesteco. Ŝi estis svatistino tre lerta kaj diligenta dum la vivo, kaj de tempo al tempo faris negocon de infanoj kaj junaj virinoj. Ŝi sin okupis ankaŭ je akuŝigado, kaptante la okazon trompe eltrudi monon de la familio de akuŝantino, ktp, ktp. Unuvorte, ŝi estis kompleta friponino.

原来这开茶坊的王婆，也不是守本分的，便是积年通殷勤，做媒婆，做卖婆，做牙婆，又会收小的，也会抱腰，又善放刁，端的看不出这婆子的本事来。

Jen, vidu nur:

Ŝiaj paroladoj povis trompi eĉ la saĝulon Lu Jia⁷;

Ŝiaj babildoj triumfis super la elokventa Sui He⁷.

Ŝiaj lipoj egalas ĉiujn lancojn de la Ses Regno⁸,

Kaj ŝia akra lango la glavojn de la tri Qi-oj⁹.

El solecaj virfenikso kaj feniksino ŝi tuj faras paron;

Vidvo kaj vidvino, pere de ŝi, tuj pariĝis.

Ŝi sciis sukcese delogi virginon el ŝia buduario,

Kaj ankaŭ la Oran Knabon en la Ĉiela Palaco.

Sufiĉis ŝia eta ruzaĵo por instigi arahanton

Aŭdace ĉirkaŭbraki pian bikŝuinon,

*Kaj kuraĝigi la Ĉielan Reĝ-gardanton Li
Ĉirkaŭpremi la patrinon de demonoj.
Ŝiaj dolĉaj paroloj konfuzis la senmortulan koron,
Kaj ŝiaj molaj diroj malĉastigis eĉ senmortulinon.
Dank' al ŝia perado virtulino falis en ammalsanon,
Kaj eĉ la diino Chang'e¹⁰ kaŝe prenis al si amoranton.*

但见：

开言欺陆贾，出口胜隋何。只凭说六国唇枪，全仗话三齐舌剑。只鸾孤凤，霎时间交仗成双；寡妇鳏男，一席话搬说摆对。解使三里门内女，遮莫九阪殿中仙。玉皇殿上侍香金童，把臂拖来；王母宫中传言玉女，拦腰抱住。略施奸计，使阿罗汉抱住比丘尼；才用机关，交李天王搂定鬼子母。甜言说诱，男如封涉也生心；软语调合，女似麻姑须乱性。藏头露尾，撺掇淑女害相思；送暖偷寒，调弄嫦娥偷汉子。

Apenaŭ la maljunulino malfermis sian pordon por forĵeti la uzitajn tefoliojn, ŝi ree vidis Ximen Qing paŝadi tien kaj reen plurfoje. Fine li venis al la tetrinkejo kaj staris sub la butikaj ŝildo kun la vizaĝo turnita al la domo de Wu Da. Li fiksis la rigardon sur la rulkurteno sen turni la okulojn for de ĝi eĉ unu momenton. La maljunulino ŝajnis, kvazaŭ ŝi lin tute ne vidas. Ŝi daŭrigis sian faradon de fajro en sia tetrinkejo, ĝis Ximen Qing, trovante, ke ŝi ne eliras por proponi al li teon, vokis al ŝi, ke ŝi alportu du tasojn da teo.

这婆子正开门，在茶局子里整理茶锅，张见西门庆熬过几遍，奔入茶局子水帘下，对着武大门首，不住把眼只望帘子里瞧。王婆只推不看见，只顾在茶局子内煽火，不出来问茶。西门庆叫道：“干娘，点两杯茶来我吃。”

“Ha,” diris la maljunulino, “estas vi, granda sinjoro! Kial vi lasis pasi tiel longan tempon sen aperi al mi? Bonvolu do sidiĝi.”

王婆应道：“大官人来了？连日少见，且请坐。”

Post kelkaj momentoj ŝi jam alportis al li du tasojn da forta teo kaj metis ilin sur la tablon.

不多时，便浓浓点两盏稠茶，放在桌子上。

“Trinku kun mi, duonpanjo. Ĉi taso estas por vi,” diris Ximen Qing.

西门庆道：“干娘，相陪我吃了茶。”

“Mi ne estas tia virino, kian vi deziras,” diris kun laŭta rido la maljunulino. “Kial mi devus vin akompani ĉe via tetrinko?”

王婆哈哈笑道：“我又不是你影射的，如何陪你吃茶？”

Ankaŭ Ximen Qing ekridis kaj poste demandis:

西门庆也笑了，一会便问：

“Duonpanjo, kion oni vendas en via najbara domo?”

“干娘，隔壁卖的是甚么？”

“Rostitajn sukeritajn kukojn, raviolojn farĉitajn per viando kaj legomoj, vaporumitajn ostre farĉitajn pastobulojn, kun varmigita forta vino, ktp, ktp.”

王婆道：“他家卖的拖煎阿满子，干巴子肉翻包着菜肉匾食饺，窝窝蛤蜊面，热烫温和大辣酥。”

“Vi freneza maljunulino,” diris Ximen Qing, ridante. “Vi parolas nur deliraĵon.”

西门庆笑道：“你看这风婆子，只是风。”

“Mi tute ne estas freneza,” diris la maljunulino. “Se vi volos iri al la domo, vi trovos ŝian edzon en ĝi.”

王婆笑道：“我不风，他家自有亲老公。”

“Ni parolu serioze,” diris Ximen Qing. “Se li vere faras bonajn kukojn, mi aĉetos kvardek aŭ kvindek, kaj kunportos ilin hejmen.”

西门庆道：“我和你说正话。他家如法做得好炊饼，我要问他买四五十个拿的家去。”

“Ne necesas, ke vi mem iru al la domo por aĉeti ilin. La viro baldaŭ eliros al la strato, kaj vi povos ricevi tiom, kiom vi deziros.”

王婆道：“若要买炊饼，少间等他街上回来买，何消上门上户！”

“Vi pravas,” diris Ximen Qing.

Trinkinte sian teon, li restis tie iom da tempo, kaj fine foriris.

西门庆道：“干娘说的是。”吃了茶，坐了一回，起身去了。

Kalkan tempon poste, kiam la maljunulino Wang prizorgis sian tetrinkejon, ŝi ree vidis la figuron de Ximen Qing. Ŝi observis lin per sia malvarma rigardo, dum li paŝadis tien kaj reen, ĵetante rigardon jen dekstren, jen maldekstren. Tiele li iradis kaj reiradis sep- aŭ ok-foje. Finfine li ree envenis rekte en la tetrinkejon.

良久，王婆在茶局里冷眼张着，他在门前踱过，东看一看，又转西去，又复一复，一连走了七八遍。少顷，迳入茶房里来。

“Saluton, granda sinjoro,” diris la maljunulino. “Ŝajnas, ke jam tre longe mi ne vidis vin!”

王婆道：“大官人侥幸，好几日不见面了。”

Ximen Qing ekridis kaj elprenis taelon da arĝento kaj donis ĝin al ŝi.

“Jen estas por mia teo, duonpanjo,” li diris.

西门庆便笑将起来，去身边摸出一两一块银子，递与王婆，说道：“干娘，权且收了做茶钱。”

La maljunulino ekridetis kaj diris:

“Kial tiom multe?”

王婆笑道：“何消得许多！”

“Ĝin akceptu, kara duonpanjo!” diris Ximen Qing.

西门庆道：“多者干娘只顾收着。”

“Nu,” pensis en si la maljunulino, “mia bonŝanco jam venis. Tiu ĉi broso komencas perdi iom el siaj haregoj. Mi do akceptu la arĝenton hodiaŭ; ĝi estos por mia domlupago morgaŭ.”

婆子暗道：“来了，这刷子当败。且把银子收了，到明日与老娘做房钱。”

Kaj ŝi diris al Ximen:

“Ŝajnas, ke vi havas ion, kio pezas sur via koro.”

便道：“老身看大官人象有些心事的一般。”

“Kiel vi faras tian divenon, duonpanjo?” demandis Ximen Qing.

西门庆道：“如何干娘便猜得着？”

“Tute ne malfacile. Pensu pri la malnova onidiro: *ĉe la sojlo ne demandu, ĉu liaj aferoj prosperas aŭ ne, sufiĉas nur ekzameni la esprimon de lia vizaĝo*. Tiamaniere, mi konfesas, mi jam ĝuste divenis mi ne scias kiom da aferoj strangaj aŭ kuriozaj.”

婆子道：“有甚难猜处！自古入门休问荣枯事，观着容颜便得知。老身异样跷蹊古怪的事，不知猜够多少。”

“Se vi povos ĝuste diveni, pri kio mi nun pensas,” diris Ximen Qing, “mi donos al vi kvin taelojn da arĝento.”

西门庆道：“我这一件心上的事，干娘若猜得着时，便输与你五两银子。”

La maljunulino ekridis kaj diris:

“Sufiĉas nur iom da sprito por fari la ĝustan divenon pri vi. Mia kara granda sinjoro, nur

alproksimigu vian orelon al mi. Vi tiel ofte marŝadis ĉi tien en la lastaj tagoj, kaj estas tre klare, ke vi havas vian okulon nur sur tiu najbara sinjorino. Ĉu vere?”

王婆笑道：“老身也不消三智五猜，只一智便猜个中节。大官人你将耳朵来：你这两日脚步儿勤，赶趁得频，一定是记挂着隔壁那个人。我这猜如何？”

Ximen Qing ekridis kaj diris:

“Via saĝeco, kara duonpanjo, estas egala al tiu de Sui He⁷, kaj via sagaceco pli akra, ol tiu de Lu Jia⁷. Por diri al vi la veron, mia kara duonpanjo, mi ne scias kial, sed ekde tiu tago, kiam mi ricevis sur mia kapo la frapon de ŝia stango sub la rulkurteno, mi kvazaŭ jam perdis miajn tri animojn kaj ses vivspiritojn! Mi neniel povas liberigi min de pensoj pri ŝi, nek en la tagoj, nek en la noktoj. Kiam mi estas hejme, mi volas nek manĝi, nek trinki, kaj havas nenian emon fari ion ajn. Mi min demandas, ĉu vi povus trovi ian rimedon por min helpi.”

西门庆笑将起来道：“干娘端的智赛隋何，机强陆贾。不瞒干娘说，不知怎的，吃他那日叉帘子时见了一面，恰似收了我三魂六魄的一般，日夜只是放他不下。到家茶饭懒吃，做事没入脚处。不知你会弄手段么？”

La maljunulino eksplodis per plorego.

“Mi devas al vi konfesi, mia granda sinjoro,” ŝi diris, “ke kvankam mi tenas tetrinkejon ĉi tie, tamen, por diri al vi la veron, ĝi pli aŭ malpli similas *lokon, kie la fantomo batas noktajn horojn kiel noktogardisto*¹¹. Antaŭ tri jaroj, en la tria tago de la sesa monato, dum kiu falis tre densa neĝo, mi vendis nur unu tason da infuzita teo, kaj de tiam mia tetrinkejo neniam plu prosperas ĝis nun, sekve mi estas devigita min vivteni nur en diversaj aliaj manieroj.”

王婆哈哈笑道：“老身不瞒大官人说，我家卖茶叫做鬼打更。三年前六月初三日下大雪，那一日卖了个泡茶，直到如今不发市，只靠些杂趁养口。”

“Kaj kion do signifas viaj diversaj manieroj?” demandis Ximen Qing.

西门庆道：“干娘，如何叫做杂趁？”

“Kiam mi estis tridek-ses-jara, mia edzo mortis. Li postlasis al mi junan knabon, sed nenion por vivteno. Mi do komencis min okupi je servado kiel svatistino, kaj, pli poste, perlaboris iom da moneroj revendante eluzitajn vestojn, kaj agis kiel akuŝistino, parigistino ktp. Iafoje mi praktikis ankaŭ akupunkturon kaj moksterapion por kuraci malsanulojn.”

王婆笑道：“老身自从三十六岁没了老公，丢下这个小厮，没得过日子。迎头儿跟着人说媒，次后揽人家些衣服卖，又与人家抱腰收小的，闲常也会作牵头，做马百六，也会针灸看病。”

Aŭdinte tiujn vortojn, Ximen Qing ekridis:

“Mi havis nenian ideon pri viaj kapabloj kaj lertecoj tiom multaj, kara duonpanjo! Nu, se vi povos aranĝi tiun ĉi aferon je mia kontenteco, mi donos al vi dek taelojn da arĝento por via estonta ĉerko. Ĉio, kion vi devos fari, estas renkontigi min kun la virino.”

“Mi nur ŝercis,” diris la maljunulino kun laŭta rido. “Kial vi prenis min tiel serioze?”

西门庆听了，笑将起来：“我并不知干娘有如此手段！端的与我说这件事，我便送十两银子与你做棺材本。你好交这雌儿会我一面。”王婆便呵呵笑道：“我自说要，官人怎便认真起来。你也！”且看下回分解。

Jen poemo, kiu tion atestas:

Ximen, la diboĉulo, havas deziron senbridan,

Ĉiurimede li provas intimiĝi kun tiu virino.

Dank' al la maljunulino Wang, la te-vendistino,

Li povos ĝui kun ŝi la plezuron de kopulacio.

有诗为证：

西门浪子意猖狂，死下功夫戏女娘。

亏杀卖茶王老母，生交巫女会襄王。

Notoj:

1. Ziyou: la adoltiĝa nomo de Wang Huizhi. Jen la epizodo: la Jin-dinastia klerulo Wang Huizhi, kiu vivis en Shanyin (la nuna Shaoxing), vekigis en iu neĝa nokto kaj subite ekpensis pri sia amiko Dai Kui, kiu tiam loĝis en Shanxi. Li tuj ekveturis en boato por lin viziti. Post longa nokta velado li finfine atingis Shanxi. Subite Wang returnis sian boaton kaj revenis hejmen. Kiam oni poste demandis lin, kial li ne persone vidis Dai kiel li komence intencis, li respondis: “Mi aliris en gaja humoro kaj reiris same en gaja humoro. Kial do mi nepre devus vidi lin persone?” La kleruloj de la dinastio Jin donis gravecon al “la sekvado de sia laŭvoleco kaj sia instinkto”, kaj tiu ĉi epizodo servas kiel klasika ekzemplo.

2. Lü Mengzheng: historia persono (944—1011), kiu leviĝis al la pozicio de ĉefministro de la fruaj jaroj de la dinastio Song. Dum sia juneco li suferis granda malriĉecon kaj loĝis en kabano eĉ dum severe malvarma vintro.

3. Pli valoras la interna fortenco, ol la ekstera: kutima esprimo signifanta, ke edzino lerta pli valoras, ol edzo kapabla.

4. La generalo Wu Dao: unu el la inferaj dioj, kiu, laŭ taŭista kredo, decidas pri la homa naskiĝo aŭ morto.

5. La Maljunulo sub la Luno: dio de geedzeco, kiu laŭlegende alfiksis al gefianĉoj ruĝan ŝnuron, kiu dumvive kunligos ilin.

6. Ĉi tie la maljunulino intence faris vortludon pri la homofonoj 做梅 [zuòméi] “fari ume-sukon” kaj 做媒 [zuòméi] “svati”.

7. Lu Jia kaj Sui He: vd. noton 5 de ĉapitro 1.

8. Ĉiujn lancojn de la Ses Regnoj: aludo al la elokventeco de Su Qin, elokventa politikisto (?—284 a.K.), kiu sukcesis interligi la ses regnojn por alianciĝo kontraŭ la komuna potenca malamiko, la regno Qin, en la periodo de Militantaj Regnoj.

9. La glavoj de la tri Qi-oj: aludo al la elokventeco de Li Shiji (?—203 a.K.), alia fama retoriko, kiu sukcesis persvadi la reganton de la regiono Tri Qi-oj, ke li submetu sin al la Liu Bang, la fondinto de la dinastio Han.

10. La diino Chang’e: legenda belulino, kiu, sekrete trinkinte eliksiron de longa vivo, ŝtelitan de ŝia edzo, flugis al la luno, kie ŝi fariĝis senmorta sed estis enfermita tie soleca por ĉiam.

11. Loko, kie la fantomo batas noktajn horojn kiel noktogardisto: kutima esprimo signifanta “objekton, kies ekzisto estas nur por formo”.

ĈAPITRO 3


LA MALJUNULINO WANG DECIDIS LA PLANON PRI “LUM-ŜTELO”
kaj
LA DIBOĈULO FARIS ARTIFIKON POR DELOGI LA MALĈASTULINON

第三回 定挨光王婆受贿 设圈套浪子私挑

*Ĉe lia ekvido, ŝi estas nekonata;
Ĉe lia dua penso, ŝi ŝajnas amema.
Antaŭ pokaloj, nur ĉe unufoja renkontiĝo,
La kvar okuloj sin ample interrigardas.
En ebrio, ŝia freŝa teniĝo estas tiel mirinda;
En nebuleco, ŝia nomo estas ree demandata.
Ĉi-nokte, en la lumo de kandelo flagretanta,
Iliaj koroj vikle kapriolas de volupta pasio.*

诗曰：

乍对不相识，徐思似有情。
杯前交一面，花底恋双睛。
傒僂惊新态，含糊问旧名。
影含今夜烛，心意几交横。



La maljunulino Wang decidis la planon pri “lum-ŝtelo”.



La diboêulo faris artifikon por delogi la malêastulinon.

Ximen Qing fortege deziris posedi Oran Lotuson. Li insiste petegis la helpon de la maljunulino Wang.

话说西门庆央王婆，一心要会那雌儿一面，便道：

“Duonpanjo,” li diris, “se vi sukcese kondukos tiun ĉi aferon al feliĉa fino, mi donos al vi dek taelojn da arĝento.”

“干娘，你端的与我说这件事成，我便送十两银子与你。”

“Granda sinjoro, aŭskultu min!” diris la maljunulino. “Eble vi jam aŭdis, ke nenio estas pli malfacila, ol la ‘lum-ŝtelo’ en la amafero, t.e. am-ŝtelo aŭ am-intrigo, kiel oni vulgare diras en la nuna tempo. Por sukcese atingi la celon, oni devas plenumi kvin kondiĉojn, kaj ilin plenumi komplete. La unua estas havi la belecon de la fama belulo Pan An¹. La dua estas havi la seksmembron almenaŭ tiel grandan, kiel tiu de azeno. La tria estas havi tiom da mono, kiom la Deng Tong². Por la kvara, oni devas esti sufiĉe juna kaj tiel senfine pacienca kaj elasta, kiel kudrilo kaŝita en silka vato³. La kvina, tio estas posedi abundon da tempo disponebla. Tiuj ĉi kvin povas esti resumitaj per kvin vortoj: beleco, peniskoloseco, riĉeco, juneco kaj temp-abundo. Se vi posedas ĉiujn ĉi tiujn kvalifikojn, mi estas certa, ke via afero povos bone iri.”

王婆道：“大官人，你听我说：但凡‘挨光’的两个字最难。怎的是‘挨光’？比如如今俗呼‘偷情’就是了。要五件事俱全，方才行的。第一要潘安的貌；第二要驴大行货；第三要邓通般有钱；第四要青春少小，就要绵里针一般软款忍耐；第五要闲工夫。此五件，唤做‘潘驴邓小闲’。都全了，此事便获得着。”

“Por diri sincere, ĉi tiujn kvalifikojn mi ĉiujn posedas,” diris Ximen Qing. “Unue mi trovas min sufiĉe bela, eĉ se mi ne estas egala al Pan An. Koncerne la duan, ekde mia knabeco mi tiel ofte ludis en la stratoj kaj stratetoj de la kvartalo de plezuro, ke mi sukcesis grandigi mian testudon⁴ belstaturan. Por tio, kio estas la tria, kvankam mi ne havas tiom da riĉaĵoj, kiom Deng Tong, tamen mia arĝento estas sufiĉa por mia komforta vivo. Rilate la kvaran, neniu ja estas pli pacienca, ol mi: eĉ se mi ricevus de ŝi kvarcent bastonfrapojn, mi neniam pensus pri rebato per pugno! Kvine, la libera tempo estas tio, kio al mi malpleje mankas, alie, kiel vi povus vidi min ĉi tie tiel ofte? Kara duonpanjo, faru do tion ĉi por mi, kaj kiam ĉio estos bone aranĝita, mi certe rekompencos vin tre, tre malavare.”

西门庆道：“实不瞒你说，这这五件事我都有。第一件，我的貌虽比不得潘安，也充得过；第二件，我小时在三街两巷游串，也曾养得好大龟；第三，我家里也有几贯钱财，虽不及邓通，也颇得过日子；第四，我最忍耐；他便打我四百顿，休想我回他一拳；第五，我最有闲工夫，不然如何来得恁勤。干娘，你自作成，完备了时，我自重重谢你。”

“Vi diras, ke vi plenumas ĉiujn tiujn kondiĉojn, mia granda sinjoro,” replikis la maljunulino, “sed laŭ mi estas ankoraŭ unu nepre necesa, sen kiu via afero riskos tute malsukcesi.”

王婆道：“大官人，你说五件事都全，我知道还有一件事打搅，也多是成不得。”

“Kio ĝi estas? Diru do al mi,” diris Ximen Qing.

西门庆道：“且说，甚么一件事打搅？”

“Pardonu al mi mian sinceran parolon,” diris la maljunulino, “sed kiam viro deziras ŝteli amon ĉe alies edzino, tiam ekzistas por li tre konsiderindaj malfacilaĵoj, kiuj malhelpas la aferon. Tiu, kiu eĉ konsentas elspezi naŭdek naŭ procentojn de la necesa sumo, tamen malsukcesos veni al la fino. Li devas iri ĝis la ekstrema limo. Mi aŭdis, ke nature vi estas avara, ne volante ĵeti vian monon por tiu ĉi afero. Jen la malfacilaĵo.”

王婆道：“大官人休怪老身直言，但凡挨光最难，十分，有使钱到九分九厘，也有难成

处。我知你从来吝啬，不肯胡乱便使钱，只这件打搅。”

“Ĝi estas facile solvebla,” diris Ximen Qing. “Mi do agos tute laŭ viaj paroloj.”

西门庆道：“这个容易，我只听你言语便了。”

“Tre bone,” diris la maljunulino, “se via moŝto estas vere preta elspezi taelojn, mi havas planon, kiu ebligas al vi renkontiĝi kun la sinjorino.”

王婆道：“若大官人肯使钱时，老身有一条妙计，须交大官人和这雌儿会一面。”

“Kian planon do? Diru al mi,” diris Ximen senpacience.

西门庆道：“端的有甚妙计？”

“Estas jam tro malfrue hodiaŭ, vi devos reveni hejmen,” diris la maljunulino kun rido, “kaj ree venu post paso de duonjaro aŭ tri monatoj, kaj ni tiam diskutos pri tio, kion ni povos fari.”

王婆笑道：“今日晚了，且回去，过半年三个月来商量。”

“Kara mia duonpanjo,” diris Ximen Qing, “ne ŝercu pri tio. Nur diru vian planon kaj aranĝu laŭ ĝi por mi, kaj vi ricevos de mi malavaran rekompenco.”

西门庆央及道：“干娘，你休撒科！自作成我则个，恩有重报。”

Sed la maljunulino nur laŭte ridis.

“Mia granda sinjoro, ŝajnas, ke vi certe jam perdis vian memregon,” ŝi diris. “Kvankam mia plano ne meritis esti kultata en la templo, tamen ĝi estos tiel bona, kaj eĉ pli bona, ol tiu de la strategiisto Sun Wu⁵, kiu donis militan trejnadon al la knabinoj, el kiuj vi povus kapti ok aŭ naŭ por via ĝuo, se vi agos laŭ ĝi.

王婆笑哈哈道：“大官人却又慌了。老身这条计，虽然入不得武成王庙，端的强似孙武子教女兵，十捉八九着。

“Permesu al mi rakonti al vi ĉion, kion mi scias pri tiu ĉi virino. Ŝi naskiĝis en malriĉa familio, sed ŝi posedas ĉiajn talentojn. Ŝi scias ludi muzikilojn kaj bele kanti, ŝia kudrado estas bonega, kaj ŝi estas lerta ankaŭ en multaj ŝakludoj. En efektiveco ekzistas nenio, kion ŝi ne scipovus. Ŝia familinomo estas Pan, kaj ŝia persona nomo, Ora Lotuso. Ŝia patro estas Pan Cai, kiu loĝis ĉe la suda urbopordego. Origine ŝi estis vendita al la riĉulo Zhang, kaj, en lia domo, ŝi ellernis kanti kaj ludi muzikilojn. Kiam Zhang estis tre maljuna, ŝi estis senpage donacita al Wu Da kiel edzino.

今日实对你说了罢：这个雌儿来历，虽然微末出身，却倒百伶百俐，会一手好弹唱，针指女工，百家歌曲，双陆象棋，无所不知。小名叫做金莲，娘家姓潘，原是南门外潘裁的女儿，卖在张大户家学弹唱。后因大户年老，打发出来，不要武大一文钱，白白与了他为妻。

“Ŝi ne tre ofte eliras el la domo kaj, kiam mi estas ne okupita, mi ofte iras al ŝia loko por babilado, kaj iafoje ŝi ankaŭ petas mian opinion, kiam ŝi estas sendecida pri iu afero. Ŝi ĉiam nomas min ‘duonpanjo’.

这雌儿等闲不出来，老身无事常过去与他闲坐。他有事亦来请我理会，他也叫我做干娘。

“Tiuĵn ĉi lastajn tagojn Wu Da eliris frue. Se vi volas konfidi al mi tiun ĉi aferon, vi devos aĉeti iom da silkaĵoj, rulon da blua, rulon da blanka, kaj ankoraŭ unu rulon da blanka kaj plej maldika, kaj dek taelojn da pura silkovato. Donu ilin ĉiujn al mi. Mi iros al ŝia domo por prunti kalendaron, kaj petos ŝin elekti por mi favoran tagon, por ke mi povu dunge venigi tajloron en mian domon por fari al mi vestojn. Povas esti, ke ŝi trovos favoran tagon por mi, sed ne proponos sin mem veni fari la vestojn. Tiukaze la afero haltos. Se ŝi tre ĝojos kaj diros: ‘Ne venigu tajloron. Mi volonte faros por vi la vestojn,’ tiam la ‘lum-ŝtelo’ aperigos al ni dekonon de espero.

武大这两日出门早。大官人如干此事，便买一匹蓝绸、一匹白绸、一匹白绢，再用十两好绵，都把来与老身。老身却走过去问他借历日，央及他拣个好日期，叫个裁缝来做。他若

见我这般说，拣了日期，不肯与我来做时，此事便休了；他若欢天喜地说：‘我替你做。’不要我叫裁缝，这光便有一分了。

“Se mi povos sukcese persvadi ŝin, ke ŝi venu ĉi tien por fari la kudradon, tiam ni jam tenos du dekonajn.

我便请得他来做，就替我缝，这光便二分了。

“Se ŝi venos ĉe la tagmezo, mi preparos manĝon kaj vinon por ŝin regali. Se ŝi insistos, ke ŝi revenu al sia hejmo kaj faru tie la laboron, asertante ke ĉi tie estas ne konvene, tiuokaze la afero ne plu iros. Sed, se ŝi sidiĝos al la tablo sen diri ion ajn, tiam la ‘lum-ŝtelo’ jam pliiĝos al tri dekonaj.

他若来做时，午间我却安排些酒食点心请他吃。他若说不便当，定要将去家中做，此事便休了；他不言语吃了时，这光便有三分了。

“Tiutage vi ne devos veni. Atendu ĝis la tria tago kaj alvenu ĉe la tagmezo en viaj plej belaj vestoj, ektusante por signali vian alvenon. Vi krii ĉe la pordego: ‘He, duonpanjo, saluton al vi! Ĉu mi povus enveni kaj trinki tason da teo?’ Mi do eliros kaj petos vin eniri. Povas esti, ke ekvidinte vin, ŝi tuj deziros reveni al sia hejmo, kaj, se ŝi tiel agos, mi ne povos ŝin haltigi. Tiuokaze la afero finiĝos. Sed, se ŝi plu restos tie, kie ŝi estos, tiam la ‘lum-ŝtelo’ progresos al kvar dekonaj.

这一日你也莫来，直至第三日，晌午前后，你整整齐齐打扮了来，以咳嗽为号，你在门前叫道：‘怎的连日不见王干娘？我买盏茶吃。’我便出来请你入房里坐吃茶。他若见你便起身来，走了归去，难道我扯住他不成？此事便休了。他若见你入来，不动身时，这光便有四分了。

“Kiam vi sidiĝos, mi diros al ŝi: ‘Jen estas la granda sinjoro, kiu donacis al mi la vestojn. Mi neniel povas diri al vi, kiel dankema mi estas al li,’ kaj pli poste mi superŝutos vin per laŭdoj pri viaj malavareco kaj grandanimeco. Tiam vi komplimentos ŝin pri ŝia kudrado. Se ŝi ne respondos, nia afero povos ne plu iradi. Sed se ŝi respondos, kaj eniros en konversacion kun vi, ni havos kvin dekonajn de espero.

坐下时，我便对雌儿说道：‘这个便是与我衣服施主的官人，亏杀他。’我便夸大官人许多好处，你便卖弄他针指。若是他不来兜揽答应时，此事便休了；他若口中答应与你说话时，这光便有五分了。

“Tiam mi do diros: ‘Mi ŝuldas al tiu ĉi sinjorino grandegan dankon pro ŝia afableco fari al mi la vestojn,’ kaj laŭdos vin ambaŭ — vin pro via dono de mono kaj ŝin pro ŝia kudrado. Mi diros: ‘Tiu ĉi sinjorino estas vere bonkora. Mi estis bonŝanca, ke mi sukcese persvadis ŝin veni ĉi tien por min helpi. Eble vi volus proponi al ŝi regalon por ŝin danki.’ Vi do elprenos iom da arĝento el via poŝo kaj petos min iri aĉeti ion. Se tiumomente ŝi decidiĝos foriri, mi ne povos ŝin reteni, kaj tiuokaze ĉio estos perdita. Sed, se ŝi ne moviĝos, tiam ni jam gajnos niajn ses dekonajn.

我便道：‘却难为这位娘子与我作成出手做，亏杀你两施主，一个出钱，一个出力。不是老身路歧相央，难得这位娘子在这里，官人做个主人替娘子浇浇手。’你便取银子出来，央我买。若是他便走时，难道我扯住他？此事便休了。他若是不动身时，事务易成，这光便有六分了。

“Mi do prenos vian arĝenton kaj, antaŭ ol mi eliros, mi diros: ‘Sinjorino, volu kunresti kun tiu ĉi sinjoro dum momento.’ Se ŝi leviĝos por foriri, tiam mi ne povos retiri ŝin al ŝia sidloko, kaj nia afero ne iros pli malproksimen, sed, se ŝi restos senmova sur sia loko, tiuokaze ni akiros ankoraŭ plian dekonon.

我却拿银子，临出门时对他说：‘有劳娘子相待官人坐一坐。’他若起身走了家去，我终不成阻挡他？此事便休了。若是他不起身，又好了，这光便有七分了。

“Kiam mi revenos kun la aĉetitaĵoj, mi metos ilin sur la tablon kaj diros: ‘Sinjorino, metu la

kudradon flanken por kelka tempo kaj ni trinku iom da vino. Tiu ĉi sinjoro estas sufiĉe malavara por elspezi sian monon pro ni.' Se ŝi ne volos aliĝi al ni, tiam nia afero ree finiĝos. Sed, se ŝi diros: 'Ho, mi pensas, ke mi ne povos resti,' sed efektive ŝi faros nenian moviĝon por foriri, tiukaze ok dekonaj jam estos niaj.

待我买得东西提在桌子上，便说：‘娘子且收拾过生活去，且喝一杯儿酒，难得这官人坏钱。’他不肯和你同桌吃，去了，此事便休了；若是只口里说要去，却不动身，此事又好了，这光便有八分了。

“Se ŝi trinkos sian vinon en kontenteco kaj komencos konversacii kun vi, mi tiam diros: ‘Restas nesufiĉa vino,’ kaj vi petos min aĉeti iom pli kaj ankaŭ iajn fruktojn, kaj donos al mi arĝenton tiucele. Tiam mi fermos la pordon post mi, enfermante vin ambaŭ, vin kaj ŝin, en la ĉambro. Se ŝi tiam honte sinĝeniĝos kaj forkuros hejmen, mi povos fari nenion por savi nian aferon el perejo. Sed se ŝi lasos al mi fermi la pordon kaj ne koleriĝos, tiukaze ni preskaŭ proksimiĝos al nia celo.

待他吃得酒浓时，正说得入港，我便推道没了酒，再交你买，你便拿银子，又央我买酒去并果子来配酒。我把门拽上，关你两个在屋里。他若焦躁跑了归去时，此事便休了；他若由我拽上门，不焦躁时，这光便有九分，只欠一分了。

“La lasta stadio estos la kriza. Vi, mia kara granda sinjoro, restos en la ĉambro kun la virino kaj parolos dolĉe kaj intime al ŝi, sed vi neniel devos esti tro kruda en via kondutado kontraŭ ŝi. Se vi maldece tuŝos ŝin por amindumo kaj per tio fuŝos la tutan aferon, tio ne estos mia respondeco. Sed vi povos intence balai per via maniko paron da manĝbastonetoj sur la plankon kaj, profitante la okazon levi ilin, milde ekinĉi ŝin sur ŝia piedeto. Se tio kolerigos ŝin, mi povos tuj enveni kaj fari pacigon inter vi, sed tiukaze ĉiuj niaj ŝancoj estos perditaj, kaj ni neniel povos returni la senesperan situacion. Se ŝi diros nenion, tiam nia operacio plene sukcesos, kaj niaj dek dekonaj estos komplete gajnitaj. Se mi kondukos vin al plena venko, per kio do vi tiam min dankos?”

只是这一分倒难。大官人你在房里，便着几句甜话儿说入去，却不可燥暴，便去动手动脚打搅了事，那时我不管你。你先把袖子向桌子上拂落一双箸下去，只推拾箸，将手去他脚上捏一捏。他若闹将起来，我自来搭救。此事便休了，再也难成。若是他不做声时，此事十分光了。这十分光做完备，你怎的谢我？”

Aŭskultinte ĉion ĉi tion, Ximen Qing ekkriis kun ĝojego:

西门庆听了大喜道：

“Kvankam tiu ĉi plano ne venas el la Nubtuŝanta Pavilono, tamen ĝi, mia kara duonpanjo, estas perfekte bonega!”

“虽然上不得凌烟阁，干娘你这条计，端的绝品好妙计！”

“Sed ne forgesu tiujn dek taelojn da arĝento promesitajn!” rimarkigis la maljunulino.

王婆道：却不要忘了许我那十两银子。”

“Kompreneble ne,” diris Ximen Qing. “*Se mi ricevos nur peceton da oranĝoselo, mi neniam forgesos la lagon Dongting, kiu ĝin produktas.* Sed, mia kara duonpanjo, kiam do vi metos tiun ĉi planon en efektivigon?”

西门庆道：“便得一片橘皮吃，切莫忘了洞庭湖。这条计，干娘几时可行？”

“Revenu ĉi-vespere,” diris la maljunulino, “kaj vi havos respondon. Nun mi devos, profitante de tio, ke ŝia edzo ankoraŭ ne revenis, iri al ŝi por prunti ŝian kalendaron kaj ludi mian rolon. Vi do sendos per iu la silkaĵojn kiel eble plej baldaŭ. Perdu nenian tempon.”

王婆道：“只今晚来有回报。我如今趁武大未归，过去问他借历日，细细说与他。你快使人送将绸绢绵子来，休要迟了。”

“Tio estas mia propra afero,” diris Ximen Qing. “Mi aranĝos ĉion tuj kaj tute. Vi povos kalkuli je mi absolute!”

西门庆道：“干娘，这是我的事，如何敢失信。”

Li do iris al la strato kaj aĉetis tri rulojn da silkaĵoj kaj dek taelojn da pura silkovato, kaj diris al sia servoknabo Dai'an, ke li involvu ilin en feltan sakon kaj portu ilin al la maljunulino. Ŝi akceptis ilin kun granda kontenteco kaj forsendis la knabon.

于是作别了王婆，离了茶肆，就去街上买了绸绢三匹并十两清水好绵。家里叫了玳安儿用毡包包了，一直送入王婆家来。王婆欢喜收下，打发小厮回去。

Vere:

La nuboj kaj pluvo super la monto Wu⁶, sed kiam?

Nur ne lasu vane konstruiĝi la altanon la reĝo Xiang.

正是：

巫山云雨几时就，莫负襄王筑楚台。

Kiam la maljunulino ricevis la silkaĵojn, ŝi malfermis sian postpordon kaj pasis en la domon de Wu Da. Ora Lotuso kondukis ŝin en la supran ĉambron, kaj ili sidiĝis.

当下王婆收了绸绢绵子，开了后门，走过武大家来。那妇人接着，走去楼上坐的。王婆道：

“Kial vi lastatempe ne iris en mian modestan tetrinkejon por preni teon?” demandis la maljunulino.

“娘子怎的这两日不过贫家吃茶？”

“Mi ne sentis min sufiĉe bone en ĉi tiuj lastaj tagoj,” respondis Ora Lotuso, “kaj mi ne havis la emon moviĝi.”

那妇人道：“便是我这几日身子不快，懒走动的。”

“Ĉu vi havas kalendaron hejme?” diris la maljunulino. “Mi volus iom konsulti ĝin. Mi deziras trovi favoran tagon por fari vestojn.”

王婆道：“娘子家里有历日，借与老身看一看，要个裁衣的日子。”

“Kiajn vestojn do, duonpanjo?”

妇人道：“干娘裁甚衣服？”

“Mi, en mia nuna aĝo, ĉiam suferas malsaneton tian aŭ alian,” diris la maljunulino. “Mi timas, ke en iu el la proksimaj tagoj *mi trovos la montojn tro altaj kaj la akvojn tro malaltaj*⁷. Kaj mia filo eĉ ne estas hejme por min prizorgi.”

王婆道：“便是因老身十病九痛，怕一时有些山高水低，我儿子又不在家。”

“Kie do li estas? De tiel longe mi havis neniun okazon lin vidi,” diris Ora Lotuso.

妇人道：“大哥怎的一向不见？”

“Li sekvis iun komerciston en iu alia provinco kaj donis al mi neniun novaĵon pri si. Mi estas maltrankvila pri li en ĉiu tago.”

王婆道：“那厮跟了个客人在外边，不见个音信回来，老身日逐耽心不下。”

“Kian aĝon li havas?”

妇人道：“大哥今年多少年纪？”

“Li havas dek sep jarojn.”

王婆道：“那厮十七岁了。”

“Kial vi ne trovis al li edzinon? Tiukaze vi povus havi iun por vin helpi.”

妇人道：“怎的不与他寻个亲事，与干娘也替得手？”

“Prave vi parolas,” diris la maljunulino. “Mi ja havas neniun por min anstataŭi dum mi devas

min okupi pri ĉio interne kaj ekstere. Mi pensas, ke mi devos pli aŭ malpli malfrue trovi por li iun knabinon. Kiam li revenos hejmen, mi vere devos fari ĉi-celan aranĝon. En ĉi tiuj tagoj mi havas malfacilan spiradon tage kaj nokte, kaj mi ofte tusadas, ĝis mia korpo sin skuegas tiel forte, kvazaŭ ĝi estus disŝiriĝonta. Tiam mi neniel povis endormiĝi, kaj pensis, ke jam estas la tempo prepari por mi la mortovestojn. Feliĉe, estas iu sinjoro, kiu ofte venas al mia tetrinkejo por tetrinkado. Kiam iu ajn estas malsana en lia domo, li sendas tiun al mi por kuraco per akupunkturo kaj moksterapio; mi ankaŭ helpas al li aĉeti servistinojn kaj fari svaton. Li trovas min fidinda, kaj mi neglektas neniujn aferojn, gravajn kaj malgravajn, konfidentajn de li al mi. Li donacis al mi kompletan da materialoj por la mortovestoj. Mi havis tiujn ĉi materialojn hejme jam pli ol unu jaron sen trovi la tempon por fari la vestojn. Sed en tiu ĉi jaro mi sentas min ne sufiĉe bone, kaj ĉar ni havas en ĝi supermonaton⁸, kaj nun mi estas ne multeokupita, mi finfine decidis profiti ĉi tiujn du liberajn tagojn por dungi tajloron. Bedaŭrinde, ĉiuj tajloroj diras, ke ili estas tro okupitaj por veni kaj fari miajn vestojn. Ho, mi neniel povas diri al vi, kiel ĉagrenita mi estas pro tio ĉi!”

王婆道：“因是这等说，家中没人。待老身东楞西补的来，早晚要替他寻下个儿。等那厮来，却再理会。见如今老身白日黑夜只发喘咳嗽，身子打碎般，睡不倒的，只害疼，一时先要预备下送终衣服。难得一个财主官人，常在贫家吃茶，但凡他宅里看病，买使女，说亲，见老身这般本分，大小事儿无不管顾老身。又布施了老身一套送终衣料，绸绢表里俱全，又有若干好绵，放在家里一年有余，不能够做得。今年觉得好生不济，不想又撞着闰月，趁着两日倒闲，要做又被那裁缝勒掯，只推生活忙，不肯来做。老身说不得这苦也！”

Finaŭskultinte tiun ĉi longan rakonton, Ora Lotuso ekridetis kaj diris:

那妇人听了笑道:

“Mi ne scias, ĉu mi povus bone fari la vestojn laŭ via plaĉo, sed, se al vi plaĉus, mi volus vin helpi; hazarde mi nun havas nenion apartan por fari. Kion do vi pensas pri tio, duonpanjo?”

“只怕奴家做得不中意。若是不嫌时，奴这几日倒闲，出手与干娘做如何？”

Aŭdinte tiujn ĉi vortojn, la maljunulino ekĝojis kaj diris kun larĝa rideto:

那婆子听了，堆下笑来说道:

“Kun viaj noblaj manoj por fari al mi la vestojn, eĉ se mi mortos, mia kaduka korpo plezuriĝos. Mi ĉiam aŭdis, kiel lertajn fingrojn vi havas por la kudrado, sed mi neniam kuraĝis veni vin ĝeni.”

“若得娘子贵手做时，老身便死也得好处去。久闻娘子好针指，只是不敢来相央。”

“Tio estas nenio, duonpanjo,” diris Ora Lotuso. “Malgraŭ ĉio, mi nun jam promesis, kaj mi devos fari ilin por vi. Jen la kalendaro, kaj portu ĝin al iu por trovi favoran tagon, por ke mi povu komenci la laboron.”

那妇人道：“这个何妨！既是许了干娘，务要与干娘做了，将历日去交人拣了黄道好日，奴便动手。”

“Ĉu vi pensas, ke mi ne scias, ke vi povas legi ĉiujn ideografiaĵojn en la libroj de poemoj kaj kantoj? Kial do mi devos porti la kalendaron al iu alia?”

王婆道：“娘子休推老身不知，你诗词百家曲儿内字样，你不知识了多少，如何交人看历日？”

“Mi tamen timas, ke mi ricevis ne sufiĉan klerigon,” diris Ora Lotuso, kun rideto.

妇人微笑道：“奴家自幼失学。”

“Ho, dankon, dankon,” kriis la maljunulino, transdonante la kalendaron al la virino.

婆子道：“好说，好说。”便取历日递与妇人。

Ora Lotuso ekzamenis ĝin, kaj poste ŝi diris:

妇人接在手内，看了一回，道：

“Morgaŭ ne estas tago favora, nek postmorgaŭ. Ni devos atendi ĝis la tria tago post hodiaŭ.”

“明日是破日，后日也不好，直到外后日方是裁衣日期。”

La maljunulino prenis la kalendaron kaj rependigis ĝin sur la muro.

王婆一把手取过历头来挂在墙上，便道：

“Se vi estas preta min helpi, vi mem estas mia favora stelo, sekve ne estas necese elekti tagon favoran. Ankaŭ aliaj konsultis la kalendaron kaj diris al mi, ke morgaŭ ne estas tago bona por la celo, sed tio min ne ĝenas: mi vidas nenian kialon doni atenton al la tabuo kontraŭ vestofarado en nefavoraj tagoj.”

“若得娘子肯与老身做时，就是一点福星。何用选日！老身也曾央人看来，说明日是个破日，老身只道裁衣日不用破日，我不忌他。”

“Nu, bone,” diris Ora Lotuso, “povas esti, ke tago malfavora por aliaj celoj plejofte taŭgas por la faro de mortovestoj.”

那妇人道：“归寿衣服，正用破日便好。”

“Se vi donas nenian atenton al tio, pardonu do mian aŭdacon vin inviti, kaj morgaŭ venu al mia modesta domo.”

王婆道：“既是娘子肯作成，老身胆大，只是明日起动娘子，到寒家则个。”

“Kial ne alporti la materialojn ĉi tien?” demandis Ora Lotuso.

妇人道：“何不将过来做？”

“Ĉar mi volus rigardi persone la manieron de via laboro, kaj, tiukaze mi timas, ke mi lasos mian domon sen gardanto.”

王婆道：“便是老身也要看娘子做生活，又怕门首没人。”

“Nu, bone,” promesis Ora Lotuso, “mi do iros al via domo post matenmanĝo.”

妇人道：“既是这等说，奴明日饭后过来。”

“Mil dankojn! Mil dankojn!” kriis la maljunulino.

Ŝi iris malsupren kaj revenis hejmen. Tiuvespere ŝi diris al Ximen Qing la rezulton de siaj penoj, kaj petis lin veni du tagojn poste.

那婆子千恩万谢下楼去了，当晚回覆了西门庆话，约定后日准来。

En la sekva mateno la maljunulino balais la plankon, preparis kudrilojn kaj fadenojn, faris teon, kaj atendis Oran Lotuson.

当夜无话。次日清晨，王婆收拾房内干净，预备下针线，安排了茶水，在家等候。

Preninte matenmanĝon, Wu Da eliris kun siaj korboj da kukoj. Lia edzino pendigis la rulkurtenon kaj ordonis al Jasmeno gardi la domon. Poste ŝi iris per la postpordo al la domo de la maljunulino Wang. Ravita, la maljunulino kondukis ŝin en sian ĉambron kaj petis ŝin sidiĝi. Poste ŝi faris tason da forta teo, kun juglandoj kaj pinograjnoj, kaj donis ĝin al Ora Lotuso. Viŝpuriginte la tablon, ŝi elportis la tri rulojn da silko. Ora Lotuso prenis la mezurojn, lerte tranĉis la teksaĵon, kaj komencis la kudradon. La maljunulino rigardis ŝin kaj senĉese superŝutis ŝin per komplimentoj.

且说武大吃了早饭，挑着担儿自出去了。那妇人把帘儿挂了，吩咐迎儿看家，从后门走过王婆家来。那婆子欢喜无限，接入房里坐下，便浓浓点一盏胡桃松子泡茶与妇人吃了。抹得桌子干净，便取出那绸绢三匹来。妇人量了长短，裁得完备，缝将起来。婆子看了，口里不住喝采道：

“Kia mirinda lerteco! Mi jam vivis pli ol sesdek jarojn sur ĉi tiu tero, sed neniam vidis tiel rapidan kudrilon kaj tiel facilmovajn fingrojn!”

“好手段，老身也活了六七十岁，眼里真个不曾见这般好针指！”那妇人缝到日中，王婆安排些酒食请他，又下了一箸面与那妇人吃。

Ora Lotuso kudris ĝis la tagmezo. La maljunulino preparis tagmanĝon kaj petis ŝin preni ĝin. Poste ŝi daŭrigis la kudradon, ĝis fariĝis preskaŭ malhele, kaj tiam ŝi ordigis kaj pakis la silkon kaj iris al sia hejmo.

再缝一歇，将次晚来，便收拾了生活，自归家去。

Ĝuste kiam ŝi malpendigis la rulkurtenon, Wu Da revenis kun siaj korboj. Vidante, ke la vizaĝo de lia edzino estas iom ruĝa, li demandis, kie ŝi estis.

恰好武大挑担儿进门，妇人拽门下了帘子。武大入屋里，看见老婆面色微红，问道：“你那里来？”

“Mi estis kun nia najbarino, duonpanjo Wang,” diris Ora Lotuso. “Ŝi petis min fari por ŝi mortovestojn, kaj ĉe la tagmanĝo ŝi preparis iom da vino kaj kukoj kaj insistis, ke mi ilin prenui.”

夫人应道：“便是间壁干娘央我做送终衣服，日中安排些酒食点心请我吃。”

“Vi ne devus ilin akcepti,” diris Wu Da. “Ankaŭ ni povos iam peti helpon de ŝi. Ŝi petis vin fari ĉi tiujn vestojn, tio estas natura, sed vi devus reveni kaj preni manĝon hejme sen ŝin ĝeni. Se morgaŭ vi iros al ŝi, kunprenu iom da mono kaj aĉetu iom da nutraĵo kaj vino viaŭce. La proverbo diras: *najbaroj estas pli karaj, ol malproksimaj parencoj*. Ne decas, ke ni difektu la amikecon inter ni. Se ŝi ne permesos al vi reciproki ŝian gastamon, vi portos la laboron ĉi tien kaj finfaros ĝin en nia hejmo.”

武大道：“你也不要吃他的才是，我们也有央及他处。他便央你做得衣裳，你便自归来吃些点心，不值得甚么，便搅挠他。你明日再去做时，带些钱在身边，也买些酒食与他回礼。常言道：远亲不如近邻，休要失了人情。他若不肯交你还礼时，你便拿了生活来家，做还与他便了。”

Vere:

Profunda tromplogo de la maljunulino

Estis nekonata al la malsaĝa krudulo.

Li reciprokis la malican ruzon per vino

Kaj eĉ proponis sian edzinon al alia viro.

正是：

阿母牢笼设计深，大郎愚卤不知音。

带钱买酒酬奸诈，却把婆娘自送人。

Aŭskultinte la parolon de Wu Da, Ora Lotuso diris nenion.

夫人听了武大言语，当晚无话。

En la sekva tago, post matenmanĝo, Wu Da prenis siajn korbojn kaj eliris. La maljunulino Wang ree venis inviti Oran Lotuson al sia domo, kaj baldaŭ ili elportis la vestojn kaj rekomencis la laboron. La maljunulino faris teon por Ora Lotuso, sed ĉe la tagmezo Ora Lotuso elprenis el sia maniko tricent kuprerojn kaj donis ilin al la maljunulino.

次日饭后，武大挑担儿出去了，王婆便趲过来相请。妇人去到他家屋里，取出生活来，一面缝来。王婆忙点茶来与他吃了茶。看看缝到日中，那妇人向袖中取出三百文钱来，向王婆说道：

“Duonpanjo,” diris la virino, “estas mia vico aĉeti vazon da vino.”

“干娘，奴和你买盏酒吃。”

“Aĵal!” ekkriis la maljunulino. “Pri kio do vi pensas? Ĉu en la mondo povus esti tia afero: estas mi, kiu petis vin veni kaj fari tiujn ĉi vestojn, kaj mi tamen lasas al vi elspezi vian monon por

vino? Ho, ĉu la vino kaj nutraĵo, kiujn mi proponis, povus vin veneni?”

王婆道：“啊呀，那里有这个道理。老身央及娘子在这里做生活，如何交娘子倒出钱，婆子的酒食，不到吃伤了哩！”

“Vi devas riproĉi mian stultan edzon,” diris Ora Lotuso. “Estas li, kiu diris, ke se vi estus tro afabla por preni miajn monerojn, mi devus porti la laboron en mian hejmon kaj redoni ĝin al vi tiam, kiam ĝi estos elfarita.”

那妇人道：“却是拙夫吩咐奴来，若是干娘见外时，只是将了家去，做还干娘便了。”

“Se via edzo tiel pensas pri tio,” diris la maljunulino, “mi supozas, ke mi devas ĝin preni.”

那婆子听了道：“大郎直恁地晓事！既然娘子这般说时，老身且收下。”

Ŝi tre timis, ke la afero povos aborti. Ŝi do aldonis kelkajn kuprerojn el sia poŝo por aĉeti pli bonajn nutraĵojn kaj vinon. Poste ŝi invitis la virinon al la regalo.

这婆子生怕打搅了事，自又添钱去买好酒好食来，殷勤相待。

Ŝajnas, karaj legantoj, ke en tiu ĉi mondo preskaŭ ĉiuj virinoj, kiel ajn inteligentaj ili estas, ne povas ne devojiĝi nur pro ies bagatela ago de afableco. Naŭ el dek virinoj ne povas tion eviti.

看官听说：但凡世上妇人，由你十分精细，被小意儿纵十个九个着了道儿。

La maljunulino preparis iajn frandaĵojn kaj ĝuis ilin kun Ora Lotuso. Poste tiu ree daŭrigis la kudradon kaj, kiam la vespero komencis fali, la maljunulino dankis ŝin tre elkore, kaj tiu ree venis hejmen.

这婆子安排了酒食点心，和那妇人吃了。再缝了一歇，看看晚来，千恩万谢归去了。

Ni nin ne embarasu per tiom da detaloj! En la tria tago, post la matenmanĝo, la maljunulino atendis, ĝis Wu Da jam eliris, kaj iris al la postpordo kaj laŭte kriis:

话休絮烦。第三日早饭后，王婆只张武大出去了，便走过后门首叫道：

“Sinjorino, mi permesis al mi...”

“娘子，老身大胆。”

“Momenton, mi tuj venos.”

那妇人从楼上应道：“奴却待来也。”

Baldaŭ ŝi ree aperis en la ĉambro de la maljunulino kaj, sidiĝinte, rekomencis labori super la vestoj. La maljunulino faris teon kiel kutime. Ĉirkaŭ la tagmezo Ximen Qing alvenis.

两个厮见了，来到王婆房里坐下，取过生活来缝。那婆子点茶来吃，自不必说。妇人看看缝到晌午前后。

Li jam senpacience atendis ĝis tiu ĉi tago, kaj hodiaŭ li sin vestis tre elegante, metis tri aŭ kvar taelojn da arĝento en sian manikon, kaj ĝojmiene eliris sur Ametistan Straton, kun orita ventumilo en la mano. Kiam li venis al la domo de la maljunulino, li ektusis kaj poste vokis:

却说西门庆巴不到此日，打选衣帽齐齐整整，身边带着三五两银子，手里拿着洒金川扇儿，摇摇摆摆迳往紫石街来。到王婆门首，便咳嗽道：

“Duonpanjo, kiel vi fartas? Jam plurajn tagojn mi vin ne vidis.”

“王干娘，连日如何不见？”

“Kiu tie vokas min?” kriis la maljunulino.

那婆子瞧科，便应道：“兀的谁叫老娘？”

“Estas mi!” diris Ximen Qing.

西门庆道：“是我。”

La maljunulino rapide malfermis la pordegon kaj, ĉe la vido de li, ŝi ekkriis kun rideto:

那婆子赶出来看了，笑道：

“Mi min demandis, kiu povas esti, kaj jen vi estas! Vi venas ĝustatempe. Envenu kaj vidu

kion mi devas montri al vi.”

“我只道是谁，原来是大官人！你来得正好，且请入屋里去看一看。”

Ŝi ektiris lin je la maniko kaj kondukis lin en la ĉambron.

把西门庆袖子只一拖，拖进房里来，对那妇人道：

“Jen estas la ĝusta sinjoro, kiu donacis al mi la silkon,” ŝi diris al Ora Lotuso.

“这个便是与老身衣料施主官人。”

Ximen Qing observis la junan virinon per siaj larĝe malfermitaj okuloj. La masoj de ŝiaj densaj haroj, kiuj estis volvitaj en tuberan formon, estis kiel etaĝigitaj nuboj de la plej malhela nuanco. Ŝiaj rozaj vangoj havis la plenan freŝecon de printempo. Ŝi portis tolan supran veston, rozkoloran jupon, kaj bluan veŝton. Kiam Ximen Qing envenis, ŝi sin okupis pri kudrado. Vidante, ke Ximen Qing alproksimiĝas, ŝi malleviis la kapon. Li rapidis antaŭ ŝin kaj sin klinante faris saluton al ŝi. Ŝi tuj leviĝis kaj faris al li profundan riverencon.

西门庆睁眼看着那妇人：云鬟叠翠，粉面生春，上穿白布衫儿，桃红裙子，蓝比甲，正在房里做衣服。见西门庆过来，便把头低了。这西门庆连忙向前屈身唱喏。那妇人随即放下生活，还了万福。

“Mi ŝuldas al tiu sinjoro grandegan dankon,” diris la maljunulino. “Estas li, kiu donacis al mi tiun ĉi materialon. Mi havis ĝin en la domo dum pli ol unu jaro, sen povi trovi iun por fari el ĝi la vestojn.”

Poste ŝi aldonis:

“Mi ŝuldas multegon ankaŭ al tiu ĉi sinjorino por ŝia helpo fari la vestojn por mi. Ŝia kudrado estas perfekte bona. La kudreroj estas tiel densaj kaj solidaj, kvazaŭ teksitaj sur la teksilo. Tiaj delikataj kudraĵoj ja estas malofte vidataj en la nunaj tagoj! Alproksimiĝu kaj rigardu ilin, granda sinjoro.”

王婆便道：“难得官人与老身段匹绸绢，放在家一年有余，不曾得做，亏杀邻家这位娘子出手与老身做成全了。真个是布机也似好针线，缝的又好又密，真个难得！大官人，你过来且看一看。”

Ximen Qing prenis la vestojn kaj ekzamenis ilin.

“Ververe,” li ekkriis, plena de admiro, “la sinjorino kudras tiel perfekte bone, ke nur anĝelo povus rivali kun ŝi.”

西门庆拿起衣服来看了，一面喝采，口里道：“这位娘子，传得这等好针指，神仙一般的手段！”

Ora Lotuso hontmiene rigardis la plankon, sed ŝi nur ridetis.

“Ne mokridu min, sinjoro,” ŝi diris.

那妇人低头笑道：“官人休笑话。”

“Duonpanjo,” diris Ximen Qing, “ĉu mi povus permesi al mi demandi, kiu estas tiu ĉi sinjorino?”

西门庆故问王婆道：“干娘，不敢动问，这位娘子是谁家宅上的娘子？”

“Divenu,” diris la maljunulino.

王婆道：“你猜。”

“Kiel mi povus ĝuste diveni?”

西门庆道：“小人如何猜得着。”

La maljunulino eksplodis per rido kaj diris:

王婆哈哈笑道：

“Sidiĝu do, kaj mi diros al vi.”

“大官人你请坐，我对你说了罢。”

Ximen Qing sidiĝis kontraŭ la virino, kaj la maljunulino diris:

“Ĉu vi ankoraŭ memoras la tagon, en kiu vi preterpasis sub la rulkurteno de ies domo kaj ricevis stangofrapon sur la kapo?”

那西门庆与妇人对面坐下。那婆子道：“好交大官人得知罢，你那日屋檐下走，打得正好。”

“Jes, mi memoras,” diris Ximen Qing. “Tiutage ĉe la pordego de iu virino mi neatendite ricevis stangofrapon, sed mi ankoraŭ ne scias, de kiu hejmo ŝi estas.”

西门庆道：“就是那日在门首叉竿打了我的？倒不知是谁家宅上娘子？”

Ora Lotuso, kiu mallevis la kapon pli malsupren, diris kun rideto:

妇人分外把头低了一低，笑道：

“Mi hontas, ke tiutage mi senatente frapis vin. Ne koleru kontraŭ mi, sinjoro.”

“那日奴误冲撞，官人休怪！”

“Ho, sinjorino, kiel mi povus havi la aŭdacon...” diris Ximen Qing kun hasto.

西门庆连忙应道：“小人不敢。”

“Tiu ĉi sinjorino estas la edzino de mia najbaro, Wu Da,” diris la maljunulino.

王婆道：“就是这位，却是间壁武大娘子。”

“Ĉu estas tiel?” diris Ximen Qing. “Pardonu min pro mia tiutaga neĝentileco.”

西门庆道：“原来如此，小人失瞻了。”

La maljunulino turnis sin al Ora Lotuso kaj demandis:

“Sinjorino, ĉu vi konas tiun ĉi sinjoron?”

王婆因望妇人说道：“娘子你认得这位官人么？”

“Ne,” respondis la virino.

妇人道：“不识得。”

“Li estas unu el la plej riĉaj sinjoroj en nia subprefektujo kaj tre bona amiko de la subprefekto. Li estas la granda sinjoro Ximen Qing. Li posedas milojn kaj milojn da ŝnure-ligitaj mil moneroj kaj tenas grandan vendejon de krudaj medikamentoj proksime de la urbodomo. La mono en lia domo amasiĝas tiel alte, ke ĝi tuŝas eĉ la Grandan Ĉerpilon⁹ kaj eĉ lia ŝime difektita greno estas sufiĉa por plenigi multajn grenejojn. Ĉio, kio estas flava en lia domo, estas oro, kaj ĉio, kio estas blanka, estas arĝento; ĉiuj etaj rondaĵoj tie estas perloj, kaj ĉiuj brilaĵoj estas gemoj. Li havas sennombrajn rinocerajn kornojn kaj elefantajn dentegojn. Estas mi, kiu svatis al li la filinon de la bataliona komandanto Wu, vere tre inteligentan virinon, kaj ŝi fariĝis lia ĉefa edzino.”

婆子道：“这位官人，便是本县里一个财主，知县相公也和他来往，叫做西门大官人。家有万万贯钱财，在县门前开生药铺。家中钱过北斗，米烂成仓，黄的是金，白的是银，圆的是珠，放光的是宝，也有犀牛头上角，大象口中牙。他家大娘子，也是我说的媒，是吴千户家小姐，生得百伶百俐。”

Poste ŝi turnis sin al Ximen:

“Granda sinjoro, kial vi ne venis trinki teon en mia modesta tetrinkejo lastatempe?”

因问：“大官人，怎的不过贫家吃茶？”

“Mi estis tre multeokupita pri la fianĉinigo de mia filino en la lastaj tagoj,” diris Ximen Qing. “Jen kial mi havis nenian liberan tempon.”

西门庆道：“便是家中连日小女有人家定了，不得闲来。”

“Ĉu? Al kiu do estis fianĉinigita via filino?” demandis la maljunulino, “kaj kial vi ne invitis min al la servo de la svato?”

婆子道：“大姐有谁家定了？怎的不请老身去说媒？”

“Ŝi fianĉiniĝis al Chen Jingji, la filo de tiu Chen, kiu estas parenco de la marŝalo Yang, la Komandanto de la Imperiestra Gvardio en la Orienta Ĉefurbo. La junulo estas dek-sep-jara kaj ankoraŭ estas ĉe sia studado en la Granda Lernejo. Mi devus inviti vin aranĝi tiun ĉi svaton, sed iu virino nomata Wen venis de la flanko de lia familio por peti gefianĉiĝ-paperojn, kaj Xue, la florumdistino, servis por ni. Ili aranĝis ĉion inter la du partioj. Sed, duonpanjo, se vi volonte venos, morgaŭ mi aranĝos tekunvenon, mi sendos inviti vin aliĝi al ĝi.”

西门庆道：“被东京八十万禁军杨提督亲家陈宅定了。他儿子陈敬济才十七岁，还上学堂。不是也请干娘说媒，他那边有了个文嫂儿来讨帖儿，俺这里又使常在家中走的卖翠花的薛嫂儿，同做保山，说此亲事。干娘若肯去，到明日下小茶，我使人来请你。”

“Mi ĵus nur ŝercis,” diris la maljunulino. “Ni, la svatistinoj en tiu ĉi urbo, ĉiuj estas kvazaŭ hundinoj. Kiam ili aranĝis la svaton, mi tiam ne metis miajn manojn sur ĝin, kaj nun, kiam la manĝo jam estas pretigita, ili certe ne volos, ke mi havu pecon da kuko kun ili. Prave diras la proverbo: *sammetianoj ne toleras unu la alian*. Ne, mi preferos nur atendi ĝis la plenumiĝo de la geedziĝo, kaj tiam, iun tagon, mi iros al vi portante kelkajn donacetojn kun la espero, ke mi povos preni iajn restaĵojn de la nupta festeno. Tio estos la plej bona afero, kiun mi povos fari. Kiel mi povus lasi min fariĝi la objekto de ilia kolerverŝo?”

婆子哈哈笑道：“老身哄大官人耍子。俺这媒人们都是狗娘养下来的，他们说亲时又没我，做成的熟饭儿怎肯搭上老身一分？常言道：当行压当行。到明日娶过了门时，老身胡乱三朝五日，拿上些人情去走走，讨得一张半张桌面，到是正经。怎的好和人斗气！”

La du personoj verve babiladis inter si kelkan tempon en tia maniero: la maljunulino senĉese superŝutis Ximen Qing per troigitaj laŭdoj, dum Ora Lotuso, kun la kapo klinita, daŭrigis sian kudradon.

两个一递一句说了一回。婆子只顾夸奖西门庆，口里假嘈，那妇人便低了头缝针线。

Jen poemo, kiu tion priskribas:

La virino estas de la naturo de akvo,

Preta trompi sian edzon post lia dorso.

Ora Lotuso amas Ximen en la koro,

Falante en sklavecon de la karna deziro.

水性从来是女流，背夫常与外人偷。

金莲心爱西门庆，淫荡春心不自由。

Ximen Qing de tempo al tempo ĵetis rigardon al ŝi, perceptante la pasion pli kaj pli kreskantan en ŝia interno. Tio supermezure ĝojigis lin, kaj li estis tiel avida, ke li forte dezirus tuj kaj tute posedi ŝin kaj pariĝi kun ŝi. La maljunulino faris du tasojn da teo. Ŝi donis unu al Ximen Qing kaj la alian al Ora Lotuso, dirante: “Sinjorino, ĉu vi volus preni tason da teo kun tiu ĉi granda sinjoro?”

西门庆见金莲有几分情意欢喜，恨不得就要成双。王婆便去点两盏茶来，递一盏西门庆，一盏与妇人，说道：“娘子相待官人吃些茶。”

La maljunulino ĵetis rigardon al Ximen Qing kaj milde ekpalpis sian vangon kiel signon, ke la kvin el iliaj dek dekonoj jam estis gajnitaj. Tio fariĝis ĝuste kiel diras la antikva proverbo:

Romantika amo perfektigas per teo,

Kaj vino estas la peranto de amo.

旋又看着西门庆，把手在脸上摸一摸，西门庆已知有五分光了。自古“风流茶说合，酒是色媒人”。

“Se vi, granda sinjoro, ne venus ĉi tien,” diris la maljunulino, “mi ne havus la kuraĝon iri al via domo kaj inviti vin. Nun la fortuno venigis vin ĉi tien, kaj la fortuno ankaŭ renkontigis vin. Sed, kiel diras la proverbo: *unu gasto ne devus ĝeni du gastigantojn*. Vi jam donacis al mi monon, kaj tiu ĉi afabla sinjorino estas tiel bona, ke ŝi volonte laboras por mi, kaj mi ne scias, kiel mi povas esprimi mian dankemon al vi ambaŭ. Se la sorto ne estus tiel favora, mi neniel povus vidi vin du esti kune ĉi tie. Sekve mi proponas, granda sinjoro, ke vi, anstataŭ mi, estu gastiganto, kaj donu al mi kelkan arĝenton por aĉeti iom da vino por regali la sinjorinon.”

王婆便道：“大官人不来，老身也不敢去宅上相请。一者缘法撞遇，二者来得正好。常言道：一客不烦二主。大官人便是出钱的，这位娘子便是出力的，亏杀你这两位施主。不是老身路歧相烦，难得这位娘子在这里，官人好与老身做个主人，拿出些银子买些酒食来，与娘子浇浇手，如何？”

“Mi ne scias, ĉu mi havas monon kun mi,” diris Ximen Qing, palpante en sia maniko.

西门庆道：“小人也见不到这里，有银子在此。”

Li elprenis taelon da arĝento, donis ĝin al la maljunulino, kaj petis, ke ŝi aĉetu ion per ĝi.

便向茄袋里取出来，约有一两一块，递与王婆，交备办酒食。

“Bonvolu fari nenion pro mi, sinjoro,” diris Ora Lotuso, sed ŝi montris nenian inklinon moviĝi.

那妇人便道“不消生受。”口里说着恰不动身。

La maljunulino prenis la arĝenton kaj, kiam ŝi sin preparis por eliro, diris:

王婆接了银子，临出门便道：

“Ĉu mi povus peti vin, sinjorino, teni kompanion kun la sinjoro dum momento? Baldaŭ mi revenos.”

“有劳娘子相陪大官人坐一坐，我去就来。”

“Ne faru al vi la klopodon, duonpanjo,” diris Ora Lotuso, sed ŝi ankoraŭ restis senmove sur sia sidloko.

那妇人道：“干娘免了罢。”却亦不动身。

La maljunulino eliris, lasante Ximen Qing kaj Oran Lotuson kune solaj en la ĉambro.

王婆便出门去了，丢下西门庆和那妇人在屋里。

Ximen Qing manĝegis tiun virinon per la rigardo. Ŝi de tempo al tempo ĵetis ŝtelan rigardon al li, poste ree mallevis la kapon kaj daŭrigis sian kudradon. Baldaŭ la maljunulino revenis kun kuirita anseraĵo, rostita anasaĵo, viandoj kaj fiŝoj, kaj tre bongustaj fruktoj. Ŝi metis ilin sur telerojn kaj surtabligis ilin ĉiujn. Poste ŝi diris al Ora Lotuso:

这西门庆一双眼不转睛，只看着那妇人。那婆娘也把眼来偷睃西门庆，又低着头做生活。不多时，王婆买了见成肥鹅烧鸭、熟肉鲜鲊、细巧果子，归来尽把盘碟盛了，摆在房里桌子上。看那妇人道：

“Flankenmetu vian laboron por kelka tempo, sinjorino, kaj prenu pokalon da vino!”

“娘子且收拾过生活，喝一杯儿酒。”

“Vi drinku mem kun lia sinjora moŝto,” diris la virino. “Ne decas, ke mi lasu al mi tian liberecon.”

那妇人道：“你自陪大官人吃，奴却不当。”

“Kiel vi povas diri tiajn vortojn?” ekkriis la maljunulino, “ĉio ĉi tio ja estis aranĝita speciale honore al vi.”

那婆子道：“正是专与娘子浇手，如何却说这话！”

Ŝi metis la telerojn antaŭ ilin kaj, kiam ili prenis ĉiu sian lokon, verŝis al ili la vinon. Ximen

Qing levis unu pokalon kaj diris:

一面将盘碟却摆在面前，三人坐下，把酒来斟。西门庆拿起酒盏来道：

“Duonpanjo, bonvolu peti la sinjorinon malplenigi kelkajn plenajn pokalojn!”

“干娘相待娘子满饮几杯。”

“Dankon, sinjoro,” diris Ora Lotuso, “sed mi ne kuraĝas trinki, ĉar mi ne povus rezisti al alkoholo.

妇人谢道：“奴家量浅，吃不得。”

“Mi scias perfekte bone, ke vi kapablas engluti eĉ la oceanon,” diris la maljunulino. “Ne rifuzu trinki senĝene unu pokalon aŭ du.”

王婆道：“老身得知娘子洪饮，且请开怀吃两盏儿。”

Ora Lotuso transprenis la pokalon kaj faris riverencon al la du. Ximen Qing prenis siajn manĝbastonetojn.

那妇人一面接酒在手，向二人各道了万福。西门庆拿起箸来说道：

“Duonpanjo,” li diris, “petu en mia nomo la sinjorinon sin mem servi laŭ sia plaĉo!”

“干娘替我劝娘子些菜儿。”

La maljunulino elektis pecojn da frandaĵoj kaj pasigis ilin al la virino. Post kiam la vino estis trifoje enverŝita, la maljunulino eliris por varmigi iom pli.

那婆子拣好的递将过来与妇人吃。一连斟了三巡酒，那婆子便去烫酒来。

“Sinjorino, ĉu mi povus aŭdace demandi pri via aĝo?” diris Ximen Qing.

西门庆道：“小人不敢动问，娘子青春多少？”

“Mi estas dudek-kvin-jara,” diris Ora Lotuso, kaj ree mallevis la kapon.

妇人低头应道：“二十五岁。”

“Vi estas, sinjorino, samaĝa kun mia humila edzino: ŝi naskiĝis la dek-kvinan de la oka monato en la jaro de drako.”

西门庆道：“娘子到与家下贱内同庚，也是庚辰属龙的。他是八月十五日子时。”

“*Vi komparas la ĉielon kun la tero!*” diris Ora Lotuso. “Via troa komplimento mortigas min de konfuzo!”

妇人又回应道：“将天比地，折杀奴家。”

“Tiu ĉi sinjorino,” diris la maljunulino, “estas tiel inteligenta kaj lerta! Krom sia bonega kudrado, ŝi scias eĉ klasikaĵojn de diversaj skoloj, por ne paroli pri ludado de diversaj ŝakludoj, karto ktp. Ŝi ankaŭ manskribas tre bone.”

王婆便插口道：“好个精细的娘子，百伶百俐，又不枉做得一手好针线。诸子百家，双陆象棋，折牌道字，皆通。一笔好写。”

“Ho, kie do oni povus trovi ŝian egalulinon?” komentis Ximen kun admiro.

西门庆道：“却是那里去讨。”

“Mi ne devus diri ion ajn impertinentan,” diris la maljunulino, “sed kvankam vi havas multajn sinjorinojn en via domo, tamen mi dubas, ĉu inter ili troviĝas iu ajn, kiu estus egala al tiu ĉi sinjorino.”

王婆道：“不是老身说是非，大官人宅上有许多，那里讨得一个似娘子的！”

“Jes, vi diras la veron,” diris Ximen Qing. “Tio estus longa historio por rakonti... La sorto min ne favoris, kaj mi trovis neniun virinon, kiu estus tiel bona...”

西门庆道：“便是这等，一言难尽。只是小人命薄，不曾招得一个好的在家里。”

“Via unua edzino estus sufiĉe bona,” diris la maljunulino.

王婆道：“大官人先头娘子须也好。”

“Ne parolu pri ŝi,” diris Ximen Qing. “Se ŝi ankoraŭ vivus en ĉi mondo, mia hejmo certe ne estus sen vera mastrino kaj ĉio en mia domo certe estus en perfekta ordo. Ĉe mi nun sin trovas tri, kvin, eĉ sep litkunulinoj, sed ili ĉiuj scias nur manĝi; neniu el ili volas sin okupi pri la mastrumado.”

西门庆道：“休说！我先妻若在时，却不恁的家无主，屋到竖。如今身边枉自有三五七口人吃饭，都不管事。”

“Kiom da jaroj jam pasis, sinjoro, de kiam via unua edzino mortis?” demandis la maljunulino. “Tion mi jam forgesis.”

婆子道：“连我也忘了，没有大娘子得几年了？”

“Mi malemas paroli pri tio,” diris Ximen Qing. “Mia unua edzino Chen devenis de familio tre malriĉa, sed ŝi estis virino tre lerta, kaj sufiĉe bone faris preskaŭ ĉion anstataŭ mi. Malfeliĉe ŝi jam mortis. Tio okazis antaŭ pli ol tri jaroj. Mi reedziĝis, sed mia nuna edzino estas malsanema, kaj la mastrumaj aferoj estas tro multaj por ŝi. Ĉiaj aferoj en mia domo iras en malordo. Jen kial mi devas pasigi tiom multe da tempo ekstere, for de la hejmo. Kiam mi estas en la hejmo, mi havas nur malbonan humoron.”

西门庆道：“说不得，小人先妻陈氏，虽是微末出身，却倒百伶百俐，是件都替的我。如今不幸他没了，已过三年来。今继娶这个贱累，又常有疾病，不管事，家里的勾当都七颠八倒。为何小人只是走了出来？在家里时，便要呕气。”

“Pardonu al mi mian malkaŝemon, granda sinjoro,” diris la maljunulino, “sed nek via mortinta edzino, nek via nuna, havas la kudrolertecon de tiu ĉi sinjorino, por ne paroli pri la ĉarmeco en la aspekto...”

婆子道：“大官人，休怪我直言，你先头娘子并如今娘子，也没这大娘子这手针线，这一表人物。”

“Ankaŭ miaj aliaj edzinoj,” diris Ximen Qing, “neniel povas esti komparataj kun ŝi.”

西门庆道：“便是房下们也没这大娘子一般儿风流。”

La maljunulino ekridis kaj diris:

“Sed vi ja tenas al vi amorantinon ekster via hejmo — tiun, kiu loĝas en la restadejo ĉe Orienta Strato. — Kial vi neniam invitis min al tetrinko tie?”

那婆子笑道：“官人，你养的外宅东街上住的，如何不请老身去吃茶？”

“Ĉu vi demandas pri la Printempa Nostalgio Zhang, la kantistino?” diris Ximen Qing. “Mi trovis ŝin kaprica, kaj jam rezignis ŝin.”

西门庆道：“便是唱慢曲儿的张惜春。我见他是路歧人，不喜欢。”

“Povas esti tiel,” daŭrigis la maljunulino, “sed kiel do pri Gracia Li, kiu antaŭe estis en la bordelo? Vi ja havas tre intimajn rilatojn kun ŝi dum longa tempo.”

婆子又道：“官人你和勾栏中李娇儿却长久。”

“Ho, mi jam antaŭ longe prenis ŝin en mian domon kaj, se ŝi pruviĝos sufiĉe kapabla prizorgi la mastrumajn aferojn, mi formale faros ŝin mia kromedzino.”

西门庆道：“这个人见今已娶在家里。若得他会当家时，自册正了他。”

“Kaj, koncerne la Duan Fraŭlinon Zhuo,” plu demandis la maljunulino, “vi certe estas en perfekta akordo kun ŝi.”

王婆道：“与卓二姐却相交得好？”

“Ne menciu ŝian nomon,” diris Ximen Qing. “Mi faris ŝin mia tria edzino, sed nelonge antaŭe ŝi falis en malsanon kaj mortis.”

西门庆道：“卓丢儿别要说起，我也娶在家做了第三房。近来得了个细疾，却又没了。”

“Ho ve! Kiel kompatinde!” ekkriis la maljunulino. “Supozu, ke mi trovos virinon tiel bonan, kiel tiu ĉi sinjorino, iun, kiu vere plaĉos al vi, kaj tiam mi venos al via domo por paroli pri la svato, ĉu vi pensos, ke tio kaŭzos al vi ĝenon?”

婆子道：“耶嚟，耶嚟！若有似大娘子这般中官人意的，来宅上说，不妨事么？”

“Miaj gepatroj ambaŭ jam mortis, kaj mi estas mia propra mastro. Kiu kuraĝus diri al mi iun ajn vorton kontraŭ mi?”

西门庆道：“我的爹娘俱已没了，我自主张，谁敢说个不字？”

“Mi do provos kun plezuro. Sed kie mi povos trovi sinjorinon tiel bonan, kiel tiu ĉi?”

王婆道：“我自说要，急切便那里有这般中官人意的！”

“Kial ne?” diris Ximen Qing. “Sed mi bedaŭras, ke la sorto regas miajn geedzajn aferojn tro rigore. Se ĝi estus iom pli indulgema, mi certe povus jam trovi tian virinon.”

西门庆道：“做甚么便没？只恨我夫妻缘分上薄，自不撞着哩。”

La du personoj daŭrigis viglan dialogon kelkan tempon. Sed subite la maljunulino Wang ekkriis:

“Ĝuste kiam ni estas en vintrinka gajeco, la vino elĉerpiĝis! Mi bedaŭras, ke mi devas ĝeni vin, sinjoro, per la demando: ĉu vi pensus, ke necesos al mi aĉeti ankoraŭ unu botelon da vino?”

西门庆和婆子一递一句说了一回。王婆道：“正好吃酒，却又没了。官人休怪老身差拨，买一瓶儿酒来吃如何？”

Ximen Qing metis sian manon en sian manikon. Restis ankoraŭ tri aŭ kvar taeloj da arĝento. Li donis ilin ĉiujn al la maljunulino, dirante:

西门庆便向茄袋内，还有三四两散银子，都与王婆，说道：

“Prenu tiujn ĉi kaj iru aĉeti plion. Ĉiufoje, kiam ni bezonos vinon, vi nur elprenu ĝin por nia konsumo. Se la arĝento estos tro multa, gardu ĝin ĉe vi, duonpanjo!”

“干娘，你拿了去，要吃时只顾取来，多的干娘便就收了。”

La maljunulino dankis lin kaj leviĝis. Ŝi ĵetis rigardon al Ora Lotuso, kiu, trinkinte tri pokalojn da vino, estis konsumata de la flama pasio de la “printempa” deziro. La vortoj, kiuj pasadis inter ili, estis kvazaŭ seka brulligno aldonita al la fajro, kiu ardis en ilia interno. La virino nur tenis sian kapon klinita, sen sin levi de la sidilo.

那婆子谢了起身。睨那粉头时，三钟酒下肚，哄动春心，又自两个言来语去，都有意了，只低了头不起身。

Vere:

La okuloj amindume parolas kaj parolas,

La amoraj flamoj brulas kaj brulas.

Sen aliaj lertecoj, la ŝmirita buŝo

De la maljunulino dolĉas kaj glatas.

正是：

眼意眉情卒未休，姻缘相凑遇风流。

王婆贪贿无他技，一味花言巧舌头。

Notoj:

1. Pan An: historia persono, alinome Pan Anren (247—300), fama kiel literatoro kaj belulo.
2. Deng Tong: historia persono (2-a jc. a. K). Li estis favorato de la imperiestro Wen de la dinastio Han, kiu donis al li la rajton fari kuprajn monerojn, sekve li fariĝis fame konata riĉegulo.

3. Kudrilo kaŝita en silka vato: kutima esprimo signifanta “kombinon de forto kun mildeco aŭ elasteco” aŭ “kruelan karakteron aŭ malican intencon malantaŭ milda aspekto aŭ kun pacienco”.

4. Testudo: tiu ĉi vorto povas esti uzata ĉe ĉinoj kiel slanga esprovo por penis.

5. Sun Wu: fama strategiisto en la periodo de Printempoj kaj Aŭtunoj (770—476 a.k.).

6. La nuboj kaj pluvo super la monto Wu: esprimo el la rimata prozaĵo *Gaotang* verkita de Song Yu: Song Yu diris al la reĝo Xiang de la regno Chu, ke la reĝo Huai de la regno Chu iam vizitis la altanon Gaotang kaj havis sonĝon, en kiu li renkontis la Diinon de la monto Wu kaj havis intimaĵojn kun ŝi. Poste ankaŭ la reĝo Xiang mem vizitis la altanon kaj havis la saman sonĝon. Sekve tiu ĉi esprimo estas uzata por aludi “sekskuniĝon” aŭ “geviran amoradon”.

7. Trovi la montojn tro altaj kaj la akvojn tro malaltaj: kutima esprimo aludanta ion malfeliĉan, precipe morton.

8. Supermonato: aldona monato enmetita en la ĉinan lunan kalendaron.

9. La Granda Ĉerpilo: la ĉina nomo de la Granda Ursino (*Ursa major*).

ALDONO

Nun la tuta traduko estas dum reviziado kaj rereviziado.

Jen la lasta ĉapitro (ankoraŭ ne reviziita)

ĈAPITRO 100

HAN AMO HAZARDE RENKONTIS HAN LA DUAN SUR LA VOJO

kaj

LA DJAN-MAJSTRO PUJING MISTERE MALAPERIGIS XIAOGE

第一百回 韩爱姐路遇二捣鬼 普静师幻度孝哥儿

*La pompeco de la malnovaj tagoj jam forpasis sen postsigno,
La arĝentaj ekranegoj kaj la ora domo estas nur en sonĝoj.
La subiranta suno brilas sur velkintaj fragmitoj ĉe ruinaj muroj,
Kaj sovaĝaj herboj en malvarma nebulo invadas la palacon.
En la tomba koridoro la fiŝforma lampo estas estingiĝanta,
Kaj en la ŝlosita ĉambro la tualet-spegulo estas polve kovrita.
Al kiu do mi parolu pri la senfinaj ŝanĝiĝoj de la homa mondo?
Al la kasajo kun manikoj da pura vento inter la flosantaj nuboj.*

诗曰：

旧日豪华事已空，银屏金屋梦魂中。
黄芦晚日空残垒，碧草寒烟锁故宫。
隧道鱼灯油欲尽，妆台鸾镜匣长封。
凭谁话尽兴亡事，一衲闲云两袖风。



Han Amo hazarde renkontis Han la Duan sur la vojo.



La djan-majstro Pujing mistere malaperigis Xiaoge.

Kiam Han Daoguo kaj Wang la Sesa revenis en la Vintrinkejon de Xie-familio sen sia filino, ili estis reduktitaj al la situacio, en kiu ili sidis senfare en domo, forkonsumante siajn vivrimedojn ĝis ilia elĉerpiĝo. Ili do sendis Chen la Trian inviti la komerciston He, por daŭrigi la iamajn rilatojn. Vidante, ke Liu la Dua jam estis mortigita, tiel ke la minaco al li ne plu ekzistas, la komercisto He revenis kaj faris vizitojn al Wang la Sesa kiel antaŭe.

Foje, dum sia konversacio kun Han Daoguo, li diris:

“Ĉar via filino, Han Amo, observas la funebron kaj gardas la vidvinecon en la domo de la komandanto kaj rifuzas reveni, mi proponas, ke post kiam mi forvandos miajn komercaĵojn kaj kolektos ĉion, kion oni ŝuldas al mi, vi du povos veni kun mi dum mia reveno al mia hejmo en Huzhou. Tio certe estos preferinda al la daŭrigo de tiu ĉi okupo via ĉi tie.”

“Se vi, sinjoro, degnos min helpi,” respondis Han Daoguo, “tio certe estos por ni bonega afero.”

En iu tago, post kiam la komercisto He forvendis ĉiujn siajn komercaĵojn kaj kolektis ĉion, kion oni ŝuldis al li, li dungis ŝipon, kaj sin direktis al Huzhou, kune kun Han Daoguo kaj Wang la Sesa.

话说韩道国与王六儿，归到谢家酒店内，无女儿，道不得个坐吃山崩，使陈三儿去，又把那何官人勾来续上。那何官人见地方中没了刘二，除了一害，依旧又来王六儿家行走，和韩道国商议：“你女儿爱姐，只是在府中守孝，不出来了，等我卖尽货物，讨了赎帐，你两口跟我往湖州家去罢，省得在此做这般道路。”韩道国说：“官人下顾，可知好哩。”一日卖尽了货物，讨上赎帐，雇了船，同王六儿跟往湖州去了，不题。

Ni revenigu nian rakonton al Han Amo. Post kiam ŝi enloĝiĝis en la rezidejo de Zhou Xiu, ŝi kaj Verda Ekrano ambaŭ gardis la vidvinecon pro Chen Jingji, alparolante unu la alian kiel fratojn, kaj vivis en akordo. Ili pasigis siajn tagojn, tenante kompanion kun Umeffloro. Tiutempe ŝia fileto Oro jam estis ses-jara, kaj Jado, la filino de Sun la Dua, havis la aĝon de dek jaroj, kaj la virinoj havis nenion alian por fari, ol prizorgi la infanojn.

Sed, post la morto de Chen Jingji, Zhou Xiu ree eliris por milita kampanjo, lasante Umeffloron resti en la hejmo. Ĉiutage ŝi ĝuis la manĝon de diversaj delikataĵoj kaj la portadon de vestoj el sateno kaj brokaĵo. Sur ŝia kapo:

Kio flavis, estis oro;

Kio blankis, estis arĝento;

Kio rondis, estis perloj;

Kio briletis, estis juveloj;

Kaj ŝi havis ĉion, kion ŝi deziris.

Por ŝi la sola bedaŭro estis, ke ŝi trovis la noktojn malfacile pasigataj, dum ŝi dormis sola sur sia kapkuseno kun la apenaŭ eltenebla brulo de sia lasciva deziro en la korpo. Ŝi rimarkis, ke Li An estas bravulo bonaspekta, kiu, post sia mortigo de Zhang Sheng, konsciencie daŭrigis la patroladon al la rezidejo tage kaj nokte.

却表爱姐在府中，与葛翠屏两个持贞守节，姊妹称呼，甚是合当。白日里与春梅做伴儿在一处。那时金哥儿大了，年方六岁。孙二娘所生玉姐年长十岁，相伴两个孩儿，便没甚事做。谁知自从陈敬济死后，守备又出征去了。这春梅每日珍馐百味，绫锦衣衫，头上黄的金，白的银，圆的珠，光照的无般不有。只是晚夕难禁独眠孤枕，欲火烧心。因见李安一条好汉，只因打杀张胜，巡风早晚十分小心。

Unu tagon, dum la vintro, li plenumis noktan deĵoron en la deĵorejo, li aŭdis, ke iu frapis sur

la posta pordo, kaj tuj demandis:

“Kiu estas?”

“Malfermu do la pordon,” respondis ies voĉo.

Li An haste malfermis la pordon kaj vidis, ke ombro englitiĝis, kaj li, ĉe la lampa lumo, rekonis en la enveninto la nutristinon Ora Kesto.

“Por kia afero vi venas ĉi tien en tiu ĉi horo?” demandis Li An.

“Mi venas ne pro mia afero,” respondis Ora Kesto. “Estas mia mastrino en la malantaŭo, kiu sendis min ĉi tien.”

一日，冬月天气，李安正在班房内上宿，忽听有人敲后门，忙问道：“是谁？”只闻叫道：“你开门则个。”李安连忙开了房门，却见一个人抢入来，闪身在灯光背后。李安看时，却认得是养娘金匱。李安道：“养娘，你这咱晚来有甚事？”金匱道：“不是我私来，里边奶奶差出我来的。”

“Por kio do la mastrino sendis vin ĉi tien?” demandis Li An?

“Ĉu do vi vere komprenas nenion?” respondis Ora Kesto kun rido. “Ŝi sendis min vidi, ĉu vi jam kuŝiĝis por dormi aŭ ne, kaj konfidis al mi doni ion al vi.”

Tion dirinte, ŝi tiris pakon de sur sia ŝultro kaj diris:

“Ĝi estas por vi, kaj tiu ĉi pako entenas kelkajn virinajn vestojn por via patrino. La mastrino sentis sin multe dankema al vi pro via eskorto de la ĉaroj da pakaĵo kaj aliaj objektoj sur la vojo hejmen kaj pro via savo de ŝia vivo. Se vi ne estus tie tiun tagon, tiu ulaĉo Zhang Sheng certe mortigus ŝin.”

Tion dirinte, ŝi restigis la vestojn kaj eliris tra la pordo, sed, farinte kelkajn paŝojn, ŝi sin turnis kaj ree eniris por diri:

“Estas ankoraŭ io grava.”

Tion diranta ŝi eligis grandan arĝentan ingoton pezantan je kvindek taeloj, kaj ĵetinte ĝin al li, tuj foriris.

Tiun nokton, perpleksa li kuŝis pensante pri tio longan tempon, antaŭ ol endormiĝi.

李安道：“奶奶叫你来怎么？”金匱笑道：“你好不理睬得。看你睡了不曾，教我把一件物事来与你。”向背上取下一包衣服，“把与你，包内又有几件妇女衣服与你娘。前日多累你押解老爷行李车辆，又救得奶奶一命，不然也吃张胜那厮杀了。”说毕，留下衣服，出门走了两步，又回身道：“还有一件要紧的。”又取出一锭五十两大元宝来，撒与李安自去了。当夜踌躇不决。

Frue en la sekva mateno, Li An ellitiĝis kaj iris rekte al sia hejmo, preninte la vestojn kun si por doni al sia patrino

“De kie tiuj ĉi objektoj venis?” demandis ŝia patrino.

Li An rakontis ĉion, kio okazis la antaŭan nokton, sed, tion aŭdinte, lia patrino ĉagreniĝis kaj diris kun lamento:

“Antaŭ nelonge, Zhang Sheng kulpis pri krimo, pro kiu li estis punita per cent pezaj bastonbatoj ĝis morto. Kun kia intenco ŝi nun donis al vi tiujn ĉi objektojn? Mi jam estas sesdek-jara, kaj de kiam via patro mortis, vi estas la sola persono, sur kiu mi povas meti mian tutan esperon. Se vi faros ion, kio kaŭzos malfeliĉon, de kiu do mi dependos dum la resto de mia vivo? Morgaŭ matene vi devus ne reiri tien.”

次早起来，径拿衣服到家与他母亲。做娘的问道：“这东西是那来的？”李安把夜来事说了一遍。做母亲的听言叫苦：“当初张胜干坏事，一百棍打死，他今日把东西与你，却是甚么意思？我今六十已上年纪，自从没了你爹爹，满眼只看着你，若是做出事来，老身靠谁？”

明早便不要去了。”

“Se mi ne reiros,” diris Li An, “ŝi certe sendos iun venigi min tien. Kion do vi diros tiam?”

“Mi diros, ke vi malvarmumis kaj falis en malsanon,” diris lia patrino.

“Sed ni ne povus ĉiam diri tian mensogon,” diris Li An. “Tiuokaze mi riskus kolerigi Lian Honoron.”

“Vi do iru preni rifuĝon ĉe via onklo Li Gui, Jakŝo de Shandong,” diris lia patrino. “Post restado tie kelkajn monatojn vi povos reveni por esplori la situacion.”

Li An, kiu estis obeema filo, sekvis la konsilon de sia patrino, kaj komencis pretigi sian pakaĵon kaj ekiris al la prefektujo Qingzhou por serĉi rifuĝon ĉe sia onklo.

Kiam Umefloro vidis, ke Li An ne revenis, ŝi plurfoje sendis servoknabon venigi lin. En la komenco lia patrino diris, ke li falis en malsanon kaj nun ripozas hejme por reakiri sian sanon. Sed, kiam ŝi vidis, ke homoj venas esplori la situacion, ŝi klarigis, ke li jam revenis al sia naskiĝloko por perlabori siajn vivrimedojn. Aŭdinte tion, Umefloro sentis fortan malkontentecon.

李安道：“我不去，他使人来叫，如何答应？”婆婆说：“我只说你感冒风寒病了。”李安道：“终不成不去，惹老爷不见怪么？”做娘的便说：“你且投到你叔叔，山东夜叉李贵那里住上几个月，再来看事故何如。”这李安终是个孝顺的男子，就依着娘的话，收拾行李，往青州府投他叔叔李贵去了。春梅以后见李安不来，三、四、五次使小伴当来叫。婆婆初时答应家中染病，次后见人来验看，才说往原籍家中，讨盘缠去了。这春梅终是恼恨在心不题。

La tempo flugas rapidege, kaj la suno kaj la luno alternas kiel teksila navedo. La dek-dua monato finiĝis, kaj la printempo komenciĝis. Dum la unua tagdeko de la unua monato, la ĉefkomandanto Zhou Xiu, ĉe la kapo de siaj trupoj el dek du mil homoj, jam kantonmentis en la prefektujo Dongchang longan tempon. Li sendis sian serviston Zhou Zhong liveri leteron al lia hejmo, invitante Umefloron kaj Sun la Duan, kune kun la du infanoj Oro kaj Jado kaj la geservistoj, iri rekuniĝi kun li, restigante nur Zhou Zhong hejme por gardi la domon. Li ankaŭ instrukciis al Zhou Zhong, ke li iru inviti la pli junan kuzon de Zhou Xiu forlasi la Orientan Bienon kaj veni gardi la domon kune kun li.

时光迅速，日月如梭，又早腊尽阳回，正月初旬天气。统制领兵一万二千，在东昌府屯住已久，使家人周忠，捎书来家。教搬取春梅、孙二娘，并金哥、玉姐家小上车。止留下周忠：“东庄上请你二爷看守宅子。”

La pli juna kuzo de la ĉefkomandanto estis nomata Zhou Xuan, kiu loĝis sur lia kampara bieno. Li konsentis aliĝi al Zhou Zhong, por gardi la domon, kune kun Verda Ekrano kaj Han Amo, dum Zhou Ren kaj grupo da servosoldatoj eskortis la kaleŝojn de la familianoj sur ilia vojo al la prefektujo Dongchang. Koncerne tiun ĉi vojaĝon, vere:

Ne por sia glora kariero ili forlasis sian hejmlokon,

Sen scii kiom da homoj supervivos tian ekspedicion.

Sin trovas versaro, kiu povas bone priskribi la militan talenton de la ĉefkomandanto Zhou Xiu kiel naskita generalo. En tiu ĉi tempo, kiam la Centra Ebenaĵo estis en stato de tumulto, lia ambicio estis ĝuste subigi la barbarojn.

原来统制还有个族弟周宣，在庄上住。周忠在府中，与周宣、葛翠屏、韩爱姐看守宅子。周仁与众军牢保定车辆，往东昌府来。此一去，不为身名离故土，争知此去少回程。有词一篇，单道周统制果然是一员好将材。当此之时，中原荡扫，志欲吞胡。

Jen, vidu nur:

Banditoj svarmas en la diversaj partoj de la lando;

Alarmaj fumsignaloj leviĝas ĉie sur la landlimoj.

*Ĉe sia ekindigno, la generalo pacigas la regnon,
Subigante la barbarojn kaj forbalaante ilin ĉiujn.
Li forgesas siajn privataĵojn por la publika bono,
Kaj preferus oferi sian vivon al la patrio kun lojalo.
Lia lanc-tenilo ŝirmas kontraŭ la suno en la batalo;
En la halo de herooj, li gajnas la plejan honoron.
Trans la pasejo Yanmen la aŭtuna vento siblas;
Vestita per kiraso li dormas sub la malvarma luno.
Dum la dudek jaroj, li gajnis meritojn en bataloj,
Kaj ankaŭ akiris al si neĝ-blankon ĉe la tempioj.
La imperiestro vidas lian heroecon fore de mil lioj,
Kaj rekompencas lian lojalecon per oftaj laŭdoj.
Ora sigelilo grandega pendas de sur lia kubuto;
Certe ĝi konvenas al heroo kun tia impona staturo.*

但见：

四方盗起如屯峰，狼烟烈焰薰天红。
将军一怒天下安，腥膻扫尽夷从风。
公事忘私愿已久，此身许国不知有。
金戈抑日酬战征，麒麟图画功为首。
雁门关外秋风烈，铁衣披张卧寒月。
汗马卒勤二十年，赢得斑斑鬓如雪。
天子明见万里余，几番劳勩来旌书。
肘悬金印大如斗，无负堂堂七尺躯。

Iun tagon, eskortate de Zhou Ren, la kaleŝoj, kiuj portis la domanaron de Zhou Xiu, alvenis en la prefektujon Dongchang. Kiam la ĉefkomandanto vidis, ke Umeŝoro, Sun la Dua, Oro kaj Jado, kune kun siaj geservistoj, jam alvenis, kaj ke ilia vojaĝo estis sekura, li ekstreme ĝojis kaj aranĝis, ke ili estu loĝigitaj en la malantaŭa parto de konstruaĵo de lia ĉefkomandantejo.

Zhou Ren diris al li:

“Via pli juna kuzo Zhou Xuan en via kampara bieno estis invitita por gardi vian domon, kune kun mia patro Zhou Zhong.”

La ĉefkomandanto ankaŭ demandis:

“Kial mi ne vidas Li An?”

有日，周仁押家眷车辆到于东昌。统制见了春梅、孙二娘、金哥、玉姐，众丫鬟家小都到了，一路平安，心中大喜。就在统制府衙后厅居住。周仁悉把“东庄上请了二爷来宅内，同小的老子周忠看守宅舍”，说了一遍。周统制又问：“怎的李安不见？”

“Ne menciui tiun ulaĉon Li An!” diris Umeŝoro. “Mi estis tre afabla al li pro lia kapto de Zhang Sheng. Mi donis al li kompletan da vestoj por lia patrino. Sed tiun nokton, dum sia patrolado de la domo, li eniris en la malantaŭan halon kaj ŝtelis de sur tiea tablo arĝentan ingoton pezantan je kvindek taeloj, kiu estis la terrento de via kampara bieno, kolektita de via kuzo. Li forkuris, kaj mi plurfoje sendis servistojn revoki lin, sed li, pretekstante malsaniĝon, rifuzis reveni. Kaj en la lasta fojo, kiam mi sendis iun al lia hejmo, li jam malaperis kaj sin kaŝis en sia naskiĝloko en Qingzhou.”

“Tiu ulaĉo!” respondis Zhou Xiu. “Mi ĉiam traktis lin tre favore, sed li montris sin tiel nedankema. Kiam mi havos tempon, mi sendos homojn tien lin aresti.”

Umefloro menciis nenion pri Han Amo.

春梅道：“又题甚李安？那厮我因他捉获了张胜，好意赏了他两件衣服，与他娘穿。他到晚夕巡风，进入后厅，把他二爷东庄上收的子粒银——一包五十两，放在明间桌上，偷的去了。几番使伴当叫他，只是推病不来。落后又使叫去，他躲的上青州原籍家去了。”统制便道：“这厮我倒看他，原来这等无恩！等我慢慢差人拿他去。”这春梅也不题起韩爱姐之事。

La tagoj pasis. Umefloro observis, ke ĉiutage Zhou Xiu absorbiĝas en militaj aferoj kaj komplete sin dediĉas al siaj devoj lojale al la imperiestro kaj la patrio, tiel ke li apenaŭ trovas tempon eĉ por manĝi dum la tagoj. Koncerne la aferojn interne de la litkurtenoj, li jam de longe ne havis la deziron. Ŝi rimarkis, ke Zhou Yi, la dua filo de la maljuna servisto Zhou Zhong, estas dek-naŭ-jara, kaj havas delikatajn brovojn kaj dolĉajn okulojn. Ŝi do komencis interŝanĝi kun li okulumojn, sekve la du personoj ekhavis inter si sekretajn seksrilatojn. De mateno al mateno kaj de vespero al vespero, ili du kune ŝakludis kaj kune trinkis vinon en ŝia ĉambro. Agante tiele, ili trompis la okulojn nur de la ĉefkomandanto.

过了几日，春梅见统制日逐理论军情，干朝廷国务，焦心劳思，日中尚未暇食，至于房帑色欲之事，久不沾身。因见老家人周忠次子周义，年十九岁，生的眉清目秀，眉来眼去，两个暗地私通，就勾搭了。朝朝暮暮，两个在房中下棋饮酒，只瞒过统制一人不知。

Unu tagon, kiam la imperiestro de la Granda Jin venkis la regnon Liao kaj observis, ke en la Orienta Ĉefurbo de la Song-dinastio la imperiestro Qinzong jam surtroniĝis, li kolektis siajn barbarajn trupojn kaj invadis en du kolonoj la Centran Ebenajon. La granda marŝalo Nian Mohe kondukis armeon el cent mil homoj tra la pasejo Jingjing en la prefektujo Taiyuan en Shanxi kun la intenco ataki la Orientan Ĉefurbon, dum la vicmarŝalo Wo Libu kondukis sian armeon ekde la prefektujo Tanzhou kun la intenco kapti la pasejon Gaoyang. La Song-trupoj defendantaj la landlimojn ne povis rezisti al ili. Tiu ĉi informo ĵetis Li Gang, la ministron de la milito, kaj Zhong Shidao, la ĉefgeneralon, en panikon, kaj tuj en la nokto elsendis urĝajn militajn depeŝojn, ordonante, ke la ses ĉefkomandantoj de Shandong, Shanxi, Henan, Hebei, Guandong kaj Shaanxi kolektu la armeojn ĉiu en la regiono sub sia jurisdikcio, kaj okupu la fortikaĵojn en sia regiono, por defendi ĉiu sian teritorion kontraŭ la malamiko. Sekve Liu Yanqing, la ĉefkomandanto de Shaanxi-regiono, kondukis la trupojn de Yansui; Wang Bing, la ĉefkomandanto de Guandong-regiono, kondukis la trupojn de Fenjiang; Wang Huan, la ĉefkomandanto de Hebei-regiono, kondukis la trupojn de Weibo; Xin Xingzong, la ĉefkomandanto de Henan-regiono, kondukis la trupojn de Zhangde; Yang Weizhong, la ĉefkomandanto de Shanxi-regiono, kondukis la trupojn de Zelu; kaj Zhou Xiu, la ĉefkomandanto de Shandong-regiono, kondukis la trupojn de Qingyan kontraŭ la invadintoj de Jin.

一日，不想北国大金皇帝灭了辽国。又见东京钦宗皇帝登基，集大势番兵，分两路寇乱中原。大元帅粘没喝，领十万人马，出山西太原府井陘道，来抢东京；副帅韩离不由檀州来抢高阳关。边兵抵挡不住，慌了兵部尚书李纲、大将种师道，星夜火牌羽书，分调山东、山西、河南、河北、关东、陕西分六路统制人马，各依要地，防守截杀。那时陕西刘延庆领延绥之兵，关东王禀领汾绛之兵，河北王焕领魏搏之兵，河南辛兴宗领彰德之兵，山西杨惟忠领泽潞之兵，山东周秀领青兗之兵。

Ni daŭrigu nian rakonton. Kiam la ĉefkomandanto Zhou Xiu sciiĝis, ke la potencaj barbaraj trupoj venis ataki la landlimojn, kaj ricevis la urĝan militan depeŝon de la ministro de milito, li kolektis siajn trupojn, kiuj, komplete kirasitaj kun plenaj ekipaĵoj, ekmarŝis al la fronto kun duobla rapideco. Kiam la rajdantaj skoltoj atingis la pasejon Gaoyang, la trupoj de la Jin-reĝima marŝalo Wo Libu jam penetris tra la pasejo internen kaj mortigis sennombrajn homojn kaj ĉevalojn.

Tiam estis ĝuste la unua tagdeko de la kvina monato. La vento subite levis la flavan sablon, tiel ke la homoj ne povis malfermi siajn okulojn. La ĉefkomandanto kondukis siajn trupojn en la batalon, sed, neatendite, la Jin-reĝima komandanto Wo Libu, urĝante sian kavalerion antaŭen en kontraŭatako, pafis sagon, kiu trafis Zhou Xiu ĝuste en lian gorĝon, kaŭzante, ke li falis de sur la ĉevalo kaj mortis. La malamikaj oficiroj penis akiri lian kadavron per hokoj kaj ŝnuroj, sed liaj propraj soldatoj ĵetis sin antaŭen kaj rapide kaptis lian korpon kaj forportis ĝin sur la ĉevala dorso. La soldatoj vunditaj kaj mortigitaj en tiu ĉi batalo estis nekalkuleblaj. Ho ve, tiutage la ĉefkomandanto Zhou Xiu falis en la batalo, en la aĝo de kvardek sep jaroj.

却说周统制，见大势番兵来抢边界，兵部羽书火牌星火来，连忙整率人马，全装披挂，兼道进兵。比及哨马到高阳关上，金国斡离不的人马，已抢进关来，杀死人马无数。正值五月初旬，黄沙四起，大风迷目。统制提兵进赶，不防被干离不兜马反攻，没鞦一箭，正射中咽喉，随马而死。众番将就用钩索搭去，被这边将士向前仅抢尸首，马戴而远，所伤军兵无数。可怜周统制一旦阵亡，亡年四十七岁。

Vere:

Lojala generalo penas servi sian hejmon kaj sian regnon;

Saĝa aŭ stulta, li ruĝigas per sia sango la flavan sablon.

正是:

于家为国忠良将，不辩贤愚血染沙。

Iu antikvulo komponis poemon por esprimi siajn senfinajn sentojn, kiu tekstis jene:

古人意不尽，作诗一首，以叹之曰:

Venka aŭ malvenka estas neanticipebla por militisto;

Sekuro aŭ danĝero estas afero decidita de la sorto.

Li mortas sur la batalkampoj, antaŭ ol vidi la venkon;

Sub la suno sinkanta la riveroj fluas kun senfina bedaŭro.

胜败兵家不可期，安危端自命为之。

出师未捷身先死，落日江流不胜悲。

Kiam la gubernatoro Zhang Shuye vidis, ke la ĉefkomandanto Zhou Xiu jam pereis sur la batalkampoj, li tuj ordonis bati gongon kiel signalon revoki la trupojn. Kontrolinte la nombron de la soldatoj vunditaj kaj mortigitaj, li retiris la trupojn por defendi Dongchang, kaj submetis urĝan raporton al la trono.

Kiam la retirigintaj trupoj reportis la kadavron de Zhou Xiu al Dongchang, Umeffloro kaj ŝia tuta domanaro estis ĵetitaj en tian malĝojegon, ke iliaj korŝiraj ploroj skuis la ĉielon. Ili enĉerkgis lian korpon, kaj redonis liajn militan akreditaĵojn kaj oficialan sigelilon al la trono. Poste, en iu tago, Umeffloro, kune kun la servisto Zhou Ren, eskortante la ĉerkon, revenis al la subprefektujo Qinghe.

巡抚张叔夜，见统制没于阵上，连忙鸣金收军，查点折伤士卒，退守东昌。星夜奏朝廷，不在话下。部下士卒，载尸首还到东昌府。春梅合家大小，号哭动天，合棺木盛殓，交割了兵符印信。一日，春梅与家人周仁，发丧载灵柩归清河县不题。

Nia rakonto devas forkiĝi ĉi tie. De kiam Umeffloro foriris, Verda Ekrano kaj Han Amo restis hejme, kie ili konsumis simplajn manĝojn kaj trinkaĵojn, kaj tenis la ĉastecon kaj gardis la vidvinecon, pasigante siajn tagojn kaj monatojn. Iun tagon, kiam la printempo finiĝis kaj la somero komenciĝis, la pejzaĝo estis sunbrila kaj freŝa, kaj la tagoj plilongiĝis, tiam ili, laciĝinte de sia kudrolaboro, eliris kaj kune promenis al la flor-pavilono apud la kabineto ĉe la okcidenta flanko de la korto. Tie ili vidis, ke la diversaj floroj estas en pompa disflorado, kaj orioj kantas

kaj hirundoj pepadas, kaj eksentis melankolion ĉe la vido de la spektaklo. La koro de Verda Ekranio restis pli aŭ malpli trankvila, sed Han Amo neniel povis elpeli el la koro la penson pri sia karulo Chen Jingji. Kun rigardo al ĉiuj objektoj, ŝi restis apatia, sed estis ĉagrenita kun larmoj, kiuj nereteneble elfluis kaj ruliĝis sur la vangoj. Ĝuste kiam la du fratinoj estis en tiu ĉi malgaja stato, Zhou Xuan proksimiĝis kaj konsolis ilin:

“Vi du fratinoj ne devus esti tiel melankoliaj. Vi preferus peni forpeli viajn ĉagrenojn. Mi havis sonĝojn en la lastaj noktoj, kiuj ŝajnas esti malbonaŭguraj. Mi sonĝis pri pafarko pendanta sur flagostango, kiu subite rompiĝis. Sed mi ne scias, ĉu tio ĉi devas esti interpretita sinistre aŭ aŭgure.”

话分两头。单表葛翠屏与韩爱姐，自从春梅去后，两个在家清茶淡饭，守节持贞，过其日月。正值春尽夏初天气，景物鲜明，日长针指困倦。姊妹二人闲中徐步，到西书院花亭上。见百花盛开，莺啼燕语，触景伤情。葛翠屏心还坦然，这韩爱姐，一心只想念陈敬济，凡事无情无绪，睹物伤悲，不觉潸然泪下。姊妹二人正在悲凄之际，只见二爷周宣，走来劝道：“你姊妹两个少要烦恼，须索解叹。我连日做得梦，有些不吉。梦见一张弓挂在旗竿上，旗竿折了，不知是凶是吉？”

Aŭdinte tion ĉi, Han Amo diris:

“Mi timas, ke ĝi povus aŭguri ion rilate Lian Honoron sur la landlimo.”

Ĝuste kiam ili estis en necerteco, subite aperis la servisto Zhou Ren, vestita en plena funebro, kaj en stato de evidenta agitiĝo. Li envenis kaj raportis:

“Okazis malfeliĉo! Lia Honoro, en la sepa tago de la kvina monato, estis mortigita en batalo ĉe la landlima pasejo. La Granda Sinjorino kaj la Dua Sinjorino, kune kun aliaj, jam alvenas kun la ĉerkveturilo.”

Tio ĵetis Zhou Xuan en konsterniĝon, kaj li tuj ordonis, ke la antaŭa akcepta halo estu purigita kaj orde aranĝita, por ke la ĉerko de Zhou Xiu povu esti enportita kaj lokita tie, kaj la oferaĵoj povu esti formale prezentataj. Ĉiuj membroj de la domanaro, junaj kaj maljunaj, komencis doni la voĉon al malgajega lamentado, kaj Zhou Xuan faris aranĝojn, ke la funebraj ceremonioj estu plenumataj en la memorfesto de septagaj periodoj de la morto de Zhou Xiu, kaj ke la voĉlegoj de sutroj kaj sanktaj tekstoj estu faritaj de la bonaj kaj taŭstaj pastroj respektive. Liaj du infanoj, Oro kaj Jado, portis kanaban funebran veston, dum vizitantoj senĉese venis prezenti siajn kondolencojn. Iu favora tago estis elektita por funebra procesio, kaj la ĉefkomandanto estis solene enterigita en sia prapatra tombejo.

韩爱姐道：“倒只怕老爷边上，有些说话。”正在犹疑之间，忽见家人周仁，挂着一身孝，慌慌张张走来，报道：“祸事，老爷如此这般，五月初七日，在边关上阵亡了！大奶奶、二奶奶家眷，载着灵车都来了。”慌了二爷周宣，收拾打扫前厅干净，停放灵柩，摆下祭祀，合家大小，哀号起来。一面做斋累七，僧道念经。金哥、玉姐披麻带孝，吊客往来，择日出殡，安葬于祖茔。俱不必细说。

Ni daŭrigu nian rakonton. En la nomo de sia nevo, la ses-jara Oro, Zhou Xuan submetis raporton al la trono, petante, ke oficiale dekretita oferceremonio estu plenumota en la enterig-loko de Zhou Xiu, kaj ke al lia filo estu permesite heredi la oficialulan pozicion de sia patro. La imperiestro donis al la koncerna ministerio dekreton, kiu tekstis jene:

“La mortinta ĉefkomandanto Zhou Xiu oferis sian vivon al sia patrio. Li mortis dum sia servado al la kortego. Lia lojaleco kaj lia kuraĝo estas indaj je laŭdoj. Oficistoj devos esti senditaj por konduki la oferceremonion ĉe lia tombejo, kaj la spirit-tabuleto devos esti starigita sur la supro de lia tombo, kun lia postmorta titolo Granda Komandanto gravurita sur ĝi. Lia filo devos ricevi

nutradon, ĝis li atingos la aĝon, en kiu li povos heredi la pozicion de sia patro.”

Koncerne Umeffloron, ŝi vivis en lukso kaj abundeco, kaj ŝiaj lascivaj deziroj fariĝis pli kaj pli fortaj. Ŝi ofte tenis Zhou Yi en sia parfumita buduaro dum pluraj sinsekvaj tagoj. Dum la matenoj kaj la vesperoj sin ripetadis, ŝi sin fordonis al la plezurĝuado kun li sen reteno, ĝis en iu tago ŝi estis trafita de malsano kaŭzita de energi-konsumiĝo, kiu ronĝis ŝian korpon ĝis la osto. Kvankam ĉiutage ŝi prenis medikamenton kontraŭ la malsano, tamen ŝia apetito por manĝo kaj trinko malkreskis kun la tagoj, ŝia energio malpliigadis, kaj ŝia korpo fariĝis tiel malgrasa, kiel skeleto, kaj tamen ŝiaj lascivaj deziroj neniel malfortiĝis.

却说二爷周宣，引着六岁金哥儿，行文书申奏朝廷，讨祭葬，袭替祖职。朝廷明降，兵部覆题引奏：已故统制周秀，奋身报国，没于王事，忠勇可嘉。遣官谕祭一坛，墓顶追封都督之职。伊子照例优养，出幼袭替祖职。这春梅在内颐养之余，淫情愈盛。常留周义在香阁中，镇日不出。朝来暮往，淫欲无度，生出骨蒸癆病症。逐日吃药，减了饮食，消了精神，体瘦如柴，而贪淫不已。

Iun tagon, iom post la celebrado de sia naskiĝtago, kaj dum la plej varma periodo de la somero en la sesa monato, malfrue en la mateno, anstataŭ ellitiĝi, ŝi kaj Zhou Yi sin brakumis reciproke sur la lito. Neatendite, tuj kiam li ejakulis, ekblovo de malvarma aero eliĝis el ŝiaj naztruo, ŝia vagina fluidaĵo abunde elfluis kaj formis flakon sur la litaĵo, kaj, ho ve, ŝi perdis sian vivon sur la korpo de Zhou Yi. En la tempo de sia morto ŝi estis en la aĝo de nur dudek naŭ jaroj.

一日，过了他生辰，到六月伏暑天气，早晨晏起，不料他搂着周义在床上，一泄之后，鼻口皆出凉气，淫津流下一洼口，就呜呼哀哉，死在周义身上。亡年二十九岁。

Kiam Zhou Yi vidis, ke ŝi ne plu spiras, li timiĝis, ŝtelis kelkajn orajn kaj arĝentajn objektojn kaj aliajn valoraĵojn el ŝiaj kofroj, kaj forkuris el la domo malproksimen. La servistinoj kaj la nutristinoj ne kuraĝis kaŝi tiujn ĉi faktojn kaj senprokraste raportis ilin al Zhou Xuan, kiu tuj enĉenigis la maljunan serviston Zhou Zhong kaj devigis lin helpi serĉi Zhou Yi. Estis sufiĉe strange, ke kiam tiu juna viro iris al la hejmo de sia onklino ekster la urbo, por serĉi rifuĝon, li estis kaptita tie, ligita per ŝnuro, kaj estis rekondukita. Zhou Xuan timis, ke se tiu ĉi skandalo tralikiĝus eksteren, tio povus malebligi al Zhou Oro heredi la pozicion de sia patro. Li do venigis Zhou Yi en la antaŭan halon, kie, sen permesi al la juna viro fari ian ajn klarigon, li ordonis bati al li kvardek pezajn bastonbatojn, kio kaŭzis, ke li mortis sur la loko.

这周义见没了气儿，就慌了手脚，向箱内抵盗了些金银细软，带在身边，逃走出外。丫鬟养娘不敢隐匿，报与二爷周宣得知。把老家人周忠锁了，押着抓寻周义。可霎作怪，正走在城外他姑娘家投住，一条索子拴将来。已知其情，恐扬出丑去，金哥久后不可袭职，拿到前厅，不由分说，打了四十大棍，即时打死。

Poste Zhou Xuan konfidis Oron al la prizorgo de Sun la Dua kaj faris aranĝojn, ke Umeffloro estu enterigita en la sama tombo kun la ĉefkomandanto en la prapatra tombejo. Li ankaŭ forsendis la du nutristinojn, kune kun la du konkubinoj, Sovaĝa Pomarbo kaj Laŭro, por ke ili povu serĉi ĉiu por si dungon aliloke aŭ trovi al si edzon. Sed Verda Ekrano kaj Han Amo obstine rifuzis foriri, kvankam li instigis ilin al tio.

把金哥与孙二娘看着。一面发丧于祖莹，与统制合葬毕。房中两个养娘并海棠、月桂，都打发各寻投向嫁人去了。止有葛翠屏与韩爱姐，再三劝他，不肯前去。

Iun tagon, neatendite, la potenca armeo de la reĝimo de la Granda Jin sukcesis ekpreni Bianliang, la Orientan Ĉefurbon, kaj kaptis la abdikiĝintan imperiestron Huizong kaj lian filon, la imperiestron Qinzong, kaj eskortis ilin al la norda regiono. La Centra Ebenaĵo estis reduktita al la ĥaoso sen reganto, kaj sur la tuta lando regis tia malordo, ke ĉie vidiĝis forĵetitaj armiloj, kaj la

homamasoj estis devigitaj fuĝi kaj senhejme vagadi. La ordinaraĵoj estis ĵetitaj en abismon de mizero kaj suferoj, kaj ĉie aŭdiĝis iliaj ĝemoj kaj krioj de doloro. Kiam la granda nombro da barbaraj trupoj alvenis al la limoj de la provinco Shandong, ili buĉadis kaj rabadis, kun la rezulto, ke inter la tieaj popolanoj edzoj forkuris kaj edzinoj estis dislasitaj en diversaj lokoj, kaj fantomoj lamentis kaj spiritoj eligis ŝirantajn kriojn, kaj eĉ patroj kaj filoj ne plu povis zorgi unu pri la alia.

Tiam Verda Ekrano jam estis forkondukita de sia gepatra familio, dum ĉiu alia forkuris por savi sian vivon, nur Han Amo estis sen loko, kie ŝi povus serĉi ŝirmon. Ŝi havis neniun alian elekton, krom prepari sian pakaĵon, vesti sin per simpla vojaĝvesto, forlasis la subprefektujojn Qinghe, kaj ekiris al Linqing por trovi siajn gepatrojn. Sed, kiam ŝi atingis Linqing, ŝi trovis, ke la Vintrinkejo de Xie-familio jam estis fermita, kaj ĝia posedanto jam forkuris.

Neatendite, ŝi hazarde renkontis Chen la Trian, kiu diris al ŝi:

“Lastjare, viaj gepatroj jam iris suden kun la komercisto He, por loĝi en lia hejmo en Huzhou.”

— 一日，不想大金人马抢了东京汴梁，太上皇帝与靖康皇帝，都被虏上北地去了。中原无主，四下荒乱。兵戈匝地，人民逃窜。黎庶有涂炭之哭，百姓有倒悬之苦。大势番兵已杀到山东地界，民间夫逃妻散，鬼哭神号，父子不相顾。葛翠屏已被他娘家领去，各逃生命。止丢下韩爱姐，无处依倚，不免收拾行装，穿着随身惨淡衣衫，出离了清河县，前往临清找寻他父母。到临清谢家店，店也关闭，主人也走了。不想撞见陈三儿，三儿说：“你父母去年就跟了何官人，往江南湖州去了。”

Sekve Han Amo komencis la vojaĝon serĉi siajn gepatrojn, vivtenante sin sur la vojo per kantado kun akompano de sia lun-liuto. Kiam ŝi malsatis, ŝi iom manĝis; kiam ŝi soifis, ŝi iom trinkis; vespere ŝi haltis por la nokto; matene, ŝi daŭrigis la vojiron. Ŝi estis tiel agitata, kiel hundo mastroperdinta, kaj rapidis tiel haste, kiel fiŝo ĵus eskapinta el la reto. Ŝiaj vinditaj piedetoj en malgrandaj ŝuoj kun pinto suprenturnita faris ŝian vojaĝon ekstreme malfacila kaj peniga.

Post plurtaga vojiro ŝi atingis la regionon ĉirkaŭ Xuzhou. Estis jam malfrue, kaj ŝi alvenis al izolita vilaĝo, kie ŝi renkontis maljunulinon en la aĝo de pli ol sepdek jaroj. Tiu sin okupis je kuirado de rizo antaŭ la kuirforno.

Han Amo paŝis antaŭen kaj riverencis al ŝi, dirante:

“Mi venas de la subprefektujo Qinghe. Por fuĝi de katastrofo de milito, mi min direktas suden por serĉi miajn gepatrojn. Nun baldaŭ vesperiĝos, kaj mi ne scias, ĉu vi povus lasi min resti por la nokto en via loko. Morgaŭ frumatene mi foriros por daŭrigi mian vojiron, kaj certe mi pagos al vi por tio.”

— 这韩爱姐一路上怀抱月琴，唱小词曲，往前抓寻父母。随路饥餐渴饮，夜住晓行，忙忙如丧家之犬，急急如漏网之鱼。弓鞋又小，千辛万苦。行了数日，来到徐州地方，天色晚了，投在孤村里面。一个婆婆，年纪七旬之上，正在灶上杵米造饭。这韩爱姐便向前道了万福，告道：“奴家是清河县人氏，因为荒乱，前往江南投亲，不期天晚，权借婆婆这里投宿一宵，明早就行，房金不少。”

La maljunulino kontemplanis la junan virinon kaj pensis en si, ke ŝi aspektas ne kiel filino de malriĉa familio aŭ de malestiminda servistino. Ŝiaj manieroj estis rafinitaj, kaj ŝia konduto ne estis ordinara. Ŝi do diris:

“Se vi serĉas lokon por pasigi la nokton, volu do sidi sur la briklito, ĝis mi finos la kuiron de tiu ĉi manĝo. Kelkaj viroj dungitaj por drago de la rivera fluejo baldaŭ venos ĝin manĝi.”

Tion dirinte, la maljunulino daŭrigis sian kuiradon, kaj, post nelonge, ŝi produktis grandan

vazon da rizo miksitaj kun fazeoloj. Ŝi kuiris ankaŭ du pladojn da legomoj gustigitaj per pinĉaĵo da salo. Ĝuste tiam envenis kelkaj viroj kun taŭzita hararo kaj nudaj kruroj, kiuj portis kuloton kaj kies piedoj estis kovritaj de ŝlimo.

Demetinte ĉiu sian fosilon aŭ ŝovelilon, ili demandis:

“Avino, ĉu nia nutraĵo estas pretigita?”

“Servu al vi mem kaj manĝu ĝissate,” respondis la maljunulino.

La婆婆看这女子，不是贫难人家婢女，生得举止典雅，容貌非俗。因说道：“既是投宿，娘子请炕上坐，等老身造饭，有几个挑河夫子来吃。”那老婆婆炕上柴灶，登时做出一大锅稗稻插豆子干饭，又切了两大盘生菜，撮上一包盐，只见几个汉子，都蓬头精腿，裤裆兜裆，脚上黄泥，进来放下锹镢，便问道：“老娘有饭也未？”婆婆道：“你每自去盛吃。”

Ĉe tio ĉiu el ili komencis helpi al si kaj poste iri manĝi en sia angulo. Dum ili manĝis, iu el ili, kiu aspektis kvardek-kvar- aŭ kvarded-kvin-jara, kun bruna vizaĝo kaj griza hararo, demandis la maljunulinon:

“Kiu estas tiu persono sidanta sur la briklito?”

“Tiu ĉi virino,” respondis la maljunulino, “estas indiĝenino de la subprefektujo Qinghe. Ŝi estas sur sia vojo al la sudo por serĉi siajn gepatrojn, ĉar jam estas malfrue en la tago, ŝi petis pasigi nokton ĉi tie.”

La viro do plu demandis:

“Sinjorino, kia estas via nomo?”

“Mia familinomo estas Han,” respondis Han Amo, “kaj mia patro estas nomata Han Daoguo.”

La viro alproksimiĝis kaj prenis ŝin je la mano, dirante:

“Ho, ĉu vi ne estas mia nevino, Han Amo?”

当下各取饭菜，四散正吃。只见内一人，约四十四五年纪，紫面黄发，便问婆婆：“这炕上坐的是甚么人？”婆婆道：“此位娘子，是清河县人氏，前往江南寻父母去，天晚在此投宿。”那人便问：“娘子，你姓甚么？”爱姐道：“奴家姓韩，我父亲名韩道国。”那人向前扯住问道：“姐姐，你不是我侄女韩爱姐么？”

“Vi ja aspektas kiel mia onklo, Han la Dua,” ekkriis Han Amo.

La du personoj do sin brakumis reciproke kaj eksplodis per plorego. Li do demandis:

“Kie estas viaj gepatroj? Mi pensis, ke vi ĉiuj vivis en la Orienta Ĉefurbo. Kiel do vi venis ĉi tien?”

Han Amo do detale rakontis de la komenco, kio okazis, kaj en la fino diris:

“Ĉar mi edziniĝis al iu viro en la domo de la garnizona komandanto Zhou Xiu, post la morto de mia edzo, mi devis gardi la vidvinecon ĝis nun. Sciiginte, ke miaj gepatroj akompanis la komerciston He al lia hejmo en Huzhou, mi decidis iri ilin serĉi. Sed en tiu ĉi tempo de malordo mi trovis neniun por min akompani, kaj mi estis devigita ekiri tute sola, min vivtenante per kantado sur la vojo. Mi tute ne atendis, ke mi povos renkonti mian onklon ĉi tie.”

那爱姐道：“你倒好似我叔叔韩二。”两个抱头相哭做一处。因问：“你爹娘在那里？你在东京，如何至此？”这韩爱姐一五一十，从头说了一遍，“因我嫁在守备府里，丈夫没了，我守寡到如今。我爹娘跟了何官人，往湖州去了。我要找寻去，荒乱中又没人带去，胡乱单身唱词，觅些衣食前去，不想在这里撞见叔叔。”

“De kiam viaj gepatroj transloĝiĝis al la Orienta Ĉefurbo,” diris Han la Dua, “al mi mankis fonto de vivrimedoj. Mi estis devigita forvendi mian domon, kaj pli poste estis dungita por labori ĉi tie dragante la riveran fluejon, por akiri al mi bovlon da rizo. Sub la cirkonstancoj, mi do aliĝu

al vi, kaj ni kune iru al Huzhou por serĉi viajn gepatrojn.”

“Se mia onklo decidus iri kun mi,” diris Han Amo, “tio certe estus perfekte bona.”

Li do plenigis bovlon da rizo kaj donis ĝin al Han Amo por manĝi. Ŝi prenis buŝon da nutraĵo, sed trovis ĝin tiel kruda, ke ŝi apenaŭ povis ĝin engluti. Ŝi manĝis nur duonan bovlon.

那韩二道：“自从你爹娘上东京，我没营生过日，把房儿卖了，在这里挑河做夫子，每日觅碗饭吃。既然如此，我和你往湖州，寻你爹娘去。”爱姐道：“若是叔叔同去，可知好哩。”当下也盛了一碗饭，与爱姐吃。爱姐呷了一口，见粗饭，不能咽，只呷了半碗，就不吃了。一宿晚景题过。

En la sekva frumateno la aliaj dungitaj viroj iris labori, sed Han la Dua, paginte la loĝprezon, kiun li ŝuldis al la maljunulino, prenis Han Amon kun si, kaj, dirinte adiaŭ, eliris por kune komenci ilian vojaĝon.

Han Amo, estis nature delikata, kaj ŝiaj vinditaj piedoj en la ŝuoj kun pinto suprenturnita estis malgrandaj. Ŝi havis kelkajn harpinglojn, kombilojn kaj aliajn valorajn objektojn kun si, kiujn ŝi forvendis, pecon post peco, por sin vivteni sur vojo kaj pagi la elspezojn de la vojaĝo. Atinginte Huai'an, ili komencis veturi per ŝipo por daŭrigi sian vojaĝon suden al Huzhou. Post pluraj tagoj ili trovis sian vojon al la hejmo de la komercisto He en Huzhou kaj rekuniĝis kun la gepatroj de Han Amo.

到次日到明，众夫子都去了，韩二交纳了婆婆房钱，领爱姐作辞出门，望前途所进。那韩爱姐本来娇嫩，弓鞋又小，身边带着些细软钗梳，都在路上零碎盘缠。将到淮安上船，迤逦望江南湖州来，非止一日，抓寻到湖州何官人家，寻着父母，相见会了。

Sed tiam la komercisto He jam mortis. Li havis neniun edzinon, nek kromedzinon en sia hejmo, krom Wang la Sesa, kaj postlasis nur unu filinon, kiu estis ses-jara, kaj proprietaĵon konsistantan el centoj da muoj da rizkampoj. Post malpli ol unu jaro ankaŭ Han Daoguo mortis, kaj, ĉar Wang la Sesa origine havis sekretajn seksrilatojn kun Han la Dua, ŝi prenis sian bofraton kiel sian edzon, kaj ili sin vivtenis per terkulturado sur la kampoj de la komercisto He.

En Huzhou sin trovis multaj riĉaj junaj viroj, kiuj rimarkis, kiel bela kaj lerta aspektas Han Amo, venis svatiĝi pri Han Amo. Ankaŭ Han la Dua ripetfoje instigis ŝin al edziniĝo, sed ŝi intence fortranĉis sian hararon, difektis al si la okulojn, kaj fariĝis bonzino, ĵurante reedziniĝi al neniuj viroj. Du jarojn poste, en la aĝo de tridek unu jaroj, ŝi falis en malsanon kaj mortis.

不想何官人已死，家中又没妻小，止是王六儿一人，丢下六岁女儿，有几顷水稻田地。不上一年，韩道国也死了。王六儿原与韩二旧有揸儿，就配了小叔，种田过日。那湖州有富家子弟，见韩爱姐生的聪明标致，都来求亲。韩二再三教他嫁人，爱姐割发毁目，出家为尼，誓不再配他人。后来至三十一岁，以疾而终。

Vere:

Antaŭ ol ŝiaj ĉastaj ostoj refariĝus polvo,

Ŝia rankora animo jam flugas al la ĉielo.

正是：

贞骨未归三尺土，怨魂先彻九重天。

Poste, sekve de tio, ke Han la Dua kaj Wang la Sesa jam geedziĝis, ili heredis la posedaĵon kaj la bienon de la komercisto He kaj vivis tie en lia domo.

后韩二与王六儿成其夫妇，请受何官人家业田地，不在话下。

Ni daŭrigu nian rakonton. Kiam la invadintaj trupoj de la reĝimo de la Granda Jin sukcesis ekpreni la prefektujon Dongchang kaj minacis alproksimiĝi al la subprefektujo Qinghe, tiam oni vidis, ke tie:

*La oficialuloj penis forkuri aliloken;
La urbopordego estis fermita tage;
La popolanoj disfuĝis en malordo;
Kaj patroj kaj filoj estis apartigitaj.*

却说大金人马，抢过东昌府来，看看到清河县地界。只见官吏逃亡，城门昼闭，人民逃窜，父子流亡。

Jen vidu nur:

*Fumo leviĝas ĉie sur la libera vastaĵo;
La suno estas kaŝita de flava sablo.
Rabemaj aproj kaj longaj serpentoj
Provas kruele engluti unu la alian;
Drakoj kaj tigroj intense interbatalas,
Konkurante inter si pri sia supereco.
Ruĝaj standardoj kaj niĝaj flagoj
Kovras la tutan vastaĵon ĉirkaŭ la urbo.
Viroj laŭte krias kaj virinoj ŝirploras;
Miriadoj da familioj estas terurfrapitaj.
La barbaraj trupoj kaj fremdaj generaloj
Estas kiel svarmantaj formikoj aŭ abeloj.
Iliaj mallongaj glavoj kaj longaj lancoj
Similas densajn arbarojn kaj bambuarojn.
De loko al loko kadavroj kaj homaj ostoj
Kuŝas disĵetitaj en ĥaosa malordo;
Tie kaj tie rompitaĵoj klingoj kaj glavoj
Amasiĝas en granda konfuzo.
Ĉiu homo portas sian infanon en la brakoj,
Ĉiu hejmo fermas sian pordegon.
Naŭ el dek domoj estas vakaj kaj dezertaj,
Ne plu similaj al komunumoj urbaj aŭ ruraj.
Oni forkuras kiel timigitaj cervoj aŭ ratoj,
Ĉie estas neniuj postsignoj de ritoj kaj muziko.*

但见：

烟生四野，日蔽黄沙。封豕长蛇，互相吞噬。龙争虎斗，各自争强。皂帜红旗，布满郊野。男啼女哭，万户惊惶。番军虏将，一似蚁聚蜂屯；短剑长枪，好似森森密竹。一处处死尸朽骨，横三竖四；一攒攒折刀断剑，七断八截。个个携男抱女，家家闭门关户。十室九空，不显乡村城郭；獐奔鼠窜，那契礼乐衣冠。

Vere:

*La palacaj nobelinoj viŝas siajn larmojn per sia maniko ruĝa;
La imperiestraj filoj forkuras alivestitaj en sia civila kostumo.*

正是：

得多少宫人红袖哭，王子白衣行。

Tiutempe, kiam Luna Sinjorino vidis, ke la barbaraj trupoj estas alproksimiĝantaj, kaj ke preskaŭ ĉiuj familioj jam fermis kaj ŝlosis sian pordegon kaj forkuris en konfuzo, ŝi sentis sin devigita fari la samon. Ŝi do kolektis kelkajn oron, perlojn, juvelojn, kaj aliajn valorajojn por preni

kun si. Tiam ŝia pli aĝa frato Wu Kai jam mortis, sekve ŝi ekiris akompanate nur de Wu la Dua, Dai'an, Eta Jado, kaj sia dek-kvin-jara filo Xiaoge. Post kiam la antaŭa pordego kaj la aliaj pordoj estis sekure ŝlositaj, ili komencis sin direkti al la prefektujo Jinan, kun la intenco serĉi rifuĝon ĉe Yun Lishou. Tion farante, ŝi esperis, unuflanke, eskapi la invadintan barbaran armeon, kaj, aliflanke, plenumi la edzigon de Xiaoge al la filino de Yun Lishou.

Sur la vojo ŝi vidis, ke ĉiuj fuĝantoj estas en konfuzo kaj paniko. La malfeliĉa Luna Sinjorino, vestita en sia vojaĝa vesto, kune kun Wu la Dua kaj la aliaj tri personoj, miksante sin en la homamasojn, boris al si vojon tra la urbopordego en la antaŭurbon.

那时，吴月娘见番兵到了，家家都关锁门户，乱窜逃去，不免也打点了些金珠宝玩，带在身边。那时吴大舅已死，止同吴二舅、玳安、小玉，领着十五岁孝哥儿，把家中前后都倒锁了，要往济南府投奔云理守。一来避兵，二者与孝哥完就亲事。一路上只见人人荒乱，个个惊骇。可怜这吴月娘，穿着随身衣服，和吴二舅男女五口，杂在人队里挨出城门，到于郊外，往前奔行。

Ili daŭrigis sian vojiron kaj alvenis al vojkruciĝo en libera vastaĵo, kie ili renkontis bonzon, kiu estis vestita en purpur-bruna kasajo, tenis en la mano kakaraon kun naŭ ringoj ligitaj al ĝi, portis pajlajn sandalojn sur la piedoj, kaj, sur la dorso, havis tolan sakon entenantan sutrajn librojn.

Farinte kelkajn grandajn paŝojn antaŭen, li salutis ŝin per kunmeto de la manplatoj sur la brusto laŭ la budhista maniero kaj diris en laŭta voĉo:

“Sinjorino Wu, kien vi iras? Volu transdoni mian disĉiplon al mi.”

Tio konsternis Lunan Sinjorinon, tiel ke ŝi eĉ paliĝis. Ŝi do alparolis lin:

“Majstro, kian disĉiplon vi petas de mi?”

“Sinjorino, vi ne ŝajnu vin dormanta en sonĝolando. Vi devas memori, kiel, dek jarojn antaŭe, sur la Orienta Branĉo de la monto Tai, vi estis persekutata de Ying Tianxi kaj serĉis rifuĝon por la nokto en mia monta groto. Mi estas la sama Djan-majstro de Neĝa Ravineto, kies religia nomo estas Pujing. Tiam vi promesis lasi al mi havi vian filon kiel mian disĉiplon. Kial vi ankoraŭ ne transdonis lin al mi?”

到于空野十字路口，只见一个和尚，身披紫褐袈裟，手执九环锡杖，脚趺芒鞋，肩背上背着条布袋，袋内裹着经典，大移步迎将来，与月娘打了个问讯，高声大叫道：“吴氏娘子，你到哪里去？还与我徒弟来！”唬的月娘大惊失色，说道：“师父，你问我讨甚么徒弟？”那和尚又道：“娘子，你休推睡里梦里，你曾记的十年前，在岱岳东峰，被殷天锡赶到我山洞中投宿。我就是那雪洞老和尚，法号普静。你许下我徒弟，如何不与我？”

“Majstro,” intermetis Wu la Dua, “vi estas bonzo. Kiel vi povas esti tiel trudema kaj absurda? En tiu ĉi jaro de militaj tumultoj ni forkuras por savi la vivon. Ŝia sola espero estas, ke en la estonteco tiu ĉi sola infano ŝia povos daŭrigi la familian linion. Kiel ŝi povus fordoni lin al vi, lasante al li rezigni la laikan vivon kaj fariĝi bonzo?”

“Ĉu vi vere rifuzas transdoni lin al mi?” demandis la bonzo.

“Majstro,” diris Wu la Dua, “ne parolu tian sensencaĵon, alie vi malhelpos al ni fari nian eskapon. Mi timas, ke la barbaraj trupoj povos sin montri ĉi tie en iu ajn momento. En la nuna tempo neniuj scias matene, kio povos okazi vespere.”

吴二舅便道：“师父出家人，如何不近道？此等荒乱年程，乱窜逃生，他有此孩儿，久后还要接代香火，他肯舍与你出家去？”和尚道：“你真个不与我去？”吴二舅道：“师父，你休闲说，误了人的去路。后面只怕番兵来到，朝不保暮。”

“Ĉar vi rifuzas transdoni mian disĉiplon al mi,” diris la bonzo, “nun estas jam malfrue en la

tago, kaj vi ne povos daŭrigi vian vojiron. Eĉ se barbaroj venos, ili ne estos ĉi tie. Vi povus veni kun mi kaj resti por la nokto en tiu ĉi templo, antaŭ ol foriri morgaŭ frumatene.”

“Majstro,” demandis Luna Sinjorino, “kiu templo do?”

La bonzo fingre montris al la alia flanko de la vojo kaj diris:

“Tie estas la templo.”

Li do kondukis ilin tien, kaj ili trovis, ke ĝi estas la templo Eterna Feliĉo, kiun Luna Sinjorino rekonis kiel tiun, kiun ŝi iam vizitis en la pasinteco.

和尚道：“你既不与我徒弟，如今天色已晚，也走不出路去。番人就来，也不到处处，你且跟我到这寺中歇一夜，明早去罢。”吴月娘问：“师父，是那寺中？”那和尚用手只一指，道：“那路旁便是。”和尚引着来到永福寺。吴月娘认的是永福寺，曾走过一遭。

Kiam ili alvenis tien, ili trovis, ke la ĉefbonzo kaj pli ol duono de la bonzoj jam forkuris; restis tie nur kelkaj djan-bonzoj, kiuj sidis en la lotusa pozicio en la kontemplejo en la malantaŭo, kie granda glazurita lampo lumis antaŭ statuo de la Budho, kaj incenso brulis en la incensujo. Tiam la suno jam subiris.

Tiun vesperon, Luna Sinjorino, kune kun Wu la Dua, Dai'an, Eta Jado kaj Xiaoge, entute kvin personoj, noktis en la ĉefbonzejo de la templo. Iuj el la junaj bonzoj rekonis ŝin kaj provizis Lunan Sinjorinon kaj la aliajn per nutraĵo. Dume Djan-majstro de Neĝa Ravineto Pujing sidis en la lotusa pozicio kun la kruroj krucitaj sur sidilo por kontemplado en la kontemplejo, frapadante lignan fiŝon dum sia voĉlego de sutroj. Luna Sinjorino, kune kun Eta Jado kaj Xiaoge, dormis sur la lito, dum Wu la Dua kaj Dai'an dormis kune sur la planko. Suferinte de alarmo kaj laciĝo, ili rapide endormiĝis.

比及来到寺中，长老僧众都走去大半，止有几个禅和尚在后边打座。佛前点着一大盏琉璃海灯，烧看一炉香。已是日色衔山时分，当晚吴月娘与吴二舅、玳安、小玉、孝哥儿，男女五口儿，投宿在寺中方丈内。小和尚有认的，安排了些饭食，与月娘等吃了。那普静老师，趺坐在禅堂床上敲木鱼，口中念经。月娘与孝哥儿、小玉在床上睡，吴二舅和玳安做一处，着了荒乱辛苦底人，都睡着了。

La sola persono inter ili, kiu ne falis en profundan dormon, estis Eta Jado, kiu leviĝis kaj observis tra fendeto en la pordo de la ĉefbonzejo, kiel Pujing voĉlegis sutrojn.

Kiam la noktomezo iom post iom alproksimiĝis, tiam la metale malvarma vento blovis, la oblikva luno verŝis palan lumon, ĉia bruo de homaj aktivecoj ĉesis, kaj ĉio estis en silento inter la ĉielo kaj la tero. Ĵetante rigardon al la granda glazurita lampo antaŭ statuo de la Budho, ŝi vidis, ke ĝi duone lumas, sed ne estingita. Kiam la djan-majstro Pujing konsideras, ke la imperio estas en stato de malordo, la popolo suferas katastrofon, kaj ke la kadavroj de tiuj, kiuj estis mortigitaj en bataloj, estas nekalkuleblaj en nombro, kun granda kompatemo kaj senlima bonkoreco, respektoplene alparolante la Budhon, li voĉlegas sutrojn kun la celo savi la vagantajn animojn, liberigi ilin de ilia malnova rankoro, forigi la obstaklojn sur ilia vojo, por ke ili povu reenkarigi. Ĉe tio li voĉlegas sorĉkanton por forigi malamikecon inter la homoj en pli ol cent fojoj. Iom pli poste, ekblovas malvarma filtriĝema vento, kaj aperas dekoj da fantomoj, el kiuj unuj estas kun frunto brulvundita, taŭzita hararo kaj malpura vizaĝo, aliaj kun detranĉitaj manoj aŭ rompitaĵoj brakoj, elŝiritaj intestoj aŭ koro, kaj ankoraŭ aliaj sen kapo kaj kun kriplitaj membroj, aŭ kun ŝlosita peza kolkateno sur sia kolo. Ili ĉiuj venas, por esti iluminitaj de la sorĉkanto de la djan-majstro, kaj staras ambaŭflanke de li. La djan-majstro do alparolas ilin:

“Vi aro da vivaj estaĵoj, volas nur venĝi vin unu kontraŭ la alia, rifuzante liberigi vin de malamo kaj serĉi repaciĝon. Kiam do tio ĉi povos veni al sia fino? Vi ĉiuj devos atente aŭskulti,

kion mi diros, se ĉiu el vi deziras sekvi sian apartan vojon al la reenkarniĝo. Jen la gatao:

止有小玉不曾睡熟，起来在方丈内，打门缝内看那普静老师父念经。看看念至三更时，只见金风淅淅，斜月朦朦，人烟寂静，万籁无声。佛前海灯，半明不暗。这普静老师见天下荒乱，人民遭劫，阵亡横死者极多，发慈悲心，施广惠力，礼白佛言，荐拔幽魂，解释宿冤，绝去挂碍，各去超生。于是诵念了百十遍解冤经咒。少顷，阴风淅淅，冷气飕飕。有数十辈焦头烂额，蓬头泥面者，或断手折臂者，或有剖腹剜心者，或有无头跛足者，或有吊颈枷锁者，都来悟领禅师经咒，列于两旁。禅师便道：“你等众生，冤冤相报，不肯解脱，何日是了？汝当谛听吾言，随方托化去罢。

*Mi instigas vin ne nutri malamon;
Akra malamo estas malfacile solvebla.
Malamo povas naskiĝi en iu ajn momento,
Sed ĝi ne povas solviĝi dum mil tagoj.
Se oni repagas al iu bonon pro malbono,
Tio estas kvazaŭ varma akvo verŝita sur neĝon.
Se oni repagas al iu malbonon pro malbono,
Tio estas kvazaŭ lupo renkontiĝanta kun skorpio.
Mi vidas, ke tiuj, kiuj nutras rankoron,
Ĉiuj lasas sin turmenti kaj ruinigi de rankoro.
Tiuj, kiuj konfesas siajn pekojn kaj pentas,
Povas trapenetri sian propran naturon;
Tiuj, kiuj komprenas sian originan menson,
Nature povas senigi sin je sia tuta rankoro.
La potenco de tiu ĉi sankta teksto,
Elaĉetas la homon el lia malbona karmo.
Ĉiu el vi povas reenkarniĝi,
Se vi nutras en la koro nenian malamon.”*

偈曰：

劝尔莫结冤，冤深难解结。
一日结成冤，千日解不彻。
若将冤解冤，如汤去泼雪。
若将冤报冤，如狼重见蝎。
我见结冤人，尽被冤磨折。
我今此忏悔，各把性悟彻。
照见本来心，冤愆自然雪。
仗此经力深，荐拔诸恶业。
汝当各托生，再勿将冤结。

Ĉe tio, la aro da fantomoj dankas lin kaj malaperas.

Eta Jado sekrete ekzamenis ilin, sed ŝi rekonis nenium.

Momenton poste envenas grandstatura viro, kiu estas tutkorpe kirasita kun gorĝo trapikita de sago.

“Mi estas Zhou Xiu, la ĉefkomandanto,” li diras al la djan-majstro. “Dum la batalo kontraŭ barbara generalo, mi mortis sur la batalkampo. Dank’ al via animsava admono, mi ĵus jam reenkarniĝis en la Orienta Ĉefurbo kiel la dua filo de Shen Jing, kun la nomo de Shen Shoushan.”

当下众魂都拜谢而去。小玉窃看，都不认得。少顷，又一大汉进来，身長七尺，形容魁

伟，全装贯甲，胸前关着一矢箭，自称“统制周秀，因与番将对敌，折于阵上，今蒙师荐拔，今往东京，托生于沈镜为次子，名为沈守善去也。”

Apenaŭ li finas sian parolon, alia viro aperas, vestita en impone bela vesto, kiu diras:

“Mi estas Ximen Qing, riĉulo el la subprefektujo Qinghe, kiu mortis suferante likadon de sango en la urino. Dank’ al via animsava admono, mi ĵus jam reenkariniĝis en la Orienta Ĉefurbo kiel la dua filo de la riĉulo Shen Tong, kun la nomo de Shen Yue.”

Eta Jado rekonis en li sian antaŭan mastron kaj estis tro timigita por eligi iun ajn vorton.

Momenton poste, ankoraŭ alia persono aperas, portante sian kapon en siaj manoj, kun la korpo komplete kovrita de sango, kaj diras:

“Mi estas Chen Jingji, kiu estis murdita de Zhang Sheng. Dank’ al via animsava admono kaj la povo de la sanktaj tekstoj, mi jam reenkariniĝis en la Orienta Ĉefurbo kiel filo de Wang-familio.”

言未已，又一人，素体荣身，口称是清河县富户西门庆，“不幸溺血而死，今蒙师荐拔，今往东京城内，托生富户沈通为次子沈越去也。”小玉认的是他爹，唬的不敢言语。已而又有一人，提着头，浑身皆血，自言是陈敬济，“因被张胜所杀，蒙师经功荐拔，今往东京城内，与王家为子去也。”

Post tio, aperas virino, kiu portas ankaŭ sian kapon en siaj manoj, kun la brusto plene kovrita per sango, kaj diras:

“Mi estas la edzino de Wu Da kaj poste kromedzino de Ximen Qing, Ora Lotuso, kiu malfeliĉe estis mortigita de mia malamiko Wu Song. Dank’ al via animsava admono, mi jam renaskiĝis en la Orienta Ĉefurbo kiel filino de Li-familio.”

Post tio, aperas ankoraŭ unu viro, kiu estas malaltastatura kun vizaĝo plumbokolora, kaj diras:

“Mi estas Wu Da, kiu mortis rezulte de la venenado fare de Ora Lotuso instigita de la maljunulino Wang. Dank’ al via animsava admono, mi jam reenkariniĝis en Xuzhou kiel filo de Fan-familio en vilaĝo.”

已而又见一妇人，也提着头，胸前皆血。自言：“奴是武大妻、西门庆之妾潘氏是也。不幸被仇人武松所杀。蒙师荐拔，今往东京城内黎家为女托生去也。”已而又有一人，身躯矮小，面背青色，自言是武植，“因被王婆唆潘氏下药吃毒而死，蒙师荐拔，今往徐州乡民范家为男，托生去也。”

Pli poste, aperas ankoraŭ unu virino, kies vizaĝo estas flava kaj malgrasa, kun la korpo gutanta sangon, kaj diras:

“Mi estas Florvazo, la edzino de Hua Zixu kaj post kromedzino de Ximen Qing. Mi mortis de abunda sangado de la utero. Dank’ al via animsava admono, mi jam reenkariniĝis en la Orienta Ĉefurbo kiel filino de la komandanto Yuan.”

Post tio, aperas ankoraŭ alia viro, kiu diras:

“Mi estas Hua Zixu, kiu suferis malfeliĉon esti kolerigita de mia edzino ĝis morto. Dank’ al via animsava admono, mi jam reenkariniĝis en la Orienta Ĉefurbo kiel filo de la familio de la bataliona komandanto Zheng.”

Post tio, aperas ankoraŭ alia virino kun siaj ŝulaĉoj ligitaj ĉirkaŭ sia kolo, kiu diras:

“Mi estas la edzino de la servisto Laiwang de Ximen Qing. Mi pendigis min ĝis morto. Dank’ al via animsava admono, mi jam reenkariniĝis en la Orienta Ĉefurbo kiel filino de Zhu-familio.”

已而又有一妇人，面色黄瘦，血水淋漓，自言：“妾身李氏，乃花子虚之妻，西门庆之妾，因害血山崩而死。蒙师荐拔，今往东京城内，袁指挥家托生为女去也。”已而又一男，

自言花子虚，“不幸被妻气死，蒙师荐拔，今往东京郑千户家托生为男。”已而又见一女人，颈缠脚带，自言西门庆家人来旺妻宋氏，“自缢身死，蒙师荐拔，今往东京朱家为女去也。”

Pli poste, aperas ankoraŭ alia virino, kiu estas flavpala kaj malgrasa, kaj diras:

“Mi estas Umeffloro, la edzino de la ĉefkomandanto Zhou Xiu. Mi pereis de konsumiĝo ŝuldata al troaj seksaj bezonoj. Dank’ al via animsava admono, mi jam reenkarniĝis en la Orienta Ĉefurbo kiel filino de Kong-familio.”

Post tio, aperas ankoraŭ alia viro, kiu estas komplete nuda kun distaŭzita hararo kaj kies tuta korpo estas kovrita de batkontuzoj, kaj diras:

“Mi estas Zhang Sheng, kiu estis batita ĝis morto. Dank’ al via animsava admono, mi jam renaskiĝis kiel filo de la malriĉa Gao-familio en la loko Daxing proksime de la Orienta Ĉefurbo.”

Post tio, aperas ankoraŭ alia virino, kun ŝnuro ĉirkaŭ sia kolo, kaj diras:

“Mi estas Bela Neĝo, antaŭa kromedzino de Ximen Qing. Malfeliĉe mi min pendigis ĝis morto. Dank’ al via animsava admono, mi jam reenkarniĝis kiel filino de la malriĉa Yao-familio ekster la Orienta Ĉefurbo.”

已而又一妇人，面黄肌瘦，自言周统制妻庞氏春梅，“因色瘠而死，蒙师荐拔，今往东京与孔家为女，托生去也。”已而又一男子，裸形披发，浑身杖痕，自言是打死的张胜，“蒙师荐拔，今往东京大兴卫贫人高家为男去也。”已而又有一女人，项上缠着索子，自言是西门庆妾孙雪娥，不幸自缢身死，“蒙师荐拔，今往东京城外贫民姚家为女去也。”

Post tio aperas ankoraŭ unu juna virino kun longa ŝnuro ĉirkaŭ sia kolo, kaj diras:

“Mi estas la filino de Ximen Qing kaj la edzino de Chen Jingji. Ankaŭ mi min malfeliĉe pendigis ĝis morto. Dank’ al via animsava admono, mi jam reenkarniĝis kiel filino de Zhong Gui, policano, kiu loĝas ekster la Orienta Ĉefurbo.”

Post tio, aperas ankoraŭ alia juna viro, kiu identigas sin per la vortoj:

“Mi estas Zhou Yi. Ankaŭ mi estis batita ĝis morto. Dank’ al via animsava admono, mi jam renaskiĝis kiel filo en Gao-familio, kiu loĝas ekster la Orienta Ĉefurbo, kaj estas nomata Gao Liuzhu.”

Fininte sian parolon, ĉiu el ili tuj subite malaperas.

Eta Jado estis timtremigita de tio, kion ŝi vidis kaj aŭdis, kaj pensis en si, ke tiu ĉi bonzo ja kapablas komunikiĝi kun la fantomoj de la mortintoj.

已而又一女人，年小，项缠脚带，自言“西门庆之女，陈敬济之妻，西门大姐是也，不幸亦缢身死，蒙师荐拔，今往东京城外，与番役钟贵为女，托生去也。”已而又见一小男子，自言周义，“亦被打死，蒙师荐拔，今往东京城外高家为男，名高留住儿，托生去也。”言毕，各恍然不见。小玉唬的战栗不已。原来这和尚，只是和这些鬼说话。

Ŝi volis reiri al la lito kaj paroli al Luna Sinjorino pri tio, sed ŝi rimarkis, ke ŝia mastrino profunde dormas. Tiam la animo de la vera naturo de Luna Sinjorino sonĝis, ke ŝi, kune kun Wu la Dua kaj la aliaj, estas sur la vojo al la prefektujo Jinan, kun koliero el cent perloj importitaj kaj zonĉeno inkrustita per juvelŝtonoj en la mano, por serĉi rifuĝon ĉe Yun Lishou. Kiam ili atingas Jinan, ŝi demandas pri la rezidejo de la regiona vickomandanto Yun Lishou. Oni anoncas pri ŝia alveno al Yun Lishou. Sciiĝinte, ke ŝi venas kun la celo plenumi la geedziĝon de iliaj infanoj, li tuj elvenas intime saluti ŝin kiel malnovan konatinon, kaj ili interŝanĝas la kutimajn ĝentilaĵojn.

Tiam la edzino de Yun Lishou jam mortis antaŭ nelonge, sekve li petas sian najbarinon, la maljunan sinjorinon Wang, teni kompanion kun Luna Sinjorino. Li aranĝas luksan bankedon honore al Luna Sinjorino en la posta halo, kaj regalias Wu la Duan kaj Dai’an en alia loko.

Dum ilia konversacio, Luna Sinjorino mencias sian fuĝon for de la invadinta armeo kaj sian

deziron pri la tuja geedziĝo de iliaj infanoj. Ŝi ankaŭ elprenas la kolieron el cent perloj kaj zonĉenon inkrustitan per juvelŝtono kaj prezentas ilin kiel nuptan donacon. Yun Lishou ilin akceptas, sed diras nenion pri la geedziĝo de iliaj infanoj.

正欲向床前告诉吴月娘，不料月娘睡得正熟，一灵真性，同吴二舅众男女，身带着一百颗胡珠，一柄宝石绦环，前往济南府，投奔亲家云理守。一路到于济南府，寻问到云参将寨门，通报进去。云参将听见月娘送亲来了，一见如故。叙毕礼数。原来新近没了娘子，央浼邻舍王婆来陪待月娘，在后堂酒饭，甚是丰盛。吴二舅、玳安另在一处管待。因说起避兵就亲之事，因把那百颗胡珠、宝石绦环教与云理守，权为茶礼。云理守收了，并不言其就亲之事。

Tiun vesperon, li ankaŭ aranĝas, ke la maljunulino Wang pasigu la nokton kun Luna Sinjorino en la sama ĉambro por ŝin sondi.

“Kvankam Yun Lishou estas milita oficisto,” diras la maljunulino Wang, “tamen li estas klerulo amanta legi klasikaĵojn, kaj de kiam vi kaj lia edzino iam gefianĉigis viajn infanojn, vi jam eniris en lian menson. Neatendite lia edzino mortis, kaj li restas sola kiel vidvo. Nun li servas kiel la komandanto de tiu ĉi montara regiono. Kvankam lia pozicio ne estas tre alta, tamen, rajdante sur la ĉevalo, li komandas la trupojn; deĉevaliĝinte, li regas la lokajn popolanojn; kaj ilia vivo aŭ morto estas en liaj manoj. Se vi bonvole ne rifuzos al li, li dezirus ĝui kun vi la ĝojon de geedzoj, tiel ke vi povos dividi kun li vian komunan feliĉon. Tiam via geedziĝo certe estos perfekta, solidigita per la geedziĝo de viaj infanoj. Post kiam la paco estos restarigita, estos ne tro malfrue, ke vi kune revenos al via hejmloko.”

Kiam Luna Sinjorino aŭdas tiujn ĉi vortojn, ŝi paliĝas de konsterniĝo kaj estas reduktita al silento dum longa tempo.

到晚，又教王婆陪月娘一处歇卧。将言说念月娘，以挑探其意，说：“云理守虽武官，乃读书君子，从割衫襟之时，就留心娘子。不期夫人没了，鳏居至今。今据此山城，虽是任小，上马管军，下马管民，生杀在于掌握。娘子若不弃，愿成伉俪之欢，一双两好，令郎亦得谐秦晋之配。等待太平之日，再回家去不迟。”月娘听言，大惊失色，半晌无言。

La maljunulino raportas al Yun Lishou, kion ŝi diris al Luna Sinjorino, kaj en la sekva vespero li preparas vinon kaj frandaĵojn en la posta halo kaj invitas Lunan Sinjorinon al kuna vintrinko tie. Luna Sinjorino pensas, ke tio estas nur formala aprobo de la geedziĝo de Xiaoge kun lia filino, kaj tuj iras tien. Post kiam ili kune sidiĝas, Yun Lishou diras al ŝi:

“Bofranko, vi povos ne scii pri tio, ke kvankam mi servas en tiu ĉi montara regiono, mi tamen komandas konsiderindan nombron da homoj, kaj mi posedas grandan kvanton da mono, luksaj vestoj, oro kaj arĝento, kaj aliaj valoraĵoj. La sola, kio mankas al mi, estas edzino, kiu zorgus pri la mastrumado. Jam longan tempon mi tiel forte pensas pri vi, kiel soifa persono sopiranta al trinko aŭ kiel persono turmentata de varmo sopiranta al malvarmeto. Mi neniam atendis, ke vi povos montri vin ĉi tie hodiaŭ por plenumi la geedziĝon de via filo kun mia filino. Ĉu tio ne estas ĉieldonacita okazo por nia duobla feliĉo? Se ankaŭ ni fariĝos geedzoj, ni povos kune ĝui nian dumvivan plezuron en tiu ĉi loko. Kion do vi pensas pri mia propono?”

这王婆回报云理守。次日夕晚，置酒后堂，请月娘吃酒。月娘只知他与孝哥儿完亲，连忙来到席前叙坐。云理守乃道：“嫂嫂不知，下官在此虽是山城，管着许多人马，有的是财帛衣服，金银宝物，缺少一个主家娘子。下官一向思想娘子，如喝思浆，如热思凉。不想今日娘子到我这里与令郎完亲，天赐姻缘，一双两好，成其夫妇，在此快活一世，有何不可？”

Aŭdinte lian proponon, Luna Sinjorino ekkoleras kaj sakras kontraŭ Yun Lishou:

“Kiu povus kredi, ke vi estas nenio alia, ol hunda skeleto envolvita en homa haŭto. Mia

mortinta edzo ĉiam traktis vin kiel honorindan personon. Kiel vi kuraĝas paroli al mi per tia bruta lingvo?”

Ĉe tio Yun Lishou, kun frivola rideto, ekpaŝas antaŭen kaj, enbrakiginte Lunan Sinjorinon, diras al ŝi:

“Sinjorino, vi vivis en via propra hejmo; por kio do vi venis al mia loko ĉi tie? Kiel diras la proverbo: *estas facile fari negocon kun la kliento, kiu propramove venas al la pordo de la butikoj*. Sed, mia kara, mi ne scias kial, de kiam miaj okuloj ektuŝis vin, vi tuj fascine kaptis min je la animo. Por ni ekzistas neniuj aliaj solvoj, ol vi edziniĝos al mi, ĉiaokaze.”

月娘听了，心中大怒，骂道：“云理守，谁知你人皮包着狗骨！我过世丈夫不曾把你轻待，如何一旦出此犬马之言？”云理守笑嘻嘻向前，把月娘搂住，求告说：“娘子，你自家中，如何走来我这里做甚？自古上门买卖好做，不知怎的，一见你，魂灵都被你摄在身上。没奈何，好歹完成了罢。”

Tion dirante, li alportas iom da vino por dividi kun Luna Sinjorino.

“Antaŭ ĉio, iru do al la antaŭo kaj voku mian pli junan fraton ĉi tien,” diras Luna Sinjorino. “Mi havas ion, kion mi bezonas diri al li.”

Ĉe tio Yun Lishou diras kun rido:

“Via pli juna frato kaj via servisto Dai’an jam estis mortigitaj de mi.”

Li do diras al siaj servosoldatoj:

“Alportu tiujn objektojn ĉi tien, por montri ilin al la sinjorino.”

Momenton poste, ĉe la lampa lumo, ili enportas la du kapojn de Wu la Dua kaj Dai’an, kiuj gutadas sangon. Luna Sinjorino tuj ekpaliĝas de teruro, ĝis la vizaĝo ekhavas la koloron de tero, kaj ŝi eksplodas per plorego kaj falas sur la plankon. Yun Lishou paŝas antaŭen kaj brakume levas ŝin kun la diro:

“Kara sinjorino, vi ne bezonas esti tiel ĉagrenita. Ĉar via frato jam mortis, vi povos fari nenion alian, ol fariĝi mia edzino. Mi estas regiona komandanto, sekve tia geedziĝo neniel malhonoros vin.”

一面拿过酒来和月娘吃。月娘道：“你前边叫我兄弟来，等我与他说句话。”云理守笑道：“你兄弟和玳安儿小厮，已被我杀了。”即令左右：“取那件物事，与娘子看。”一时，灯光下，血沥沥提了吴二舅、玳安两颗头来。唬的月娘面如土色，一面哭倒在地。被云理守向前抱起：“娘子不须烦恼，你兄弟已死，你就与我为妻。我一个总兵官，也不玷辱了你。”

Luna Sinjorino pensas en si:

“Ĉar tiu ĉi ulaĉo jam mortigis mian pli junan fraton kaj mian serviston, se mi ne cedos al li, kredeble ankaŭ mi perdos mian vivon.”

Ŝi do ŝajnigas, kvazaŭ ŝi turnas sian koleron en ĝojon, kaj diras:

“Vi devos akcepti miajn kondiĉojn, antaŭ ol mi konsentos edziniĝi al vi.”

Yun Lishou respondas:

“Kiaj ajn povos esti viaj kondiĉoj, mi ilin akceptos.”

“Mi ne edziniĝos al vi,” diras Luna Sinjorino, “antaŭ ol mia filo edziĝos al via filino.”

“Konsentite!” respondas Yun Lishou.

月娘自思道：“这贼汉将我兄弟家人害了命，我若不从，连我命也丧了。”乃回嗔作喜，说道：“你须依我，奴方与你做夫妻。”云理守道：“不拘甚事，我都依。”月娘道：“你先与我孩儿完了房，我却与你成婚。”云理守道：“不打紧。”

Tion dirinte, li elvokas sian filinon kaj puŝas ŝin al Xiaoge, por ke ili povu kune dividi la ampokalon kaj ligi la nuptan nodon, kaj tiele ili fariĝas geedzoj. Nur post tio Yun Lishou tiras

Lunan Sinjorinon al si kaj proponas kune ludi la nub-kaj-pluvan ludon; sed ŝi rezistas kaj rifuzas lin obei.

Ĉe tio Yun Lishou furioziĝas kaj sakras kontraŭ ŝi:

“Vi virinaĉo! Vi min trompis, logante min edzinigi mian filinon al via filo, kaj nun vi rifuzas plenumi vian promeson. Ĉu vi pensas, ke mi ne kuraĝas mortigi vian filon?”

Tion dirinte, li paŝas al la kapo de la lito, kie li tiras glavon el la ingo kaj svingas ĝin malsupren, tiel ke sango ekŝprucas al la distanco de pluraj paŝoj.

一面叫出云小姐来，和孝哥儿推在一处，饮合卺杯，绾同心结，成其夫妇。然后扯月娘和他云雨。这月娘却拒阻不肯，被云理守忿然大怒，骂道：“贱妇！你哄的我和你儿子成了婚姻，敢笑我杀不得你的孩儿？”向床头提剑，随手而落，血溅数步之远。

Tri-futa akra glavo falas sur la kolon;

La freŝa sango ekinundas ĉion ĉirkaŭe.

正是：

三尺利刀着项上，满腔鲜血湿模糊。

Kiam Luna Sinjorino vidas, ke li jam hakis Xiaoge ĝis morto, ŝi ne povas sin deteni de tim-ekkrio.

Tiumomente ŝi ekvekiĝis kaj trovis, ke tio estas nur Nanke-songo. Ŝi estis tiel terurita, ke ŝi estis komplete kovrita de malvarma ŝvito kaj ŝia tuta korpo malseketiĝis.

“Strange! Strange!” ŝi ripete kriis.

“Sinjorino,” demandis Eta Jado, kiu kuŝis apude, “pro kio vi ploras?”

“Ĝus mi havis malbonaŭguran songon,” respondis Luna Sinjorino kaj poste rakontis al ŝi ĉion pri ĝi.

月娘见砍死孝哥儿，不觉大叫一声。不想撒手惊觉，却是南柯一梦。唬的浑身是汗，遍体生津。连道：“怪哉，怪哉。”小玉在旁，便问：“奶奶怎的哭？”月娘道：“适间做得一梦不详。”不免告诉小玉一遍。

“Kelkan tempon antaŭe mi ne povis endormiĝi,” diris Eta Jado, “kaj, ellitiĝinte, mi kaŝe rigardis tra fendeto en la pordo kaj vidis, ke la bonzo parolas al fantomoj preskaŭ la tutan nokton. Ĝus mia mortinta mastro, la Kvina Sinjorino, la Sesa Sinjorino, la bofilo Chen, la garnizona komandanto Zhou Xiu, Bela Neĝo, la edzino de Laiwang, la filino de Ximen, ĉiuj venis paroli al li kaj poste malaperis unu post la alia.”

“Multaj el ili estas enterigitaj en la tombejo malantaŭ tiu ĉi templo,” diris Luna Sinjorino. “Estas tute ne mirinde, ke la animoj de tiuj, kiuj mortis mafeliĉan morton, povas sin montri dum la kvieteco de la nokto.”

小玉道：“我倒刚才不曾睡着，悄悄打门缝见那和尚原来和鬼说了一夜话。刚才过世俺爹、五娘、六娘和陈姐夫、周守备、孙雪娥、来旺儿媳妇子、大姐都来说话，各四散去了。”月娘道：“这寺后见埋着他每，夜静时分，屈死淹魂如何不来！”

La mastrino kaj la servistino daŭrigis sian parolon, ĝis kokoj kriis ĉe la tagiĝo. Luna Sinjorino haste ellitiĝis, lavis al si la vizaĝon, kaj eniris en la kontemplejon por kulti kaj fari riverencojn al la Budho kaj ekbruligi la incenson.

Neatendite ŝi renkontis tie la majstron Pujing, kiu sidis sur sia sidilo por kontemplado. Li alparolis ŝin per mallaŭta voĉo:

“Sinjorino Wu, ĉu vi jam venis al via plena kompreno pri tio, kion mi diris al vi?”

Luna Sinjorino genuiĝis kaj salutis kunmetante la manplatojn sur la brusto, dirante:

“Permesu al mi informi vian bonzan moŝton, ke via disĉiplino Wu, kun siaj karnaj okuloj kaj

mortema korpo, ne rekonis en vi la enkarniĝon de antikva budho, sed dank' al la sonĝo, el kiu mi ĵus vekigis, mi nun jam atingis plenan komprenon.”

娘儿们说了回话，不觉五更，鸡叫天明。吴月娘梳洗面貌，走到禅堂中，礼佛烧香。只见普静老师在禅床上高叫：“那吴氏娘子，你如何可省悟得了么？”这月娘便跪下参拜：“上告尊师，弟子吴氏，肉眼凡胎，不知师父是一尊古佛。适间一梦中都已省悟了。”

“Se vi jam atingis plenan komprenon,” diris la majstro, “vi ne bezonos daŭrigi tiun ĉi vojaĝon. Se vi irus tien, ĉiu el vi kvin vane perdus sian vivon. La fakto, ke vi kaj via filo renkontis min, estas io, kio venas el la radikoj de bono, kiujn vi plantis en viaj pasintaj tagoj. Se ne estus tiele, vi neeviteble suferus kruelan apartiĝon de via karno kaj sango. Antaŭe, via mortinta edzo Ximen Qing kulpis pri malbonaj agoj kaj faris nenion bonan. Tiu ĉi filo via renaskiĝis en vian familion por estonte disipi viajn riĉaĵojn kaj detrui vian proprietaĵon, kun la fina rezulto de lia korpo kaj lia kapo en malsamaj lokoj. Nun mi estas preta fari savon al li, preninte lin kiel mian disĉiplon. Kiel diras la proverbo: *kiam unu filo fariĝas bonzo, estiĝas savo por naŭ generacioj*. Tio ankaŭ havos bonan efikon sur vian mortintan edzon, kompensante lian malbonan karmon, tiel ke ankaŭ li povos atingi saviĝon. Se vi ne kredas min, sekvu min, kaj mi lasos al vi vidi propraokule.”

老师道：“既已省悟，也不消前去，你就去，也无过只是如此。倒没了丧了五口儿性命。你这儿子，有分有缘遇着我，都是你平日一点善根所种。不然，定然难免骨肉分离。当初，你去世夫主西门庆造恶非善，此子转身托化你家，本要荡散其财本，倾覆其产业，临死还当身首异处。今我度脱了他去，做了徒弟，常言‘一子出家，九祖升天’，你那夫主冤愆解释，亦得超生去了。你不信，跟我来，与你看一看。”

Ĉe tio, li eniris per grandaj paŝoj en la ĉefbonzejon, kie ili povis vidi, ke Xiaoge ankoraŭ kuŝas sur la lito. La majstro levis sian bonzan bastonon en sia mano kaj tuŝis lin sur la kapo, dirante al Luna Sinjorino kaj la aliaj, ke ili rigardu. Subite li sin turnis, kaj ili povis vidi, ke li estas Ximen Qing, kun peza kolkateno ĉirkaŭ sia kolo kaj fera ĉeno ĉirkaŭ sia talio. La majstro ree tuŝis lin per sia bastono, kaj li denove fariĝis Xiaoge dormanta sur la lito, ĝuste kiel antaŭe. Kiam Luna Sinjorino vidis tion ĉi, ŝi pretervole laŭte ekploris. Ŝi ekkomprenis, ke Xiaoge estas la reenkarniĝo de Ximen Qing.

于是叉步来到方丈内，只见孝哥儿还睡在床上。老师将手中禅杖，向他头上只一点，教月娘众人看。忽然翻过身来，却是西门庆，项带沉枷，腰系铁索。复用禅杖只一点，依旧是孝哥儿睡在床上。月娘见了，不觉放声大哭，原来孝哥儿即是西门庆托生。

Baldaŭ Xiaoge vekigis, kaj Luna Sinjorino diris al li:

“Vi devos sekvi la majstron kaj fariĝi bonzo.”

Oni do rasis al li la kapon antaŭ la statuo de la Budho, kaj li ricevis la vertofroton fare de la majstro kiel formalan signon de sia bonziĝo.

Ĉe tio la kompatinda Luna Sinjorino brakumis lin kaj amare ploregis, sentante, ke ŝi vane vartis kaj edukis lin kun la espero, ke li, atinginte la aĝon de dek kvin jaroj, povos heredi kaj daŭrigi la familian linion. Ŝi neniam atendis, ke renkontinte tiun ĉi djan-majstron, li estos forŝirita disde ŝi kaj fariĝos asketa bonzo. Ankaŭ Wu la Dua, Eta Jado, kaj Dai'an sentis grandan triston.

Ĉe tio, la majstro Pujing formale akceptis Xiaoge kiel disĉiplon, donante al li la religian nomon Mingwu, aŭ Klara Ekkompreno, kaj diris adiaŭ al Luna Sinjorino. Ĉe la foriro, li diris al ŝi:

“Ne necesas al vi plu vojaĝi antaŭen. Baldaŭ la barbara armeo retiriĝos. La tuta teritorio dividiĝos en du partojn, la Sudon kaj la Nordon. Kaj la Centra Ebenaĵo baldaŭ havos sian reganton. En ne pli ol dek tagoj, la armitaj trupoj retiriĝos, kaj la teritorio reakiros la pacon. Vi povos reveni

al via hejmo, kaj pasigos viajn tagojn en trankvilo.”

良久，孝哥儿醒了。月娘问他：“如何你跟了师父出家。”在佛前与他剃头，摩顶受记。可怜月娘扯住恸哭了一场，干生受养了他一场。到十五岁，指望承家嗣业，不想被这老师幻化去了。吴二舅、小玉、玳安亦悲不胜。当下这普静老师，领定孝哥儿，起了他一个法名，唤做明悟。作辞月娘而去。临行，分付月娘：“你们不消往前途去了。如今不久番兵退去，南北分为两朝，中原已有个皇帝，多不上十日，兵戈退散，地方宁静了，你每还回家去安心度日。”

“Majstro,” diris Luna Sinjorino, “post kiam vi plenumos la savon de mia filo, en kiu tago de kiu jaro la patrino kaj la filo povos revidi unu la alian?”

Tion dirante, ŝi instinkte alkroĉiĝis al Xiaoge kaj ree eksplodis per laŭta plorego.

“Sinjorino,” diris la majstro, “Ĉesigu vian ploron. Jen alia majstro venas de tie.”

Ili ĉiuj tuj turnis sian kolon por rigardi en la direkto, kiun li montris, kaj ĝuste en tiu momento, kune kun Xiaoge, li transformiĝis en ekblovo da klara vento kaj malaperis el ĉies vido.

月娘便道：“师父，你度托了孩儿去了，甚年何日我母子再得见面？”不觉扯住，放声大哭起来。老师便道：“娘子休哭！那边又有一位老师来了。”哄的众人扭颈回头，当下化阵清风不见了。

Vere:

Trifoje li descendis sur nian mondon sen kono de iu ajn;

Subite li forflugis trans la pinton de la sankta monto Tai.

正是：

三降尘寰人不识，倏然飞过岱东峰。

Nun ni forlasu la majstron kaj lian disĉiplon por plu paroli pri Luna Sinjorino, Wu la Dua kaj la aliaj. Ili daŭrigis la restadon en la templo Eterna Feliĉo ĉirkaŭ dek tagojn. Dum tiu tempo, efektive la Granda Jin-reĝimo deklaris Zhang Banchang marioneta imperiestro en la Orienta Ĉefurbo, kun hierarkio de civilaj kaj militaj oficistoj. Poste la du imperiestroj de Song-dinastio, Huizong kaj Qinzong, estis eskortitaj kiel kaptitoj al la Nordo. La princo Kang eskapis sur argila ĉevalo¹ trans la riveron Jangzio, kaj surtroniĝis en la urbo Jiankang. Tiu ĉi estis la imperiestro Gaozong de la Suda Song-dinastio. Li nomumis Zongze ĉefgeneralulo, kiu sukcese reakiris la perditajn partojn de Shandong kaj Hebei el la manoj de la Jin-invadintoj. Sekve de tio la lando splitiĝis en du reĝimojn, la Jin-reĝimon kaj la Suda Song-dinastion, kun la rezulto, ke la lando ree estis en paco, kaj la popolo reprenis siajn okupojn.

Post tio, kiam Luna Sinjorino revenis hejmen kaj remalfermis sian pordegon de sia rezidejo, ŝi trovis perdita nenion el la familia posedaĵo kaj la meblaro. Poste ŝi ŝanĝis la nomon de Dai'an en Ximen An kaj faris lin la heredanto de ĉio, kio restis el la familia havo. Ekde tiam oni nomis lin Honorinda Juna Sinjoro Ximen, kaj li zorge vivtenis Lunan Sinjorinon en ŝia maljuna aĝo. Ŝi vivis ĝis la aĝo de sepdek jaroj, antaŭ ol morti naturan morton, kio estis la rekompenco, kiun ŝi akiris al si per siaj bonfaroj kaj voĉlegado de la sutroj dum sia vivo.

不说普静老师幻化孝哥儿去了，且说吴月娘与吴二舅众人，在永福寺住了十日光景，果然大金国立了张邦昌在东京称帝，置文武百官。徽宗、钦宗两君北，康王泥马渡江，在建康即位，是为高宗皇帝。拜宗泽为大将，复取山东、河北。分为两朝，天下太平，人民复业。后月娘归家，开了门户，家产器物都不曾疏失。后就把玳安改名做西门安，承受家业，人称呼为“西门小员外”。养活月娘到老，寿年七十岁，善终而亡。此皆平日好善看经之报。

Jen poemo, kiu tion atestas:

Foliumante ĉi romanon, oni dronas en pensado:

*Kiu do povas plene kompreni la ciklon de la Ĉielaj Leĝoj?
Riĉega kaj brutala, Ximen Qing estis sen posteuloj;
Sovaĝa kaj diboĉa, Chen Jingji estis ekstermita.
La boneco de Jada Turo kaj Luna Sinjorino ilin longvivigis;
Pro sia diboĉo Florvazo kaj Umeĥoro tro frue mortis.
Ne mirinde, Ora Lotuso rikoltis la repagon de malbono;
Kaj ŝia fetora reputacio daŭros por ĉiam kaj por eterne.*

有诗为证：

阅阅遗书思惘然，谁知天道有循环。
西门豪横难存嗣，敬济颠狂定被歼。
楼月善良终有寿，瓶梅淫佚早归泉。
可怪金莲遭恶报，遗臭千年作话传。

Noto:

1. Laŭ legendo, kiam la princo Kang eskapis de la invadintaj Jin-trupoj, li noktis en templo. Dum la nokto, li subite vekiĝis kaj aŭdis, ke voĉo diras al li, ke li devos tuj forkuri sur ĉevalo por eviti esti kaptita. Li rapide eliris kaj trovis, ke ĉevalo atendas lin ekster la templo. Li surĉevaliĝis kaj sukcesis transpasi Jangzion. Nur tiam li malkovris, ke estis la argila ĉeval-statuo antaŭ la templo, kiu lin savis.

